

Mangada
JULIO MANGADA ROSENÖRN.
Glorieta de Bilbao, 5. MADRID.
ESPAÑA

PARTES OFICIALES

de la
GUERRA
de los

IMPERIOS CENTRALES

EN
ESPERANTO

DESDE EL 1 DE OCTUBRE 1914
AL 5 DE JUNIO 1915.

COMPUESTO POR 140 HOJAS
NUMERADAS DESDE LA N.º 12 A
LA 151. IMPRESA A UNA SOLA
CARA EN PAPEL AMARILLO



Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj

Großes Hauptquartier, 1. Oktobro, vespere.

Oficiale estas sciigate: Je la 30a de septembro la Germanoj prenis la altaĵojn apud Roye kaj Fresnoy, nordokcidente de Noyon. – Sudoriente de St. Mihiel, je la 1a de oktobro atakoj el Toul estis repuŝataj. La Francoj suferis gravajn perdojn. – La atako kontraŭ Antwerpen estas sukcese daŭrigata.

Sur la orienta militkampoj nenio aliĝis.

Großes Hauptquartier, 2. Oktobro, vespere.

Oficiale estas sciigate: La Francoj denove provis, ĉirkaŭiri la dekstran alon de la germana armeo, sed estis repuŝataj. Sude de Roys la Francoj estas pelitaj el siaj pozicioj. – En la mezo de l'fronto la stato estas neŝanĝita. –

La taĉmentoj antaŭenirantaj en la Argonnen kun gravaj sukcesoj marŝis suden. Oriente de la Maas la Francoj forte atakis okcidenten, sed suferis gravajn perdojn kaj estis repuŝataj.

Antaŭ Antwerpen la fortifikajeto Wavre, St. Catherine kaj la reduto*) Dorpeweldt kun interfortikaĵoj estas atake prenitaj hieraŭ posttagmeze je la 5a. La fortifikajeto Waelhem estas sieĝata. La grava, okcidenten antaŭpostena loko Termonde estas en niaj manoj.

Sur la orienta militkampoj ŝajnas, ke estas preparata antaŭenmarŝo de rusaj taĉmentoj trans la Njemen-riveron kontraŭ la gubernion Suwalki.

Großes Hauptquartier, 3. Oktobro, vespere.

Oficiale estas sciigate: Sur la franca militkampoj gravaj ŝanĝiĝoj hodiaŭ ne okazis. Dum la atako kontraŭ Antwerpen'on estas prenitaj ankaŭ la fortifikajetoj Nierre, Waelhem, Königshock kaj la redutoj inter ili. En la interfortikaĵoj ni prenis 30 kanonojn. La farita truo en la ekstera vico de la fortifikajetoj ebligas nun la atakon kontraŭ la internan fortifikajetan zonon kaj kontraŭ la urbon mem.

Sur la orienta militkampoj estas venkitaj apud Augustow post dutaga forta batalo la tria sibiria kaj partoj de la 22a korpusoj, kiuj sin trovis sur la maldekstra alo de la rusaj armeoj antaŭenirantaj trans la Njemen'on. Pli ol 2000 nevunditaj kaptitoj, nombro da kanonoj kaj maŝinpafiloj estas prenitaj.

*) Reduto: Simpla fortikaĵo el tero, ĉirkaŭita per kavo (Kabe).

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 4. Oktobro, vespere.

Oficiale estas sciigate: Sur la okcidenta militkampoj la batalo sukcese progresas sur la dekstra alo kaj en la Argonnen. - Antaŭ Antwerpen kaj sur la orienta militkampoj la militagoj daŭras laŭplane kaj sen batalo.

Großes Hauptquartier, 5. Oktobro, vespere.

Oficiale estas sciigate: Antaŭ Antwerpen la Germanoj silentigis la fortifikajetojn Kessel kaj Broechem. - Ĉe la dekstra alo en Francujo la bataloj estas sukcese daŭrigataj. - En Polujo la germanaj taĉmentoj, antaŭenirantaj al la Weichsel, atingis la rusajn armeojn.

Wien, 5. Oktobro.

Oficiale estas sciigate: La militagoj en rusa Polujo kaj en Galicio sukcese progresas. Batalante ŝultron ĉe ŝultro, germanaj kaj aŭstriaĵ-hungaraj taĉmentoj repuŝis la Rusojn el Opatow kaj Klimantow al la Weichsel. En la Karpatoj la Rusoj estis plene venkataj ĉe la montoselo de Uzsok.

La vicestro de l'aŭstra generalstabo:
v. Hoefer.

Großes Hauptquartier, 6. Oktobro, vespere.

Oficiale estas sciigate: Pro la ĉiamaj provoj de la Francoj, ĉirkaŭiri nian dekstran alon, ni plilongigis la armefronton ĝis norde de Arras. Ankaŭ okcidente de Lille kaj okcidente de Lens niaj antaŭgvardioj renkontis francan kavalerion. Nia kontraŭatako kontraŭ Arras-Albert-Roye ne jam decidiĝis. Ĉe la fronto inter Oise kaj Maas, apud Verdun kaj en Elsaŝ-Lothringen la stato estas neŝanĝita.

Sur la orienta militkampoj la rusa antaŭenmarŝo kontraŭ orientan Prusujon estas haltigita en la gubernio Suwalki. Apud Suwalki de hieraŭ la Rusoj estas sukcese atakataj. En rusa Polujo germanaj taĉmentoj forpelis je la 4a de oktobro la brigadon de la rusaj pafistoj-gvardianoj el fortikigita pozicio inter Opatow kaj Ostrowice kaj prenis proksimume 3000 kaptitojn, kelkajn kanonojn kaj maŝinpafilojn. - Je la 5a de oktobro 2½ rusaj kavaleriaj divizioj kaj partoj de la helpaj rezervo - taĉmentoj el Ivangorod estis atakataj apud Radom kaj repuŝataj al Ivangorod.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 7. Oktobro.

Tagmeze oni sciigas oficiale: Ankaŭ hieraŭ nia ofensivo per kelkaj bataloj atingis siajn celojn en diversaj lokoj. Laŭ la raporto de generalstaboficiro, kiu per brava flugo revenis el Przemyśl, tiu ĉi fortikaĵo estas defendata de la entuziasmitaj ensidantoj kun granda braveco kaj gardemo. Per kelkaj atakoj eksteren kontraŭ la repelitan rusan fronton ili gajnis multnombrajn kaptitojn. Pro la pafado el la fortikaĵoj ĉiuj atakoj de la Rusoj malsukcesis kun teruraj perdoj. — En la Karpathen neniuj kontraŭulo plu staras okcidente de la montoselo de Wysz-kowo. — La Rusoj enpenetrantaj Hungarujon apud Marmaros-Sziget estas repuŝitaj. Dum la pasinta nokto la urbo revenis en niajn manojn.

La vicestro de laŭstra generalstabo:
v. Hoefer.

Großes Hauptquartier, 7. Oktobro, vespere.

Oficiale. La bataloj ĉe la dekstra germana alo en Francujo ne jam decidigis. Atakoj de la Francoj en la Argonnen kaj ĉe la nordokcidenta fronto de Verdun estis repuŝataj.

Apud Antwerpen la fortikaĵo Broechem estas en niaj manoj. Ni pasis atakante la Nethe-riveron kaj alproksimiĝis al la interna fortifikajeta zono. Angla brigado kaj la Belgoj inter la eksteraj kaj internaj fortifikajetoj estis repuŝataj al Antwerpen. 4 pezaj baterioj, 52 kanonoj, multaj maŝinpafiloj estis prenataj sur la kampo.

La atako de la Rusoj en la gubernio Suwalki estas repuŝita. La Rusoj perdis 2700 kaptitojn kaj 9 maŝinpafilojn. — En Polujo ni prenis 4800 kaptitojn en negrandaj sukcesaj bataletoj okcidente de Iwangorod.

Großes Hauptquartier, 8. Oktobro, vespere.

Oficiale estas sciigite: Antaŭ Antwerpen la fortifikajeto Breendonck estas prenita. La atako kontraŭ la internan fortifikajetan zonon kaj per tio la bombardo de la urbpartoj, kuŝantaj malantaŭ ĝi, komenciĝis, post kiam la komandanto de la fortikaĵo estas deklarinta, ke li prirespondos.

Sur la orienta militkampoj rusa taĉmento enmarŝanta de Lomsha atingis Lyck'on. — De l'okcidenta militkampoj okazintaĵoj ne estas sciigataj. Iom ni progresis apud St. Mihiel kaj en la Argonnen-arbaroj.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj

Großes Hauptquartier, 9. Oktobro, vespere.

Oficiale oni sciigas: Hodiaŭ antaŭtagmeze kelkaj fortifikajetoj de la interna fortikaĵa zono de **Antwerpen** estas prenitaj. **La urbo estas en la manoj de la Germanoj** de post la hodiaŭa posttagmezo. La komandanto kaj la garnizono forlasis la teritorion de la fortikaĵo. Nur en kelkaj fortifikajetoj sidas ankoraŭ kontraŭuloj. La posedo de Antwerpen per tio ne estas malfortigata.

Großes Hauptquartier, 10. Oktobro, je la 11a antaŭtagmeze.

La tuta fortikaĵo Antwerpen kun ĉiuj fortifikajetoj estas en niaj manoj.

Großes Hauptquartier, 10. Oktobro, vespere.

Oficiale oni sciigas: Post nur dekdu taga sieĝo **Antwerpen** kun ĉiuj fortifikajetoj venis en niajn manojn. Je la 28a de septembro okazis la unua pafo kontraŭ la eksteran fortifikajetan zonon. Je la 1a oktobro fortifikajetoj estis prenataj la unuan fojon. Je la 6a kaj 7a de oktobro niaj infanterio kaj artilerio transiris la Netheriveron, kiu estis per digo haltigita kaj preskaŭ ĉie estis 400 metrojn larĝa. Je la 7a de oktobro, laŭ la Haag'a konvencio la bombardado de la urbo estis anoncata. Ĉar la komandanto deklaris, ke li la bombardadon prirespondos, noktmeze inter la 7a kaj 8a de oktobro la bombardado estis komencata. Samtempe komenciĝis la atako kontraŭ la internajn fortifikajetojn. Jam matene je la 9a de oktobro du el ili estis prenitaj. Je la 9a de oktobro posttagmeze ni povis okupi la urbon sen serioza kontraŭstaro. La verŝajne tre forta garnizono komence estis brave sin defendinta. Sed ĉar ĝi fine ne sentis sin egalforta al la atako de la germanaj infanterio kaj maristo-divizio kaj al la efiko de nia fortega artilerio, ĝi estis fuginta tute dissolvite. Inter la garnizono sin trovis ankaŭ angla maristo-brigado antaŭ nelonge alveninta. Laŭ anglaj gazetraportoj oni estis destininta ĝin la „spino de la defendo.“

La grado de la dissolviĝo de la brita-belga armeo ekkoni ĝasper la fakto, ke la diskutoj pri la urbotransdono devis okazi kun la urbestro, ĉar nenia soldata registaro estis trovebla. La signita transdono estis atestita de la stabĉefo de l'ĝisnuna gubernio Antwerpen je la 10a de oktobro. — La lastaj ne jam transdonitaj fortifikajetoj estis okupataj de germanaj taĉmentoj.

La nombro de la kaptitoj ne jam estas taksebla. Multaj belgaj kaj anglaj soldatoj fugas Hollandon, kie ili estas senarmigataj kaj kaptataj. Grandegaj provizoj ĉiuspecaj estas prenitaj.

La lasta belga fortikaĵo, la „neprenebla Antwerpen“, estas venkita. La atakinta armeo vere eksterordinare laboris, kion la imperiestro rekomencis distingante la komandanton, infanterigeneralon v. Beseler, per la ordeno „Por la merito“.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 13. Oktober.
Wien, 10. Oktober.

Oficiale estas sciigate: Hieraŭ la Rusoj ankoraŭ provis atakon kontraŭ la sudan fronton de Przemyśl, sed estis repuŝataj. Poste ili komencis returnenmarŝi. Ili devis ankaŭ forlasi la okcidentan fronton, kaj aŭstra kavalerio tie jam enrajdis la urbon. 5 ĝis 6 rusaj infanteri-divizioj kontraŭstaris apud Lancut, sed devis fugi kontraŭ la San-riveron. Plue estis repuŝataj kosako-divizio kaj infanteribrigado oriente de Dymow. Niaj soldatoj ĉie sekvas la kontraŭulon.

La vicedro de l'aŭstra generalstabo:
v. Hoefer.

Großes Hauptquartier, 11. Oktober, vespere.

Je la 10a de oktobro germana kavalerio venkis francan kavaleridivizion okcidente de Lille tute kaj repuŝis apud Hazebrouk alian, kiu suferis gravajn perdojn. - La bataloj ĉe la fronto sur la okcidenta militkampoj ne jam decidiĝis. - Pri la kaptitoj apud Antwerpen nenio jam povas esti sciigata, ĉar nature detalaj raportoj mankas ankoraŭ. Ankaŭ pri la nombro de la kaptitoj kaj pri la transiro de anglaj kaj belgaj taĉmentoj al Hollando precizaj raportoj ne jam povas esti publikigitaj. -

Sur la orienta militkampoj ĉiuj atakoj de la 11a kaj 10a rusaj armeoj kontraŭ la Germanojn en orienta Prusujo estis repuŝataj de nia armeo la 9an kaj 10an de oktobro. Ankaŭ provo de ĉirkaŭpreno apud Schirwindt estis vanigata kaj 1000 Rusoj kaptataj. - En suda Polujo la antaŭgvardioj de niaj armeoj atingis la Weichsel'on. Apud Grojec sude de Warschau ni prenis 2000 kaptitojn el la 2a sibiria korpuso. - Rusaj oficialaj sciigoj pri granda venko apud Augustowo kaj Suwalki estas neveraj. Kiom fidindaj estas oficialaj rusaj sciigoj, montras la fakto, ke pri la grandegaj malvenkoj apud Tannenberg kaj Insterburg oficialaj rusaj sciigoj ne estas publikigitaj.

Wien, 11. Oktober, tagmeze.

Nia rapida antaŭenmarŝo ĝis la San liberigis Przemyśl'on de la rusa ĉirkaŭpreno. Niaj soldatoj enmarŝis la fortifikadon. La Rusoj estis atakataj kaj venkataj, kie ili ankoraŭ kontraŭstaris. Fugante al la San-transirejoj apud Sieniawa kaj Lezajsk ili lasis en niaj manoj grand-arojn da kaptitoj.

La vicedro de l'aŭstra generalstabo:
v. Hoefer.

Berlin, 13. Oktober.

Oficiale. La 11an de oktobro rusa kirasa krosŝipo de la „Bajan“-serio estas merkita de pafita torpedo antaŭ la finna sinuso.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj

Großes Hauptquartier, 13. Oktobro.

Oni sciigas oficiale: Sur la orienta militkampoj la 11a de oktobro entute pasis trankvile. La 12an de oktobro fortega provo de la Rusoj, nin ĉirkaŭiri, estis vanigata. La kontraŭulo perdis 1500 kaptitojn kaj 20 kanonojn. En suda Polujo la rusa antaŭgvardio estis repuŝata de niaj soldatoj sude de Warschau. La Rusoj provis transiri la Weichsel'on sude de Iwangorod, sed devis returneniri post perdoj.

De la okcidenta militkampoj nenio grava estas raportita. Fortaj atakoj de l'kontraŭulo oriente de Soissons estas repuŝitaj. En la Argonnen-arbaro okazas daŭre fortaj bataloj. Niaj soldatoj antaŭeniras per ĉiuj rimedoj de fortifikacia milito paŝon post paŝon tra densaj arbetoj kaj sur malfacilege irebla teritorio. La Francoj obstine kontraŭstaras, pafas de sur la arboj kaj per maŝinpafiloj de surarbaraj stakoj; krom kelketaĝaj ŝanĝosoj ili konstruis fortifikajsimilajn rezistejojn.

Neveraj estas la sciigoj, kiujn la franca armeestraro publikigas pri sukcesoj de sia armeo en la Woivre-ebenaĵo. Laŭ eldiroj de kaptitoj oni diris al la soldatoj, ke la Germanoj estas venkitaj kaj ke kelkaj fortifikajetoj apud Metz jam estas prenitaj. Fakte niaj soldatoj tie batalantaj neniuloke returneniris. Etain estas en niaj manoj kiel antaŭe. Ĉiuj atakoj de la Francoj kontraŭ nian pozicion apud St. Mihiel estas repuŝitaj.

Ankaŭ hodiaŭ la kaptitoj el Antwerpen ne jam estas takseblaj. La nombro de la kontraŭuloj en Hollando senarmigitaj atingis proksimume 28000. Laŭ oficialaj sciigoj el London kaj Hollando inter ili estas ankaŭ 2000 angloj. Ŝajnas, ke multaj belgaj soldatoj iris civile vestitaj al siaj hejmurboj. — En Antwerpen malmultaj domoj kaj objektoj estas detruitaj. La kontraŭuloj faris nefunkcieblaj la kluzojn kaj pramojn. En la haveno sin trovis 4 anglaj, 2 belgaj, 1 franca, 1 dana, 32 germanaj kaj 2 aŭstraj vaporŝipoj, krom tio 2 germanaj velŝipoj. Laŭ ĝisnuna esploro de la germanaj ŝipoj ŝajnas, ke oni faris la kaldronegojn nefunkcieblaj.

— Krom tio sur la okcidenta militkampoj nenio alligis.

Großes Hauptquartier, 14. Oktobro, tagmeze.

Oni sciigas oficiale: La kontraŭuloj, inter ili parto de la ensidintaj el Antwerpen, de Gent rapide iras returnen, okcidenten al la marbordo. Nia armeo sekvas. Ni okupis Lille'on kaj prenis tie 4500 kaptitojn. La registaro de Lille estis deklarinta al la germanaj soldatoj, ke la urbo estas nedefendata. Malgraŭ tio la kontraŭuloj dum provo de ĉirkaŭiro sendis tien de Dünkirchen taĉmentojn, por ke ili sin defendu ĝis la alveno de l'ĉirkaŭiranta armeo. Ĉar tiu ĉi nature ne alvenis, la senrezultate defendita urbo akceptis difektojn, dum niaj taĉmentoj ĝin ekposedis.

De la fronto de l'armeo nenio nova estas sciiginda. Proksimege ĉe la katedralo de Reims ni konstatis du pezajn francajn bateriojn; plue ni rimarkis lumsignalojn sendatajn de sur unu de ĝiaj turoj. Kompreneble ni kontraŭbatalas ĉiujn kontraŭulajn aranĝojn kaj batalrimedojn, kiuj malutilas niajn soldatojn, sen indulgi la katedralon. Do kiel antaŭe, tiel ankaŭ nun la Francoj mem estas prikulpaj, se la honorinda konstruaĵo plue iĝos ofero al la milito.

Sur la orienta militkampoj la Rusoj estis repuŝitaj en la bataloj apud Schirwindt kaj perdis 3000 kaptitojn, 26 kanonojn kaj 12 maŝinpafilojn. Lyck ree estas en niaj manoj. La kontraŭulo eliris el Biella. Pli sude dum repuŝado de rusaj antaŭgvardioj al Warschau ni prenis 8000 kaptitojn kaj 25 kanonojn.

— Berry au Bac, nordokcidente de Reims. Ĉi tiuj sciigoj estas neniel laŭfaktaj.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 15. Oktobro, tagmeze.

Apud Antwerpen estis prenataj 4-5000 kaptitoj. Verŝajne ankoraŭ granda nombro da belgaj soldatoj, kiuj sin vestis civile, estos baldaŭ arestata. Laŭ sciigo de l'konsulo en Terneuzen proksimume 20000 belgaj soldatoj kaj 2000 Angloj transiris al Hollando, kie ili estis senarmigataj. Videble ili fugis ĥaose. Tion pruvas aroj da forĵetitaj vestaĵoj, precipe de la angla Royal Naval-divizio. - La kaptatoj el Antwerpen estas grandaj: Minimume 500 kanonoj, sennombra municio, aro da seloj kaj ĉabrakoj, multe da sanitarajoj, multaj aŭtomobiloj, lokomotivoj kaj vagonoj, multaj milionoj kilogramoj da greno, multe da faruno, karboj, lino, por 10000000 markoj lano, kupro kaj arĝento por 500000 markoj, kirasa vagonaro, kelkaj vagonaroj kun provizoj, multaj brutoj. Belgaj kaj anglaj ŝipoj jam ne troviĝas en Antwerpen. - Escepte unu ĉiuj 34 germanaj vaporŝipoj kaj 3 velŝipoj, kiuj estis en la haveno de Antwerpen dum la eksplodo de l'milito, sin trovas ankoraŭ tie, sed la maŝinoj estas faritaj nefunkcieblaj. Nur la „Gneisenau“ de la „Norddeutscher Lloyd“ estis traborata kaj mergata. La granda kluzo de l'haveno estas nedifektita, sed pro ŝarĝitaj, mergitaj boatoj nun ne funkcias. La urbo Antwerpen estas malmulte difektita. La enloĝantoj estas trankvilaj kaj videble ĝojaj, ke la tagoj de l'teruro finiĝis, precipe pro tio, ĉar la fipopolo jam estis ekrabinta.

La resto de la belga armeo rapide forlasis Gent'on, kiam la Germanoj proksimiĝis. La belga registaro escepte la milita ministro laŭdire iris al Le Havre. En atakoj ĉe Albert la Francoj suferis grandajn perdojn kaj estis repuŝataj. Krom tio sur la okcidenta militkampoj nenio aliĝis.

Sur la orienta militkampoj la rusa atako kun grandaj fortoj entreprenita kontraŭ orientan Prusujon malsukcesis. - La atako de nia armeo ŝultron ĉe ŝultro batalanta kun la aŭstra progresas. Ni staras antaŭ Warschau. Atako de 8 rusaj korpusoj el Iwaugorod-Warschau trans la Weichsel'on estis repuŝata sur la tuta linio kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo. - La sciigoj pri kaptitaj germanaj kanonoj, kiujn publikigis rusaj gazetoj, estas neveraj.

Großes Hauptquartier, 16. Oktobro.

La 14an de oktobro la Rusoj provis, repreni Lyck'on. La atakoj estis repuŝataj. Ni prenis 800 kaptitojn, 1 kanonon kaj 3 maŝinpafilojn. - Brügge estas okupita de la Germanoj la 14an de oktobro, Ostende la 15an de oktobro. - Fortaj atakoj de la Francoj nordokcidente de Reims estis repuŝataj. En siaj oficialaj sciigoj la Francoj raportas, ke ili rimarkinde progresis en kelkaj lokoj de la fronto, ekzemple ĉe Berry au Bac, nordokcidente de Reims. Ĉi tiuj sciigoj estas neniel laŭfaktaj.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj

Großes Hauptquartier, 17. Oktobro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: En Brügge kaj Ostende ni prenis multe da pormilitaj aĵoj, inter ili grandan nombron da infanteripafiloj kaj 200 funkciajn lokomotivojn.

De la franca militkampoj gravaj okazaĵoj ne estas sciigataj.

En la gubernio Suwalki la Rusoj hieraŭ restis trankvilaj. La nombro de la kaptitoj prenitaj apud Schirwindt atingis 4000. Ankaŭ kelkaj kanonoj estis ankoraŭ prenataj. La bataloj apud kaj sude de Warschau daŭras.

Berlin, 18. Oktobro.

Oficiale estas sciigate: La 17an de oktobro proksime de la hollanda bordo la germanaj torpedobatoj S 115, S 117, S 118 kaj 119 iĝis batalantaj kun la angla kroŝipo Undoubted kaj 4 anglaj kontraŭtorpedobatoj. Laŭ oficialaj anglaj sciigoj niaj torpedobatoj estis mergataj; el la ensidantoj 31 estis albordigataj al Anglujo.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 18. Oktobro, antaŭtagmeze.

Oficiale oni sciigas: Sur la okcidenta militkampoj la hieraŭa tago entute pasis trankvile. La situacio ne ŝanĝiĝis. - Sur la orienta militkampoj ni progresas en la regiono de Lyck. La batalo apud kaj sude de Warschau daŭras.

Wien, 18. Oktobro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: Nia atako en la batalo sur ambaŭ bordoj de la Strwiaz-rivero hieraŭ estis daŭrigata kaj atingis en kelkaj lokoj jam la rusan fronton. Ĉe kelkaj pozicioj niaj soldatoj avancis per tranĉeoj, kiel en fortifika milito. En la pasinta nokto kelkaj atakprovoj de la Rusoj estis sange repuŝataj. Ankaŭ hodiaŭ estas batalate laŭlonge de la tuta fronto. Nia peza artilerio partoprenas. Ni daŭrigas la persekutadon de la kontraŭulo repuŝita norde de Wyszkw. Aliaj partoj de niaj taĉmentoj transirintaj la Karpaten progresis ĝis Lublince, ĝis la montetoj norde de Orow kaj ĝis la regiono de Uroz. Oni taksas, ke la Rusoj perdis en la atakoj kontraŭ Przemyśl-on 40000 mortintojn kaj vunditojn.

La vicestro de l'aŭstra generalstabo:

v. Hoefler.

Großes Hauptquartier, 19. Oktobro, antaŭtagmeze.

La kontraŭulo provis nin ataki okcidente kaj nordokcidente de Lille, sed suferis multajn perdojn kaj estis repuŝata. - Sur la orienta militkampoj la stato estas neŝanĝita.

La eŭropa milito.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 23. Oktobro, antaŭtagmeze.

Ĉe la Yser-kanalo la Germanoj hieraŭ batalis sukcese. Sude de Dixmuiden niaj soldatoj avancis. Okcidente de Lille ni atakis sukcese. Ni okupis kelkajn vilaĝojn. Escepte tio nenio okazis ĉe la fronto de la okcidenta armeo.

Sur la orienta militkampoj rusaj atakoj estis repuŝataj okcidente de Augustow; ni prenis kelkajn maŝinpafilojn. De sur la sudorienta militkampoj sciigoj pri decidigaj okazaĵoj ne jam estas raportataj.

Berlin, 24. Oktobro.

Oficiale estas sciigite: La jam sciigita detruo de la angla kozŝipo „Hawke“ per germana submara boato je la 13a de oktobro estas oficiale atestata per tio. La submara boato revenis nedifektita. La 20an de oktobro la angla vaporŝipo „Glitra“ estas mergita de germana submara boato ĉe la norvega bordo, post kiam ĝiaj valvoj estis malfermitaj. Laŭ invito la ensidantoj forlasis antaŭe la ŝipon en boatoj.

La vicestro de la admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 25. Oktobro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigite: Pluaj fortaj germanaj taĉmentoj transiris la Yser-Ypern-kanalon inter Nieuport kaj Dixmuiden post malfacilaj bataloj la 24an de oktobro. Oriente kaj nord-oriente de Ypern la kontraŭulo plifortiĝis. Malgraŭ tio niaj soldatoj sukcesis avanci sur kelkaj lokoj. Proksimume 500 Angloj estis kaptataj, inter ili regimentestro kaj 28 oficiroj.

Sur la orienta militkampoj ni ekavancis kontraŭ Augustow-on. Ĉe Iwangorod niaj soldatoj batalas ŝultron ĉe ŝultro kun aŭstraj-hungaraj. Ili prenis 1800 kaptitojn.

Großes Hauptquartier, 26. Oktobro, antaŭtagmeze.

En Nieuport kaj Dixmuiden, okcidente de la Yser-kanalo, sidas ankoraŭ obstine defendantaj kontraŭuloj kaj estis atakataj inter ili de niaj soldatoj. La kunbatalanta angla eskadro devis sin retiri pro la pafado de nia peza artilerio. Tri ŝipoj estis plej efike paftrafitaj. Tiam la 25an de oktobro posttagmeze la tuta eskadro restis nevidata. - Apud Ypern la batalo daŭras nedecidita. Sudoriente de Ypern kaj okcidente kaj sudokcidente de Lille niaj soldatoj atakante bone progresis. En obstinaj bataloj interdomaj la Angloj suferis multajn perdojn kaj lasis pli ol 500 kaptitojn en niaj manoj. - Norde de Arras forta franca atako malsukcesis pro nia pafado. La kontraŭulo suferis gravajn perdojn.

Sur la orienta militkampoj ni avancis atakante al Augustow. Apud Iwangorod la batalo staras bonŝanca. Decido ne jam okazis.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 26. Oktobro.

Oficiale estas sciigate: En la bataloj apud Iwangorod ni prenis ĝis nun 8000 kaptitojn kaj 19 maŝinpafilojn. Apud Jaroslau rusa regimentestro kaj 200 soldatoj devis kapitulaci. Apud Zalucze (sudokcidente de Sniatyn ĉe la limo de la Bukowina) kaj apud Pasienozza (sudokcidente de Nadworna en la orienta Karpathen) la kontraŭulo estis repuŝata. Entute la stato ne ŝanĝiĝis.

La vicestro de l'aŭstra generalstabo: v. Hoefler.

Großes Hauptquartier, 27. Oktobro, antaŭtagmeze.

La germana armeestraro publikigas jenan oficialan sciigon: La bataloj ĉe la Yser-Ypern-kanalo apud Ypern kaj sudokcidente de Lille estas daŭrigataj same obstine. La Germanoj ankaŭ hieraŭ avancis. Ĉe la aliaj partoj de la okcidenta fronto nenio grava okazis.

Okcidente de Augustow la atako de la Germanoj malrapide progresas. Sudokcidente de Warschau niaj soldatoj repuŝis ĉiujn atakojn de fortaj rusaj taĉmentoj. Norde de Iwangorod aliaj rusaj korpusoj transiris la Weichsel'on.

Wien, 27. Oktobro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: La stato en meza Galicio estas neŝanĝita. Sudokcidente de Iwangorod niaj bravegaj korpusoj batalas kontraŭ pli fortan kontraŭulon; kelkaj el ili prenis 10000 kaptitojn.

La vicestro de l'aŭstra generalstabo: v. Hoefler.

Großes Hauptquartier, 28. Oktobro, antaŭtagmeze.

La bataloj apud Nieuport-Dixmuiden daŭras ankoraŭ. La Belgoj tie kuniĝis kun iom grandaj plifortigaj taĉmentoj. Niaj atakoj tie estis daŭrigataj. 16 anglaj militŝipoj partoprenis en la batalo kontraŭ nian dekstran alon. Ilia pafado estis senefika. - Apud Ypern la stato ne ŝanĝiĝis dum la 27a de oktobro. Okcidente de Lille niaj atakoj estis daŭrigataj kun sukceso. - En la Argonnen-arbaro ree kelkaj kontraŭulaj tranĉeoj kun la ensidantoj estis prenataj. Ĉe la okcidenta fronto plue nenio grava okazis.

En Polujo la germanaj-aŭstraj armeoj ĝis nun dum kelktagaj bataloj sukcese repuŝintaj ĉiujn rusajn atakojn devis ĉesi; ĉar alvenis pluaj rusaj taĉmentoj el Iwangorod, Warschau kaj Nowogeorgiewsk. La Rusoj komence ne sekvis. Ni facile disiĝis de la kontraŭulo. Niaj taĉmentoj aranĝiĝos laŭ la nova stato. - Sur la nordokcidenta militkampoj nenio grava aliĝis.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 29. Oktobro, antaŭtagmeze.

La germana atako sude de Nieuport malrapide progresas. Apud Ypern la batalo staras neŝanĝita. Okcidente de Lille nia armeo bone avancis. Kelkaj fortikigitaj pozicioj de l'kontraŭulo estis prenataj, 16 anglaj oficiroj, 300 soldatoj kaj 4 kanonoj kaptataj. Anglajn kaj francajn kontraŭatakojn ni repuŝis ĉie. - Necesiĝis bombardi francan baterion starigitan antaŭ la katedralo de Reims kaj artilerian observanton metitan sur la turon de la katedralo. - En la Argonnen la kontraŭulo estis pelata el kelkaj tranĉeoj; kelkaj maŝinpafiloj estas prenitaj. - Sudokcidente de Verdun forta franca atako estis repuŝata. Niaj kontraŭatakantaj soldatoj avancis ĝis la franca ĉefpozicio, kiun ili okupis. La Francoj suferis multajn perdojn. - Ankaŭ oriente de la Mosel estis repuŝataj ĉiuj entreprenoj de l'kontraŭulo, kiuj estis preskaŭ negravaj.

Sur la nordorienta militkampoj nia armeo atakante avancis. Dum la lastaj 3 semajnoj tie 13500 Rusoj, 30 kanonoj kaj 39 maŝinpafiloj estis kaptataj.

Sur la sudorienta militkampoj la stato de hieraŭ ne ŝanĝiĝis.

Großes Hauptquartier, 30. Oktobro.

Niaj atakoj sude de Nieuport kaj oriente de Ypern estis sukcese daŭrigataj; ni kaptis 8 maŝinpafilojn kaj 200 Anglojn. - En la Argonnen ni prenis kelkajn fortikajn domojn kaj poziciojn. - Nordoriente de Verdun la Francoj atakis sen sukceso. - Escepte tio la stato ne ŝanĝiĝis sur ambaŭ militkampoj.

Großes Hauptquartier, 31. Oktobro, antaŭtagmeze.

La germana armeestraro sciigas oficiale jenon: Nia armeo en Belgujo prenis hieraŭ Roms-capelle'on kaj Bixschote'on. La atako kontraŭ Ypern ankaŭ progresas. Sandvoorde, kastelo Hollebeke kaj Wembeke estis atakprenataj. Ankaŭ pli sude ni avancis. - Oriente de Soissons ni ankaŭ atakis la kontraŭulon kaj elpuŝis lin dum la tago el kelkaj tre fortikigitaj pozicioj norde de Vailly. Posttagmeze Vailly estis atakprenata kaj la kontraŭulo repuŝata trans la Aisne'on. La Francoj suferis gravajn perdojn; ni prenis 1000 kaptitojn kaj 2 maŝinpafilojn. En la Argonnen, okcidente de Verdun kaj norde de Toul ree kelkaj kontraŭulaj atakoj malsukcesis post gravaj perdoj de la Francoj.

Sur la nordorienta militkampoj decidiga batalo ne jam okazis. Okcidente de Warschau la Rusoj sekvas malrapide niajn taĉmentojn, kiuj nove aranĝiĝas.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Konstantinopel, 30. Oktobro.

La registaro de Turkujo sciigas oficiale: Dum malgranda parto de la turka ŝiparo la 28an de oktobro ekzercis en la Nigra Maro, la rusa ŝiparo ekmilitis jaŭde atakante la turkajn ŝipojn. Nia ŝiparo mergis la 5000 tunojn pezan rusan minvaporŝipon „Pрут“, kiu enhavis 700 minojn, difektis rusan torpedoboaton kaj prenis karbovaporŝipon. Torpedo pafita de la torpedoboato „Hairet-Mille“ mergis la rusan kontraŭ-torpedoboaton „Kubanez“; „Monavenet-Millie“ torpede difektegis alian rusan gardoŝipon. Ni savis kaj prenis 3 rusajn oficirojn kaj 72 maristojn. La turka ŝiparo neniel estis difektata. La batalo daŭras favore al ni.

Großes Hauptquartier, 1. Novembro, antaŭtagmeze.

En Belgujo la militagoj estas malfaciligataj per la subakvigoj, kiuj okazis sekve de la detruo de kluzoj ĉe la Yser-kanalo apud Nieuport. – Apud Ypres niaj soldatoj avancis plu; kelkaj kanonoj de la Angloj kaj minimume 600 kaptitoj estas prenitaj. Ankaŭ la taĉmentoj batalantaj okcidente de Lille avancis. La nombro de la kaptitoj prenitaj apud Vailly atingis 1500. – En la regiono de Verdun kaj Toul okazis nur bataletoj.

Sur la nordorienta militkampoj niaj taĉmentoj estis ankoraŭ hieraŭ nedecidige batalantaj kontraŭ la Rusojn.

Wien, 1. Novembro.

En Rusa Polujo komenciĝis novaj bataloj. Ni repuŝis atakojn kontraŭ niajn poziciojn kaj disĉasis kelkajn kontraŭulajn taĉmentojn.

En la kelktaga obstina batalo nordoriente de Turka kaj sude de Stary-Sambor ni hieraŭ decidige venkis. 2 avancintajn infanteri-diviziojn kaj 1 pafisto-brigadon ni pelis el ĉiuj iliaj pozicioj. – Czernowitŝ estas ankoraŭ en niaj manoj. La bombardado de la Rusoj ĉefe direktita al la palaco de la greka-katolika episkopo estis preskaŭ senefika.

La vicestro de l'aŭstra generalstabo: v. Hoefer.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 2. Novembro, antaŭtagmeze.

La armeestraro oficiale sciigas jenon: Atakante Ypern'on ni avancis plu. Messines estas en niaj manoj. – Kontraŭ nia dekstra alo ni nun certe konstatis Hindojn. Laŭ la ĝisnunaj konstatoj ili ne batalas en apartaj taĉmentoj, sed estas distribuitaj ĉe la tuta angla fronto. – Ankaŭ en la bataloj en la Argonnen ni progresis. La kontraŭulo tie multe perdis.

Sur la orienta militkampoj la stato estas neŝanĝita. La Rusoj provis rompi nian fronton apud Szittkehmen, sed estis repuŝataj.

Berlin, 2. Novembro.

La neoficiala sciigo pri la detruo de l'angla krosŝipo „Hermes“, farita de germana submara boato je la 31a de oktobro, estas oficiale atestata per tio. La boato revenis nedifektita.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 3. Novembro, tagmeze.

La subakvigoj sude de Nieuport malebligas ĉiun militagon en tiu regiono. La kampoj estas detruitaj ĝis post longtempe. La akvo estas kelkloke 2 metrojn profunda. Niaj taĉmentoj forlasis la subakvigitan teritorion kun ĉiuj homoj, ĉevaloj, kanonoj kaj veturiloj. Niaj atakoj al Ypern progresas. Pli ol 2500 soldatoj, plejmulte Angloj, kaj kelkaj maŝinpafiloj estis kaptitaj. – Okcidente de Royes okazis obstinaj bataloj, en kiuj ambaŭ kontraŭuloj multe perdis; sed la stato tie ne ŝanĝiĝis. Post envilaĝa bataleto mankis al ni kelkcentoj da soldatoj kaj du kanonoj. – Bone sukcesis niaj atakoj ĉe la Aisne oriente de Soissons. Malgraŭ plej forta kontraŭula resisto ni atake prenis kelkajn multe fortikigitajn poziciojn, okupis Chavonne'on kaj Soupir'on kaj kaptis pli ol 1000 Francojn kaj 4 maŝinpafilojn. Apud la katedralo de Soissons la Francoj starigis pezan baterion, kies observanto estis vidata sur la katadrala turo. Ne necesas, noti la konsekvencojn de tia ago, kiu ŝajnas esti laŭsistema. – Inter Verdun kaj Toul kelkaj atakoj de la Francoj estis repuŝataj. La Francoj parte surhavis germanajn paltojn kaj kaskojn. – En la Vogesen atako de la Francoj estis repuŝata en la regiono de Markirch. Niaj taĉmentoj kontraŭatakis.

Sur la orienta militkampoj la militagoj ankoraŭ evolucas; bataloj ne okazis. Por preni ponton, kiun la Germanoj preparis al krevigo, la Rusoj (1a sibiria korpuso) puŝis antaŭ sia avangardo civilulojn.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 4. Novembro, antaŭtagmeze.

Niaj atakoj apud Ypres, norde de Arras kaj oriente de Soissons, progresas malrapide, sed sukcese. Sude de Verdun kaj en la Vogesen francaj atakoj estis repuŝataj. – Sur la orienta militkampoj nenio grava okazis.

Wien, 2. Novembro, tagmeze.

En Rusa Polujo la bataloj daŭras. En la bataletoj ĉe la San la Rusoj suferis gravajn perdojn precipe apud Roswadow. Ni prenis tie 400 kaptitojn kaj 3 maŝinpafilojn. Sude de Stary Sambor alia taĉmento ankaŭ kaptis 400 Rusojn. Nia antaŭenmarŝo tie kaj nordokcidente de Turka plu sukcesas.

Berlin, 4. Novembro.

Oficiale estas sciigate: La 4an de novembro antaŭtagmeze la kroŝipo York veturis en la Jade-sinuso sur unu el la minojn barantaj la havenon kaj subakvigis. Laŭ la ĝisnunaj sciigoj 382 maristoj – pli ol la duono de la ensidintoj – estas savitaj. La savado estis malfaciligata de densa nebulo.

Großes Hauptquartier, 5. Novembro.

Hieraŭ Belgoj subtenataj de Angloj kaj Francoj elirinte el Nieuport forte atakis inter la marbordo kaj la subakvigita teritorio. Ili estis repuŝataj senpene. – Apud Ypern, sudokcidente de Lille, sude de Berry-au-Bac, en la Argonnen kaj Vogesen niaj atakoj progresis.

Sur la orienta militkampoj nenio grava okazis.

Berlin, 6. Novembro.

Oficiale estas sciigate: Laŭ sciigo de l'oficiala angla gazetara oficejo nia kroŝipa eskadro detruis je la 1a de novembro la anglan kirasan kroŝipon „Monmouth“ apud la bordo de Ĉilujo. La kirasa kroŝipo „Good Hope“ estis grave difektata. La malgranda kroŝipo „Glasgow“ fugis difektita.*) Ĉe la germana partio partoprenis en la batalo la grandaj kroŝipoj „Scharnhorst“ kaj „Gneisenau“ kaj la malgrandaj kroŝipoj „Nürnberg“, „Leipzig“ kaj „Dresden“. Ŝajnas, ke niaj ŝipoj ne estas difektitaj.

*) Noto de la tradukinto: La kirasa kroŝipo „Monmouth“ pezas 14 300 tunojn, „Good Hope“ 9 500 tunojn, „Glasgow“ 4 500 tunojn.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 6. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigite: Nia ofensivo nordokcidente kaj sudokcidente de Ypern bone progresas. Ankaŭ apud La Bassée norde de Arras kaj en la Argonnen ni avancis. Niaj soldatoj batalakiris gravan pozicion en la Bois Brulé, nordoriente de Fort Mihiel; la Francoj multe perdis.

Sur la nordorienta militkampoj nenio grava okazis.

Berlin, 6. Novembro.

Laŭ oficialaj sciigoj oni loĝigis en germanaj tendaroj, hospitaloj k. t. p. ĝis la 1a de novembro:

Francojn: 3138 oficiroj, 181618 soldatoj

Rusojn: 3121 „ 186779 „

Belgojn: 537 „ 34907 „

Anglojn: 417 „ 15730 „

Entute: 7213 oficiroj, 419034 soldatoj.

La kaptitoj, kiuj nun ankoraŭ estas transportataj al la tendaroj, ĉi supre ne jam estas enkalkulitaj.

Großes Hauptquartier, 7. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. Niaj atakoj al Ypres progresis ankaŭ hieraŭ, precipe sudokcidente de Ypres. Pli ol 1000 Francoj estas kaptitaj, 3 maŝinpafiloj prenitaj. Ni repuŝis francajn atakojn okcidente de Noyon kaj atakojn al la vilaĝoj de ni jam prenitaj Vailly kaj Chavonne; la kontraŭulo suferis gravajn perdojn. Soup'ir'on, kiun ni estis prenintaj kaj nur malmulte okupintaj, kaj la okcidentan parton de Sapinaul, kiu daŭre estis fortege bombardata, ni devis malokupi. — Apud Servon la kontraŭulo estis repuŝata; en la Argonnen ni avancis plu.

Sur la orienta militkampoj tri rusaj kavaleri-divizioj, kiuj estis transirintaj la Warthe-riveron sude de Kolo, estis venkataj kaj repuŝataj trans la riveron. Escepte tio renkontoj ne okazis tie.

La armeestraro.

Noto de la tradukinto: La noton sur la folio 27 a bonvolu korekti kaj kompletigi jene:

Kirasa krosŝipo „Monmouth“:	Konstruita en 1901;	pezo: 9950 tunoj;	rapideco: 23,9 marmejloj;	678 ensidantoj
„Good Hope“:	„ 1901;	„ 14300 „	„ 23,8 „	900 „
„Glasgow“:	„ 1909;	„ 4900 „	„ 25,8 „	376 „

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! ..

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 6. Novembro.

Oficiale. La 3an de novembro niaj grandaj kaj malgrandaj krosŝipoj atakis la anglan bordon apud Yarmouth. Ili bombardis la tieajn ĉebordajn fortikojn kaj kelkajn negrandajn ŝipojn, kiuj proksime haltis kaj videble ne supozis atakon. Neniaj fortaj anglaj taĉmentoj gardis tiun ĉi gravan havenon. La angla submara boato „D 5“, kiu ŝajne sekvis niajn ŝipojn, laŭ sciigo de l'angla admiralaro veturis sur minon kaj subakviĝis.

La ĉefo de l'germana admiralstabo: von Pohl.

Berlin, 7. Novembro.

Laŭ oficiala sciigo de la Reuter-oficejo el Tokio. Tsingtaŭ estas prenita post heroa resisto, la 7an de novembro. Detalaj sciigoj ne jam alvenis.

La vicestro de l'admiralstabo: v. Behncke.

Großes Hauptquartier, 8. Novembro, antaŭtagmeze.

Niaj atakoj apud Ypern kaj okcidente de Lille hieraŭ estis daŭrigataj. — Sur la okcidenta flanko de la Argonnen ni atakprenis gravan monteton apud Vienne le Chateau, pro kiu dum semajnoj estis batalate. Ni prenis 2 kanonojn kaj 2 maŝinpafilojn. — Escepte tio la nebuloza tago pasis trankvila.

De la orienta militkampoj novaj sciigoj ne alvenis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 9. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Hieraŭ posttagmeze kelkaj kontraŭulaj ŝipoj ree bombardis nian dekstran alon; sed nia artilerio ilin rapide forpelis. — Vespera antaŭeniĝo de la kontraŭulo, kiu estis ripetata nokte, malsukcesis tute.

Sur la orienta militkampoj norde de la Wyszytyer See fortaj rusaj taĉmentoj atakis, sed estis repuŝataj kaj suferis gravajn perdojn. Ili lasis en niaj manoj 4000 kaptitojn kaj 10 maŝinpafilojn.

Malgraŭ plej obstina resisto ni progresis atakante apud Ypern malrapide, sed daŭre. Kontraŭulaj kontraŭatakoj sudokcidente de Ypern estis repuŝataj, kelkcentaj soldatoj kaptataj.

La armeestraro.

Rondtrigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Konstantinopel, 8. Novembro.

Sciigo de l'turka armeestraro. - Kun helpo de Dio ni transiris hieraŭ la egiptan limon. Ĉar la rusa ŝiparo fugis en siajn milithavenojn, nia ŝiparo bombardis Poti'on, unu el la plej gravaj havenoj ĉe la Kaukasus, kaj difektis multe. Niaj ĝendarmoj kaj la gentoj de nia partio pereigis la anglajn taĉmentojn albordiĝintajn en Akaba. 4 anglaj kirasoŝipoj tie troviĝintaj sin retiris; nur 1 krosŝipo restis.

Konstantinopel, 8. Novembro, je la 6a vespere.

La turka armeestraro sciigas oficiale: En dutaga batalo okazinta ĉe la kaukasa limo la rusa armeo estas tute venkita. Nia armeo sidas en la pozicioj de la Rusoj. Detalojn oni publikigos poste.

Wien, 9. Novembro.

Oficiale estas sciigate: Ĉiuj niaj militagoj sur la suda militkampoj*) progresas bone. Nia antaŭenmarŝo trans la linion Sabac-Ljosnisa renkontis plej obstinan resiston ĉe la multe fortikigitaj mondpiedoj; la tritagaj bataloj ĉe Loznisa-Krupanj-Ljubeviga decidige sukcesis. Ĉi tie nin kontraŭis la serbaj tria armeo (generalo Paul Sturm) kaj unua armeo (generalo Petar Bojewis), entute 6 divizioj, 120000 soldatoj. Ambaŭ armeoj forlasintaj siajn forte defenditajn poziciojn de hieraŭ estas returnenmarŝantaj al Valjowo. - Niaj venkintaj korpusoj atingis hieraŭ vespere la montetojn superantajn Loznisa'on oriente kaj la ĉefaltaĵon de Sokolska Planina sudoriente de Krupanj. Multnombraj kaptitoj kaj multe da pormilitaj objektoj estis prenitaj.

Großes Hauptquartier, 10. Novembro.

La germanaj atakoj apud Ypern malrapide progresis ankaŭ hieraŭ. Pli ol 500 Francoj, koloruloj kaj Angloj kaj kelkaj maŝinpaŝiloj estis prenitaj. Ankaŭ pli sude niaj taĉmentoj avancis. Fortaj kontraŭatakoj de la Angloj estis repuŝataj. En la Argonnen ni bone progresis. Kontraŭulaj atakoj estis facile repuŝataj.

En Rusa Polujo apud Konin nia kavalerio disĉasis rusan batalionon, prenis 500 kaptitojn kaj 8 maŝinpaŝilojn.

*) En Serbujo. (La tradukinto).

Rondirigu tŭn ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! ..

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Berlin, 11. Novembro.

Laŭ oficiala publikigo de la angla admiralaro la aŭstralia krosŝipo „Sidney“ atakis la 9an de novembro matene apud la kokosinsuloj en la hinda oceano la germanan ŝipon „Emden“, dum taĉmento estis surteriĝinta, por detruĝi la anglan stacion por senfadena kaj ordinara telegrafado. Post obstinaj kaj multperdigaj bataletoj la ŝipo „Emden“ estis brulpafita de la pli forta artilerio de l'kontraŭulo; la ensidantoj veturigis sian ŝipon sur la bordon. – Plue la angla admiralaro sciigas, ke per subakvigo de karbo-vaporŝipo la germana ŝipo „Königsberg“ estas blokita en la Rufidji-rivero (germana orienta Afriko), 6 marmejlojn super la enmariĝo. Parto de la ensidantaro laŭdire sin baris en fortikigita pozicio sur la bordo. Ŝajnas, ke bombardado al la „Chatam“ estis senefika.

La vĉestro de l'admiralstabo: v. Behncke.

Großes Hauptquartier, .7 Novembro, antaŭtagmeze.

Ĉe la Yser ni bone progresis ĥieraŭ. Dixmuiden estas atakprenita. Pli ol 500 kaptitoj kaj 9 maŝinpafiloj venis al niaj manoj. Pli sude ni avancis trans la kanalon. Okcidente de Langemarck junaj regimentoj kantante „Deutschland, Deutschland über alles“*) avancis kontraŭ la plej antaŭajn liniojn de la kontraŭulaj pozicioj kaj okupis ilin. Ĉirkaŭ 2000 francaj infanteristoj kaj 6 maŝinpafiloj estis prenataj. – Sude de Ypern ni elpuŝis la kontraŭulon el St. Eloi, pri kiu estis batalate kelkajn tagojn. Ni prenis tie ĉirkaŭ 1000 kaptitojn kaj 6 maŝinpafilojn. Malgraŭ kelkaj fortaj kontraŭatakoj ni restis sur la superantaj altaĵoj norde de Armentieres. – Sudokcidente de Lille ni avancis atake. La Francoj multe perdis provante reokupi la superantajn altaĵojn norde de Vienne le Chateau, ĉe la okcidenta rando de la Argonnen, nordoriente kaj sude de Verdun francaj atakoj ĉie estis repuŝataj.

De la orienta militkampoj gravaj sciigoj ne alvenis.

La armeestraro.

London, 12. Novembro.

La angla admiralaro sciigas, ke germana submara boato subakvigis la malgrandan anglan torpedo-kanonboaton „Niger“ ĉe Dover. Ĉiuj oficiroj kaj 87 el la soldatoj estis savataj.

*) Germana patriotisma kanto. (La trad.)

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 12. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – La germanaj soldatoj repuŝis la kontraŭulon antaŭenmarŝintan el Nieuport trans la Yser-riveron ĝis Lombartzyde. Ni forpuŝis la kontraŭulon el la regiono inter la orienta bordo de l'Yser kaj la maro. La atako trans la Yser-kanalon sude de Dixmuiden progresis. Oriente de Ypern ni plue avancis. Entute estas prenitaj 700 Francoj, 4 kanonoj kaj 4 maŝinpafiloj. Kontraŭulaj atakoj okcidente de la Argonnen kaj en la arbaro mem estis repuŝataj. – Sur la orienta militkampoj nia kavalerio repuŝis oriente de Kalisch pli fortan rusan kavalerion denove atakintan.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 13. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Ĉe la Yser apud Nieuport niaj maristoj – soldatoj kaŭzis plej gravajn perdojn al la kontraŭulo kaj kaptis 700 Francojn. Dum la atakoj bone progresantaj apud Ypern ankaŭ 1100 soldatoj estis kaptataj. Fortaj francaj atakoj okcidente kaj oriente de Soissons estis repuŝataj; la Francoj tre multe perdis. – Ĉe la limo de orienta Prusujo apud Eydtkuhnen kaj sude de ĝi, oriente de la lagoj, denove ekestis bataloj. Decido ne jam okazis.

La armeestraro.

Konstantinopel, 13. Novembro.

La turka armeestraro sciigas oficiale: Dum la pasinta nokto post surpriza atako niaj soldatoj okupis ĉe la limo de la vilajeto*) Trapezunt ĉiujn rusajn fortikigitajn domojn, enmarŝis 3 horojn en Rusujon (direkto al Batum) kaj okupis la rusan kazernon en Kurdoghlu.

Großes Hauptquartier, 14. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – La bataloj en sudokcidenta Belgujo daŭras ankoraŭ sed estis malhelpataj dum la lastaj tagoj de la pluva kaj venta vetero. Niaj atakoj plue progresas malrapide. Sude de Ypern 700 Francoj estis kaptataj. Okcidente de Lille anglaj atakoj estis repuŝataj. Apud Berry aŭ Bac la Francoj devis malokupi superantan pozicion. En la Argonnen niaj atakoj bone progresis. La Francoj suferis grandajn perdojn kaj lasis en niaj manoj ankaŭ hieraŭ pli ol 150 kaptitojn. – En orienta Rusujo la bataloj daŭras ankoraŭ. Apud Stallupönen 500 Rusoj estis kaptataj. Apud Soldaŭ decido ne jam okazis. En la regiono de Wloclawsk ree rusa korpuso estis repuŝata. 1500 kaptitoj kaj 12 maŝinpafiloj venis al niaj manoj.

*) Nomo de distriktoj en Rusujo. (La tradukinto).

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 13. Novembro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: Ĉe la norda fronto de niaj armeoj hieraŭ nenio grava okazis. La kontraŭulo enmarŝis en Tarnow, Jaslo kaj Krosno. - La nombro de la kaptitoj loĝigitaj ĝis hieraŭ en Aŭstrio-Hungarujo estas jena: 867 oficiroj, 92727 soldatoj.

v. Hoefer, Generalmajor.

Großes Hauptquartier, 15. Novembro, antaŭtagmeze.

Pro la malfavora vetero ni avancis ankaŭ hieraŭ nur malmulte en la bataloj ĉe la dekstra alo. Dum la malfacila avancado estis prenataj kelkcentoj da Francoj kaj Angloj kaj 2 maŝin-pafiloj. - En la Argonnen ni sukcesis krevigi kaj atakpreni fortan francan pozicion. Nevera estas la sciigo de la Francoj, ke ili malordigis germanan taĉmenton apud Coincourt (sude de Marsal). La Francoj kontraŭe multe perdis tie; ni perdis eĉ ne unu soldaton.

Sur la orienta militkampoj la bataloj daŭras ankoraŭ ĉe la limo de orienta Prusujo kaj en rusa Polujo. Decido ne jam okazis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 16. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Pro ventegoj kaj neĝado okazis hieraŭ nur malfortaj militagoj inter ambaŭ kontraŭuloj sur la okcidenta militkampoj. En Belgujo niaj atakoj progresis malrapide; en la Argonnen ni tamen iom progresis.

Sur la orienta militkampoj la bataloj daŭris. Niaj soldatoj batalantaj en orienta Prusujo repuŝis hieraŭ la kontraŭulon sude de Stallupönen. Niaj taĉmentoj batalantaj de en okcidenta Prusujo sin defendis sukcese apud Soldau kontraŭ antaŭenmarŝantaj rusajn taĉmentojn kaj repuŝis per sukcesa bataleto apud Lipno kaj Plozk rusajn taĉmentojn avancantajn sur la dekstra bordo de la Weichsel. Ĝis hieraŭ ni prenis en tiuj bataloj 5000 soldatojn kaj 10 maŝin-pafilojn.

Okazis decido en la bataloj, kiuj daŭris sekve de nia sukceso apud Wlozlawsk. Kelkaj rusaj korpusoj nin atakintaj estis repuŝataj ĝis trans Kutno. Laŭ la ĝisnunaj konstatoj ili perdis 23000 soldatajn, kiuj estis kaptataj, minimume 70 maŝinpafilojn kaj kanonojn, kies nombro ne jam estis konstatata.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Konstantinopel, 14. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Niaj soldatoj prenis pozicion ĝis nun okupitan de la Rusoj apud Kotur en la persa provinco Aserbeidschan. Apud Köpriköi ni prenis la altaĵon 1905; neniuj el la sur-
sidantoj sukcesis fugi. Ni atakis la Anglojn albordiĝintajn apud Fau en la provinco Bassorah.
60 Angloj pereis. (Mallongigita.)

Großes Hauptquartier, 17. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Sur la okcidenta militkampoj ankaŭ la hieraŭ tago pasis preskaŭ
trankvila. Sude de Verdun kaj nordoriente de Cirey la Francoj atakis sensukcese. – Sur la
orienta militkampoj la militagoj daŭras sukcese. Detalaj sciigoj ne jam alvenis.

Wien, 17. Novembro, tagmeze.

Oni sciigas oficiale: Antaŭenmarŝinte el la regiono de Krakau niaj soldatoj prenis hieraŭ
la plej antaŭajn poziciojn de l'kontraŭulo norde de la imperia limo. En la regiono de Wolbrom
kaj Pilika la Rusoj venis plejmulte nur sub niajn artileria-kuglojn. Kie atakis rusa infanterio, ĝi
estis repuŝata. Unu el niaj regimentoj prenis 500 kaptitojn kaj 2 taĉmentojn kun maŝinpafiloj. –
La germana venko apud Kutno jam influas la tutan konstelacion.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

Großes Hauptquartier, 17. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale oni sciigas: La bataloj en Belgujo daŭras. La situacio estas ĝenerale neŝanĝita.
En la Argonnen ni avancis atakante kun sukceso. – Francaj atakoj sude de Verdun estis re-
puŝataj. Atako kontraŭ niajn taĉmentojn transirintajn al la okcidenta Maaŝ-bordo apud St. Mihiel
komence sukcesis, poste estis repuŝata. Nia atako sudoriente de Cirey kaŭzis, ke la Francoj
forlasis parton de siaj pozicioj. La kastelo Chatillon estas atakprenita de niaj soldatoj. – Sude
de Plo En Polujo norde de Lodz ree estiĝis bataloj, kiuj ne jam decidiĝis. – Sudoriente de
Soldaŭ la kontraŭulo devige returnenmarŝis al Mlava. Ĉe la ekstrema parto de l'norda alo
forta rusa kavalerio estas venkita je la 16a kaj 17a kaj repuŝita ĝis trans Pillkallen.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu prezata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 19. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - En Belgujo kaj norda Francujo la situacio estas neŝanĝita. - Dum esplora flugo germana aeroplaneskadro devigis 2 kontraŭulajn aeroplanojn alteriĝi kaj terenfaligis alian. Unu el niaj aeroplanoj ne revenis. - Forta franca atako en la regiono de Servon ĉe la okcidenta rando de la Argonnen estis repuŝata; la Francoj ege perdis. Niaj perdoj estis malgrandaj.

Sur la orienta militkampoj la nove komencitaj bataloj daŭras ankoraŭ.

La armeestraro.

Berlin, 19. Novembro.

Oficiale. - La 17an de novembro iuj el niaj militŝipoj en la Orienta Maro baris la enirejon de la Libau'a haveno per mergitaj ŝipoj kaj fermis la lokojn por militaj aferoj gravajn. Torpedobatoj enveturintaj ĉi tiun havenon konstatis, ke kontraŭulaj militŝipoj ne estis en la haveno.

La vicestro de l'admiralstabo: v. Behncke.

Wien, 19. Novembro.

Oficiale estas sciigite: La batalo en rusa Polujo daŭras favora. Laŭ la ĝisnunaj sciigoj ni prenis 7000 kaptitojn, 18 maŝinpafilojn kaj kelkajn kanonojn.

La vicestro de l'generalstabo: v. Hoefer.

Großes Hauptquartier, 20. Novembro, antaŭtagmeze.

En Westflandern*) kaj norda Francujo io grava ne okazis. La moliginta, preskaŭ glaĉiiginta tero kaj neĝventego igis niajn militagojn tre malfacilaj. Franca atako apud Combrès, sudoriente de Verdun, estis repuŝata.

Ĉe la limo de orienta Prusujo la stato estas neŝanĝita. Oriente de la lagoj la Rusoj ekposedis neokupitan surkampojn pozicion kaj la malnovajn, nemoveblajn kanonojn, starantajn en ĝi. - La kontraŭulaj taĉmentoj repuŝitaj al Mlawa kaj Lipno plue returnenmarŝas. - Sude de Plozk ni avancis atake. En la bataloj ĉe Lodz kaj oriente de Czenstochau decido ne jam okazis.

La armeestraro.

*) La plej okcidenta provinco de Belgujo. (La tradukinto).

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 21. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Sur la okcidenta militkampoj la situacio estas entute neŝanĝita. Antaŭ preskaŭ la tuta fronto la kontraŭula artilerio vige pafadis. — Sur la orienta militkampoj la militagoj plue evoluiis. En orienta Prusujo io grava ne okazis. Ni daŭrigis la persekutadon de l'kontraŭulo repuŝita apud Plozk kaj Mława. Apud Łódź ni atake avancis. Oriente de Czenstochau niaj soldatoj kaj la aŭstraj batalas ŝultron ĉe ŝultro kaj avancis.

En orienta Prusujo la situacio estas neŝanĝita. La alveno de novaj regimentoj el War-
schau prokrastas ankoraŭ la decidon en rusa Polujo. Oriente de Czenstochau kaj nordoriente
de Krakau la atako de la unuiĝintaj armeoj estis daŭrigata.

La armeestraro.

Wien, 21. Novembro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: La atako de la unuiĝintaj armeoj kontraŭ la rusa ĉefarmeo en
rusa Polujo sukcesas ĉe la tuta fronto. En la bataloj nordoriente de Czenstochau 2 kontraŭulaj
batalionoj kapitulacis.

Antaŭ hieraŭ anglaj ŝipoj aperis ĉe la flandra bordo kaj bombardis kontraŭ
Lombartzyde kaj Zeebrügge. Inter niaj soldatoj okazis nur malmultaj difektoj, sed nombro da
belgaj civiluloj estis mortigita aŭ vundita.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

Sur la orienta militkampoj la situacio ne jam estas klara. En orienta Prusujo kaj nord-
oriente de la Polujo la bataloj estas deciditaj. En suda Polujo la bataloj estas nedeciditaj. En la regiono
de Czenstochau kaj ĉe la dekstra alio norde de Krakau nia atako daŭras. — La oficiala rusa
sciigo, ke la generaloj von Liebert kaj von Fenneberg estis kaptitaj, en orienta Prusujo, estas
mensogo. La unua sin trovas en Berlino, la alia ĉe siaj regimentoj. Ambaŭ de niaj konga-
tempo ne estis en orienta Prusujo.

Großes Hauptquartier, 22. Novembro, antaŭtagmeze.

Sur la okcidenta militkampoj la stato estas neŝanĝita. — En Polujo estas ankoraŭ batalate
pro la venko. La bataloj sude de Plozk, apud Łódź kaj apud Czenstochau daŭras.

La unua sin trovas en Berlino, la alia ĉe siaj regimentoj. Ambaŭ de nia konga-
tempo ne estis en orienta Prusujo.

La armeestraro.

Konstantinopel, 22. Novembro.

La turka armeestraro sciigas oficiale: Kun helpo de Dio niaj soldatoj alvenis al la Suez-
kanalo. En la batalo okazinta inter Katasa kaj Kestebe kaj apud Kantara, kiu kuŝas ĉe la ka-
nalo mem, pereis la angla kapitano Wilson, unu leŭtenanto kaj multaj soldatoj; tre multaj estis
vundataj. Ni prenis sufiĉe multajn kaptitojn. La anglaj taĉmentoj fugis haose. Kapitulacis
anglaj kamelrajdantoj antaŭpostenaj kaj ĝendarmoj, kiuj ĝis nun estis en angla servo.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 23. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — La bataloj apud Nieuport kaj Ypern daŭras. Malgranda angla eskadro alproksimiĝinta dufoje al la bordo estis forigata de nia artilerio. La bombardado de la anglaj ŝipkanonoj estis senefika. — En la Argonnen ni avancas paŝon post paŝo; tranĉeo post tranĉeo, unu franca pozicio post la alia estas prenataj. Ni prenas ĉiutage nombron da kaptitoj. — Perforta esploro kontraŭ nia pozicio sur la orienta bordo de la Mosel estis vanigata per nia kontraŭatako.

En orienta Prusujo la situacio estas neŝanĝita. La alveno de novaj regimentoj el Warschau prokrastas ankoraŭ la decidon en rusa Polujo. Oriente de Czenstochau kaj nordoriente de Krakau la atako de la unuiĝintaj armeoj estis daŭrigata.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 24. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Ankaŭ hieraŭ anglaj ŝipoj aperis ĉe la flandra bordo kaj bombardis kontraŭ Lombartzyde kaj Zeebrügge. Inter niaj soldatoj okazis nur malmultaj difektoj, sed nombro da belgaj civiluloj estis mortigita aŭ vundita. Sur la okcidenta militkampoj gravaj ŝanĝoj ne okazis.

Sur la orienta militkampoj la situacio ne jam estas klara. En orienta Prusujo kaj nordoriente de la lagoj niaj soldatoj defendas siajn poziciojn. En norda Polujo la tie okazantaj malfacilaj bataloj ne jam estas deciditaj. En suda Polujo la batalo staras nedecidita. En la regiono de Czenstochau kaj ĉe la dekstra alo norde de Krakau nia atako daŭras. — La oficiala rusa sciigo, ke la generaloj von Liebert kaj von Pannowitz estu kaptataj en orienta Prusujo, estas mensogo. La unua sin trovas en Berlin, la alia ĉe siaj regimentoj. Ambaŭ de iom longa tempo ne estis en orienta Prusujo.

Berlin, 24. Novembro.

Oficiale. — La 23 an de novembro la angla admiralaro oficiale sciigas, ke la germana submara boato „U 18“ estas mergita ĉe la norda bordo de Skotlando de angla patrolŝipo. La Reuter-oficejo sciigas, ke la angla kontraŭ-torpedoboato „Garry“ savis 3 oficirojn kaj 23 soldatojn el la ensidintoj. 1 soldato dronis.

La armeestraro.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 25. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - La anglaj ŝipoj ĥieraŭ ne atakis la bordon. - Sur la okcidenta militkampoj la situacio estas neŝanĝita. Apud Arras ni progresis iom.

En orienta Prusujo niaj soldatoj repuŝis ĉiujn rusajn atakojn. La kontraŭatako de la Rusoj el Warschau malsukcesis en la regiono de Lowicz-Strykow-Brzeziny. Ankaŭ oriente de Czenstochau ĉiuj rusaj atakoj vaniĝis antaŭ nia fronto.

La armeestraro.

Wien, 25. Novembro.

Oni sciigas oficiale: La batalego en rusa Polujo daŭras. Ĝis nun niaj soldatoj prenis en tiu ĉi batalo 29 000 (dudeknaŭ mil) kaptitojn, 49 maŝinpafilojn kaj multe da aliaj pormilitaj objektoj.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

Großes Hauptquartier, 25. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Sur la okcidenta militkampoj la situacio estas neŝanĝita. En la regiono de St. Hilaire-Suain franca atako forte komencita, sed malforte daŭrigita estis repuŝata; la kontraŭulo multe perdis. Apud Apremont ni progresis.

En orienta Prusujo la situacio estas neŝanĝita. - En la bataloj de la taĉmentoj de generalo von Mackensen apud Lodz kaj Lowicz la rusaj 1a kaj 2a armeoj kaj partoj de la 5a suferis gravajn perdojn. Krom multaj mortintoj kaj vunditoj la Rusoj perdis nemalpli ol proksimume 40 000 (kvardek mil) nevunditajn kaptitojn. 70 kanonoj, 160 veturiloj kun municio, 156 maŝinpafiloj estis prenataj, 30 kanonoj estis farataj neuzeblaj. Ankaŭ en ĉi tiuj bataloj partoj el niaj junaj regimentoj fortege batalis malgraŭ multnombraj viktimoj. Malgraŭ tiuj ĉi sukcesoj ne jam estis eble, batali decidige; ĉar alvenis pluaj fortaj taĉmentoj de l'kontraŭulo de oriente kaj sude. Ĝiaj atakoj ĥieraŭ ĉie estas repuŝitaj; sed la decido de la bataloj ne jam okazis.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 26. Novembro.

De sur la suda militkampoj oficiale estas sciigite: En la batalo ĉe la Kolubara de hieraŭ okazis grava progreso. La centro de la serba fronto, la forta pozicio apud Lacarevac, estis atake prenita de la regimentoj 11, 73 kaj 102, kiuj estas glorie konataj pro sia braveco; ni kaptis 8 oficirojn kaj 1200 soldatojn, 3 kanonojn, 4 veturilojn kun municio kaj 3 maŝinpafilojn. Ankaŭ ni sukcesis, sude de Ljig preni la altaĵojn oriente de la samnoma rivero kaj kapti tie 300 Serbojn. La taĉmentoj marŝintaj el Valjewo suden staras antaŭ Kosjerici.

Wien, 26. Novembro.

Oficiale. - En la batalo en rusa Polujo la kontraŭuloj staras neavancantaj ĉe granda parto de la fronto. En okcidenta Galicio niaj soldatoj sin defendas kontraŭ la rusaj taĉmentoj transirintaj la Dunajez-riveron. Ankaŭ la bataloj en la Karpaten daŭras.

La vicedro de l'generalstabo: v. Hoefer.

London, 26. Novembro.

En la hieraŭa kunsido de la subparlamento la marino-ministro Churchill sciigis, ke la (angla) ŝipo de linio „Bulwark“ eksplodis apud Sheerneŝ la 25an de novembro matene. Pereis inter 700 kaj 800 maristoj. Nur 12 estis savataj. - La ĉeestantaj admiraloj raportis, ke laŭ ilia konvinkigo la kaŭzo estis interna eksplodo de la municio-provizejo kaj ke la akvo ne skuiĝis. La ŝipo subakviĝis dum tri minutoj kaj estis for, kiam la densaj vapornuboj estis sol-
viĝintaj. La eksplodo estis tiom forta, ke la konstruaĵoj de Sheerneŝ ektremis ĝis la fundamen-
toj; ĝi estis sentata ĝis kelkajn mejlojn malproksime.

Großes Hauptquartier, 27. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Ankaŭ hieraŭ la anglaj ŝipoj ne ĝenis la flandran bordon. Ĉe la fronto sur la okcidenta militkampoj gravaj aliigoj ne okazis. Nordokcidente de Langemarck ni prenis grupon da domoj kaj kune nombron da kaptitoj. - En la Argonnen nia atako plue progresas. Francaj atakoj en la regiono de Apremont kaj oriente de St. Mihiel estis repuŝataj.

Sur la orianta militkampoj decidigaj bataloj hieraŭ ne okazis.

La armeestraro.

Rondtrigu tion ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 28. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Sur la okcidenta militkampoj la situacio estas neŝanĝita. Francaj atakoj en la Argonnen estis repuŝataj. En arbaro nordokcidente de Apremont kaj en la Voëgesen ni prenis kelkajn tranĉeojn malgraŭ forta defendo de la Francoj.

En orienta Prusujo okazis nur negravaj bataloj. Apud Lowicz niaj taĉmentoj denove atakis. La batalo daŭras ankoraŭ. Fortaj atakoj de la Rusoj okcidente de Nowo-Radomsk estis repuŝataj. Escepte tio en suda Polujo nenio ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 29. Novembro.

Oficiale estas sciigate: De la okcidenta armeo pri la hieraŭa tago oni povas nur sciigi, ke malsukcesis atakprovoj de l'kontraŭulo sudoriente de Ypern kaj okcidente de Lens.

Sur la orienta militkampoj la situacio estas neŝanĝita dekstre de la Weichsel. Atakoj de la Rusoj en la regiono de Lodz estis repuŝataj, poste komencitaj kontraŭatakoj estis sukcesaj.

En suda Polujo nenio grava okazis. — La imperiestro estas nun sur la orienta militkampoj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 30. Novembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Ĉe la okcidenta fronto io grava ne okazis. — Ĉe la limo de orienta Prusujo iom fortaj rusaj taĉmentoj provis surprize ataki germanajn fortikigitajn poziciojn oriente de Darkehmen; ili malsukcesis kun multaj perdoj. La resto de la atakintoj, kelkaj oficiroj kaj 600 soldatoj, estis prenata. — Sude de la Weichsel niaj hieraŭ cititaj kontraŭatakoj kondukis al notindaj sukcesoj. 18 kanonoj kaj pli ol 4300 kaptitoj fariĝis nia kaptajo. — En suda Polujo io grava ne okazis.

Wien, 29. Novembro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: Ĉe nia tuta fronto en rusa Polujo kaj okcidenta Galicio la hieraŭa tago pasis tre trankvila. En la Karpaten la kontraŭulaj taĉmentoj avancintaj al Homonna estis venkataj kaj repuŝataj. Ni prenis 1500 kaptitojn.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 1. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Sur la okcidenta militkampoj malgranda atako de kontraŭulo estis repulsa. Aldone al la sciigo de la rusa generalstabo je la 29a de novembro pri jam kelkajn tagojn pasinta epizodo el la batalo apud Lodz, kiu estis tre sukcesa por la Germanoj, ni konstatas jenon: Partoj de la germanaj taĉmentoj batalantaj kontraŭ la dorso kaj la dekstra flanko de la rusa armeo oriente de Lodz estis grave minacata eldorse de fortaj rusaj taĉmentoj antaŭenirantaj el oriento suden. Vidante la kontraŭulon staranta antaŭ sia fronto la germanaj taĉmentoj sin turnis kaj atake rompis per tritagaj, malfacilaj bataloj la rondon jam formitan de la Rusoj. Ili kunportis 12000 kaptitajn Rusojn kaj 25 prenitajn kanonojn neperdinte mem eĉ unu kanonon. Ankaŭ preskaŭ ĉiuj vunditoj estis kunforttransportitaj. Laŭ la cirkonstancoj la perdoj estis kompreneble ne malgravaj, sed certe ne „grandegaj“. Certe tio estis unu el la plej brilaj faroj de la tuta militiro. – La Imperiestra Moŝto inspektis hieraŭ apud Gumbinnen kaj Darkehmen niajn regimentojn en orienta Prusujo kaj ties poziciojn.

Oficiale estas sciigate: Sur la okcidenta militkampoj io grava ne okazis. Ankaŭ en orienta Prusujo kaj en suda Polujo entute regas trankvilo.

En norda Polujo sude de la Weichsel pliuzante la hieraŭ sciigitajn sukcesojn ni pliiĝis la kaptajon. La nombro de la kaptitoj kreskis je proksimume 9500, la nombro de la prenitaj kanonoj je 18. Krom tio venis al niaj manoj 26 maŝinpafiloj kaj multaj veturiloj kun municio.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 1. Decembro.

Wien, 1. Decembro.

Oficiale. – Sur la serba militkampoj plua periodo de la militagoj finiĝis per venko. La kontraŭulo estis repuŝata ĉe la tuta fronto, kvankam fine li resistis dum kelkaj tagoj plej forte kun sia tuta armeo oriente de la Kolubara kaj de la Ljig kaj refoje provis ataki; returnenirante li suferis denove gravajn perdojn. – Sur la militkampoj de Konatice sole niaj soldatoj trovis proksimume 800 neentombigitajn kadavrojn. Ankaŭ la perdo de multaj kaptitoj kaj de multa pormilita materialo tre malfortigas la Serbojn; ĉar depost la komenco de la lasta ofensivo ni prenis pli ol 19000 kaptitojn, 47 maŝinpafilojn, 46 kanonojn kaj multe da aliaj pormilitaj objektoj.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! ..

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 2. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Sur la okcidenta militkampoj malgrandaj atakoj de l'kontraŭulo estis repuŝataj. En la Argonnen la Virtemberga infanteri-regimento nro. 120, la regimento de lia imperiestra moŝto, prenis fortan pozicion. Ĝi kaptis 2 oficirojn kaj proksimume 300 soldatojn. — En orienta Prusujo io nova ne okazis. — En norda Polujo la bataloj daŭras normale. En suda Polujo kontraŭulaj atakoj estis repuŝataj.

Malvera estas la sciigo publikigita en la eksterlanda gazetaro, ke en la nombro de 40000 rusaj kaptitoj, kiun ni publikigis, estas enkalkulitaj la 23000 kaptitoj prenitaj apud Kutno. En la bataloj apud Wloclawec, Kutno, Lodz kaj Lowicz de la 11a de novembro ĝis la 1a de decembro nia orienta armeo prenis pli ol 80000 (okdek mil) nevunditajn Rusojn.

Wien, 2. Decembro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: Ankaŭ hieraŭ entute regis silento ĉe nia fronto en okcidenta Galicio kaj rusa Polujo. Dum la pasinta nokto rusa atako nordokcidente de Wolbrom estis repuŝata. La bataloj okcidente de Novo-Radomsk kaj apud Lodz estas bonŝance evoluciantaj. Impresite de nia lasta atakelmarŝo la Rusoj antaŭ Przemyśl nenion entreprenis. Kelkaj kontraŭulaj aviadistoj sensukcese ĵetis bombojn. La militagoj en la Karpaten ne jam finiĝis. La sciigo pri la enmarŝo de niaj soldatoj en Belgrad kaŭzis grandegan ĝojon sur la norda militkampoj.

La vicestro de l'generalstabo: v. Hoefer.

Großes Hauptquartier, 3. Decembro.

Oficiale. — Sur ambaŭ militkampoj nenio grava okazis. — Lia imperiestra moŝto vizitis hodiaŭ partojn el la aŭstraj hungaraj kaj germanaj armeoj batalantaj apud Czenstochau.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 4. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Sur la okcidenta militkampoj francaj atakoj kontraŭ niaj taĉmentoj en Flandern refoje estis repuŝataj, same nordokcidente de Altkirch, kie la Francoj suferis multajn perdojn. Sur la orienta militkampoj kontraŭulaj atakoj estis repuŝataj oriente de la masuraj*) lagoj; la Rusoj multe perdis. — Nia ofensivo en Polujo daŭras normale.

*) Masuren estas la suda parto de la germana provinco: Orienta Prusujo. (La tradukinto).

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 5. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: En Flandern kaj sude de Metz hieraŭ francaj atakoj estas repuŝitaj. Apud La Bassée, en la Argonnen kaj sudokcidente de Altkirch niaj soldatoj avancis. — En la bataloj oriente de la masuraj lagoj la situacio estas bonŝanca. En negrandaj entreprenoj ni prenis tie 1200 kaptitojn. En Polujo niaj militagoj daŭras laŭplane.

La armeestraro.

Wien, 5. Decembro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: En la Karpaten hieraŭ nenio grava okazis. En okcidenta Galicio apud Tymbark estiĝis negrandaj, por ni bonŝancaj bataloj. La situacio en suda Polujo estas neŝanĝita. La batalo en norda Polujo daŭras.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 6. Decembro.

Oficiale estas sciigate: Dum la lasta nokto ni laŭplane malokupis Vermelles'on (sudoriente de Bethune), kies plua defendo pro la daŭra franca artileripafado estus senutile rabinta viktimojn. La konstruaĵojn ankoraŭ starantajn ni krevigis antaŭe. Niaj soldatoj okupis fortajn poziciojn oriente de tiu loko. La kontraŭulo ĝis nun ne povis sekvi. — Okcidente kaj sudokcidente de Altkirch la Francoj denove atakis kun pli fortaj taĉmentoj, sed vane. Ili suferis gravajn perdojn. Escepte tio sur la okcidenta militkampio io grava ne okazis.

Oriento de la masuraj lagoj la kontraŭulo entreprenis nenio. La bataloj ĉirkaŭ Lodz ĉiam iras laŭ niaj intencoj. En suda Polujo nenio aliĝis.

Posttagmeze oni sciigas oficiale: Hodiaŭ posttagmeze Lodz estis prenata de niaj soldatoj. Suferinte gravajn perdojn la Rusoj tie returnenmarŝas.

La armeestraro.

ESPERANTA SOC.
FRATECO
BRAGA (BRAND)

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 6. Decembro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: La batalo en Polujo evolucas bonŝance por la germana-aŭstra armeo. La rusaj taĉmentoj antaŭenirintaj al okcidenta Galicio estis hieraŭ atakataj elsude de niaj kaj germanaj regimentoj. La unuiĝintoj kaptis 2200 Rusojn kaj kelkajn veturilarojn de l'kontraŭulo.

En la Karpaten okazis bataletoj. La kontraŭulo enpenetranta nian pozicion ĉe la Beskiden estis repuŝata kaj perdis 500 kaptitojn. La vicestro de l'generalstabo: v. Hoefer.

Großes Hauptquartier, 7. Decembro.

Oficiale estas sciigate: De la okcidenta militkampoj kaj de oriente de la masuraj lagoj gravaj sciigoj ne alvenis.

En norda Polujo post longa batalado ĉirkaŭ Lodz ni grave sukcesis repuŝante la fortajn rusajn taĉmentojn, kiuj staris norde, okcidente kaj sudokcidente de tiu urbo. Lodz estas en niaj manoj. Pro la grandeco de la batalkampoj oni ne jam povas konstati la rezultojn de tiu batalo. La perdoj de la Rusoj estas sendube tre grandaj. - La Rusoj en suda Polujo provis, helpe veni al siaj minacitaj armeoj norde; tio estis vanigata per atakoj de aŭstraj-hungaraj kaj germanaj taĉmentoj sudokcidente de Piotrkow.

La armeestraro.

Wien, 7. Decembro.

Oficiale estas sciigate: La batalado pro la decido sur la rusa militkampoj daŭras. Ankaŭ en okcidenta Galicio okazas nemalgrandaj bataloj. Ili ne jam decidiĝis. Niaj soldatoj tie prenis hieraŭ pluajn 1500 Rusojn. En la Karpaten oni batalas plu. Sur kelkaj lokoj la kontraŭulo retiris fortajn taĉmentojn ĝis malantaŭ la montarodorso.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

Konstantinopel, 7. Decembro.

La turka armeestraro sciigas: Apud Adjara ni denove batalis sukcese kaj forprenis de la Rusoj - kiuj uzis Dum-Dum-kuglojn - 1 kanonon, multegon da bomboj, da armiloj kaj municio. Rusaj atakoj malsukcesis oriente de la Wan-lago ĉe la turka limo. Kontraŭe niaj soldatoj antaŭenirintaj el Revender okupis Saoutchulagehe'on, 70 kilometrojn trans la limo, gravan pozicion de la Rusoj en la provinco Aserbeidschan.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 8. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Ĉe la flandra fronto la tero malbone irebla pro la lastaj pluvegoj tre malfaciligas la armemovojn. Norde de Arras ni iomete progresis. — La milithospitalo en Lille hieraŭ forbrulis. Verŝajne okazis ekbruligo. Homoj ne perdis la vivon. — Ne laŭfaktaj estas la asertoj de la Francoj, ke ili avancis en la Argonnen. De iom longa tempo tie okazis neniu ajn franca atako; kontraŭe ni avancis malrapide, sed konstante. — Apud Malancourt, oriente de Varennes, antaŭhieraŭ estis prenata franca pozicio. La pli granda nombro el la defendantoj pereis. La resto, kelkaj oficiroj kaj proksimume 150 soldatoj, estis kaptata. — Franca atako kontraŭ niaj pozicioj norde de Nancy hieraŭ estis repuŝata.

De la limo de orienta Prusujo gravaj sciigoj ne alvenis. En norda Polujo la germanaj soldatoj tuj poste sekvas la kontraŭulon rapide returnenirantan oriente kaj sudoriente de Lodz. — Krom la eksterordinare gravaj, sangaj perdoj hieraŭ jam sciigitaj la Rusoj suferis ĝis nun la perdon de proksimume 5000 kaptitoj kaj 16 kanonoj kun municiveturiloj. — En suda Polujo nenio grava okazis.

La armeestraro.

Wien, 8. Decembro, tagmeze.

Oficiale estas sciigate: La bataloj en okcidenta Galicio plifortiĝas. Atakante nun ankaŭ elokcidente niaj taĉmentoj forpuŝis la kontraŭulon el lia pozicio Dobczycs-Wieliczka. Nia atako daŭras. La nombro de la kaptitoj ne jam estas taksebla. Ĝis nun 5000 estas fortransportitaj, inter ili 27 oficiroj. — En Polujo denovaj atakoj de la Rusoj estis ĉie repuŝataj de niaj kaj germanaj taĉmentoj sudokcidente de Piotrkow. — En la Karpaten nenio grava okazis.

La vicestro de l' generalstabo: v. Hoefer.

Wien, 8. Decembro.

De sur la serba militkampoj oficiale estas sciigate: La nova lokigo de niaj taĉmentoj okazas laŭplane. La kontraŭulo kelkfoje provis ĝin malhelpi, sed estis repuŝata kaj suferis notindajn perdojn. — Nia ofensivo sude de Belgrad bone progresas. Ni kaptis tie 14 oficirojn kaj 400 soldatojn.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 9. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Niaj soldatoj devis pafe bruligi la bienon Pechérie, okcidente de Reims, kvan-
kam super ĝi flirtis flago kun la ruĝa kruco; ĉar fotoĝrafoj faritaj de aviadisto pruvis sendube,
ke tuj malantaŭ la bieno sin kaŝis peza franca baterio. – Francaj atakoj en la regiono de Souain
kaj kontraŭ Varennes kaj Vauquois ĉe la orienta rando de la Argonnen estis repuŝataj; la kon-
traŭulo suferis perdojn. En la Argonnen mem ni avancis sur kelkaj lokoj kaj prenis nombron
da kaptitoj. – En la hieraŭ sciigitaj bataloj norde de Nancy la Francoj suferis gravajn perdojn.
Niaj perdoj laŭcirkonstance estas nemultaj.

El la orienta Prusujo novaj sciigoj ne alvenis. – En norda Polujo nia armeo tuŝas la rusan,
kiu haltis en multe fortikigita pozicio oriente de la Miazga. Ĉirkaŭ Lowicz plue estas batalate. –
En suda Polujo denove aŭstraj-hungaraj kaj niaj soldatoj sukcese atakis ŝultron ĉe ŝultro.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 10. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: En la regiono de Souain la Francoj hieraŭ pafis nur per artilerio.
Ĉe la orienta rando de la Argonnen denova franca atako kontraŭ Vauquois-Boureuilles ne suk-
cesis kaj mortis sub la pafado de nia artilerio. La kontraŭulo videble suferis grandajn perdojn.

Tri kontraŭulaj aviadistoj ĵetis hieraŭ 10 bombojn sur Freiburg i. B., kiu estas nefortik-
igita kaj ne kuŝas en la regiono de la militagoj. Okazis neniua difekto. Ni notas ĉi tie la
aferon, por konstati la fakton, ke refoje – kiel jam ofte depost la komenco de l'milito – niaj
kontraŭuloj ĵetis bombojn sur nefortikigitan urbon nekuŝatan en la regiono de la militagoj.

Oriente de la masuraj lagoj okazis nur artileria batalado. En norda Polujo unu el niaj
avancantaj taĉmentoj atake prenis sur la dekstra bordo de la Weichsel Przasnysz'on. Ni prenis
600 kaptitojn kaj kelkajn maŝinpafilojn. Sur la maldekstra bordo de la Weichsel nia atako daŭras. –
En suda Polujo rusaj atakoj estis repuŝataj.

La armeestraro.

Konstantinopel, 10. Decembro.

Oficiale estas sciigate: Ĉelima taĉmento okupis en la Kaŭkasus Taoucherd'on norde de
Olty. Niaj taĉmentoj ĉe la limo de Aserbeidschan avancis ĝis Sonay kaj Djihari, oriente de
la vilajedo Wan.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 12. Decembro, antaŭtagmeze.

Wien, 10. Decembro.

Oni sciigas oficiale: En Polujo la hieraŭa tago pasis trankvile ĉe nia fronto. Unuopa nokta atako de la Rusoj sudokcidente de Nowo-Radomsk estis repuŝata. - En okcidenta Galicio ambaŭ kontraŭuloj marŝigis al la batalo fortajn taĉmentojn. Ĝis nun ni prenis tie pli ol 10000 kaptitojn. La batalo daŭras ankoraŭ hodiaŭ. - Per niaj militagoj en la Karpaten ni jam reakiris nemalgrandajn partojn de nia teritorio.

La vicestro de l' generalstabo: v. Hoefer.

Berlin, 10. Decembro.

Oficiale: Laŭ oficiala sciigo de la Reuter-oficejo en London nia krozŝipa eskadro je la 8a de decembro, matene je la 7^{1/2}a, proksime de la Falkland-insuloj estis ekvidata kaj atakata de angla eskadro komandata de vicadmiralo Sturdee. Laŭ la angla sciigo subakviĝis dum la bataleto la ŝipoj „Scharnhorst“, „Gneisenau“ kaj „Leipzig“. La ŝipoj „Dresden“ kaj „Nürnberg“ sukcesis fugi. Laŭdire ili estas persekutataj. Ŝajnas, ke niaj perdoj estas gravaj. Nombro da postvivantoj el la subakvigintaj ŝipoj estis savata. Pri la fortoj de l'kontraŭulo, kiu laŭdire malmulte perdis, la anglaj sciigoj nenion raportas.

10. Decembro. - Laŭ plua oficiala sciigo de la Reuter-oficejo la persekutantaj anglaj krozŝipoj sukcesis mergi ankaŭ la ŝipon „Nürnberg“.

La vicestro de l'generalstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 13. Decembro, antaŭtagmeze.

Großes Hauptquartier, 11. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - En Flandern ni progresis. - Okcidente kaj oriente de la Argonnen kontraŭulaj artileripozicioj estis batalataj bonsukcese. Francaj atakoj en la Bois de Prêtre okcidente de Pont-a-Mousson estis repuŝataj.

Oriente de la masuraj lagoj nenio aliĝis. En norda Polujo ni avancis atake. En suda Polujo nenio okazis.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 12. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: En Flandern la Francoj atakis hieraŭ oriente de Langemarck. Ili estis repuŝataj kaj perdis 200 pereigitojn kaj 340 kaptitojn. - Nia artilerio bombardis la stacidomon de Ypern, por malhelpi la movojn de kontraŭulaj taĉmentoj. - Apud Arras ni progresis. Apud Souain-Perthes la Francoj denove atakis sen iu ajn sukceso. - En la Argonnen post kelksemajna neageco la Francoj provis kelkajn atakojn. Ili ĉie estis facile repuŝataj. Kontraŭe la Germanoj per krevigo de minoj refoje prenis gravan francan pozicion. La kontraŭulo perdis multajn pereigitojn kaj supersutojn. Krom tio ni prenis 200 kaptitojn. - Apud Apremont, sudoriente de St. Mihiel, kelkaj fortaj francaj atakoj estis repuŝataj, same sur la dorso de la Vogesen okcidente de Markirch.

Ĉe la limo de orienta Prusujo nia kavalerio repuŝis rusan kavalerion kaj prenis 350 kaptitojn. Sude de la Weichsel niaj militagoj evolucas plu. En suda Polujo rusaj atakoj estis repuŝataj de aŭstraj-hungaraj kaj de niaj soldatoj.

La armeestraro.

Wien, 12. Decembro, tagmeze.

Oficiale. - Malgraŭ ĉiaj malhelpaĵoj sur la vintra montara kampo niaj soldatoj senhalte daŭras avanci en la Karpaten. En sukcesaj bataletoj ili prenis hieraŭ 2000 kaptitojn. La montoseloj okcidente de tiu de Lupkow ree estas en niaj manoj. - Sude de Gorlice, Grybow kaj Neu-Sandec komenciĝis nemalgrandaj bataloj. - En okcidenta Galicio daŭras la batalo, kies fronto etendiĝas de okcidente de Tymbark ĝis oriente de Krakau. Hieraŭ ree kelkaj atakoj de la Rusoj malsukcesis sub la pafoj de nia artilerio. - La situacio en Polujo ne ŝanĝiĝis. - La ensidantoj de Przemyśl atake elmarŝis kaj rekunportis 700 kaptitojn, 18 maŝinpafilojn kaj tre multe da municio. Escepte tio nenio grava okazis. La vicestro de l'generalstabo: v. Hoefler.

Großes Hauptquartier, 13. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Postkiam je la 11a nuna la franca ofensivo el Aprémont estis malsukcesinta, la kontraŭulo atakis hieraŭ posttagmeze sur pli larĝa fronto el Flirey (meze de St. Mihiel kaj Pont-à-Mousson). La Francoj malsukcesis kaj perdis 600 kaptitojn kaj grandan nombron da pereigitoj kaj vunditoj. Ĉe ni 70 soldatoj estas vunditaj. Escepte tio la tago entute pasis trankvile sur la okcidenta militkampoj.

En norda Polujo ni prenis nombron da kontraŭulaj pozicioj. Ni prenis 11000 (dekunu mil) kaptitojn kaj 43 maŝinpafilojn. - El orienta Prusujo kaj suda Polujo io nova ne estas sciigita.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 13. Decembro.

Oficiale. – En la batalo en okcidenta Galicio apud Limanowa la suda alo de la Rusoj hieraŭ estis venkata kaj devigata returnenmarŝi. Ĝi komencis la persekutadon de la kontraŭulo. Ĉe la aliaj partoj de la fronto ĉiuj atakoj malsukcesis same kiel dum la antaŭaj tagoj. – Niaj taĉmentoj marŝintaj ĝis trans la Karpaten energie daŭrigis, kelkfoje batalante, la persekutadon. Posttagmeze Neusandek estis prenata; ankaŭ en Grybow, Gorlice kaj Zmigrod niaj soldatoj ree enmarŝis. El la komitato Zemplin la kontraŭulo estas tute elpuŝita. – En la orientaj arbaroj Karpaten, kiuj kuŝas flanke de la ĉefa militkampoj, la kontraŭulo sude de la montodorso nenie sukcesis multe avanci. Entute niaj soldatoj restis sur la montoŝeloj, en la Bukovina sur la linio de la valo Suczawa. En suda Polujo hodiaŭ ne estis batalate. Norde de Lowicz niaj konfederitoj sukcese daŭrigis ataki la multe fortigitajn poziciojn de la Rusoj.

La vicestro de l' generalstabo: v. Hoefer.

Konstantinopel, 13. Decembro.

La turka armeestraro sciigas, ke la granda krosŝipo Sultan Jawus Selim la 10an de decembro paŝbruligis la urbon Batum; ĝi do ne estas grave difektita, kion sciigis la Rusoj; la rusaj surbordaj baterioj pafis sensukcese.

Großes Hauptquartier, 14. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Nefortaj francaj atakoj kontraŭ kelkaj el niaj pozicioj inter Maas kaj Vogesen facile estis repuŝataj. Escepte tio nenio grava okazis sur la okcidenta militkampoj, en orienta Prusujo kaj en suda Polujo. En norda Polujo niaj militagoj daŭras.

Pri la rusaj kaj francaj oficialaj sciigoj ni notas jenon: El Petersburg la 11an de decembro oficiale estis sciigate: „Sudoriente de Krakau ni daŭrigis niajn atakojn, prenis kelkajn germanajn kanonojn kaj maŝinpafilojn kaj proksimume 2000 kaptitojn.“ Fakte ne unu soldato, nek unu kanono aŭ maŝinpafilo de niaj taĉmentoj batalantaj „sudoriente de Krakau“ venis al la manoj de la Rusoj. – La oficiala sciigo de la 12a de decembro el Paris asertas: „Nordoriente de Vailly germana baterio estas tute pereigita. En Deuxnoudo okcidente de Vigneulles-les-Hattonchâtel 2 germanaj baterioj estis pereigataj, 1 grandkalibra kaj 1 kontraŭ aeroplanoj. En la sama regiono la Francoj krevigis fortikigitan domon kaj kelkajn tranĉeojn.“ Ĉiuj tiuj sciigoj estas eltrovitaj.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 14. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Ni daŭrigis la persekutadon de la Rusoj en okcidenta Galicio kaj ree avancis ĉiuloke norden post malgrandaj kaj iom grandaj bataletoj. Ankaŭ Dukla nun ree estas en niaj manoj. - Niaj taĉmentoj antaŭenmarŝintaj ĝis trans la Karpaten prenis hieraŭ kaj antaŭhieraŭ 9000 kaptitojn kaj 10 maŝinpaŝilojn. Ĉe nia fronto inter Rajbort kaj oriente de Krakau kaj en suda Polujo la stato estas neŝanĝita. Norde de Lowicz niaj konfederitoj atake plu avancis kontraŭ la malsupra Bsura. La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

De la limo de orienta Prusujo nenio grava okazis. En norda Polujo niaj atak-

Großes Hauptquartier, 15. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Hieraŭ la Francoj vane atakis ĉe kelkaj punktoj: Atako entreprenita kontraŭ niaj pozicioj sudoriente de Ypern malsukcesis kun grandaj perdoj de l'kontraŭulo. Kontraŭula atako el nordoriente de Suippes estis repuŝata kun gravaj kontraŭulaj perdoj, same alia nordoriente de Ornes (norde de Verdun). En la regiono de Ailly-Ŗprémont, sude de St. Mihiel, la Francoj kvarfoje atakegante provis preni niajn poziciojn. La atakoj malsukcesis, same denova kontraŭula antaŭenmarŝo el la regiono de Flirey (sude de Toul). - En la Vogesen la bataloj daŭras ankoraŭ. Atake reprenante la vilaĝon Steinbach (okcidente de Sennheim) ni prenis 300 kaptitojn.

En orienta Prusujo nenio grava okazis. Germana taĉmento antaŭenirinta el Soldau tra Mlawa al Ciechanow sin retiris al sia antaŭa pozicio renkontinte multe pli fortajn kontraŭulojn. En rusa Polujo okazis nenio grava. La malbona vetero influas niajn agojn.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 17. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - La Francoj daŭrigis en tiu sukceso. Ankaŭ apud

Wien, 15. Decembro.

De sur la serba militkampoj estas sciigate: Fariĝis necesa, retiri nian alon. La situacio per tio estiĝinta igis konsilinde, intertempe malokupi ankaŭ Belgrad'on. Ni forlasis la urbon sen batalo. De la toleritaj penegadoj kaj bataloj niaj soldatoj ja suferis, sed estas plenaj de entuziasmo.

La ofensivo de niaj armeoj en okcidenta Galicio devigis la kontraŭulon, tie returnenmarŝi kaj ŝanceliĝi ankaŭ la rusan fronton en suda Polujo. - Niaj taĉmentoj persekutantaj en okcidenta Galicio la kontraŭulon elsude venis hieraŭ ĝis la linio Jaslo-Rajbrot. Dum ĉi tiu persekuto kaj en la lasta batalo ni kaptis laŭ la plej novaj sciigoj 31 000 (tridekunu mil) Rusojn.

Hodiaŭ alvenis sciigoj pri returnenmarŝo de l'kontraŭulo ĉe la tuta fronto Rajbrot-Niepolomice-Wolbrom-Noworadomsk-Piotrkow. En la arbaro-Karpaten ni gardis nin kontraŭ la antaŭenmarŝo de kontraŭulaj taĉmentoj en la valon Latorcza.

Ĝiam povas esti taksataj.

La vicestro de l'generalstabo: v. Hoefer.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 16. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Sur la okcidenta militkampoj la kontraŭulo denove provis antaŭenmarŝi tra Nieuport; li estis helpata de la pafado de siaj ŝipoj sur la maro. La pafado restis tute sen sukcesa; la atako estis repuŝata. 450 Francoj estis kaptataj. De la aliaj partoj de la fronto estas notinda nur la atakpreno de altaĵo okcidente de Sennheim, kiun la kontraŭulo obstine defendis de antaŭhierau. La baterio de Hartlepool estas silentigita, la gasujo pereigita; de sur la ŝipoj ni provis konstati kelkajn grandajn bruladojn.

De la limoj de orienta Prusujo nenio nova estas sciigata. En norda Polujo niaj atakmojoj daŭras normale. Hierau ni prenis kelkajn fortajn poziciojn de l'kontraŭulo kaj kaptis proksimume 3000 Rusojn kaj 4 maŝinpafilojn. En suda Polujo niaj soldatoj batalantaj tie kune kun la aŭstraj avancis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 16. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Kelkaj el niaj suraltmaraj militŝipoj atakis la orientan bordon de Anglujo kaj bombardis je la 16a de decembro matene la fortikigitajn ĉebordejojn Scarborough kaj Hartlepool. Pri la plua irado de l'entrepreno sciigoj nun ne jam povas esti publikigitaj.

Ni perdis tie malpli ol 200 soldatojn. — En la Argonnen ni prenis per sukcesaj atakoj ĉirkaŭ 750 kaptitojn kaj iom da porŝutaj objektoj. — De la aliaj partoj de la okcidenta fronto gravaj okazaĵoj ne estas sciigataj.

Großes Hauptquartier, 17. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — La Francoj daŭrigis en Nieuport sian atakon sen iu sukceso. Ankaŭ apud Zillebecke kaj La Bassé ili provis ataki, sed kun tre multaj perdoj estis repuŝataj. — La intenco de la Francoj, konstrui apud Soissons ponton trans la Aisne, estis vanigata de nia artilerio. Oriente de Reims ni detruis francan subteran pozicion.

De la limoj de orienta kaj okcidenta Prusujo nenio nova estas sciigata. — La ofensivo kontraŭ Silesio kaj Posen, kiun la Rusoj estis anoncintaj, tute malsukcesis. Post obstinaj, malfacilaj tutfrontaj bataloj ili estis devigataj, returnenmarŝi en tuta Polujo. La kontraŭulo ĉie estas persekutata. En la hieraŭaj kaj antaŭhieraŭaj bataloj en norda Polujo la braveco de la regionoj el okcidenta Prusujo kaj Hessen batalis decidige. La sekvoj de tiu ĉi decido nun ne jam povas esti taksataj.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
 Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
 zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Grobes Hauptquartier, 19. Decembro, antaŭtagmeze.

Berlin, 17. Decembro.

Oficiale. - Sur la okcidenta fronto okazis hieraŭ kelkaj kontraŭulaj atakoj. Apud Nieupoort, Bixschote kaj norde de La Bassée ankoraŭ estas batalate. Okcidente de Lens, oriente de Arras. Pri la germana atako kontraŭ la orienta bordo de Anglujo jenaj detalajoj estas oficiale sciigataj: Alproksimiĝante la anglan bordon dum la nebula mateno niaj krosŝipoj estis sensukcese atakataj de kvar anglaj kontraŭ-torpedoboatoj. Unu el ili estis pereigata, alia sukcesis flegi grave difektita. La baterio de Hartlepool estas silentigita, la gasujo pereigita; de sur la ŝipoj ni povis konstati tri grandajn bruladojn. La bordgardejo kaj signaloficejo en Withby estis destruitaj. Niaj ŝipoj kelkfoje estis trafataj de la surbordaj baterioj, sed suferis nur malmultajn difektojn. Sur alia loko ankoraŭ plua kontraŭ-torpedoboato estis mergata. Nieupoort kaj Bixschote. -

La vicesstro de l'admiralstabo: v. Behncke.

Apud La Bassée, kie atakis Francoj kaj Angloj, la vicesstro de l'admiralstabo: v. Behncke. 200 kaptitoj (koloruloj kaj Angloj) venis al niaj manoj. Ĉirkaŭ 600 mortigitaj Angloj kuŝas antaŭ nia fronto. - Apud Notre-Dame-de-Lorette (sudoriente de Bethune) ni perdis tranĉeon 60 m longan. Niaj perdoj konsistis el 1000 homoj, 5 maŝinpafiloj, 2 minjetoj kaj 270 Angloj.

Grobes Hauptquartier, 18. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - La batalo apud Nieupoort staras favora, sed ne jam estas finita. - Malsukcesis atakoj de la Francoj inter La Bassée kaj Arras kaj sur ambaŭ bordoj de la Somme. La kontraŭulo suferis gravajn perdojn, sole ĉe la Somme 1200 kaptitojn kaj minimume 1800 pereigitojn. Ni perdis tie malpli ol 200 soldatojn. - En la Argonnen ni prenis per bonsukcesintaj atakoj ĉirkaŭ 750 kaptitojn kaj iom da pormilitaj objektoj. - De la aliaj partoj de la okcidenta fronto gravaj okazaĵoj ne estas sciigataj.

Ĉe la limoj de orienta kaj okcidenta Prusujo la stato estas neŝanĝita. - En Polujo ni plue sekvas la fugantan kontraŭulon.

La armeestraro.

18an de decembro apud Notre-Dame-de-Lorette. - En la regiono de Souain-Massiges (nord-oriento de Châlons) la Francoj hieraŭ forte atakis kaj sur unu loko avancis ĝis en nian unuan tranĉeon. Sed ĉiuj iliaj atakoj malsukcesis pro niaj pafiloj, 4 oficiroj kaj 310 soldatojn la Francoj lasis sur la loko.

Konstantinopel, 18. Decembro.

Oficiale. - Sub la protekto de kanonoj kaj maŝinpafiloj la Rusoj provis avanci sur la maldékstra bordo de l'Tschoruk, sed post kvinhora batalo estis repuŝataj. - Post la batalo apud Sarai, kiu finiĝis favore por la Turkoj, ni daŭrigis senhalte la persekutadon de l'kontraŭulo. La turka kavalerio renkontis la Rusojn 15 km okcidente de Kotur, atakis ilin neatendante sian infanterion kaj forĉasis ilin kontraŭ Razi Kotur.

sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! ..

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 19. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Sur la okcidenta militkampoj okazis hieraŭ kelkaj kontraŭulaj atakoj. Apud Nieuport, Bixschoote kaj norde de La Bassée ankoraŭ estas batalate. Okcidente de Lens, oriente de Albert kaj okcidente de Noyon ni repuŝis la atakojn.

Ĉe la limo de orienta Prusujo atako de rusa kavalerio estis repuŝata okcidente de Pillkallen. En Polujo la persekutado estas daŭrigata.

Großes Hauptquartier, 20. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - La imperiestro tute resaniĝis kaj denove iris al la fronto. - Sur la okcidenta militkampoj la kontraŭulo ĉesigis hieraŭ siajn sensukcesajn atakojn apud Nieuport kaj Bixschoote. - Apud La Bassée, kie atakis Francoj kaj Angloj, la kontraŭulo estas repuŝita kaj multe perdis. 200 kaptitoj (koloruloj kaj Angloj) venis al niaj manoj. Ĉirkaŭ 600 mortigitaj Angloj kuŝas antaŭ nia fronto. - Apud Notre-Dame-de-Lorette (sudoriente de Bethune) ni perdis tranĉeon 60 m longan. Niaj perdoj estis tre malgrandaj. - En la Argonnen ni progresis iom kaj prenis 3 maŝinpafilojn.

Ĉe la limoj de orienta kaj okcidenta Prusujo io nova ne okazis. - En Polujo la rusaj armeoj provis, ekkalti en nova pozicio ĉe Rawka kaj Nida. Ili estas ĉie atakataj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 21. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Ankaŭ hieraŭ francaj atakoj apud Nieuport estis repuŝataj. - Inter Richebourg-l'Avoué kaj la kanalo d'Aire la Bassée niaj taĉmentoj atakis la poziciojn de la Angloj kaj Hindoj. La kontraŭulaj tranĉeoj estis atake prenitaj, la kontraŭulo elpuŝata el sia pozicio kun gravaj siaj perdoj. Ni prenis 1 kanonon, 5 maŝinpafilojn, 2 minjetilojn kaj 270 Anglojn kaj Hindojn, inter ili 10 oficirojn. - Ni atake reprenis la tranĉeon perditan al la kontraŭulo la 18an de decembro apud Notre-Dame-de-Lorette. - En la regiono de Souain-Massiges (nordoriente de Châlons) la Francoj hieraŭ forte atakis kaj sur unu loko avancis ĝis en nian unuan tranĉeon. Sed ĉiuj iliaj atakoj malsukcesis pro niaj pafoj; 4 oficirojn kaj 310 soldatojn la Francoj lasis inter niaj manoj. Granda nombro da mortigitaj Francoj kuŝas antaŭ niaj pozicioj. - En la Argonnen ni prenis gravan arbaraltaĵon apud La Four de Paris kaj 3 maŝinpafilojn, 1 revolverkanonon kaj 275 Francojn. - Nordokcidente de Verdun tute malsukcesis la francaj atakoj tre forte faritaj.

(Daŭrigo sur la folio 54a)

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationales Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zoj, zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

La granda vigleco de la Francoj antaŭ nia tuta fronto klariĝas per jena bulteno, eldonita de generalo Joffre la 17an de decembro nuna kaj trovita ĉe mortigita franca oficiro:

Bulteno de l' 17a de decembro 1914.

De 3 monatoj la fortaj kaj nenombreblaj atakoj ne sukcesis, rompi nian fronton. Ĉie ni venke resistis. Post kiam ni plimultigis niajn soldatojn kaj materialon, la momento estas veninta, profiti la nunan malfortecon de l'kontraŭulo. Post kiam ni retenadis la germanajn taĉmentojn, estas nia tasko, repuŝi ilin kaj por ĉiam liberigi nian landon de la enpenetrintoj. Multe pli ol iam Francujo fidus vian kuraĝon, vian energion kaj vian volon, venki malgraŭ ĉia ofero. Jam vi venkis apud la Marne, la Yser, en Lothringen kaj en la Vogesen. Vi sciis venki ĝis la fina triumfo. Perthes ni repuŝis atakojn; la Francoj parte suferis gravajn perdojn Joffre.

En orienta kaj okcidenta Prusujoj la situacio estas neŝanĝita. En Polujo progresas nia atako kontraŭ la pozicioj, en kiuj la kontraŭulo ree formis fronton.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 22. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Apud Nieuport kaj en la regiono de Ypern entute regas silento. - Por repreni la poziciojn apud Festubert kaj Givenchy, kiujn ili perdis la 20an de decembro, la Angloj plinomrigitaj de francaj teritorial-soldatoj hieraŭ kaj lastnokte faris ekstreme fortajn atakojn, kiuj estis repuŝataj. En la regiono de Richebourg ili sukcesis, reekposedi siajn antaŭajn poziciojn. - La hieraŭajn atakojn de la Francoj en la regiono de Albert, nordoriente de Compiègne, apud Souain kaj Perthes estis repuŝataj kun gravaj iliaj perdoj. - En la okcidenta parto de la Argonnes ni prenis kelkajn tranĉeojn; oriente de la Argonnes, nordokcidente kaj norde de Verdun la francaj atakoj facile estis repuŝataj; la kontraŭulo parte suferis gravajn perdojn.

Sur la orienta militkampoj la situacio estas neŝanĝita en orienta kaj okcidenta Prusujoj. En Polujo niaj soldatoj estas forte batalantaj apud la Bzura kaj Ravka. Sur multaj lokoj ili jam permilitis la transiron. Sur la dekstra bordo de la Pilica la batalo de la unuiĝintaj armeoj staras ankoraŭ nedecidita.

Bedaŭrinde ni konstatis nur post la publikigo, ke la hieraŭ sciigita bulteno de la franca generalo Joffre de l' 17a de decembro 1914 havis jenan postskribon: „Tiu ĉi bulteno estas publikigota hodiaŭ vespere al ĉiuj taĉmentoj; estas malhelpote, ke ĝi estu presata en gazetoj.“

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlino S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 23. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Niaj taĉmentoj facile repuŝis atakojn en la dunoj apud Lombartŭde kaj sude de Bixŝoote. – Apud Richebourg l'Avoué la Angloj hieraŭ ree estis puŝataj el siaj pozicioj. Malgraŭ ekstreme fortaj kontraŭatakoj ni defendis kaj plifortigis ĉiujn poziciojn, kiujn ni estis perforte akirintaj de la Angloj inter Richebourg kaj la kanalo d'Aire à La Bassée. Depost la 20a de decembro ni kaptis 750 kolorulojn kaj Anglojn kaj akiris 5 maŝinpafilojn kaj 4 minjetilojn. – En la ĉirkaŭaĵo de Châlons la kontraŭulo estas tre vigla. Norde de Sillery, sudoriente de Reims, apud Souain kaj Perthes ni repuŝis atakojn; la Francoj parte suferis gravajn perdojn.

En orienta kaj okcidenta Prusujo la situacio restis neŝanĝita. La bataloj apud la Bzura kaj Rawka daŭras. Sur la dekstra bordo de la Pilica la stato estas neŝanĝita.

Niaj taĉmentoj apud Soldau-Neidenburg denove ekatakis kaj repuŝis la Rusojn en kelkaj bataloj. Mława kaj la kontraŭulaj pozicioj apud ĝi ree estas en niaj manoj. En tiuj bataloj ni kaptis pli ol 1000 Rusojn. Multaj lokoj forte estis batalate per la Rusoj.

Wien, 23. Decembro, tagmeze.

Oficiale. – Ni avancis en la Karpaten, en la Ung-valo kaj ĉe la montoselo de Lubkow. – La oficiala publikigo, eldonita de la rusa generalstabo la 18an de decembro, asertis, ke la Rusoj prenis de ni 3000 soldatojn, kanonojn kaj maŝinpafilojn. Tio estas mensogita. Nia tiea taĉmento perdis tie 2 oficirojn kaj 305 soldatojn mortigitajn, vunditajn kaj netroveblajn; ne unu kanono nek maŝinpafilo venis al la manoj de la Rusoj. – La fortaj bataloj apud Krasno, Jaslo, Tuchow kaj apud la malsupra Dunajec daŭras. Sude de Tomaszow ni repuŝis noktan atakon de kaŭkasaj regimentoj.

(Eltiraĵo.)

Großes Hauptquartier, 25. Decembro, antaŭtagmeze.

La vicedro de l'generalstabo: von Hoefer.

Oficiale estas sciigate: En Flandro ni hodiaŭ entute regis trankvilo. Oriente de Festubert ni perforte akiris de la Angloj parton de iliaj fortigitaj pozicioj alligitan al tiu, kiun ni prenis je la 20a de decembro. Apud Chiry, sudoriente de Vailly, niaj soldatoj atakis la francajn fortigojn entute ĝinte. La francoj perdis 1700 homojn kaj kaptis 1700 homojn.

Wien, 23. Decembro.

Oficiale estas sciigate: Antaŭ ol ĝis povis ataki, la franca submara boato „Curie“ ĉe nia bordo estis bombardata de surbordaj baterioj kaj de aeroplanoj kaj estis mergata. La ensidantoj estis kaptataj. La 21an nunan nia submara boato 12 atakis en la Otranto-markolo la francan ŝiparon, konsistantan el 16 grandaj ŝipoj, pafis dufoje torpedojn kontraŭ ŝipo de linio laŭ la tipo „Courbet“ kaj trafis ambaŭfoje. La poste estiĝanta konfuzo inter la kontraŭulaj ŝipoj, la danĝera proksimesto de kelkaj el ili, la altaj ondoj kaj la netravidebla aero kaŭzis, ke la submara boato ne povis certiĝi pri la plua sorto de tiu ŝipo.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 24. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Hieraŭ la kontraŭulo ne ripetis la atakojn apud Nieuport. Apud Bixschoote je la 21a de decembro niaj taĉmentoj akiris 230 kaptitojn. En la regiono de Châlons la kontraŭulo ree estis tre vigla. La fortan kontraŭulan artileri-pafadon ĉe tiu ĉi fronto sekvis apud Souain kaj Perthes infanteriatakoj, kiuj estis repuŝataj. La kontraŭulo perforte akiris tranĉeon, kiun li daŭre estis bombardinta; sed ni reprenis ĝin vespere. Post tiu ĉi sukcesinta kontraŭatako ni forlasis la pozicion, ĉar la pafado de l'kontraŭulo preskaŭ estis ebeniginta partojn de la tranĉeo. Pli ol 100 kaptitoj restis inter niaj manoj.

Niaj taĉmentoj apud Soldau-Neidendurg denove ekatakis kaj repuŝis la Rusojn en kelkaj bataloj. Mlawa kaj la kontraŭulaj pozicioj apud ĝi ree estas en niaj manoj. En tiuj bataloj ni kaptis pli ol 1000 Rusojn. - Ĉe la Bzura kaj Rawka sur multaj lokoj forte estis batalate per la bajonetoj. La artilerio malmulte povis sukcesi, ĉar la aero estis neklara. La perdoj de la Rusoj estas grandaj. - Sur la dekstra bordo de la Pilica, sudoriente de Tomaszow, la Rusoj kelkfoje atakis kaj kun multaj siaj perdoj estis repuŝataj de la unuiĝintoj. Pli sude la stato estas neŝanĝita.

Großes Hauptquartier, 25. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: En Flandern hieraŭ entute regis trankvilo. Oriente de Festubert ni perforte akiris de la Angloj pluan parton de iliaj fortikigitaj pozicioj alligitan al tiu, kiun ni prenis je la 20a de decembro. - Apud Chivy, nordoriente de Vailly, niaj soldatoj atakis kontraŭulan kompanion enterigintan sin antaŭ nia pozicio; 172 Francoj estis kaptataj. La kontraŭulo provis, atake repreni la pozicion, sed suferis gravajn perdojn. - Francaj atakoj apud Souain kaj Perthes kaj ataketoj nordokcidente de Verdun kaj okcidente de Apremont estis repuŝataj.

Sur la oriento militkampoj la stato restis neŝanĝita.

La armeestraro.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 26. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale estas sciigate: Okcidenta militkampoj: Apud Nieuport ni repuŝis atakojn de la Francoj kaj Angloj dum la nokto inter la 24a kaj 25a de decembro. — La sukceso de la bataloj kontraŭ Hindoj kaj Angloj apud Festubert nur hodiaŭ estas takebla. 19 oficiroj kaj 819 koloruloj kaj Angloj estis kaptataj. Ni akiris 14 maŝinpafilojn, 12 minjetilojn, reflektorojn kaj alian pormilitan materialon. Sur la batalkampo la kontraŭulo lasis 3000 mortigitojn. Ni permesis al la Angloj batalpaŭzon, pro kiu ili estis petintaj, por entombigi siajn mortigitojn. Laŭcirkonstance niaj perdoj estas malgrandaj. — En negrandaj bataletoj apud Lyhons (sudoriente de Amiens) kaj Tracyle-Val (nordoriente de Compiègne) ni akiris ĉirkaŭ 200 kaptitojn. En la Vogesen sude de Diedolshausen kaj en la supera Elsaŝ okcidente de Sennheim kaj sudokcidente de Altkirch hieraŭ okazis negrandaj bataletoj. La stato tie ne ŝanĝiĝis.

La 20an de decembro posttagmeze franca aviadisto ĵetis naŭ bombojn sur la vilaĝon Inor, kvankam tie troviĝas nur milithospitaloj, kiuj estas ekkonebligataj tute klare ankaŭ por aviadistoj-observantoj. Ne okazis citinda difekto. Responde al ĉi tiu faro kaj al la bombardado antaŭnelonga kontraŭ la nefortikigita urbo Freiburg, kiu kuŝas ekster la militkampoj, ni hodiaŭ matene ĵetis bombojn mezgrandkalibrajn sur kelkajn vilaĝojn en la Position de Nancy.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj kontraŭ niaj pozicioj apud Lötzen estis repuŝataj. 1000 kaptitoj restis inter niaj manoj. — En norda Polujo norde de la Weichsel la situacio restis neŝanĝita. Sudoriente de la Weichsel ni daŭris avanci atake apud la Bzura. Sur la dekstra bordo de la Pilica, sudoriente de Tomaszow, nia ofensivo sukcesis. Pli sude la situacio ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Berlin, 26. Decembro.

Oficiale estas sciigate: La 25an de decembro antaŭtagmeze malpezaj anglaj militŝipoj antaŭeniris en la germanan sinuson. Akvoaeroplanoj, kiujn ili kunhavis, atakis la enmariĝojn de niaj riveroj kaj faligis bombojn al ankrumitaj ŝipoj kaj al gasujo proksime de Cuxhaven, sed nek trafis, nek difektis. Pafadite la aeroplanoj forflugis okcidenten. Niaj aerŝipoj kaj aeroplanoj informiĝis pri la anglaj fortoj. Ili trafis per bomboj du anglajn kontraŭtorpedobatojn kaj kuran vaporŝipon; sur la laste nomita estis observata brulado. Venanta nebula vetero malhelpis kromajn batalojn.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu intereso ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 24., 25., 26. Decembro.

(Eltiraĵo el kelkaj oficialaj aŭstraj sciigoj.)

Ĉe la malsupra Nida ni akiris en bataleto je la 22a de decembro pli ol 2000 kaptitojn. De la 11a ĝis la 20a de decembro ni kaptis entute 43000 (kvardektri mil) Rusojn. Interne de la imperio troviĝas nun jam 200000 (ducent mil) kaptitaj kontraŭuloj. — Post kvartagaj heroaj bataloj niaj soldatoj prenis la montoselon de Uzsoj. La Rusoj ree okupis la teritoriojn de Krosno kaj Jaslo. Sude de Tomaszow ni avancis atake. — Sur la balkana militkampoj de dek tagoj regas trankvilo. Nur apud la Save kaj Drina okazas kelkfoje malgravaj bataletoj. La fortifikaĵo Bileca repuŝis je la 24a de decembro malfortan atakon de la Montenegrinoj.

Großes Hauptquartier, 27. Decembro, antaŭtagmezo.

Oficiale. — En Flandern hieraŭ nenio grava okazis. Anglaj ŝipoj hodiaŭ matene estis vidataj. — Nordoriente de Albert la kontraŭulo vane antaŭenmarŝis kontraŭ La Boisselle; ni sukcese kontraŭatakis hodiaŭ matene. — Francaj atakoj en la valo Meurisson (Argonnes) kaj sudoriente de Verdun malsukcesis sub niaj pafoj. En la supera Elsaŝ la Francoj atakis niajn poziciojn oriente de la linio Thann-Dammerkirch. Ĉiuj atakoj estis repuŝitaj dum la unuaj horoj de l'nokto la Francoj prenis gravan altaĵon oriente de Thann, sed estis repuŝataj per forta kontraŭatako. La altaĵo estas certe en niaj manoj. — Apud Nieuport kaj sude de Ypern ni avancis for per grandaj bataletoj. Kelkaj fortaj francaj atakoj nordokcidente de St. Menchould estis repuŝataj. La Francoj suferis gravajn perdojn; ni prenis kelkcentojn de kaptitoj. Per atako en la apud Bzura kaj Rawka. Sudoriente de Tomaszow la ofensivo estis sukcese daŭrigata. Rusaj atakoj suden kontraŭ Inowloz estis repuŝataj; la Rusoj suferis gravajn perdojn.

La armeestraro.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al la Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 28. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Okcidenta militkampoj: Apud Nieuport la kontraŭulo ree atakis sen ia sukceso. Li estis helpata de bombardado el ŝipoj, kiu nin neniel malutilis, sed kiu mortigis kaj vundigis kelkajn enloĝantojn de Westende. Ankaŭ malsukcesis kontraŭula atako kontraŭ la bona domo St. Georges, pri kiu la kontraŭulaj sciigoj raportas, ke ĝi estas en la manoj de la Francoj. Sude de Ypern ni prenis tranĉeon kaj kun ĝi kelkajn dekduojn da kaptitoj. Kelkfojaj fortaj atakoj de l'kontraŭulo en la regiono nordokcidente de Arras estis repuŝataj. Sudoriente de Verdun la kontraŭulo ripete atakis sen ia sukceso; same okazis, kiam li provis reakiri la hieraŭ probatalatan altajn okcidente de Sennheim. – kaj oriente de la Rawka, apud kaj sudokcidente

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo kaj en Polujo norde de la Weichsel io nova ne okazis. Sur la maldekstra bordo de la Weichsel niaj atakoj plue evolucas malgraŭ malfavora vetero. La armeestraro.

Konstantinopel, 29. Decembro.

Oficiale. – Niaj soldatoj kontraŭbatalis la Rusojn ĉe la rivero Murad kaj venkis ilin tute. Ni akiris 2 kanonojn kun armaturo, 1 maŝinpafilon, 2 municioveturiloj de la artilerio, 36 mulojn, 115 ĉevalojn, 9 oficirojn kaj suboficirojn kaj 96 soldatojn. – Rusa oficiala sciigo de la 23a de decembro publikigas, ke la Rusoj ekavancis apud Sarijkamiŝsch. Tiu ĉi loko estas en la Kaukasus. La Rusoj do konfesas, ke la turka armeo staras sur rusa teritorio. – Pluaj sciigoj de la Kaukasus-armeo raportas jenon: Ni sekvas la kontraŭulon kaj akiris sufiĉe grandan nombron da kaptitoj kaj da pormilitaj objektoj. Franca torpedoboato pafis kelkajn grenadojn kontraŭ la bordgardistaron apud Kikili kontraŭe de Tenedos, sed sensukcese. La Angloj denove provis alboridiĝi apud Akaba. Du kontraŭulaj boatoj provis alproksimiĝi al la bordo, sed retiris sin pro la pafado de la ĝendarmoj. Kvar kontraŭuloj estis mortigitaj. La vicestro de l'generalstabo: von Hoefen

Großes Hauptquartier, 29. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Okcidenta militkampoj: Apud Nieuport kaj sude de Ypern ni avancis iom per negrandaj bataletoj. Kelkaj fortaj francaj atakoj nordokcidente de St. Ménehould estis repuŝataj. La Francoj suferis gravajn perdojn; ni prenis kelkcentojn da kaptitoj. Per atako en la Bois Brulé, okcidente de Aprémont, ni akiris tri maŝinpafilojn kaj prenis francan tranĉeon. Francaj atakoj okcidente de Sennheim estis repuŝataj. plano estis vidata ruiniginta 12 km de Helgoland;

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo kaj en Polujo dekstre de la Weichsel nenio aliĝis. Apud la Bzura kaj Rawka ni avancis atake. Sude de Inowloz ni repuŝis fortajn francajn atakojn.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu intereso ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 30. Decembro, antaŭtagmeze

Oficiale. - Pro la biendomo St. Georges sudoriente de Nieuport, kiun ni devis malokupi pro surpriza atako, ankoraŭ estas batalate. Ventego kaj pluvegoj difektis ambaŭ kontraŭulajn poziciojn en Flandern kaj norda Francujo. Ĉe la aliaj partoj de la fronto la tago entute pasis trankvile. en Polujo do nun sumiĝas je 136000 (cent tridekses mil) kaptitoj, pli ol 100 kano-

En orienta Prusujo la rusa kavalerio estis repuŝata al Pillkallen. En Polujo la situacio ne ŝanĝiĝis dekstre de la Weichsel. Okcidente de la Weichsel nia ofensivo estis daŭrigata oriente de la Bzura. Krom tio la bataloj daŭras apud kaj oriente de la Rawka, apud kaj sudokcidente de Inowlodz.

Laŭ eksterlandaj sciigoj ŝajnas, ke Lowicz kaj Skierniewice ne estas en niaj manoj. Tiujn urbojn ni prenis antaŭ pli ol 6 tagoj. Skierniewice troviĝas multe malantaŭ nia fronto.

La armeestraro.

Wien, 29. Decembro.

Oficiale. - La rusa 8a armeo, kiu antaŭ ĉirkaŭ unu semajno ekavancis kontraŭ niaj taĉmentoj transirintaj la Karpaten, plifortigis sin tiom je rezervaj taĉmentoj kaj novaj divizioj, ke estis prudente, retiri niajn soldatojn al la montoseloj kaj en la regionon de Gorlice. La situacio norde per tio ne estas influata.

Sur la balkana militkampoj la Montonegrinoj agas vigle, sed sensukcese. Apud Trebinje malforta atako kontraŭ niaj antaŭaj pozicioj facile estis repuŝata, la kontraŭula artilerio silentigata. Kontraŭ forta limfortikajeto en Krivosije la montenegrinaj kanonoj nature sukcesis eĉ ne iomete.

Großes Hauptquartier, 31. Dec. La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

Oficiale. - Okcidenta militkampoj: Ĉe la marbordo entute regas silento. La kontraŭulo artilerie bombardadis la banelon. La brita admiralaro sciigas: el la domoj sen kaŭzi difekton

La 25an de decembro 7 anglaj hidroplanoj, kiujn akompanis kruzŝipoj, torpedoboatoj kaj submaraj boatoj, atakis la germanajn militŝipojn ankrumitajn antaŭ Cuxhaven. La Germanoj kontraŭsendis 2 Zeppelinaersipojn, 3 hidroplanojn kaj kelkajn submarajn boatojn.

3 anglaj aviadistoj revenis en submaraj boatoj, kiuj estis ilin savintaj. Iliaj hidroplanoj subakviĝis. 1 aviadisto ne revenis. Lia hidroplano estis vidata ruiniginta 12 km de Helgoland; lia sorto estas nekonata.

Rimarko: Pri ĉi tiuj detalaĵoj la germana admiralaro ne jam raportis.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internacionale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Berlin, 31. Decembro.

La ĉefstabejo sciigas: Dum la persekutado, sekvintan la batalojn apud Lodz kaj Lowicz, niaj taĉmentoj batalantaj en Polujo akiris pli ol 56 000 (kvindek ses mil) kaptitojn kaj multajn kanonojn kaj maŝinpafilojn. La tuta kaptajo akirita de post nia ofensivo komencita la 11an de novembro en Polujo do nun sumiĝas je 136 000 (cent tridek ses mil) kaptitoj, pli ol 100 kano-
noj kaj pli ol 300 maŝinpafiloj.

Plue estas oficiale sciigite: La sumo de la militkaptitoj (ne civiluloj=kaptitoj) troviĝantaj kaj loĝigitaj en Germanujo je la jarfiniĝo estas

8138 oficiroj kaj 577 875 soldatoj.

Tiu ĉi nombro ne jam enhavas parton de la kaptitoj akiritaj en la persekutado en rusa Polujo kaj ne ankaŭ ĉiujn nun estantajn fortransportataj. - Tiu ĉi sumo konsistas el:

Francoj: 3459 oficiroj, 215 905 soldatoj, inter ili 7 generaloj

Rusoj: 3575 " 306 294 " " " 18 "

Belgoj: 612 " 36 852 " " " 3 "

Angloj: 492 " 18 824 " .

Erariga estas la sciigo publikigita el Kopenhagen kaj laŭdire devenanta de la rusa militministerio, laŭ kiu en Rusujo troviĝas 1140 oficiroj kaj 134 700 germanaj militkaptitoj. La Rusoj enkal-
kulas en la suman nombron ĉiujn civilulojn=kaptitojn, kiujn ili retenis kaj enloĝigis, kiam komenciĝis la milito. La sumo de veraj militkaptitoj estas taksota je maksimume 15% de la sciigita nombro. Krom tio oni atentu, ke granda nombro ankaŭ el ĉi tiuj kaptitoj venis vundita inter la manojn de la Rusoj.

Großes Hauptquartier, 31. Decembro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Okcidenta militkampoj: Ĉe la marbordo entute regas silento. La kontraŭulo artilerie bombardadis la banejon Westende kaj detruis parton el la domoj, sen kaŭzi difekton pormilite gravan. En la biendomo Alger Auberge, kiun ni krevigis, tuta franca kompanio estis detruata. Fortaj francaj atakoj norde de la militsidejo apud Chalons estis repuŝataj. - En la okcidenta parto de la Argonnes niaj soldatoj sufiĉe avancis preninte kelkajn tranĉeojn lokitajn unu post la alia kaj kaptinte pli ol 250 Francojn. - Apud Flirey norde de Toul francaj atak-
provoj malsukcesis. En la supera Elsaŝ okcidente de Sennheim ĉiuj atakoj de la Francoj mortis sub niaj pafoj. Ili bombarde detruis laŭsisisteme domon post domo de la vilaĝo Steinbach de ni okupita; sed niaj perdoj estas malgrandaj.

Orienta militkampoj: La situacio en orienta Prusujo kaj en Polujo norde de la Weichsel estas neŝanĝita. Apud kaj oriente de la Bzura la bataloj daŭras. En la regiono de Rawa nia ofensivo progresis. Sur la orienta bordo de la Pilica la stato estas neŝanĝita.

La armeestraro.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Berlin, 1. Januaro 1915.

El London oficiale estas sciigate: La angla ŝipo de linio „Formidable“ subakviĝis hodiaŭ matene en la kanalo. 71 el la ensidintoj estas savitaj de malgranda krosŝipo. La angla gazetara ofcejo aldonas, ke estas ankoraŭ necerte, ĉu la perdo estis kaŭzata de mino aŭ de torpedo-pafo de submara boato.*)

Großes Hauptquartier, 1. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Okcidenta militkampoj: Apud Nieuport nenio sciiginda okazis. Ni decidis, ne reokupi la biendomojn de St. Georges, kiuj estas tute pafdetruitaj de la kontraŭula artilerio kaj kie la nivelo de l'akvo estas tre alta. Oriente de Bethune, sude de la kanalo ni perforte akiris de la Angloj tranĉeojn. En la Argonnes ni atake avancis plu; ni akiris ree 400 kaptitojn, 6 maŝinapilojn, 4 minjetilojn kaj multe da aliaj armiloj kaj da municio. – Francan bivakon lokitan nordokcidente de St. Mihiel apud Lahaimeix ni pafe bruligis. Apud Flirey kaj okcidente de Sennheim ni repuŝis ĉiujn hieraŭ ripetitajn atakojn.

Orienta militkampoj: Ĉe la limo de orienta Prusujo kaj en Polujo la stato restis neŝanĝita. Densa nebulo malhelpis la militagojn.

La armeestraro.

El la ĉefstabejo estas sciigate:

La kaptajo akirita de niaj soldatoj batalantaj dum decembro en la Argonnes sume estas jena: 2950 nevunditaj kaptitoj, 21 maŝinapiloj, 14 minjetiloj, 2 revolverkanonoj, 1 bronca bombardilo.

Großes Hauptquartier, 2. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Atakoj kontraŭ niaj pozicioj inter kaj apud la dunoj norde de Nieuport estis repuŝataj. – En la Argonnes nia tuta fronto avancis plu. Fortaj francaj atakoj norde de Verdun kaj kontraŭ la fronto Ailly-Apremont norde de Commercy estis repuŝataj. La Francoj suferis gravajn perdojn; ni kaptis 3 oficirojn kaj 100 soldatojn. Dume niaj soldatoj sukcesis, tute preni la forte promilititan Bois Brulé. Malpli grandaj bataletoj sudokcidente de Saarburg sukcesis laŭ niaj deziroj. – De ioma tempo la Francoj bombardas laŭsisteme lokojn malantaŭ nia fronto. Ili sukcesis, mortigi 50 enloĝantojn en loko, kie restadis unu el niaj divizioj. – La francaj oficialaj raportoj sciigas, ke la Francoj avancis paŝon post paŝo en la vilaĝo Steinbach. Vere ni perdis eĉ ne unu domon de Steinbach. Ĉiuj francaj atakoj kontraŭ la vilaĝo estis repuŝataj. Ĉe la limo de orienta Prusujo la stato ne ŝanĝiĝis, Oriente de Bzura kaj Rawka ni atake avancis dum iom bona vetero. En Polujo oriente de la Pilica nenio aliĝis.

La armeestraro.

*) La „Formidable“ estis konstruata en la jaro 1898. Ĝi pezis 15240 tunojn kaj sarhavis 760 marsoldatojn.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu intereso ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 2. Januaro.

Oficiale estas sciigate: Lia Imperiestra moŝto kaj Lia Sankta Papa moŝto hieraŭ interŝanĝis jenajn telegramojn:

Al Lia moŝto, Vilhelmo II., germana imperiestro. torpedobatoj, sed ne difektata.

Fidante la sentojn de kristana amo al proksimuloj, kiuj estas en via moŝto, ni petas Vian moŝton, ke vi finu la nunan jaron plenan de malfeliĉo kaj komencu la novan per ago de imperiestra grandanimeco, akceptante nian proponon, ke la militantaj ŝtatoj interŝanĝu la militkaptitojn estonte ne plu taŭgajn por la militservo.

Papa Benedikt XV.

Al Lia Sankta Papa moŝto, Rom.

Dankante Vian Sanktan moŝton pro via telegramo mi sentas la koran devon aserti, ke mia tuta simpatio estas kun la propono de Via Sankta moŝto, pli agrabligi la sorton de la militkaptitoj ne taŭgaj por plua militservo. La sento de kristana amo al proksimuloj, kiu inspiris ĉi tiun proponon, estas tute konforma al miaj propraj konvinkoj kaj deziroj.

Vilhelmo.

Großes Hauptquartier, 3. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Okcidenta militkampoj: Antaŭ Westende hieraŭ tagmeze aperis kelkaj kontraŭulaj ŝipoj akompanataj de kelkaj torpedobatoj, sed ne pafis. Apud la tuta fronto okazis nur artileria bataloj. Kontraŭula infanteriatako okazis nur nordokcidente de St. Ménehould kaj estis repuŝata; la Francoj suferis tre gravajn perdojn.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo kaj norda Polujo nenio aliĝis. En Polujo okcidente de la Weichsel niaj soldatoj sukcesis, preni post kelktaga fortega batalado ege fortikititan lokon de la rusa ĉefpozicio Borzymow; ili akiris 1000 kaptitojn kaj 6 maŝinpafilojn. Per tri noktaj atakoj la Rusoj provis repreni Borzymow'on. Sed iliaj atakoj estis repuŝataj kun multaj iliaj perdoj. - La rusaj raportoj mensogas kelkfoje sciigante rusajn sukcesojn apud Inowłodz. Ĉiuj rusaj atakoj en tiu regiono estis repuŝataj; la Rusoj multe perdis kaj hieraŭ ne plu atakis. - Krom tio la stato restis neŝanĝita oriente de la Pilica.

La armeestraro.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 3. Januaro 1915.

Oficiale estas sciigite: Unu el niaj submaraj boatoj senfadene telegrafas, ke la 1an de januaro je la 3a antaŭtagmeze ĝi subakvigis la anglan ŝipon de linio „Formidable“ en la Angla Kanalo, proksime de Plymouth. La boato estis persekutata de kontraŭ-torpedoboatoj, sed ne difektata.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 4. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. - Okcidenta militkampoj: Escepte kelkaj pli malpli fortaj artileribataloj ĉe la fronto entute regis silento. Nur apud Thann en la supera Elsaŝ la kontraŭulo estis vigla. Post perdiga bombardado kontraŭ la altaĵo okcidente de Sennheim la Francoj sukcesis vespere, preni sur tiu altaĵo niajn pafdetruitajn tranĉeojn kaj poste la vilaĝon Steinbach de ni persiste defenditan, kiu ofte estis menciata dum la lastaj tagoj. La altaĵon ni reprenis nokte per bajonetatako; pro Steinbach ankoraŭ estas batalate.

Orienta militkampoj: Tie la situacio ne aliĝis. Niaj atakoj en Polujo oriente de la Rawka daŭras.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 5. Januaro.

Oficiale. - Okcidenta militkampoj: Norde de Arras niaj taĉmentoj krevigis tranĉeojn 200 metrojn longan kaj akiris kelkajn kaptitojn. Postaj kontraŭatakoj de la kontraŭulo malsukcesis. En la Argonnes kelkaj francaj atakoj estis repuŝataj. Franca atako inter Steinbach kaj Uffholz estis repuŝata per bajonetbatalo.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo kaj norda Polujo la situacio ne ŝanĝiĝis. Oriente de la Bzura apud Kozłow-Biskupi kaj sude niaj atakoj progresis. Ankaŭ nordoriente de Bolimow niaj soldatoj avancis oriente de la Rawka tra Humin kaj la altaĵoj nordaj de tie. Pli sude ĝis la Pilica kaj sur la dekstra bordo de la Pilica nenio aliĝis. - La stato de la vojoj kaj malfavora vetero malhelpis niajn militagojn.

La armeestraro.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 6. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Okcidenta militkampoj: Hieraŭ la Francoj plue bombardadis laŭsisteme la vilaĝojn malantaŭ nia fronto. Videble al ili estas tute egale, ĉu ili per tio senloĝigas aŭ mortigas siajn sampatrujanojn; nin la bombardado ne multe malutilas. – Apud Souain kaj en la Argonnes ni prenis kelkajn kontraŭulajn atakojn kaj kaptis 2 francajn oficirojn kaj pli ol 200 soldatojn. – Hieraŭ matene la Francoj denove ekposedis la multe probatalitan altaĵon okcidente de Sennheim, sed estis forpuŝataj per forta bajonetatako kaj ne riskis pluajn atakojn. Ni kaptis 50 alpoĉasistojn.

Orienta militkampoj: Ĉe la orienta limo kaj en norda Polujo ankaŭ hieraŭ nenio aliĝis. En Polujo okcidente de la Weichsel niaj taĉmentoj preninte kelkajn kontraŭulajn poziciojn avancis ĝis la regiono apud la Sucha. 1400 kaptitoj kaj 9 maŝinpafiloj restis inter niaj manoj. – Sur la orienta bordo de la Pilica la situacio estas neŝanĝita.

La armeestraro.

Konstantinopel, 6. Januaro.

La turka armeestraro sciigas: Niaj soldatoj avancintaj el la regiono de Somai kaj Bajirgue okupis Urmia'on, gravan pozicion de la Rusoj. – Post la nedecidita marbatalo kiu okazis hieraŭ inter la rusa ŝiparo kaj turkaj krosŝipoj, la rusa ŝiparo mergis italan komercŝipon, kvankam tiu ĉi estis suprentirinta sian flagon.

Großes Hauptquartier, 7. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Angloj kaj Francoj daŭrigis, bombarde detruis la belgajn kaj francajn vilaĝojn malantaŭ nia fronto. – Norde de Arras nun okazas ankoraŭ fortaj bataloj pro la posedo de la tranĉeoj, kiujn ni hieraŭ atakprenis. – En la okcidenta parto de la Argonnes niaj soldatoj avancis plu. Per atako farita la 5an de januaro en la orienta parto de la Argonnes (Bois Countel Chaussee) la kontraŭulo venis ĝis en niajn tranĉeojn, sed estis repuŝata apud la tuta fronto kun gravaj siaj perdoj kaj estis reelpelita el nia pozicio. Niaj perdoj laŭcirkonstanco estas malgrandaj. – Okcidente de Sennheim la Francoj provis hieraŭ vespere, reekposedi la altaĵon 425. Iliaj atakoj mortis sub nia pafado; la altaĵo restis sub niaj manoj.

Sur la orienta militkampoj nenio aliĝis. La daŭrigo de niaj militagoj suferis pro la plej-eble malfavora vetero. Malgraŭ tio ni malrapide avancis atake.

La armeestraro.

* Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu interesulo ricevos ĝin senpage, turnante sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 8. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Okcidenta militkampoj: La ĉiama pluvado pli kaj pli marĉigas la kamparon en Flandern; pro tio la militagoj estas multe malhelpataj. – Oriente de Reims la Francoj dum la lasta nokto provis, perforte preni unu el niaj antaŭaj tranĉeoj; per tuja kontraŭatako ili estis repuŝataj al siaj pozicioj kaj perdís 50 kaptitojn. – En la meza kaj orienta partoj de la Argonnes niaj taĉmentoj ree avancis. – Nokta franka atako kontraŭ niaj pozicioj apud la Buchenkopf sude de Diedolshausen (Vogesens) estis repuŝata. Kelkfojaj atakoj de la Francoj kontraŭ la altaĵo okcidente de Sennheim malsukcesis sub nia artileripafado. Ni kaptis 2 oficirojn kaj 100 soldatojn. Pro la vilaĝo Oberburnhaupt sude de Sennheim nun estas ankoraŭ batalate.

Orienta militkampoj: Ankaŭ tie regis malfavora vetero. Ĉe la limo de orienta Prusujo kaj en norda Polujo nenio aliĝis. Oriente de la Rawka niaj atakoj progresis; 1600 Rusoj estis kaptataj, 5 maŝinpafiloj prenataj. Sur la orienta bordo de la Pilica okazis nur artileribataloj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 9. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. – Okcidenta militkampoj: Ankaŭ hieraŭ daŭris la malfavora vetero; kelkfoje pluvegis. La Lys-rivero kelkloke superakvis siajn bordojn. – Kelkaj francaj atakoj nordoriente de Soissons estis repuŝataj kun sufiĉe grandaj perdoj de la Francoj. Franca atako apud Perthes (norde de la bivakego apud Chalons) estis repuŝata kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo. – En la orienta parto de la Argonnes niaj soldatoj sukcese atakis, kaptis 1200 Francojn kaj prenis kelkajn minjetilojn kaj nnu broncan bombardilon; silesiaj ĉasistoj, lotringa bataliono kaj Landwehr* el Hessen tie sin distingis. – Apud Flirey antaŭan de ni ne okupitan tranĉeon ni eksplodigis en la momento, kiam la Francoj ĝin estis ekposedintaj. Ĉiuj francaj ensidantoj estis mortigataj. – Okcidente kaj sude de Sennheim nenio aliĝis. El Oberburnhaupt kaj el la tranĉeoj antaŭ ĝi la Francoj estis repuŝataj al siaj pozicioj kaj lasis inter niaj manoj 190 kaptitojn.

Orienta militkampoj: Tie la situacio estas neŝanĝita. La malbona vetero daŭras. Nia kaptajo de l' 7a de januaro plialtiĝis al 2000 kaptitoj kaj 7 maŝinpafilojn.

La armeestraro.

*) La Landwehr estas tiuj germanaj soldatoj, kiuj havas pli ol 28 jarojn.

Noto: Duonmonate aperas ilustrita „Internacia Bulteno“ pri la milito. Ĉiu intereso ricevos ĝin senpage, turnate sin al Internationale Korrespondenz „Argus“, Berlin S 59.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 10. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: La malfavora vetero daŭris ankaŭ hieraŭ. La Lys superakvis siajn bordojn kaj per tio fariĝis kelkloke 800 metrojn larĝa. — Malsukcesis kontraŭulaj provoj, elpuŝi nin el niaj pozicioj inter la dunoj apud Nieuport. — Nordoriente de Soissons la Francoj ree atakis, sed hieraŭ estis ĉie repuŝataj kun multaj siaj perdoj. Pli ol 100 kaptitoj restis inter niaj manoj. Hodiaŭ tie ree estas batalate. — Okcidente kaj oriente de Perthes (nordoriente de la bivakego apud Chalons) la Francoj denove forte atakis. La atakoj vaniĝis kun tre gravaj perdoj de la Francoj. Ni prenis proksimume 150 kaptitojn. — En la Argonnes ni avancis plu. Ĉi tie kaj en la regiono de Apremont, norde de Toul, la bataloj daŭras ankoraŭ. — La 8 an de januaro vespere la Francoj provis denove preni la vilaĝon Ober-Burnhaupt per nokta atako. La atako tute malsukcesis. Niaj soldatoj kaptis pluajn 230 Francojn kaj prenis 1 maŝinpafilon. La suma kaptaĵo apud Ober-Burnhaupt do estas 2 oficiroj, 420 soldatoj kaj 1 maŝinpafilo. Ankaŭ tie ĉi la Francoj videble suferis gravajn perdojn. Granda nombro da mortigitoj kaj vunditoj kuŝas antaŭ la fronto kaj en la apudaj arbaroj. — En la supera Elsaŭ hieraŭ okazis nur negravaj bataletoj. Ĉirkaŭ noktmeze niaj taĉmentoj apud Nieder-Aspach repuŝis francan atakon.

Orienta militkampoj: La vetero ne jam pliboniĝis. Apud la tuta orienta fronto la stato restis neŝanĝita. Negrandaj rusaj atakoj sude de Mlawa estis repuŝataj. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 11. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la regiono de Nieuport-Ypern kaj sude okazis nur artileribataloj. Franca atako apud Laboisselle, nordoriente de Albert, tute malsukcesis. — Norde de Soissons la Francoj, ekposedintaj nur malgrandan parton de niaj plej antaŭaj tranĉeoj, atakis denove, sed ĝis nun sukcesis neniel. La bataloj daŭras ankoraŭ. Apud Soupir dum la lastaj tagoj ne estis batalate. — Oriente de Perthes niaj taĉmentoj reprenis la perditajn partojn de siaj tranĉeoj; la Francoj grave perdis. — En la Argonnes niaj atakoj progresis. En la supera Elsaŭ entute regis silento.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo kaj norda Polujo la situacio ne ŝanĝiĝis. Pro la malfavora vetero ankaŭ niaj atakoj en Polujo okcidente de la Weichsel nur malrapide progresas.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 12. Januaro, antaŭtagmeze.

Okcidenta militkampoj: Sude de l' kanalo de La Bassée okazas malgravaj bataloj, kiuj ĝis nun estis senrezultataj. Norde de Crony la Francoj atakis hieraŭ vespere, sed estis repuŝataj kun gravaj siaj perdoj. Hodiaŭ matene la bataloj ĉi tie reviviĝis. Franca atako hieraŭ posttagmeze entreprenita oriente de Perthes malsukcesis sub nia pafado. La kontraŭulo suferis tre gravajn perdojn. — En la Argonnes apud la Romana Strato ni prenis francan pozicion. 2 oficiroj kaj 140 soldatoj estis kaptataj. En la orienta parto de la Argonnes depost la 8a de januaro ni kaptis de la Francoj 1 majoron, 13 leŭtenantojn kaj 1600 soldatojn (la jam raportitaj estas enkalkulitaj). Do la kontraŭulo sume perdis sur tiu ĉi malgranda batalejo laŭtakse 3500 militistojn (kun mortigitoj kaj vunditoj). — Francaj atakprovoj apud Ailly sude de St. Mihiel malsukcesis.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo nenio nova okazis. Rusaj atakoj en norda Polujo ne sukcesis. Niaj atakoj okcidente de la Weichsel kelkloke progresis malgraŭ la malbona vetero. Sur la orienta bordo de la Pilica nenio aliĝis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 13. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Apud Nieuport okazis forta artileribatalo, sekve de kiu la kontraŭuloj forlasis siajn tranĉeojn apud Palingsbrug (antaŭurbo de Nieuport). — La kontraŭulaj atakoj apud la kanalo de La Bassée estas decidige repuŝitaj. Francaj atakoj kontraŭ Laboisselle kaj la altaĵo Nouvron estis repuŝataj. — La hieraŭan senrezultatan francan atakon kontraŭ la altaĵo de Crony sekvis germana kontraŭatako, kiu finiĝis per tuta malvenko de la Francoj, kiuj devis malokupi la altaĵojn nordoriente de Cuffies kaj norde de Crony. Niaj Markanoj*) okupis du francajn poziciojn, kaptis 1700 Francojn kaj prenis 4 kanonojn kaj kelkajn maŝinpafilojn. — Atako de francaj pioniroj sude de St. Mihiel estis sukcese repuŝata. — Niaj soldatoj ekokupis la altaĵojn norde kaj nordoriente de Nomeny. En la Vogesen la situacio estas neŝanĝita.

Orienta militkampoj: Tie la situacio ne ŝanĝiĝis hieraŭ.

La armeestraro.

*) Soldatoj el la prusaja provinco Mark. (La trad.)

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 14. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Inter la dunoj apud Nieuport okazis artileribatalo. Precipe forte la kontraŭulo bombardadis la banurbon Westende, kiun li baldaŭ estos tute detruinta. Kontraŭulaj torpedoboataj malaperis, kiam ili estis bombardataj. — Daŭrigante la atakon komencitan la 12-an de januaro nordoriente de Soissons niaj soldatoj denove atakis sur la altaĵoj apud Vregny kaj forpelis la kontraŭulon ankaŭ de tie. En fluantaj pluvegoj, sur profunden moliĝinta argila tero ni atake prenis ĝis post la noktiĝo tranĉeon post tranĉeo kaj repelis la kontraŭulon ĝis la rando de la alta plataĵo. 14 francaj oficiroj kaj 1130 soldatoj estis kaptataj, 4 kanonoj, 4 maŝinpafiloj kaj 1 reflektoro prenataj. Estis brila militago de niaj taĉmentoj antaŭ la okuloj de ilia imperiestro. — Laŭ pli preciza konstato la suma kaptajo el la bataloj de l' 12-a kaj 13-a de januaro nordoriente de Soissons estas jena: 3150 kaptitoj, 8 pezaj kanonoj, 1 revolverkanono, 6 maŝinpafiloj kaj alia materialo. — Nordoriente de la bivakego apud Chalons la Francoj hieraŭ atakis antaŭ- kaj posttagmeze oriente de Perthes kun multaj fortoj. Kelkloke ili enpenetris niajn tranĉeojn, sed estis elpuŝataj per fortaj kontraŭatakoj kaj repelataj kun multaj siaj perdoj en siajn poziciojn. Ili lasis inter niaj manoj 160 kaptitojn.

Orienta militkampoj: Sudoriente de Gumbinnen kaj oriente de Lötzen rusaj atakoj estas repuŝitaj kaj kelkcentoj da kaptitoj prenitaj. En norda Polujo la situacio estas neŝanĝita. En Polujo okcidente de la Weichsel ni daŭrigis niajn atakojn. Sur la orienta bordo de la Pilica okazis nenio sciiginda.

La armeestraro.

Konstantinopel, 15. Januaro.

La turka armeestraro sciigas: La franca submara boato „Saphir“*) provis, alproksimiĝi al la enirejo de la Dardanellen-markolo, sed estis mergata de nia artilerio. Parto de la ensidantaro estis savata.

*) Konstruita en 1906—1908; pezo: 450 t; 6 torpedotuboj; 23 ensidantoj.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 16. Januaro, antaŭtagmeze.
Großes Hauptquartier, 15. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Antaŭ Westend aperis hieraŭ kelkaj torpedobatoj kaj malpli grandaj ŝipoj, kiuj alproksimiĝis al la bordo ĝis distanco de proksimume 14 km. — Ambaŭflanke de Notredame de Lorette, nordokcidente de Arras, francaj atakoj estis repuŝataj de niaj soldatoj. Ni perdis hieraŭ tranĉeon, kiun ni perforte prenis de la kontraŭulo apud Ecurie, norde de Arras, antaŭ 8 tagoj kaj kiu estis okupita de taĉmentoj el unu kompanio. Apud tiu ĉi loko bataloj hodiaŭ ree komenciĝis. — Norde kaj nordoriente de Soissons la nordan bordon de la Aisne ni definitive liberigis de la Francoj. La germanaj soldatoj prenis per seninterrompa atako la vilaĝojn Cuffies, Crouy*, Bucy-le-Long, Missy kaj la biendomojn Vauxrot kaj Verreries. Ni akiris ĝis nun en la tritagaj bataloj norde de Soissons ĉirkaŭ 5200 kaptitojn, 14 kanonojn, 6 maŝinpafilojn kaj kelkajn revolverkanonojn. La Francoj suferis gravajn perdojn. 4—5000 mortigitaj Francoj estis trovataj sur la militkampoj. La kontraŭulo sin retiris sub la pafoj de nia peza artilerio. — Kontraŭulaj atakoj norde de Verdun kaj apud Consenvoys malsukcesis. — Kelkaj atakoj, per kiuj la Francoj kelkloke venis ĝis en niajn tranĉeojn apud Ailly, sudoriente de St. Mihiel, estis repuŝataj kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo. Per lasta atako niaj taĉmentoj prenis la kontraŭulajn poziciojn, kiujn ni tamen dum la nokto forlasis memvole kaj sen batalo, post kiam ni estis rekonstruintaj nian propran pozicion. — Malgrava atako apud Mesnil, norde de St. Dié, estis repuŝata de niaj taĉmentoj. Escepte tio en la Vogesen okazis nur artileribataloj.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo kaj norda Polujo nenio aliĝis. La atakoj en Polujo okcidente de la Weichsel malrapide progresis. Post la konkero** de pozicio nord-oriente de Rawa 500 rusaj kaptitoj restis inter niaj manoj. Ni prenis 3 maŝinpafilojn. Fortaj kontraŭatakoj de la Rusoj estis repuŝataj kun plej gravaj iliaj perdoj. La armeestraro.

*] Ankaŭ sur la folio 68 oni bonvolu legi: Crouy, anstataŭ: Crony. (La trad.)

**] konkero (Boirac): Ekposedi per atako, per milito. (La trad.)

*] Indijenoj, kiuj estas en la kolonia militservo de la Germanoj. (La trad.)

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 16. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la regiono de Nieuport okazis nur artileribataloj. Atakoj kontraŭ niaj pozicioj nordokcidente de Arras estis repuŝataj. Kontraŭatakante niaj soldatoj prenis du tranĉeojn kaj kaptis la ensidantojn. — Hieraŭ ni tute detruis la biendomojn La Boisselle, nordoriente de Albert, kiuj dum la lastaj tagoj ofte estis menciataj, kaj forpelis de tie la Francojn. — Nordoriente de Soissons regis silento. La nombro de la francaj kanonoj, konkeritaj tie en la bataloj de la 12a ĝis 14a de januaro, atingis 35. — Negrandaj, por ni sukcesaj bataletoj okazis en la Argonnes kaj en la arbaro de Consenvoys (norde de Verdun). Atako kontraŭ Ailly, sudoriente de St. Mihiel, komenciĝante vaniĝis sub nia pafado. En la Vogesen nenio grava okazis.

Orienta militkampoj: La situacio estas neŝanĝita. La pluvema kaj malklara vetero malebligis ĉiun batalagon. La armeestraro.

Berlin, 16. Januaro.

Oficiale. — La guberniestro de Germana Orienta Afriko sendis oficialajn sciigojn pri la batalo apud Tanga, la plej granda ĝis nun okazinta en niaj kolonioj. Laŭ ili nia sukceso estis multe pli granda, ol la anglaj raportoj konfesas.

La 2 an de novembro la Angloj aperis antaŭ Tanga kun 2 militŝipoj kaj postulis senkondiĉan kapitulacion, kiun la guberniestro Dro. Schnee rifuzis. La ŝipoj forveturis, sed revenis la 3 an de nov. kaj albordigis 1 eŭropan kaj 4 hindajn regimentojn, inter ili kavalerion, ankaŭ marsoldatojn kaj ĉirkaŭ 8 maŝinpafilojn kaj 9 kanonojn. La pezaj ŝipkanonoj de l'krozŝipo „Fox“ subtenis la atakon de la Angloj. La kontraŭulo estis repuŝata dum tritagaj obstinaj bataloj. Niaj kanonoj pafbruligis anglan transportŝipon; ankaŭ la „Fox“ estis grave trafita. La 6 an de nov. la anglaj ŝipoj forveturis norden. — La albordigita soldataro sumiĝis je 8000; ni havis 2000 militistojn. La Angloj perdis pli ol 3000 mortigitojn, vunditojn kaj kaptitojn. Niaj perdoj estis malgrandaj; definitivaj nombroj mankas ankoraŭ. Laŭ neakurata denombro estis akirataj: 8 maŝinpafiloj, 300000 kartoĉoj, 30 militaj telefoniloj, pli ol 1000 lanaj kovriloj, multaj pafiloj kaj ekipaĵo kaj grandaj kvantoj da nutraĵoj. La humoro de niaj venkantaj soldatoj (koloniaj soldatoj, ĝendarmoj kaj volontuloj el la kolonio) estis bonega; ankaŭ la Askari*) estis sinoferemaj kaj heroaj. La graveco kaj la sekvoj de la angla malvenko de ĉi tie eĉ ne proksimume jam estas takseblaj. (Eltiraĵo).

*) Indiĝenoj, kiuj estas en la kolonia militservo de la Germanoj. (La trad.)

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 17. Januaro.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En Flandern okazis nur artileribatalo de ambaŭ partioj. Apud Blangy, nordoriente de Arras, ni krevigis grandan fabrikdomon kaj prenis kelkajn kaptitojn. De la cetera fronto nenio grava estas raportebla escepte artileribataloj de ŝanĝiganta forteco kaj daŭrigo de la batalo per tranĉeoj kaj minoj. — En la Argonnes ni progresis iom. Ventego kaj pluvo malhelpis la batalagojn preskaŭ ĉe la tuta fronto.

Orienta militkampoj: Ĝenerale la situacio estas neŝanĝita.

Antaŭ ĉirkaŭ 4 semajnoj ni publikigis la ĝeneralan atakordonon*), kiun la franca armeestro eldonis en decembro, mallongan tempon antaŭ la kunveno de la francaj deputitoj. La atakprovoj de niaj kontraŭuloj sur la mondbatalkampoj, kiuj komenciĝis pro kaj post tio, neniel malhelpis la germanan armeestron, realigi ĉion, kion ĝi kredis esti utila. Neniuloke ili havigis ian notindan sukceson al niaj kontraŭuloj, dum niaj armeoj sufiĉe kontentige progresis norde de La Bassée, apud la Aisne kaj en la Argonnes. — La kontraŭulaj perdoj dum tiu ĉi tempo estas jenaj: Ĉirkaŭ 26000 de ni denombritaj mortigitoj, 17860 nevunditaj kaptitoj. Se oni laŭsperte supozas, ke la nombro de la vunditoj estas kvaroble la nombro de la mortigitoj, la perdoj estas — nekalkulte la malsaniĝintoj, nekontrolitaj mortigitoj kaj „malaperintoj“ — minimume 150000 (centkvindek mil) soldatoj. Niaj sumaj perdoj dum la sama tempo atingas eĉ ne kvaronon de tiu ĉi nombro.

La armeestaro.

Großes Hauptquartier, 18. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la regiono de Nieuport okazis nur artileribatalo. Kontraŭulaj movoj preparantaj atakon ne estis rimarkataj dum la lastaj tagoj. Al la bordo kelkloke alnaĝis minoj. — Apud La Boisselle, nordoriente de Albert, niaj taĉmentoj per bajonet-atako elpuŝis la Francojn el la tombejo kaj el biendomoj sudokcidente de tie, kiujn tiuj estis okupintaj. Ni kaptis 3 oficirojn kaj 100 soldatojn. — En la Argonnes ni konkeris kelkajn francajn tranĉeojn kaj pereigis preskaŭ la tutan ensidantaron. — Atakante niajn poziciojn nordokcidente de Pont à Mousson la Francoj venis ĝis en nian pozicion sur altaĵo 2 km sude de Vilcey. La batalo daŭras ankoraŭ. En la Vogesen kaj en la supera Elsaß regis fortaj neĝado, vento kaj nebulo, kiuj malhelpis la batalagojn.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo la situacio estas neŝanĝita. En norda Polujo la Rusoj provis antaŭenmarŝi trans la Wkra apud Radzanow, sed estis repuŝataj. En Polujo, okcidente de la Weichsel, io grava ne okazis.

La armeestaro.

*) Legu sur la folio 54. (La trad.)

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 19. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Escepte negravaj bataletoj ĉe la tuta fronto okazis nur artileribataloj.

Orienta militkampoj: La vetero estis tre malfavora. En orienta Prusujo nenio nova okazis. Apud Radzanowo, Biczun kaj Sierpe la Rusoj estis repuŝataj kun gravaj siaj perdoj. Kelkcentoj da rusaj kaptitoj restis inter niaj manoj. Okcidente de la Weichsel kaj oriente de la Pilica la situacio entute estas neŝanĝita.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 20. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Inter la marbordo kaj la Lys okazis nur artileribataloj. Apud Notre-dame de Lorette, nordokcidente de Arras, ni prenis de la kontraŭulo tranĉeojn 200 m longan kaj akiris 2 maŝinpafilojn kaj kelkajn kaptitojn. — En la Argonnen niaj taĉmentoj prenis kelkajn tranĉeojn. Sur unu loko ni avancis 500 m dum la lastaj tagoj. — En la arbaro norde de Sennheim niaj atakoj bone progresis. La Hirzstein estis prenata, 2 oficiroj kaj 40 alpoĉasistoj kaptataj.

La armeestraro.

Berlin, 20. Januaro.

Oficiale. — En la nokto inter la 19a kaj 20a de januaro kelkaj marino-aerŝipoj atakis kelkajn fortikigitajn lokojn sur la orienta bordo de Anglujo. En nebula vetero kaj pluvo kelkfoje bomboj estis ĵetataj kun sukceso. La aerŝipoj estis bombardataj, sed revenis nedifektitaj.

La vicestro de l'admiralstabo: Behnke.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 21. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Inter la marbordo kaj la Lys ankaŭ hieraŭ nur artileribataloj okazis. — Dum la lasta nokto ni perdis la tranĉeon apud Notredame de Lorette, kiun ni prenis antaŭhieraŭ. — Nordokcidente de Arras la Francoj kelkfoje atakis ambaŭflanke de la ŝoseo Arras-Lille, sed estis repuŝataj. — Sudokcidente de Berry au Bac ni prenis de la Francoj du tranĉeojn, kiujn ni defendis malgraŭ fortaj kontraŭatakoj. — Francaj atakoj kontraŭ niaj pozicioj sude de St. Mihiel estis repuŝataj. — Nordokcidente de Pont-à-Mousson ni sukcesis, repreni parton de la pozicioj, kiujn la Francoj prenis de ni antaŭ tri tagoj. Niaj soldatoj tie konkeris 4 kanonojn kaj kelkajn kaptitojn. Pro la resto de la perdita pozicio ankoraŭ estas batalate. — En la Vogesen nordokcidente de Sennheim la bataloj daŭras ankoraŭ.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo la situacio estas neŝanĝita. En negranda bataleto apud Lipno ni sukcesis. 100 kaptitoj restis inter niaj manoj. Okcidente de la Weichsel, nordoriente de Borsimow, niaj atakoj progresis. Rusa atako okcidente de Lopuseno, sudokcidente de Konskio, estis repuŝata.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 22. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Daŭra pluvado malebligis iom grandan batalagon inter la marbordo kaj la kanalo La Bassee. Apud Arras okazis artileribatalo. Ni forlasis kaj kreviges unu el la tranĉeoj sudokcidente de Berry-au-Bac, kiujn ni prenis antaŭhieraŭ; ĉar ĝi estis parte plenigata de la renversigantaj muroj de fabriko. — Franca atako norde de Verdun facile estis repuŝata. — Post la antaŭhieraj bataloj sude de St. Mihiel negranda francaj taĉmentoj restis ankoraŭ ne malproksime de niaj pozicioj. Per atako ni liberigis de la Francoj la kampon antaŭ nia fronto ĝis ilia antaŭa pozicio. — La batalo pro Croix des Cannes, nordokcidente de Pont-à-Mousson, daŭras ankoraŭ. Forta franca atako kontraŭ la parto de nia pozicio, kiun ni reprenis, estis repuŝata kun grava perdo de l' kontraŭulo. — En la Vogesen norde de Sennheim niaj soldatoj forpelis la kontraŭulon de la altaĵoj de l' Hartmannweilerkopf kaj kaptis 2 oficirojn kaj 125 soldatojn.

En orienta Prusujo la situacio estas neŝanĝita. Apud la Sucha niaj atakoj malrapide progresis. Oriente de la Pilica ne okazis io nova.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 25. Januaro, antaŭtagmeze.

Großes Hauptquartier, 23. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Apud Gent kaj Zeebrügge kontraŭulaj aviadistoj hieraŭ ĵetis bombojn sensukcese. — Inter Souain kaj Perthes, norde de la bivakego apud Châlons, la kontraŭulo atakis hieraŭ posttagmeze; sed la atako malsukcesis sub nia bombardo. La kontraŭulo fugis returnen en siajn tranĉeojn. — En la Argonnes niaj soldatoj prenis kontraŭulan pozicion okcidente de Fontaine la Mitte, kaptis 3 oficirojn kaj 245 soldatojn kaj akiris 4 maŝinpafilojn. — Nordokcidente de Pont-à-Mousson du francaj atakoj estis repuŝataj kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo. En la bataloj pro repreno de niaj tranĉeoj de post la 21-a de januaro ni forprenis de l'kontraŭulo 7 kanonojn kaj 1 maŝinpafilon. — Apud Wisembach alpoĉasistoj estis repuŝataj. Kelkaj noktaj atakoj de l'kontraŭulo kontraŭ la Hartmannsweilerkopf restis sensukcesaj.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo io nova ne okazis. En norda Polujo, apud Przasnych, malgrava rusa atako estis repuŝata. El Blinno kaj Gojsk la Rusoj estis elpelataj. Nefortaj rusaj taĉmentoj antaŭenmarŝantaj el Szpital Gorny estis devigataj returneniri. Niaj atakoj apud la Sucha progresas. Apud Rawa, okcidente de Chonciny, okazis viglaj artileribataloj. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 24. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: La 23-a de januaro entute pasis sen gravaj okazaĵoj. En la Argonnes du francaj atakoj estis senpene repuŝataj. En la Vogesen ni progresis apud la Hartmannsweilerkopf kaj nordoriente de Steinbach kaj kaptis 50 francajn ĉasistojn.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo kaj norda Polujo nenio aliĝis. Nia atako en la regiono de la Sucha, apud Borzymow, estis sukcesa. Kontraŭulaj kontraŭatakoj estis repuŝataj kun gravaj perdoj de la Rusoj. Rusaj atakoj nordokcidente de Opozno malsukcesis.

Berlin, 24. Januaro.

Oficiale. — Dum antaŭeniro, kiun faris en la nordmaron la kirasaj krosŝipoj Seydlitz, Derfflinger, Moltke kaj Blücher kune kun 4 malgrandaj krosŝipoj kaj 2 grupoj de torpedoboatoj, dimanĉe antaŭtagmeze okazis bataleto kun angla ŝiparo, konsistanta el 5 grandaj, kelkaj malgrandaj krosŝipoj kaj 26 kontraŭ-torpedoboatoj. 70 marmejlojn okcidentnordokcidente de Helgoland la kontraŭulo post 3 horoj ĉesis batali kaj sin retiris. Laŭ ĝisnunaj sciigoj subakviĝis angla granda krosŝipo kaj nia kirasa krosŝipo Blücher. Escepte tiu ĉiuj ŝipoj revenis en la havenojn. La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 25. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — En la regiono de Nieuport kaj Ypern okazis artileribataloj. Sudokcidente de Berry-au-Bac ni perdis tranĉeon, kiun ni estis prenintaj de la Francoj antaŭ kelkaj tagoj. — Norde de la bivakego apud Châlons hieraŭ okazis nur artileribatalo, hodiaŭ ankaŭ infanteribataletoj, kiuj daŭras ankoraŭ. En la Argonnes, norde de Verdun kaj norde de Toul, la artilerio estas vigla. — Ĉiuj francaj atakoj kontraŭ la Hartmannsweilerkopf estis repuŝataj. En la arbarbataloj la Francoj multe perdas. Ne malpli ol 400 francajn ĉasistojn ni trovis senvivajn. La nombro de la kaptitaj Francoj kreskas. — En orienta Prusujo la artilerio batalis ĉe la fronto apud Löben, Gumbinnen kaj norde. Nia bombardado devigis la kontraŭulon malokupi kelkajn poziciojn sudoriente de Gumbinnen. Nordoriente de Gumbinnen kontraŭulaj atakoj estis repuŝataj kun gravaj perdoj de la Rusoj. — En norda Polujo nenio aliĝis. Oriente de la Pilica io grava ne okazis.

La armeestraro.

Berlin, 25. Januaro.

Oficiala sciigo de l' gubernatoro de Germana Sudokcidenta Afriko atestas la malvenkon de la Angloj apud Sandfontein je la 25-a de septembro 1914. Laŭ ĝi en la bataleto, gvidata de kolonelo-leŭtnanto v. Heydebreck, 3 anglaj skadroj estis pereigataj de niaj soldatoj. 15 oficiroj, inter ili ilia gvidinto kolonelo Grant, kaj 200 soldatoj estis kaptataj, 2 kanonoj prenataj. El ni 2 oficiroj kaj 12 soldatoj estis mortigataj, 25 soldatoj vundataj. — Laŭ la angla oficiala sciigo el Pretoria komence de oktobro la perdoj de la unuiĝintaj Angloj kaj Sudafrikanoj estis nur 15 mortigitoj, 41 vunditoj, 7 malaperintoj kaj 35 kaptitoj.

Großes Hauptquartier, 26. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Laŭ sia kutimo la kontraŭulo hieraŭ bombardadis artilerie Middelkerke kaj la banlokon Westende. Per tio iom granda nombro da enloĝantoj estis mortigata, inter ili la urbestro de Middelkerke. Niaj perdoj estis hieraŭ tre malgrandaj. — Ambaŭflanke de l' kanalo de La Bassée niaj soldatoj atakis la anglajn poziciojn. Pro minaco al niaj flankoj ni ne povis preni la poziciojn inter Givenchy kaj la kanalo; sed sude de l' kanalo la Badenanoj tute sukcesis. Tie per furioza atako 1100 m larĝa parto de la anglaj pozicioj estis ĝistranskurata, 2 fortaj punktoj prenataj, 3 oficiroj kaj 110 soldatoj prenataj, 1 kanono kaj 3 maŝinpafiloj akirataj. La Angloj vane provis, repreni la poziciojn, kiujn ni tuj alikonstruis laŭ niaj celoj; ili estis repuŝataj kun multaj siaj perdoj. Niaj perdoj laŭcirkonstanco estas malgrandaj. — Sur la altaĵoj de Craonne, sudoriente de Laon, ni batalis sukcese. — En la sudaj Vogesen ĉiuj francaj atatoj estis repuŝataj; pli ol 50 kaptitoj venis al niaj manoj.

Orienta militkampoj: Nordoriente de Gumbinnen la Rusoj sensukcese atakis la pozicion de nia kavalerio. Krom tio en orienta Prusujo okazis fortaj artileribataloj. Negrandaj bataletoj nordoriente de Wlodzlawek estis sukcesaj por ni. En Polujo okcidente de la Weichsel kaj oriente de la Pilica io grava ne okazis.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 27. Januaro, antaŭtagmeze.

Okcidenta militkampoj: Apud Nieuport kaj Ypern nur la artilerio batalis. Apud Cuinchy sudokcidente de La Bassée, la kontraŭulo hieraŭ vespere provis repreni la pozicion, kiun ni prenis la 25-an de januaro. La peno estis vana; la atako malsukcesis sub nia bombardado. — La bataloj sur la altaĵoj de Craonne, pri kiuj ni raportis jam hieraŭ, tute sukcesis. La Francoj estis elpuŝataj el sia pozicio sur la altaĵoj okcidente de la Creute Ferme kaj oriente de Hurtebise kaj pelataj al la suda deklivo de la alta kampo. La Saksoj atake prenis kelkajn poziciojn sur fronto 1400 m larĝa; 865 nevunditaj Francoj estis kaptataj, 8 maŝinpafiloj konkerataj, provizejo de pioniroj kaj multe da alia materialo akirataj. — Sud-oriente de St. Mihiel niaj soldatoj prenis francan pozicion. Kontraŭatakoj de la Francoj restis sensukcesaj. — En la Vogesen kuŝas alta neĝo, kiu malrapidigas niajn movojn. liaj perdoj.

Orienta militkampoj: La rusaj atakoj nordoriente de Gumbinnen ne progresis. Kelkloke la kontraŭulo tre multe perdis. En Polujo nenio aliĝis. niaj manoj. La armeestraro.

Orienta militkampoj: Negravaj kontraŭulaj atakprovoj nordoriente de Gumbinnen estis repuŝataj. Apud Biczun nordoriente de Sierps rusa taĉmento estis repuŝata. Escepte tio en Polujo nenio aliĝis. La armeestraro.

Wien, 28. Januaro, tagmeze.

Okcidenta militkampoj: La kontraŭulo nun estas elpelita ankaŭ el la valo Nagy-Ag. La kontraŭulo, kiu kun iom fortaj taĉmentoj estis enpenetrinta tiun ĉi valon norde de Ökörmezö, hieraŭ devis malokupi siajn lastajn bone fortikigitajn poziciojn. Toronya de ni estis prenata; persekutante ni atingis Wyskow-on, kie denove komenciĝis batalo kontraŭ la kontraŭula postgardio. Alveniginte rezervajn taĉmentojn la Rusoj sur la altaĵoj norde de Vezerszallas kaj apud Volovec refoje provis repreni sian perditan ĉefpozicion. Ili estis repuŝataj kaj perdis 700 kaptitojn kaj 5 maŝinpafilojn. Apud la ceteraj partoj de la fronto en la Karpaten la situacio ne grave aliĝis. Okcidente de la valo Nagy-Ag regas silento. — En okcidenta Galicio kaj en Polujo okazis artileribataloj kaj negravaj militagoj.

La vicestro de l' generalstabo: v. Hoefer.
— En norda Polujo nenio aliĝis. — Nord-oriente de Bolimow, oriente de Lowicz, niaj soldatoj elpuŝis la kontraŭulon el lia antaŭa pozicio kaj enpenetris en la ĉefpozicion. Malgranda fortaj noktaj kontraŭatakoj ni defendis kaj instalas la prenitajn tranĉeojn escepte de malgranda parto. La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 28. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Ĉe la flandra bordo Middelkerke kaj Slyps estis bombardataj de la kontraŭula artilerio. — Sur la altaĵoj apud Craonne ni perforte prenis de la kontraŭulo tranĉeojn 500 m longajn, kiuj aliĝas orienten al la pozicio antaŭhieraŭ prenita. Francaj kontraŭatakoj senpene estis repuŝataj. En la bataloj de l' 25a ĝis 27a de januaro la kontraŭulo suferis gravajn perdojn. Pli ol 1500 mortigitaj Francoj kuŝis sur la kampo; 1100 kaptitoj, enkalkulite la nombro sciigita la 17an de januaro, venis al la manoj de niaj soldatoj. — En la regiono de Senones kaj Ban-de-Sapt kelkaj francaj atakoj estis repuŝataj kun sufiĉe grandaj perdoj de l' kontraŭulo. 1 oficiro kaj 50 Francoj estis kaptataj. Niaj perdoj estis tre malgrandaj. — En la supera Elsass la Francoj atakis apud la fronto Niederaspach–Heidweiler–Hirzbacher Wald niajn poziciojn apud Aspach, Ammerzweiler, Heidweiler kaj la arbaro de Hirzbach. Ĉie la atakoj de l' kontraŭulo estis repuŝataj kun multaj liaj perdoj. Precipe gravaj estis la perdoj apud Heidweiler kaj Ammerzweiler, kie la francaj taĉmentoj iris returnen dissolvitaj. 5 francaj maŝinpafiloj restis en niaj manoj.

Orienta militkampoj: Negravaj kontraŭulaj atakprovoj nordoriente de Gumbinnen estis repuŝataj. Apud Biczun nordoriente de Sierps rusa taĉmento estis repuŝata. Escepte tio en Polujo nenio aliĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 29. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Nokte elirinta germana flugeskadro ĵetis aron da bomboj sur la anglajn provizejojn en la fortifikaĵo Düнкirchen. — Kontraŭula atako inter la dunoj nordokcidente de Nieuport estis repuŝata. La kontraŭulo enpenetrinta nian pozicion sur unu loko estis repuŝata per nokta bajonetatako. — Sude de l' kanalo de La Bassée la Angloj provis repreni la pozicion de ni prenitajn. La atako estis facile repuŝata. — Escepte tio apud la fronto io grava ne okazis.

Orienta militkampoj: Rusa atako en la regiono de Kussen, nordoriente de Gumbinnen, malsukcesis kun gravaj perdoj de la kontraŭulo. — En norda Polujo nenio aliĝis. — Nordoriente de Bolimow, oriente de Lowicz, niaj soldatoj elpuŝis la kontraŭulon el lia antaŭa pozicio kaj enpenetris en la ĉefpozicion. Malgraŭ fortaj noktaj kontraŭatakoj ni defendis kaj instalas la prenitajn tranĉeojn escepte de malgranda parto.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 30. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: La francaj perdoj en la bataloj norde de Nieuport, la 28-an de januaro, estis grandaj. Pli ol 300 Marokanoj kaj Algerianoj kuŝas mortigitaj inter la dunoj. Ankaŭ hieraŭ nia artilerio malhelpis la kontraŭulon, alproksimiĝi per tranĉeoj al la dunoj oriente de la lumturo. — Sude de l' kanalo de La Bassée lastnokte niaj soldatoj perforte prenis de la Francoj 2 tranĉeojn, kiuj aliĝas al la pozicio prenita la 25-an de januaro, kaj kaptis pli ol 60 Francojn. — En la okcidenta parto de la Argonnes hieraŭ niaj soldatoj per atako akiris nemalgrandan teritorion. 12 oficiroj kaj 731 soldatoj estis kaptataj, 12 maŝin-pafiloj kaj 10 malgrandkalibraj kanonoj konkerataj. La perdoj de l' kontraŭulo estas gravaj. 400 ĝis 500 mortigitoj kuŝas sur la batalkampo. La franca infanterieregimento 155 ŝajnas esti pereigita. Niaj perdoj laŭcirkonstanco estas malgrandaj. — Noktaj atakprovoj de la Francoj estis repuŝataj kun gravaj iliaj perdoj. — Nordoriente de Badonviller la Francoj estis elpelataj el la vilaĝo Angomont al Bréménil. Angomont de ni estis okupata.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo la Rusoj sensukcese atakis la antaŭponton pozicion oriente de Darkehmen, bombardis niajn fortikaĵojn oriente de la lagoj kaj provis sudoriente de la Löwentin-lago atakon, kiu malsukcesis pro nia pafado. — Rusaj noktaj atakoj en la regiono de Borzymow, oriente de Lowicz, estis repuŝataj kun plej gravaj perdoj de l' kontraŭulo.

La armeestraro.

Wien, 30. Januaro.

Oficiale. — Nekalkulite mallongajn artileripafadojn regas silento antaŭ la pola-galicia fronto. — Per la fortaj bataloj de la lastaj tagoj ni reakiris la montoselojn en la Karpaten. Malgraŭ malbona vetero la soldatoj dum la unusemajnaj, malfacilaj militagoj batalis kun plej granda persisto kaj kontraŭstaremo, pasis la kamparon malgraŭ ofte alta neĝo kaj tial bonege sukcesis. Ni prenis de la kontraŭulo sume 10000 kaptitojn kaj 6 maŝinpafilojn.

La vicestro de l' generalstabo: v. Hofer.

Großes Hauptquartier, 31. Januaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En Flandern hieraŭ nur artileribataloj okazis. Apud Guinchy, sude de la ŝoseo La Bassée-Bethune, kaj apud Carency (nordokcidente de Arras) ni perforte prenis de la Francoj kelkajn tranĉeojn.

Orienta militkampoj: Ĉe la limo de orienta Prusujo io nova ne okazis. En Polujo ni repuŝis rusan atakon apud Borzymow, oriente de Lowicz.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 1. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Sur la okcidenta militkampoj io grava ne okazis.

De la limo de orienta Prusujo io nova ne estis sciigata. Norde de la Weichsel, en la regiono sudokcidente de Mława, ni elpelis la Rusojn el kelkaj vilaĝoj antaŭ nia fronto, kiujn ili estis okupintaj la antaŭan tagon. — En Polujo sude de la Weichsel ni avancis plu. Sude de la Pilica ni ree atakis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 2. Februaro, antaŭtagmeze.

Okcidenta militkampoj: Escepte de artileribataloj sur kelkaj lokoj nenio grava okazis.

Orienta militkampoj: Ĉe la limo de orienta Prusujo nenio grava okazis. En Polujo norde de la Weichsel okazis renkontoj kun rusa kavalerio en la regiono de Lipno kaj nord-okcidente de Sierpe. Sude de la Weichsel niaj atakoj progresas plu.

Dum la lasta tempo la francaj oficialaj raportoj pri la militaj okazaĵoj enhavas sciigojn vere strangajn, kiuj estas falsigitaj malfavore al ni, parte ankaŭ eĉ eltrovitaj. Nature la germana armeestraro ne okupos sin detale pri tiaj raportoj. Ĉiu mem povas esplori ilian valoron uzante la germanajn oficialajn sciigojn.

La armeestraro.

Berlin, 2. Februaro.

Oficiale. — La hodiaŭa numero de la „Reichs- und Staatsanzeiger“*) enhavas jenan sciigon: Berlin, 1a de februaro 1915. — Sciigo! Anglujo estas ŝipe transportanta al Francujo multajn soldatojn kaj grandajn arojn da pormilita materialo. Tiujn transportojn ni malhelpos per ĉiuj militaj rimedoj. — La pacaj ŝipoj estas urĝe avertataj pri alproksimiĝo al la norda kaj okcidenta bordo de Francujo; ĉar se ili estus erare konsiderataj kiel ŝipoj, kiuj servas por militaj celoj, ilin minacus granda danĝero. Al la komercŝipoj la vojo ĉirkaŭ Skotlando estas proponata.

La ĉefo de la marino-admiralstabo: von Pohl.

Konstantinopel, 2. Februaro.

La turka armeestraro sciigas oficiale: Dum la lastaj tagoj antaŭ la kaŭkasa fronto niaj soldatoj sukcesis en negrandaj renkontoj. Kontraŭula taĉmento atakinta nin apud Artwin estis repuŝata kun gravaj siaj perdoj. Persekutate ĝi lasis inter niaj manoj multe da pormilita materialo. — En la regiono de Korna malgranda nia taĉmento surprize atakis je la 30a nokte 2 kontraŭulajn batalionojn barintajn sin malantaŭ pikdrato kaj kaŭzis al ili grandajn perdojn. Subtenate de kanonboatoj la kontraŭulo je la sekventa tago provis surbordiĝi, sed estis repuŝata kaj postlasis multajn mortigitojn, inter ili 1 kapitanon kaj 1 suboficiron.

*) Oficiala gazeto de la germana registaro. (La trad.)

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 3. Februaro.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Francaj atakoj kontraŭ niaj pozicioj apud Perthes estis repuŝataj. Apud la aliaj partoj de la fronto nur artileribataloj okazis.

Orienta militkampoj: Ĉe la limo de orienta Prusujo io nova ne okazis. En Polujo norde de la Weichsel la kavaleribataloj finiĝis; la Rusoj estis repuŝataj. Sude de la Weichsel ni atake prenis la vilaĝon Humin, oriente de Bolimow; pro Wola-Szydłowiecka ankoraŭ estas batalate. Depost la 1a de februaro ni akiris tie pli ol 4000 kaptitojn kaj 6 maŝinpafilojn. — Rusaj noktaj atakoj kontraŭ niaj pozicioj apud la Bzura estis repuŝataj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 4. Februaro, posttagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Ĉe la fronto inter la Norda Maro kaj Reims okazis artileribataloj. — Denovaj francaj atakoj apud Perthes estis repuŝataj kun perdoj de l' kontraŭulo. — Norde kaj nordokcidente de Massiges (nordokcidente de St. Ménéhould) niaj soldatoj hieraŭ atakis, ĝistranskuris 3 liniojn de kontraŭulaj tranĉeoj kuŝantajn unu post la alia kaj okupis la francan ĉefpozicion en fronto 2 km larĝa. Ĉiuj francaj kontraŭatakoj, kiuj daŭris ankaŭ nokte, estas repuŝitaj. Ni kaptis 7 oficirojn, 601 soldatojn kaj akiris 9 maŝinpafilojn, 9 malgrandkalibrajn kanonojn kaj multe da materialo. — Krom tio estas menciinde, ke en la mezaj Vogesen la unua bataleto de unu nia surskia taĉmento kontraŭ francaj ĉasistoj bone sukcesis.

Orienta militkampoj: En orienta Prusujo estis repuŝataj malfortaj rusaj atakoj kontraŭ niaj pozicioj sude de la Memel. En Polujo norde de la Weichsel aliĝe al la sciigitaj kavaleribataloj okazis bataletoj de negrandaj miksitaj taĉmentoj. Apud la Bzura sude de Sochaczew rusa nokta atako malsukcesis kun grandaj perdoj de l' kontraŭulo. Nia atako oriente de Bolimow progresas malgraŭ fortaj kontraŭatakoj de la Rusoj. La nombro de la kaptitoj kreskas. En la Karpaten de kelkaj tagoj germanaj taĉmentoj batalas ŝultron ĉe ŝultro kun la armeoj de Aŭstrio-Hungarujo. La unuiĝintaj soldatoj kelkajn fojojn bone sukcesis en la malfacile transirebla, neĝkovrita montkamparo.

La armeestraro.

Orienta militkampoj: La Rusoj hieraŭ atakis ĉe la limo de orienta Prusujo kaj mon-

Großes Hauptquartier, 5. Februaro.

Okcidenta militkampoj: Apud la tuta fronto nur artileribataloj okazis. — Unuopa franca atako kontraŭ niaj pozicioj nordokcidente de Perthes restis sensukcesa.

Orienta militkampoj: Ĉe la limo de orienta Prusujo denovaj rusaj atakoj sude de la Memel estis repuŝataj. Same malsukcesis fortaj rusaj atakoj kontraŭ niaj nove akiritaj pozicioj oriente de Bolimow. Tie ni kaptis de la 1a de februaro entute 26 oficirojn kaj proksimume 6000 soldatojn.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, Berlin, 4. Februaro. antaŭtagmezo.

La „Reichsanzeiger“ oficiale sciigas jenon:

1. Per tio la akvoj ĉirkaŭ Granda Britujo kaj Irlando kaj la tuta angla Kanalo estas deklarataj milita teritorio. Depost la 18^a de februaro ĉiu komercŝipo renkontata en tiu teritorio estos detruata, kvankam ne ĉiam estos eble, eviti la danĝerojn tiam minacantajn la maristojn kaj pasaĝerojn.

2. Ankaŭ neŭtralaj ŝipoj sur tiu ĉi teritorio enriskiĝos; ĉar pro la kontraŭleĝa uzo de neŭtralaj flagoj, kiun la brita registaro ordonis la 31^{an} de januaro, kaj pro la hazardaĵoj de l' marmilito ne ĉiam povos esti evitata, ke atakoj celantaj kontraŭulajn ŝipojn trafas ankaŭ neŭtralajn.

3. Sendanĝera estas la navigado norde ĉirkaŭ la Shetland-insuloj, en la orienta parto de la Norda Maro kaj sur strio minimume 30 marmejlojn larĝa laŭlonge de la nederlanda bordo. La ĉefo de la marino-admiralstabo: von Pohl.

Orienta militkampoj: Ĉe la limo de orienta Prusujo, sudoriente de la lagoj kaj en Polujo dekstra de la Weichsel okazis kelkaj negrandaj, por ni sukcesaj renkontoj de malvesta graveco.

Wien, 5. Februaro, tagmezo.

Oficiale. — En Polujo kaj okcidenta Galicio la situacio estas neŝanĝita. La ĉiutage ripetataj atakoj de la Rusoj en la Karpaten malsukcesas. — En la Bukowina ni ekavancis. La 22^{an} de januaro ni prenis Kirlibaba'on. Dum la lastaj tagoj komenciĝis novaj bataloj. Niaj soldatoj enpenetris la valon de la Moldawa kaj repuŝis la kontraŭulon. Izwor, Moldawa kaj Breaza estas en niaj manoj. En la Karpaten ni denove kaptis 4000 Rusojn (Eltiraĵoj).

Orienta militkampoj: Ĉe la limo de orienta Prusujo, sudoriente de la lagoj kaj en Polujo renkontoj de malvesta graveco. Krom tio la situacio estas neŝanĝita. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 6. Februaro.

Okcidenta militkampoj: Denovaj francaj atakoj kontraŭ la pozicioj de ni prenitaj norde de Massiges restis sen sukceso. Same malsukcesis kontraŭula atako en la Argonnes.

Orienta militkampoj: La Rusoj hieraŭ atakis ĉe la limo de orienta Prusujo kaj nian fronton Humin-Bzura sude de la Weichsel. Ni repuŝis ĉiujn atakojn, akiris 1000 kaptitojn kaj 6 maŝinpafilojn.

Ĉefe de angla, sed ankaŭ de franca flanko oni seninterrompe ripetas la aserton, ke la Germanoj, kvazaŭ por soleni la naskiĝtagon de Lia Imperiestra Moŝto, grandstile entreprenis atakojn, kiuj senescepte grave malsukcesis. Ke tiu aserto estas absolute mensogita, tion pravas niaj oficialaj raportoj pri la aluditaj tagoj. Nature tia batalmaniero neniel tuŝas la personon de l' militestro. Sed la germana armeestraro ne volas preterlasi, fardon tian fiecon al la malestimo de la tuta mondo. La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 10. Februaro, antaŭtagmeze.

Großes Hauptquartier, 7. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Sudokcidente de Ypern, prenante francan tranĉeon ni akiris 2 anglajn maŝinpafilojn. — Sude de l'kanalo de La Bassée la kontraŭulo enpenetris unu nian tranĉeon; la batalo tie daŭras ankoraŭ. — Escepte tio kaj artileribataloj sur ambaŭ militkampoj nenio grava okazis. — La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 8. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampo: La batalo pro nia pozicio sude de la kanalo sud-okcidente de La Bassée daŭras ankoraŭ. Parto de la mallonga tranĉeo, kiun la kontraŭulo prenis, estas reakirita. — En la Argonnes ni perforte prenis de la kontraŭulo partojn de liaj fortikaĵoj. — Krom tio nenio grava okazis.

Orienta militkampo: Ĉe la limo de orienta Prusujo, sudoriente de la lagoj kaj en Polujo dekstre de la Weichsel okazis kelkaj negrandaj, por ni sukcesaj renkontoj de malvasta graveco. Krom tio eloriente nenio estas sciiginda. — La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 12. Februaro, antaŭtagmeze.

Großes Hauptquartier, 9. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampo: Io grava ne estas sciigata.

Orienta militkampo: Ĉe la limo de orienta Prusujo ni ree sukcesis en kelkaj negrandaj renkontoj de malvasta graveco. Krom tio la situacio estas neŝanĝita. — La armeestraro.

Konstantinopel, 9. Februaro.

La turka armeestraro sciigis hieraŭ: La avangardo de nia armeo antaŭeniranta al Egiptujo sukcese faris informiĝan marŝon tra la dezerto, repelis al la kanalo antaŭlokitan gvardion de la Angloj kaj eĉ sendis kelkajn infanterikompaniojn trans la Suez-kanalon inter Tussum kaj Serapeum. Malgraŭ la pafado de anglaj krosŝipoj kaj kirasaj vagonaroj niaj taĉmentoj dum la tuta tago bataligis la kontraŭulon kaj komplete informiĝis pri ĉiuj liaj defendiloj. Angla krosŝipo estis grave difektata per nia artileripafado. Nia avangardo plue restos senpere antaŭ la kontraŭulo kaj informiĝos sur la orienta kanalbordo, ĝis kiam nia armeo povos ekataki. — Parto de nia ŝiparo efike bombardis Jalta'n kaj mergis aliloke rusan ŝipon.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 10. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Okazis nenio sciiginda krom negrandaj sukcesoj de niaj soldatoj en la Argonnes, ĉe la okcidenta deklivo de la Vogesen apud Ban-de-Sapt kaj en la arbaro de Hirzbach.

Orienta militkampoj: La kelklokaj bataletoj ĉe la limo de orienta Prusujo tie kaj tie fariĝis batalagoj pligrandampleksaj. Ĉie ili iras normale. — En Polujo dekstre kaj maldekstre de la Weichsel nenio aliĝis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 11. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Per atako en la Argonnes ni avancis. La kontraŭulo perdis 6 oficirojn, 307 soldatojn, 2 maŝinpafilojn kaj 6 negrandajn kanonojn. Ankaŭ en la mezaj kaj sudaj Vogesen ni sukcesis iom.

Orienta militkampoj: Ĉiuj bataloj ĉe la limo de orienta Prusujo daŭris ankaŭ hieraŭ favore al ni malgraŭ profunda neĝo, kiu malhelpis la movojn de la taĉmentoj. La rezultatoj el la renkontoj kun la kontraŭulo ne jam estas certe konstateblaj. — Sur la pola batalkampo dekstre de la Weichsel ni akiris kelkcentojn da kaptitoj per atako en la regiono nordokcidente de Sierpe, per kiu ni repelis la kontraŭulon ĉie, kie ni lin renkontis. Maldekstre de la Weichsel io grava ne okazis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 12. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Post iom longa paŭzo hieraŭ kontraŭulaj ŝipoj ree aperis ĉe la marbordo. — Super Ostende kontraŭulaj aviadistoj ĵetis bombojn, kiuj ne kaŭzis militistan malutilon. Ĉe la ceteraj partoj de la fronto artileribataloj okazis. — Tre multe da municio la kontraŭulo ĵetis kontraŭ niajn poziciojn en la Champagne; nenie li citinde sukcesis per tio. Apud Souain ankaŭ infanteriatako estis provata, kiun ni repuŝis; 120 kaptitoj restis inter niaj manoj. — La hieraŭ sciigita nombro de la kaptitoj en la Argonnes kreskis je 1 oficiro kaj 119 soldatoj. Nordokcidente de Verdun ni prenis kelkajn tranĉeojn de l' kontraŭulo; la kontraŭatako, kiun la Francoj faris antaŭportante la Ĝenevan flagon, estis repuŝata kun nemalgrandaj iliaj perdoj. — Sur la fortifikaĵon Verdun germanaj aviadistoj ĵetis 100 bombojn. — Ĉe la Sudelkopf en la Vogesen la Francoj sukcesis okupi malgrandan antaŭtranĉeon antaŭ nia pozicio.

Orienta militkampoj: Lia Imperiestra Moŝto alvenis al la batalkampo ĉe la limo de orienta Prusujo. La tieaj militagoj devigis la Rusojn, rapide malokupi siajn poziciojn oriente de la mazuraj lagoj. Sur kelkaj lokoj la bataloj daŭras ankoraŭ. Ĝis nun ni akiris tie ĉirkaŭe 26 000 kaptitojn, pli ol 20 kanonojn kaj 30 maŝinpafilojn. Sed la amaso de la prenita pormilita materialo eĉ ne proksimume jam estas taksebla. — En Polujo dekstre de la Weichsel la germanaj soldatoj daŭrigis la ofensivon hieraŭ sciigitan, prenis la urbon Sierpe kaj ree akiris kelkcentajn kaptitojn. Sur la pola militkampoj maldekstre de la Weichsel nenio aliĝis.

La armeestraro.

Rendirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zeoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 13. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Ankaŭ hieraŭ ĉe la marbordo kontraŭulaj aviadistoj ĵetis bombojn, kiuj bedaŭrinde multe difektis la civilan loĝantaron kaj ties posedaĵon; la militistaj perdoj estis negravaj. — En nia fronto artileripafaĵoj estis trovataj, kiuj sendube devenas el amerikaj fabrikejoj. — La nombro de la kaptitoj akiritaj en la atakoj hieraŭ repuŝitaj oriente de Souain plialtiĝis al 4 oficiroj kaj 478 soldatoj. Antaŭ nia fronto 200 mortintaj kontraŭuloj estis trovataj; ni perdis en tiuj bataletoj 90 mortigitojn kaj vunditojn. — Daŭrigante niajn atakojn de l' 3-a de februaro ni plue prenis 1200 metrojn de la franca ĉefpozicio norde de Massiges (nordokcidente de St. Ménéhould). — Ĉe la Sudelkopf en la Vogesen la kontraŭulo denove provis ataki, sed ĉie estis senpene repuŝata.

Orienta militkampoj: La militagoj ĉe kaj trans la limo de orienta Prusujo ĉie bone progresas. Kie la kontraŭulo provas resisti, li rapide estas forpelata. En Polujo dekstre de la Weichsel niaj atakantaj taĉmentoj transiris la malsupran parton de la Skrwia kaj avancis al Racionz. De sur la pola batalkampoj maldekstre de la Weichsel io grava ne estas raportata.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 16. Februaro, antaŭtagmeze.

Großes Hauptquartier, 14. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Nordoriente de Pont-à-Mousson ni perforte prenis de la Francoj la vilaĝon Norroi kaj la altaĵon 365 kuŝantan okcidente de ĝi; 2 oficiroj, 151 soldatoj estis kaptataj. En la Vogesen ni atake prenis la vilaĝojn Hilsen kaj Ober-Sengern; 135 kaptitoj estis akiritaj.

Orienta militkampoj: Ĉe kaj trans la limo de orienta Prusujo niaj militagoj iras laŭ niaj esperoj. En Polujo dekstre de la Weichsel niaj taĉmentoj progresis marŝante al Racionz; maldekstre de la Weichsel nenio aliĝis.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 16. Februaro, vespere.

Oficiale. — Dum la 9 taga batalo en Masuren la rusa armeo, konsistinta el minimume 11 infanteriaj korpoj, estis repusata al sia antaŭa pozicio.

Großes Hauptquartier, 15. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Sude de Ypern apud St. Eloi ni prenis de la kontraŭulo pecon de lia pozicio ĉirkaŭ 900 metrojn longan. Kontraŭatakoj estis sensukcesaj. Same malsukcesis atako de l' kontraŭulo sudokcidente de La Bassée. Kelkaj dekduoj da kaptitoj restis inter niaj manoj. — Ĉe la Sudelkopf ni reprenis la antaŭ-tranĉeon, kiun ni estis perdintaj je la 12-a de februaro. El Sengern en la Lauch-valo la kontraŭulo estas elpuŝita; la vilaĝon Remspach li poste forlasis memvole.

Orienta militkampoj: Norde de Tilsit la kontraŭulo estis elpuŝata el Piktupönen kaj estas plue pelata al Tauroggen. Trans kaj maltrans la limo, oriente de la lagoj la bataloj ankoraŭ daŭras, per kiuj ni persekutas la kontraŭulon. Ĉie niaj taĉmentoj avancis rapide. — Kontraŭ kontraŭulaj taĉmentoj avancantaj tra Lomza germanaj taĉmentoj avancis en la regiono de Kolno. — Apud la Weichsel ni avancis plu. Racionz estas okupita de ni. En la antaŭaj bataloj ni prenis krom multaj kaptitoj 6 kanonojn. En Polujo maldekstre de la Weichsel nenio grava ŝanĝiĝis.

Großes Hauptquartier, 16. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Ni repuŝis kontraŭulajn atakojn kontraŭ la anglaj tranĉeoj de ni prenitaj apud St. Eloi. Escepte tio nenio grava okazis.

Orienta militkampoj: La bataloj, per kiuj ni persekutadas la kontraŭulon, plue daŭras tre sukcese ĉe kaj trans la limo de orienta Prusujo. — En Polujo norde de la Weichsel ni okupis Bielsk'on kaj Plock'on post mallonga batalo. Ĉirkaŭ 1000 kaptitoj venis al niaj manoj. En Polujo sude de la Weichsel io grava ne okazis.

La eksterlanda gazetaro presis la plej monstrajn famojn pri nemezureblajn perdojn de la Germanoj en la bataloj oriente de Bolimow (komence de februaro). Ni konstatas, ke en tiuj bataloj la germanaj perdoj estis malgrandaj rilate al la sukceso.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 16. Februaro, vespere.

Oficiale. — Dum la 9 taga batalo en Masuren la rusa armeo, konsistinta el minimume 11 infanteri- kaj kelkaj kavaleridivizioj, ne nur estis elpuŝata el siaj multe fortikigitaj pozicioj oriente de la masuraj lagoj, sed puŝata ĝis trans la limo kaj fine post preskaŭ kompleta ĉirkaŭpreno pereige venkata. Nur restoj povas esti fugintaj en la arbarojn oriente de Suwalki kaj Augustowo, kie ili estas persekutataj. La sangaj perdoj de l' kontraŭulo estas tre grandaj. La nombro de la kaptitoj ne jam estas konstatita, sed ĝi certe estas multe pli granda ol 50 000 (kvindek mil). Ni prenis pli ol 40 kanonojn kaj 60 maŝinpafilojn; la amaso de la akirita pormilita materialo estas nesupervidebla. — Lia Imperiestra Moŝto ĉeestis la decidigan batalon meze de nia batalanta fronto. La venkintoj estas partoj el la taĉmentoj, kiuj jam antaŭe staris sur la orienta militkampoj, kaj taĉmentoj pro tiu tasko alkondukitaj, kiuj sin montris egalpovaj al siaj bravaj kameradoj. La laboro de la soldatoj, kiuj marŝante kaj batalante superis tage kaj nokte la plej malbonajn veteron kaj vojojn, estas pli granda ol ĉiu ajn laŭdo. — Generalo-marŝalo von Hindenburg direktis majstre kiel ĉiam la militagojn, kiuj estis brile realigitaj de generalo-kolonelo von Eichhorn kaj infanteri-generalo von Below. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 17. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Versajne pro niaj grandaj sukcesoj sur la orienta militkampoj Francoj kaj Angloj entreprenis hieraŭ kaj en la pasinta nokto tre obstinajn atakojn ĉe diversaj lokoj. La Angloj denove provis, atake repreni siajn poziciojn perditajn je la 14-a de februaro; ili malsukcesis kaj perdis 4 oficirojn kaj 170 soldatojn, kiujn ni kaptis. Nordoriente de Reims kontraŭulaj atakoj estis repuŝataj. 2 oficiroj, 179 Francoj restis inter niaj manoj. Atakoj precipe fortaj, kiuj kelkfoje kaŭzis obstinajn bataladojn sendistancajn, celis nian fronton en la Champagne. Nekalkulite kelkajn mallongajn frontpartojn, en kiujn la kontraŭulo enpenetris kaj kie ankoraŭ daŭras la batalo, la kontraŭulaj atakoj ĉie estis repuŝataj. Proksimume 300 Francoj estis kaptataj. — En la Argonnes ni daŭrigis nian ofensivon, prenis pluajn partojn de la kontraŭula ĉefpozicio, kaptis 350 kontraŭulojn kaj akiris 2 montarkanonojn kaj 7 maŝinpafilojn. Ankaŭ en la Priesterwald (norde de Toul) ni iom sukcesis kaj akiris 2 maŝinpafilojn. Ĉe la limo de Elsass-Lothringen io nova ne okazis. — Orienta militkampoj: Norde de la Memel niaj soldatoj sekvis la ĉie repuŝitan kontraŭulon trans la limon kontraŭ Tauroggen. Sur la arbara teritorio oriente de Augustowo ĉe multaj lokoj okazis ankoraŭ bataloj, per kiuj ni persekutadas la kontraŭulon. La rusa taĉmento antaŭenirinta de Lomza al Kolno estas venkata. 700 kaptitoj, 6 maŝinpafiloj venis al niaj manoj. Same apud Grajewo kontraŭula taĉmento estis repuŝata al Ossowiez. Ŝajnas, ke ĉe la nun okupita fronto Plock-Racionz (en Polujo norde de la Weichsel) evluas iom obstinaj bataloj. En Polujo sude de la Weichsel io nova ne okazis. La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 18. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: La hieraŭ sciigitaj kontraŭulaj atakprovoj daŭris kun sama malsukceso. Ĉe la ŝoseo Arras-Lille daŭras ankoraŭ la bataloj pro malgranda parto de niaj tranĉeoj, kie la kontraŭuloj enpenetris antaŭhieraŭ. — La nombro de la kaptitoj prenitaj hieraŭ nordoriente de Reims kreskis ankoraŭ. Ankaŭ ĉi tie la Francoj suferis tre multajn sangajn perdojn. Ili ĉesis ataki plu. — En la Champagne norde de Perthes ankoraŭ estas batalate. Oriente de tie la Francoj estis repuŝataj kun gravaj siaj perdoj; ili sin defendas nur sur kelkaj malgrandaj lokoj de niaj plej antaŭaj tranĉeoj. La hieraŭ sciigita nombro de kaptitoj kreskis al 11 oficiroj, 785 soldatoj. Absolute malsukcesis ankaŭ la atakoj kontraŭ niaj pozicioj apud Boureuilles-Vauquois (oriente de la Argonnes) kaj oriente de Verdun. — Ni malokupis la altajn 365 prenitan je la 13a de februaro kaj la vilaĝon Norroy (nordoriente de Pont-à-Mousson), post kiam ni radikale detruis la tieajn francajn fortikaĵojn. La kontraŭulo ne provis, repreni per la armiloj tiun ĉi pozicion. — Escepte tio nenio nova.

Orienta militkampoj: Apud Tauroggen kaj nordokcidente de Grodno la persekutado-bataletoj daŭras ankoraŭ. — La kontraŭula taĉmento venkita apud Kolno enviciĝis en novajn taĉmentojn norde de Lomża; la kontraŭulo estas denove atakata. La bataloj apud Plock-Racionz decidiĝis sukcese por ni. Ĝis nun ni akiris 3000 kaptitojn. — El Polujo sude de la Weichsel io nova ne estas sciigata.

La militkaptajo el la bataloj ĉe la limo de orienta Prusujo kreskis ankoraŭ. La ĝisnuna rezultato estas: 64 000 kaptitoj, 71 kanonoj, pli ol 100 maŝinpafiloj, 3 lazaretvagonaroj, aeroplanoj, 150 plenaj municioveturiloj, reflektoroj kaj nenombreblaj ŝarĝitaj veturiloj kun la ĉevaloj. Versajne ĉi tiuj nombroj kreskos plu.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 19. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Ĉe la ŝoseo Arras-Lille ni elpuŝis la Francojn el tiu parto de unu nia tranĉeo, kiun ili okupis je la 16a de februaro. En la Champagne denove la Francoj parte avancis tre multnombro. Iliaj atakoj tute malsukcesis sub nia pafado. Pluaj 100 kaptitoj restis inter niaj manoj. — Kelkaj el la mallongaj tranĉepartoj, kiujn la Francoj okupis je la 16a nuna, estas reprenitaj de ni. — En la raportita franca atako kontraŭ Boureuilles-Vauquois ni kaptis 5 oficirojn kaj 479 soldatojn nevunditajn. — Oriente de Verdun, apud Combres, la Francoj komence sukcesis, sed poste estis repuŝataj kun multaj siaj perdoj. — En la Vogesen ni prenis perforte la altajn 600, sude de Lusse, kaj akiris 2 maŝinpafilojn.

Orienta militkampoj: Tauroggen hieraŭ estas prenita de ni. La persekutado-bataloj nordokcidente de Grodno kaj norde de Suchawola estas finiĝontaj. La batalo nordokcidente de Kolno daŭras ankoraŭ. Sude de Mysciniec ni pelis la Rusojn el kelkaj vilaĝoj. En Polujo norde de la Weichsel okazis negrandaj renkontoj sur ambaŭ bordoj de la Wkra, oriente de Racionz. Sude de la Weichsel nenio nova.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 20. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la Champagne norde de Perthes kaj norde de Le Mesnil la Francoj hieraŭ atakis kun tre fortaj taĉmentoj. Malsukcesis ĉiuj kontraŭulaj provoj, rompi nian fronton. Sur kelkaj malgrandaj lokoj la Francoj sukcesis, enpenetri niajn plej antaŭajn tranĉeojn; tie ankoraŭ estas batalate. Escepte tio ili estis repuŝataj kun gravaj siaj perdoj. Ankaŭ norde de Verdun ni repuŝis kontraŭulan atakon.

Apud Combres la Francoj denove atakis post forta prepara artileripafado; la batalo daŭras ankoraŭ.

En la Vogesen ni okupis la kontraŭulan ĉefpozicion 2 km longan sur la altaĵoj oriente de Sulzern kaj prenis perforte la Reichsackerkopf okcidente de Münster. Pro la altaĵoj norde de Mühlbach ankoraŭ estas batalate. Metzeral kaj Sondernach post batalo estis okupataj de ni.

Orienta militkampoj: Nordokcidente de Grodno kaj norde de Suchawola nenio grava aliĝis. Sudoriente de Kolno la kontraŭulo estis repuŝata al la antaŭaj pozicioj apud Lomza. Sude de Miszyniec, nordoriente de Praszysz kaj oriente de Racionz okazis bataloj kun nur loka graveco. Sude de la Weichsel nenio nova. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 21. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Kontraŭula ŝipo, kiu verŝajne serĉis minojn, surveturis sur minon apud Nieuport kaj subakviĝis. Kontraŭulaj torpedoboatoj malaperis, kiam ili estis atakataj.

Ĉe la ŝoseo Gheluvelt-Ypern kaj apud la kanalo sudoriente de Ypern ni prenis po unu kontraŭula tranĉeo kaj kelkajn kaptitojn.

En la Champagne hieraŭ preskaŭ regis silento post la fortaj bataloj en la pasintaj tagoj. — Apud Combres 3 francaj atakoj estis repuŝataj, kiuj estis entreprenataj kun fortaj taĉmentoj kaj tre obstine. La kontraŭulo suferis gravajn perdojn. Ni kaptis 2 oficirojn kaj 125 soldatojn.

En la Vogesen ni atake avancis plu. En la regiono sudoriente de Sulzern ni prenis la vilaĝon Hohrodberg, la altaĵon apud Hohrod kaj la biendomarojn Breßel kaj Widenthal.

Orienta militkampoj: Ankaŭ hieraŭ en la regiono de Grodno nenio grava aliĝis. Norde de Ossowiez, sudoriente de Kolno kaj ĉe la fronto inter Praszysz kaj la Weichsel (oriente de Plock) la bataloj daŭris. — Sude de la Weichsel nenio nova.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 22. Februar, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Okcidente de Ypern ni ree prenis hieraŭ kontraŭulan fronteon. Kontraŭulaj kontraŭatakoj kontraŭ la prenitaj pozicioj restis sensukcesaj. — En la Champagne ankoraŭ hieraŭ regis preskaŭa silento. La nombro de la Francoj de ni kaptitaj en la lastaj tieaj bataloj kreskis al 15 miloj kaj pli ol 1000 soldatoj. La sangaj perdoj de la kontraŭulo estis eksterordinare grandaj. — Hieraŭ kaj lastnokte la kontraŭulo sen iu sukceso atakis niajn poziciojn norde de la vilaĝoj Hohrod kaj Stossweiler estis prenitaj post batalo. — Escepte tio nemo grava.

Berlin, 22. Februaro.

Oficiale. — En Masuren la persekutado post la vintra batalo estas finita. Dum la purigado de la arbaroj nordokcidente de Grodno kaj en la bataletoj ĉe la Bobr kaj Narew, pri kiuj ni raportis dum la lastaj tagoj, ĝis nun estis kaptataj: 1 komandanto-generalo, 2 divizio-komandantoj, 4 aliaj generaloj kaj proksimume 40 000 soldatoj; 75 kanonoj, ĝis nun ne jam konstatebla nombro da maŝinpafiloj kaj multe da alia pormilita materialo. La suma kaptaro el la vintra batalo en Masuren do estas ĝis hodiaŭ

7 generaloj, pli ol 100 000 soldatoj, pli ol 150 kanonoj

kaj eĉ ne proksimume jam taksebla pormilita materialo de ĉia speco, inter ĝi maŝinpafiloj. Kelkfoje la kontraŭulo enterigis aŭ mergis en la lagojn municion kaj pezajn kanonojn. Ekzemple hieraŭ apud Lötzen kaj en la Widminnen-lago ni elterigis aŭ malmergis 8 pezajn kanonojn.

La 10 an rusan armeon de generalo barono Sievers post tio oni povas rigardi esti tute pereigita.

Okcidenta militkampoj: Nun pereigaj perdoj malsukcesis atako, kiu la Rusoj kun rapide kolektitaj, nove formitaj taĉmentoj entreprenis de Grodno nordokcidenten. — La nombro de la kanonoj prenitaj dum la persekutado post la vintra batalo en Masuren kreskis al 300, inter ili 18 pezaj. — Nordokcidente de Ossowicz, norde de Lomza kaj apud Praszynsz la bataloj daŭras. Ĉe la Weichsel, oriente de Plock, ni avancis plu kontraŭ Wyszogrod. — En Pollujo sude de la Weichsel la atako de rusa divizio kontraŭ niaj pozicioj ĉe la Rawka estis repuŝata.

Nota: En la tradukon de la depeŝo de la 14-a de februaro (folio 83) bedaŭrinde grava eraro enŝoviĝis. La ĝusta teksto de la tria linio estas: Depost la 18-a de februaro ĉiu kontraŭula kampanjo rekantata ktp. (La tradukinto.)

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 22. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Okcidente de Ypern ni ree prenis hieraŭ kontraŭulan tranĉeon. Kontraŭulaj kontraŭatakoj kontraŭ la prenitaĵoj restis sensukcesaj. — En la Champagne ankaŭ hieraŭ regis preskaŭa silento. La nombro de la Francoj de ni kaptitaj en la lastaj tieaj bataloj kreskis al 15 oficiroj kaj pli ol 1000 soldatoj. La sangaj perdoj de l' kontraŭulo estis eksterordinare grandaj. — Hieraŭ kaj lastnokte la kontraŭulo sen iu sukceso atakis niajn poziciojn norde de Verdun. — En la Vogesen la vilaĝoj Hohrod kaj Stossweiler estis prenataj post batalo. — Escepte tio nenio grava.

Orienta militkampoj: Novaj bataletoj komenciĝas evolui apud Grodno kaj norde de Suchawola. La sciigitaj bataloj nordokcidente de Ossowiez kaj Lomza kaj apud Praszysz daŭras. En Polujo kaj sude de la Weichsel nenio nova. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 22. Februaro, tagmeze.

Oficiale. — Ĉe la fronto en rusa Polujo kaj okcidenta Galicio kelkaj atakoj de la Rusoj senpene estis repuŝataj. En la Karpaten multnombre okazis rusaj atakoj, eĉ dum la nokto, kiuj malsukcesis kun grandaj perdoj de l' kontraŭulo. Sude de la Dnjestr pli grandaj bataloj evoluas. Forta taĉmento de l' kontraŭulo hieraŭ estis repuŝata post iom longaj bataloj; ni prenis 2000 kaptitojn, 4 kanonojn kaj multe da pormilita materialo.

Oficiala rusa bulteno asertas, ke la nombro da 29 000 militkaptitoj, kiujn niaj soldatoj en la Karpaten prenis de l' fino de januaro ĝis antaŭ kelkaj tagoj, estas falsa. Dume tiu ĉi nombro kreskis al 64 oficiroj, 40 806 soldatoj, 34 maŝinpaŝiloj kaj 9 kanonoj.

(Mallongigita.)

La vicestro de l' aŭstra generalstabo: v. Hoefer.

Großes Hauptquartier, 23. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: La fortifikaĵo Calais estis bombardata de ni per multnombraj elajer bomboj dum la nokto de l' 21a ĝis 22a nuna. — La Francoj hieraŭ denove atakis en la Champagne, norde de Perthes, sed malpli forte. Ĉiuj atakoj malsukcesis sub nia pafado. — Apud Ailly-Apremont post unuaj negrandaj sukcesoj la Francoj estis repuŝataj al sia pozicio. — En la Vogesen la Sattelkopf norde de Mühlbach estis perforte prenata de ni. — Escepte tio nenio grava.

Orienta militkampoj: Kun pereigaj perdoj malsukcesis atako, kiun la Rusoj kun rapide kolektitaj, nove formitaj taĉmentoj entreprenis de Grodno nordokcidenten. — La nombro de la kanonoj prenitaĵoj dum la persekutado post la vintra batalo en Masuren kreskis al 300, inter ili 18 pezaj. — Nordokcidente de Ossowiez, norde de Lomza kaj apud Praszysz la bataloj daŭras. Ĉe la Weichsel, oriente de Plock, ni avancis plu kontraŭ Wyszogrod. — En Polujo sude de la Weichsel la atako de rusa divizio kontraŭ niaj pozicioj ĉe la Rawka estis repuŝata. La armeestraro.

Noto: En la tradukon de la depeŝo de l' 4a de februaro (folio 82) bedaŭrinde grava eraro enŝoviĝis. La ĝusta teksto de la tria linio estas: Depost la 18a de februaro ĉiu kontraŭula komercŝipo renkontata . . . ktp. (La tradukinto.)

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 24. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la regiono de Perthes (en la Champagne) hieraŭ 2 francaj infanteridivizioj atakis. Sur kelkaj lokoj okazis, obstinaj sendistancaj bataloj kiuj estis decidataj favore al ni. La kontraŭulo estis repuŝata al siaj pozicioj kun multaj siaj perdoj. — En la Vogesen ni progresis atake kontraŭ Sulzern kaj Ampfersbach (okcidente de Stoßweiler). En la bataloj de la lastaj tagoj ni prenis 500 kaptitojn.

Orienta militkampoj: Denova kontraŭula atako el Grodno estis senpene repuŝata. Sud-oriente de Augustowo la Rusoj hieraŭ sukcesis, ĉe 2 lokoj transiri la Bobr-riveron; apud Sztabin la kontraŭulo estis repuŝata. — En la regiono de Krasnybor la batalo daŭras ankoraŭ. Apud Praszysz ni prenis 1200 kaptitojn kaj 2 kanonojn. Oriente de Skierniewice rusa nokta atako estis repuŝata.

Großes Hauptquartier, 25. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — En la Champagne la kontraŭulo hieraŭ daŭrigis ataki plej obstine. Kiel antaŭe li eĉ ne iom sukcesis, malgraŭ la fortaj alkondukitaj taĉmentoj. — Escepte tio nenio grava.

Orienta militkampoj: La bataletoj ĉe la Njemen, Bobr kaj Narew daŭras. La fortikigita urbo Praszysz hieraŭ post obstinaj bataloj estis atake prenata de rezervaj taĉmentoj el orienta Prusujo. Pli ol 10 000 (dek mil) kaptitoj, pli ol 20 kanonoj, granda provizo da maŝinpafiloj kaj tre multe da materialo venis al niaj manoj. En aliaj bataletoj norde de la Weichsel ni prenis dum la lastaj tagoj 5000 kaptitojn. — En Polujo sude de la Weichsel la Rusoj okupis la domaron Mogily (sudoriente de Bolimow) post atako de taĉmentoj, kiuj kvinoble superis la niajn. Escepte tio nenio grava.

Estas notinde, ke la komandanto de la 57^a rusa rezervo-divizio, kaptita apud Augustowo, demandis germanajn oficirojn, ĉu estas vere, ke Antwerpen sieĝata de la Germanoj baldaŭ estos prenata. Kiam poste oni klarigis al li la situacion sur la okcidenta militkampoj, li ne volis kredi, ke la germana okcidenta armeo staras sur franca teritorio.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 1. Marto.

Konstantinopel, 25. Februaro.

La turka armeestraro sciigas jenon: Hieraŭ antaŭtagmeze je la 10^a dek grandaj kirasaj ŝipoj komencis bombardi la fortifikajetojn apud la enirejo de la Dardanellen. La bombardado daŭris ĝis la 5^a kaj duono posttagmeze; poste la ŝipoj sin retiris en la direkto al Tenedos. Laŭ niaj observoj 1 kontraŭula ŝipo de la tipo „Agamemnon“ kaj 2 aliaj kirasaj ŝipoj estis difektataj per la pafoj de la fortifikajetoj sur la Anatola bordo.

La francoj hieraŭ kvinfoje ekprovis rompi nian fronton; la atakoj malsukcesis kun gravaj perdoj de la kontraŭulo. — La pozicioj, kiuj ni prenis oriente de Badonviller, ankoraŭ hieraŭ estis defendataj.

Großes Hauptquartier, 26. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — De ambaŭ militkampoj io grava ne estas sciigata.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 27. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la Champagne fortaj francaj taĉmentoj denove atakis hieraŭ kaj dum la lasta nokto. Kelkloke la batalo daŭras ankoraŭ; aliloke la atako estas repuŝita. — Norde de Verdun ni atakis parton de la francaj pozicioj; la bataleto daŭras ankoraŭ. De la aliaj frontoj io grava ne estas sciigata.

Orienta militkampoj: Nordokcidente de Grodno, okcidente de Lomza kaj sude de Praszysz aperis novaj rusaj taĉmentoj, kiuj ekatakis. Ĉe la Skroda sude de Kolno ni prenis 1100 kaptitojn. Sur la maldekstra bordo de la Weichsel nenio grava okazis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 28. Februaro, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la Champagne la kontraŭulo ankaŭ hieraŭ daŭrigis la atakojn. Ĉiuj estis repuŝataj. Sude de Malancourt (norde de Verdun) ni atake prenis kelkajn kontraŭulajn poziciojn kuŝantajn unu malantaŭ la alia. Malfortaj francaj kontraŭatakoj malsukcesis. Ni kaptis 6 oficirojn kaj 250 soldatojn; 4 maŝinpaŝiloj kaj 1 minjetilo estis akirataj. — Ĉe la okcidenta rando de la Vogesen post forta batalo ni elpuŝis la Francojn el iliaj pozicioj apud Blamont-Bionville. Ni atingis la linion Verdinal-Bremenil, oriente de Badonviller oriente de Celles. Per tio ni avancis 6 km sur fronto 20 km larĝa. La provoj de l' kontraŭulo, repreni la de ni okupitan teritorion, malsukcesis kun gravaj liaj perdoj. Same ankaŭ kontraŭulaj atakoj en la sudaj Vogesen estis repuŝataj.

Orienta militkampoj: Hieraŭ novaj rusaj taĉmentoj estis avancintaj nordokcidente de Grodno. Per kontraŭatako ni repuŝis la Rusojn al la antaŭpozicioj de la fortifikaĵo. 1800 kaptitoj restis inter niaj manoj. Nordokcidente de Ostrolenka ni repuŝis kontraŭulan atakon ĉe la Omulew. — Pro superaj kontraŭulaj taĉmentoj avancintaj elsude kaj eloriente al Praszysz niaj soldatoj sin retiris norden kaj okcidenten de tiu ĉi urbo. — Sude de la Weichsel nenio nova. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 1. Marto.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Apud Wervicq (norde de Lille) per nia pafado angla aeroplano estis devigata alteriĝi. — Ĉe unu punkto de nia fronto la Francoj ree — kiel jam antaŭ kelkaj monatoj — uzis pafaĵojn, kiuj eksplodante eligas malbonodorantajn kaj sufokajn gasojn. Ili ne malutilis nin. — Niaj pozicioj en la Champagne hieraŭ estis kelkfoje atakataj de minimume du korpusoj; post fortaj sendistancaj bataloj ĉiuj atakoj estis repuŝataj. — En la Argonnes ni prenis 2 minjetilojn. Inter la orienta rando de la Argonnes kaj Vauquois la Francoj hieraŭ kvinfoje ekprovis rompi nian fronton; la atakoj malsukcesis kun gravaj perdoj de l' kontraŭulo. — La pozicioj, kiujn ni prenis oriente de Badonviller, ankaŭ hieraŭ estis defendataj kontraŭ kontraŭulaj reprenprovoj.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj norde de Lomza kaj nordokcidente de Ostrolenka estis repuŝataj. Escepte de tio nenio nova. La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 2. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: En la Champagne denovaj atakoj komencitaj kun fortaj taĉmentoj preskaŭ ĉiam malsukcesis jam sub niaj pafoj; la kontraŭulo suferis grandegajn perdojn. Sendistancaj bataloj okazintaj sur kelkaj lokoj estis sukcesaj por ni. Niaj pozicioj restis nepreneblaj en nia mano. — En la Argonnes ni prenis kelkajn tranĉeojn, 80 kaptitojn kaj 5 minjetilojn. Atakoj al Vauquois estis sange repuŝataj. La sukcesoj, kiujn ni atingis dum la lastaj tagoj en la Vogesen, estis defendataj malgraŭ fortaj kontraŭatakoj. Tre perdigaj por la kontraŭulo estis atakoj, kiujn la Francoj faris hieraŭ vespere nordoriente de Celles.

Orienta militkampoj: Sudoriente kaj sude de l' arbaro apud Augustowo rusaj atakoj estis sensukcesaj. Rusaj noktaj atakoj nordoriente de Lomza kaj oriente de Plock estis repuŝataj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 3. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Apud St. Eloi sude de Ypern post sanga sendistanca batalo atako de du anglaj kompanioj estis repuŝata. Apud Peronne franca aeroplano surteriĝis sekve de motordifektiĝo. La ensidantoj estis kaptataj. — La francaj atakoj en la Champagne eĉ ne iomete sukcesis. La Francoj ree kun multaj siaj perdoj estis repuŝataj al siaj pozicioj. Nordokcidente de Ville-sur-Tourbe ni perforte prenis de la kontraŭulo tranĉeojn sur fronto 350 m larĝa. Francaj atakoj en la arbaro de Consenvoye kaj en la regiono de Ailly-Apremont estis facile repuŝataj. Per nia atako nordoriente de Badonviller ree ni bone avancis. Dum la lastaj tagoj nia fronto ĉi tie avancis 8 km. Nordoriente de Celles la Francoj vane provas, perdigi nin same kiel ni al ili kaŭzis perdojn dum la lastaj tagoj.

Orienta militkampoj: Apud Grodno la situacio estas neŝanĝita. Sudoriente de Augustowo la Rusoj provis, transiri la Bobr'on; ili estis repuŝataj kun gravaj siaj perdoj kaj lasis 1500 kaptitojn inter niaj manoj. Aliaj atakoj en la regiono norde de Lomza tute malsukcesis ĝuste antaŭ nia fronto. Sudokcidente de Kolno ni progresis. Sude de Myszyniec ni iom retiris nian avangardon pro supereco de l' kontraŭulo. Nordokcidente de Praszynsz la Rusoj antaŭensendis patrolojn. Kelkaj rusaj noktaj atakoj oriente de Plock estis repuŝataj.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 4. Marto, tagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Franca vaporŝipo kun municio, destinita al Nieuport, pro eraro de la ebriaj ŝipistoj alboridiĝis en Ostende, tie estis bombardata kaj subakviĝis. La vunditaj ensidintoj estis savataj. Sur la Lorette-altaĵo nordokcidente de Arras niaj soldatoj hieraŭ matene ekokupis la kontraŭulajn poziciojn sur fronto 1600 m larĝa. 8 oficiroj, 558 soldatoj estis kaptataj, 7 maŝinpaŝiloj kaj 6 negrandaj kanonoj prenataj. Posttagmeze francaj kontraŭatakoj estis repuŝataj. — En la Champagne denovaj francaj atakoj estis facile repuŝataj. Okcidente de St. Hubert en la Argonnes franca atako malsukcesis. Per kontraŭatako ni prenis tranĉejon de la Francoj. Ankaŭ en la arbaro de Cheppy franca atako malsukcesis. — Unu el la lastaj raportoj eldonitaj de sur la Eiffel-turo sciigis, ke germana taĉmento marŝanta trans la altaĵon de Tahure estas sukcese bombardita. Kontraŭordinare tiu ĉi raporto diras la veron. Sed la taĉmento konsistis el forkondukataj kaptitaj Francoj, el kiuj 38 estis mortigataj, 5 vundataj.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj nordokcidente de Grodno malsukcesis sekve de nia elflanka artileripafado. Ankaŭ nordoriente de Lomza la rusaj atakoj malsukcesis kun grandaj perdoj de la kontraŭulo. Sude de Myszyniec kaj Chopzele kaj nordokcidente de Praszysz la Rusoj denove atakis. Sur la cetera fronto nenio aliĝis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 5. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Per nia pafado sude de Ypern ni kaŭzis al la Angloj menciindajn perdojn. — De el la pozicio sur la Lorette-altaĵo, kiun ni perforte prenis de la Francoj, ni repuŝis hieraŭ posttagmeze kontraŭulon kontraŭatakon. — En la Champagne la Francoj hieraŭ kaj lastnokte daŭrigis siajn atakojn norde de Le Mesnil. Ĉiuj atakoj estis repuŝataj; ni defendis niajn poziciojn. — Malsukcesis atakoj kontraŭ niaj pozicioj apud Vauquois, oriente de la Argonnes, kaj en la arbaro apud Consenvoye oriente de la Maas. — Malsukcesis ankaŭ ĉiuj provoj, forpreni de ni la teritorion, kiun ni okupis dum la lastaj tagoj en la regiono de Badonviller. Kun multnombraj taĉmentoj ordigitaj en multaj linioj unu post la alia la Francoj hieraŭ vespere atakis la altaĵon nordoriente de Celles; ili malsukcesis kun multaj siaj perdoj. Ankaŭ kelkaj noktaj atakoj estis sensukcesaj. Pli ol 1000 senvivaj Francoj kuŝas antaŭ niaj gardantaj baroj.

Orienta militkampoj: Ĉirkaŭ Grodno la situacio estas neŝanĝita; rusaj atakoj estis sange repuŝataj. — La rusaj atakoj nordoriente kaj norde de Lomza malsukcesis kun gravaj kontraŭulaj perdoj. Multaj kaptitoj el la 1a kaj 2a rusa gvardio-divizioj restis inter niaj manoj. — Okcidenten ĝis la Weichsel la situacio ne ŝanĝiĝis. Oriente de Plock kelkaj rusaj atakoj estis sensukcesaj. Oriente de Skierniewice forta kontraŭula nokta atako tute malsukcesis. La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! ..

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Berlin, 5. Marto.

Oficiale. — Laŭ oficiala raporto de la brita admiralaro la germana submara boato U 8 hieraŭ vespere estas mergita de angla torpedoboato proksime de Dover. La ensidintoj estis savataj. La vicesro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 6. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampo: Kontraŭatakante ni perforte prenis de la Angloj tranĉeon sudoriente de Ypern. — La Francoj vane provis, elpuŝi nin el la pozicio de ni okupita sur la Lorette-altaĵo; la atakantoj estis repuŝataj. 50 Francoj restis inter niaj manoj. — En la Champagne la Francoj daŭrigis siajn atakojn apud Perthes kaj Le Mesnil; ĉiuj atakoj malsukcesis. Apud Perthes ni kaptis 5 oficirojn kaj 140 soldatojn. Kontraŭatakante ni perforte prenis de la Francoj arbareton norde de Perthes kaj tranĉepecon apud Le Mesnil. — Senrezultataj estis francaj atakprovoj kontraŭ niaj pozicioj apud Vauquois, Consenvoye, oriente de Badonviller kaj nordoriente de Celles.

Orienta militkampo: La tuta militkaptiĝo el la arbara teritorio nordokcidente de Grodno kaj apud Augustowo nun estas kolektita, kvankam la Rusoj forte provis malhelpi nin. La taĉmentoj ĝis nun tie bezonitaj nun estas disponeblaj por aliaj militagoj. — Ĉirkaŭ Grodno kaj apud Lomza nenio nova. — Nordoriente de Praszynsz rusa atako malsukcesis kun multaj kontraŭulaj perdoj. Ankaŭ nordokcidente de Plonsk rusa atako estis repuŝata. — Sude de la Weichsel nenio nova. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 7. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampo: Inter la maro kaj la Somme preskaŭ nur artileribataloj okazis; noktaj kontraŭulaj atakprovoj sude de Ypern estis vanigataj. — En la Champagne niaj soldatoj progresis. Ni prenis de la kontraŭulo kelkajn tranĉeojn kaj proksimume 60 kaptitojn. Franca amasa atako kontraŭ nia pozicio nordoriente de Le Mesnil malsukcesis sub la pafado de niaj infanterio kaj artilerio: la Francoj suferis plej gravajn perdojn. — Oriente de Badonviller kontraŭulaj atakoj estis repuŝataj. En la Vogesen bataloj hieraŭ komencitaj okcidente de Münster kaj norde de Sennheim daŭras ankoraŭ.

Orienta militkampo: Niaj movoj nordokcidente de Grodno iras laŭplane. Rusa nokta atako kontraŭ Mocarce nordoriente de Lomza estis repuŝata, ankaŭ okcidente de Praszynsz iom fortaj rusaj atakoj estis repuŝataj. — Niaj atakoj sudoriente de Rawa sukcesis. 3400 Rusoj estis kaptataj, 16 maŝinpaŝiloj prenataj. La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Konstantinopel, 6. Marto.

La turka armeestraro sciigas oficiale: Ĉe la kaŭkasa fronto nenio aliĝis. — 2 anglaj kavaleriregimentoj, havantaj po 1500 soldatoj kaj helpataj de angla maŝinpafilo-kompanio kaj de artilerio, atakis niajn avangardojn apud Vessile sude de Korna. La rezultato de la batalo estis, ke la kontraŭulo ĥaose fugis turnita al Chaibe postlasante pli ol 200 mortigitoj kaj vunditoj. Ni akiris 1 maŝinpafilon kaj igis nefunkcieblaj 2 kontraŭulajn kanonojn. Ni perdis 10 mortigitojn kaj 15 vunditojn. — Hieraŭ 2 kontraŭulaj kirassipoj kaj 1 krozsipo sensukcese bombardadis dum 3 horoj la fortifikajetojn ĉe la bordo de Smyrna. Hodiaŭ matene je la 8a 1 franca kaj 3 anglaj militŝipoj, sekvataj de 5 grandaj minserĉŝipoj, bombardadis dum 1¹/₂ horoj la fortifikajetojn de Smyrna. 7 pafaĵoj de niaj baterioj trafis tiun kontraŭulan kirassipon, kiu estis komencinta la pafadon. 1 minserĉŝipo estis mergata. Dum la hieraŭa kaj hodiaŭa bombardadoj ni perdis entute 4 mortigitojn kaj 7 vunditojn. — Hieraŭ kaj hodiaŭ la kontraŭula ŝiparo ne agis forte kontraŭ la Dardanellen. — Estas konstatite, ke la kontraŭula aeroplano alpaŝita de niaj baterioj falis en la maron.

7. Marto: Ĝenerale la stato preskaŭ ne ŝanĝiĝis. Hodiaŭ posttagmeze 6 kontraŭulaj kirassipoj bombardadis niajn bateriojn en la Dardanellen-markolo. Niaj baterioj respondis sukcese.

Großes Hauptquartier, 8. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Sur Ostende 'n kontraŭulaj aviadistoj ĵetis bombojn, kiuj mortigis 3 Belgojn. — La bataloj en la Champagne daŭras. Apud Souain hieraŭ vespere la kontraŭulo en sendistanca batalo estis repuŝata; nokte la batalo rekomenciĝis. Nordoriente de Le Mesnil posttagmeze kontraŭula atako tute malsukcesis. Nia nokta kontraŭatako sukcesis; 140 Francoj estis kaptataj. — En la Priesterwald nordokcidente de Pont-à-Mousson ni repuŝis francajn atakojn. En la Vogesen la bataloj okcidente de Münster kaj norde de Sennheim ne jam estas finitaj.

Orienta militkampoj: Sude de Augustowo rusaj atakoj malsukcesis kun grandaj perdoj de l' kontraŭulo. Apud Lomza oni plue batalas. Okcidente de Praszysz kaj oriente de Plock la Rusoj kelkfoje vane atakis. Apud Rawa niaj soldatoj repuŝis du rusajn noktatakojn. Rusaj atakoj el la regiono de Nowo Miasto ne sukcesis. Ni kaptis tie 1500 Rusojn.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 9. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Sur la Lorette-altaĵo ni plue prenis de la Francoj 2 tranĉeojn, kaptis 6 oficirojn kaj 250 soldatojn kaj akiris 2 maŝinpafilojn kaj 2 malgrandajn kanonojn. — En la Champagne la bataloj apud Souain ne jam estas finitaj. Nordoriente de Le Mesnil ni malebligis per nia pafado atakon de la Francoj, kiuj estis pretaj al antaŭeniĝo. — En la Vogesen nebuloj kaj neĝo malfaciligas la batalagojn. Okcidente de Münster kaj norde de Sennheim la bataloj daŭras ankoraŭ.

Orienta militkampoj: Oriente kaj sude de Augustowo rusaj atakoj malsukcesis kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo. Post malsukcesinta atako nordoriente de Lomza la kontraŭulo lasis 800 kaptitojn inter niaj manoj. Nordokcidente de Ostrolenka komenciĝis batalo, kiu daŭras ankoraŭ. En la bataletoj nordokcidente kaj okcidente de Praszynsz, kiuj estis por ni sukcesaj, ni kaptis 3000 Rusojn. Rusaj atakoj norde de Rawa kaj nordokcidente de Nove Miasto nesukcesis. Tie 750 Rusoj estis kaptataj. La armeestraro.

Berlin, 10. Marto.

Oficiale. — Laŭ sciigo de la brita admiralaro la germana submara boato „U 20“ hodiaŭ estis ramata kaj mergata de la angla kontraŭtorpedoboato Ariel. La ensidantoj estis savataj. La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 11. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Angla aviadisto ĵetis bombojn super Menin. Nur unu bombo sukcesis; ĝi mortigis 7 Belgojn kaj vundis 10. — La Angloj hieraŭ atakis nian pozicion apud Neufchatel. Kelkloke ili enpenetris la vilaĝon. La batalo daŭras ankoraŭ. Angla atako apud Givenchy estis repuŝata. — En la Champagne la Francoj dufoje atakis la arbarangulon oriente de Souain, el kiu ni elpuŝis ilin antaŭhieraŭ. Ambaŭ atakoj estis sange repuŝataj. — La bataloj pro la Reichsackerkopf en la Vogesen hieraŭ ree estis komencataj.

Orienta militkampoj: Okcidente de Sereje ni prenis de la Rusoj 600 soldatojn, 3 kanonojn kaj 2 maŝinpafilojn. Denova rusa provo, trafenetri nian fronton sude de Augustowo, finiĝis per la pereigo de la tie atakantaj taĉmentoj. — En la batalo nordokcidente de Ostrolenka niaj soldatoj venkis; la Rusoj lasis inter niaj manoj 6 oficirojn, 900 soldatojn kaj 8 maŝinpafilojn. — Niaj atakoj norde kaj nordokcidente de Praszynsz progresis plu. En la batalo nordokcidente de Nove Miasto ni ree kaptis 1660 Rusojn. La armeestraro.

*] Laŭ posta telegramo „U 12“, el kies ensidantoj nur 10 estis savataj. — **] rami = alveturi, surveturi, puŝegi ŝipon per ŝipo.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 10. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Neĝo kaj forta frosto limigis, en la Vogesen eĉ preskaŭ malebligis la batalagojn. Nur en la Champagne estis batalate plu. Apud Souain bavaraj soldatoj venkis post longdaŭra sendistanca batalo. Nordoriente de Le Mesnil sur kelkaj lokoj la kontraŭulo nelongdaŭre enpenetris niajn liniojn. Kontraŭatakante ni efikis, ke alrapidantaj francaj rezervoj ne povis subteni siajn taĉmentojn, kaj definitive elpuŝis la kontraŭulon el nia pozicio per obstinega sendistanca batalo.

Orienta militkampoj: Malsukcesis denova atako de la Rusoj, por rompi nian fronton apud Augustowo. La batalo nordokcidente de Ostrolenka daŭras ankoraŭ. La bataletoj nordokcidente kaj okcidente de Praszysz plue daŭras favore al ni. Unu nia atako nordokcidente de Nove Miasto progresis. — Ili 2 regimentestroj kaj akiris 3 kanonojn kaj 10 maŝinpafilojn. Ankaŭ el la

Per la bataloj sciigitaj hodiaŭ kaj dum la lastaj tagoj la vintra batalo en la Champagne finiĝis tiel, ke eĉ reviviĝeto ne plu povos iel ŝanĝi la rezulton. Kiel ni jam sciigis la 17 an de februaro, la batalo estis komencata, ĉar la franca armeestraro intencis, la Rusojn en Masuren forte prematajn helpi provante trafenetron de nia fronto. La unua celo estis la urbo Vouziers. Kvankam la kontraŭulo ne konsideris la viktimojn, li neniel povis realigi sian intencon, kion pruvas la konata rezultato de la batalo en Masuren. Sed ankaŭ la trafenetro-provon oni hodiaŭ povas rigardi tute kaj mizere malsukcesinta. Kontraŭe al ĉiuj oficialaj francaj raportoj la kontraŭulo neniuloke sukcesis, eĉ ne plej malmulte. Ni dankas tion al la heroo sintenado de niaj tieaj soldatoj, al la kapablo kaj persisteco de iliaj kondukantoj, unuavice al la komandanto-generalulo v. Einem kaj ankaŭ al la komandantoj-generaluloj Riemann kaj Fleck. En seninterrompaj bataloj tage kaj nokte la kontraŭulo depost la 16 a de februaro ĵetis kontraŭ nian fronton 8 km larĝan - kiu estis defendata nur de 2 nekompletaj Rejnaj divizioj - pli ol 6 plenajn korpusojn unu post la alia kaj el pezaj kanonoj grandegajn kvantojn da municio el propraj kaj amerikaj fabrikejoj - ofte pli ol 100000 pafoj dum 24 horoj. Neŝanceligeble la Rejnlandanoj kaj la gvardio-batalionoj kaj aliaj taĉmentoj, kiuj estis alkondukataj por helpi ilin, ne nur kontraŭstaris la sesoble superantan kontraŭulon, sed sufiĉe ofte lin forte atakis. Tial, kvankam nur estis batalate pro defendo, tamen pli ol 2450 nevunditaj kaptitoj, inter ili 35 oficiroj, restis inter niaj manoj. Certe, la kuraĝa kontraŭulo kaŭzis al ni gravajn perdojn. Ili estas eĉ pli grandaj ol tiuj, kiujn suferis ĉiuj batalantaj taĉmentoj en la tuta batalo en Masuren. Sed ili ne estas vanaj. La kontraŭulo minimume perdis trioble, ni taksas pli ol 45000 soldatoj. Nia fronto en la Champagne staras pli fortike ol iam. La francaj streĉoj neniel povis influi la evoluon de la militagoj sur la orienta militkampoj. Novan folion de l' gloro akiris la germanaj kuraĝeco kaj persisto, samvaloran al tiu, kiun preskaŭ samtempe ili perbatalis en Masuren. Ce la Orzyc, nordokcidente de Grodno. La armeestraro, rusa atako estis repuŝata. La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 12. Marto 1915.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: 2 kontraŭulaj ŝipoj de linio, akompanataj de kelkaj torpedoboatoj, hieraŭ bombardis la banlokon Westende per pli ol 70 pafoj, sed kaŭzis nenian malutilon. Kiam niaj baterioj ekpafis, la kontraŭula eskadro forveturis. — La Angloj, kiuj okupis Nieuve Chapelle'n, dum la lasta nokto kelkfoje atakis orienten, sed estis repuŝataj. Ankaŭ norde de Nieuve Chapelle hieraŭ nefortaj anglaj atakoj estis repuŝataj. La batalo tie daŭras ankoraŭ. — En la Champagne preskaŭ regis silento. En la Vogesen pro forta neĝado nur malmulte estis batalate. — Orienta militkampoj: Norde de la arbaro apud Augustowo la Rusoj estis venkataj. Per rapida formarŝo turnita al Grodno ili evitis radikalan malvenkon. Ni prenis tie pli ol 4000 kaptitojn, inter ili 2 regimentestroj, kaj akiris 3 kanonojn kaj 10 maŝinpafilojn. Ankaŭ el la regiono de Augustowo la kontraŭulo komencis retiri sin al Grodno. Nordokcidente de Ostrolenka ni kaptis atake 3 oficirojn kaj 220 soldatojn. Norde kaj nordokcidente de Praszysz niaj atakoj progresis. Tie ni kaptis hieraŭ pli ol 3200 Rusojn. —

Du grandajn venkojn la Rusoj atribuas al si en siaj oficialaj raportoj: apud Grodno kaj apud Praszysz. Ili asertas, ke ili venkis aŭ pereigis en ambaŭ bataloj po 2 germanaj korpusoj. Se la rusa armeestraro serioze kredis tion, la okazintaĵoj dum la lastaj tagoj montris al ĝi alion pri la batalfortoj de niaj soldatoj. Ilia ofensivo de Grodno tra la arbaro de Augustowo, tiom elokvente anoncita, baldaŭ malsukcesis. La spertojn de la tie atakintaj taĉmentoj oni legas en la unuaj frazoj de nia hodiaŭa raporto. Apud Praszysz post provizora cedo niaj soldatoj ree staras 4 km norde de tiu ĉi urbo. Depost ni forlasis ĝin, ni kaptis sur la batalkampoj inter Weichsel kaj Orzyc 11460 Rusojn. — La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 13. Marto, antaŭtagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Sude de Ypern izolaj atakoj de la Angloj estis senpene repuŝataj. — Nia atako komencita pro repreno de la vilaĝo Nieuve Chapelle komence sukcesis, poste renkontis anglajn taĉmentojn multe superantajn kaj tial ne estis daŭrigata. Tie estis tre viglaj anglaj aviadistoj, el kiuj antaŭhieraŭ 1, hieraŭ 2 estis pafe faligataj. — En la Champagne sur kelkaj lokoj la batalo reekvivis. Ĉiuj francaj partaj atakoj estis repuŝataj kun multaj perdoj de l'kontraŭulo. 200 kaptitoj restis inter niaj manoj. — En la Vogesen neĝo kaj nebulo malhelpis la batalagojn.

Orienta militkampoj: El la regiono de Augustowo kaj nordoriente la Rusoj returneniris ĝis trans la Bobr kaj sub la kanonojn de Grodno. Ĉe la Orzyc nordoriente de Praszysz rusa atako estis repuŝata. — La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 14. Marto, tagmeze.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: El la regiono norde de La Panne-Nieuport kelkaj kontraŭulaj ŝipoj hieraŭ posttagmeze bombardis sensukcese niajn poziciojn. — Nekalkulite izola angla atako, kiu estis repuŝata, apud Nieuve Chapelle nur artileribatalo okazis. — En la Champagne la Francoj ankaŭ hieraŭ ripetis partajn atakojn oriente de Souain kaj norde de Le Mesnil. Kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo ĉiuj atakoj malsukcesis sub la pafado de niaj soldatoj. — En la Vogesen la bataloj estas rekomencitaj, ĉar la vetero pliboniĝis. —

Ankaŭ en la Argonnes la Francoj nun uzas novan specon de mangrenadoj, kiuj eksplodinte eljetas sufokajn gasojn. En la hieraŭaj bataloj ni ankaŭ denove konstatis la uzadon de eksplodaj infanteripafaĵoj, kiuj alpuŝigante estigas flamojn.

Orienta militkampoj: La stato estas neŝanĝita.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 15. Marto 1915.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: Westende-banejo estis hieraŭ sensukcese bombardata de 2 kontraŭulaj kanonboatoj. Bone progresis atako kontraŭ altaĵo okupita de la Angloj sude de Ypern. Francaj partaj atakoj norde de Le Mesnil (Champagne) estis repuŝataj kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo. En la Vogesen sur kelkaj lokoj ankoraŭ estas batalate.

Orienta militkampoj: La nombro de la rusaj kaptitoj el la bataloj norde de l'arbaro apud Augustowo atingis 5400. Norde kaj nordoriente de Praszynsz la Rusoj atakis per fortaj taĉmentoj: ĉiuj atakoj malsukcesis kun gravaj iliaj perdoj. Sude de la Weichsel nenio aliĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 16. Marto 1915.

Oficiale. — Okcidenta militkampoj: La angla surmonta pozicio apud St. Eloi sude de Ypern, pro kiu estis batalate de antaŭhieraŭ, estas en niaj manoj. Ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo nordokcidente de Arras oni batalas pro elstaranta krutaĵo. En la Champagne kelkaj francaj partaj atakoj malsukcesis kun multaj perdoj sub nia pafado. Norde de Beausejour ni perforte prenis kelkajn tranĉeojn de la Francoj. En la Argonnes kaj ĉe ties orienta rando komenciĝis bataletoj, kiuj daŭras ankoraŭ. En la Vogesen sur kelkaj lokoj ankoraŭ estas batalate.

Orienta militkampoj: Sur ambaŭ bordoj de la Orzyc, nordoriente de Praszynsz, la Rusoj atakis, sed ĉie estis repuŝataj. Eksterordinare obstina estis la batalo apud Jednorozek. 2000 rusaj kaptitoj restis inter niaj manoj. Sude de la Weichsel nenio okazis.

La armeestraro.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Berlin, 16. Marto.

Oficiale. — La brita admiralaro sciigas oficiale, ke la anglaj krosŝipoj Kent kaj Glasgow kaj la helpa krosŝipo Orama renkontis la malgrandan krosŝipon Dresden apud la insulo Juan Fernandez en la Pacifika Oceano. Post mallonga batalo „Dresden“ pro eksplodo de municiejo ekbrulis kaj subakviĝis. Laŭdire la ensidantoj estis savataj de la anglaj krosŝipoj. La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 17. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: La batalo pro la krutaĵo ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo, nordokcidente de Arras, estis decidata favore al ni. — En la Champagne la Francoj dum la tago kelkfoje sensukcese atakis okcidente de Perthes kaj norde de Le Mesnil. Vespere ili komencis denove ataki per pli multnombraj taĉmentoj norde de Le Mesnil; la batalo daŭras ankoraŭ. — En la Argonnes la bataletoj ne jam finiĝis. De sur la deklivo sudokcidente de Vauquois, oriente de la Argonnes, la Francoj, kiuj tiun estis okupintaj, estis malsuprenpuŝataj. En la Priesterwald apud Pont-à-Mousson du francaj atakoj malsukcesis. En la Vogesen nur la artilerio batalis.

Orienta militkampoj: Malfortaj rusaj atakoj al Tauroggen kaj Laugszargen estis repuŝataj. Inter Szkwa kaj Orzyc la Rusoj vane provis, trapenetri nian fronton. Sude de la Weichsel nenio aliĝis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 18. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Franca atako al niaj pozicioj ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo estis repuŝata. Francaj partaj atakoj en la Champagne, norde de Le Mesnil, estis haltigitaj per kontraŭatakoj. Denova franca atako hieraŭ vespere komencita estis repuŝata kun gravaj kontraŭulaj perdoj. En la Argonnes la bataletoj malplifortiĝis hieraŭ. — Francaj aviadistoj ĵetis bombojn sur la nefortikigitan urbon Schlettstadt en la Elsaß. Nur unu bombo sukcesis: ĝi trafis la seminarion por instruistinoj, mortigis 2 infanojn kaj grave vundis 10. Responde al tio ni bombardis lastnokte la fortifikacion Calais per grandkalibraj bomboj.

Orienta militkampoj: La Rusoj ankaŭ hieraŭ daŭrigis la sensukcesajn atakojn kontraŭ niaj pozicioj inter Pissek kaj Orzyc kaj nordoriente de Praszysz. Okcidente de la Szkwa ni akiris 900, oriente de la Szkwa 1000 kaptitojn kaj 4 maŝinpafilojn. — Rusaj soldatoj de la 3-a linio*) facile, sed negrave sukcesis enmarŝante en la plej nordan angulon de orienta Prusujo, turnitaj al Memel. Ili ekbruligis vilaĝojn kaj bienojn kaj rabis. Pune ni postulis grandetajn kompensojn monsumojn de la urboj en la rusa teritorio de ni okupita. Kompense al ĉiu germana vilaĝo aŭ bieno, kiun tiuj fibandoj forbrulis, ni ekbruligos 3 vilaĝojn aŭ bienojn en la rusa teritorio de ni okupita. Ĉiu bruldifekto en Memel estos respondata per forbruligo de la rusaj registaraj konstruaĵoj en Suwalki kaj la aliaj gubernio-ĉefurboj, kiuj estas en niaj manoj.

La armeestraro.

(*) Soldatoj de la 1-a linio: La preta armeo kun la rezervoj. Soldatoj de la 2-a linio: Eksservintaj soldatoj de 27 ĝis 39 jaroj (en Germanujo). Soldatoj de la 3-a linio: Eksservintaj soldatoj de pli ol 39 jaroj kaj neservintoj mobilizitaj nur dum la milito. (Noto de la trad.)

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 21. Marto 1915.

Konstantinopel, 18. Marto.

La turka armeestraro sciigas: Parto de nia ŝiparo hodiaŭ matene bombardadis la ŝipfarejon kaj la ekzercejon por torpedoboatoj okcidente de Theodosia sur la Krim kaj bruligis ĝin. Hodiaŭ matene la kontraŭula ŝiparo komencis fortan bombardadon kontraŭ la fortifikajetoj de la Dardanellen, kiuj sukcese respondis. Je la 2a posttagmeze la franca kirassipo „Bouvet“ estis mergata. — Antaŭtagmeze je la 11^{1/2} 14 kontraŭulaj kirassipoj komencis bombardi la Dardanellen-bateriojn. Je la 3a posttagmeze kelkaj el la kirassipoj sin retiris el sub la pafaĵoj, 8 kirassipoj daŭrigis la bombardon ĝis la 5a posttagmeze post po tre longaj paŭzoj. Krom la franca kirassipo „Bouvet“ kontraŭula torpedoboato estis mergata. Angla kirassipo de la tipo Irresistible estis farata neplubatalpova; alia de l'tipo Cornwallis estis grave difektata kaj devis sin retiri el la batalo.

Großes Hauptquartier, 19. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: En la Champagne ree malsukcesis du francaj partaj atakoj norde de Le Mesnil kaj norde de Beausejour. 2 francaj oficiroj kaj 70 soldatoj estis kaptataj. Post gravaj perdoj la repuŝita kontraŭulo pro nia sukcesa pafado sin retiris en siajn poziciojn. — Sudoriente de Verdun la Francoj atakis kelkfoje. En la Woivre-ebenaĵo ili estis repuŝataj, ĉe la orienta rando de la Maas-altaĵoj oni batalas ankoraŭ.

Orienta militkampoj: Apud Memel la situacio ne jam estas klara. Saĝnas, ke malfortaj rusaj taĉmentoj enpenetris en Memel. Kontraŭagoj estas preparitaj. — Ĉiuj rusaj atakoj inter Pissek kaj Orzyc kaj nordoriente kaj okcidente de Praszysz estis repuŝataj; la kontraŭulo parte suferis tre gravajn perdojn. — Sude de la Weichsel nenio aliĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 20. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Ĉe la ŝoseo Wytschaete-Ypern apud St. Eloi ni prenis de la Angloj grupon da domoj. Ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo ni elpuŝis Francojn el kaŝejo, kie ili sin defendis ankoraŭ. — En la Champagne la tago pasis preskaŭ trankvile, postkiam en la matena krepusko niaj soldatoj estis prenintaj kelkajn tranĉeojn norde de Beausejour. — Francaj partaj atakoj estis repuŝataj norde de Verdun, en la Woivre-ebenaĵo kaj ĉe la orienta rando de la Maas-altaĵoj apud Combres; la kontraŭulo suferis gravajn perdojn. — Kontraŭ niaj pozicioj ĉe la Reichsackerkopf kaj Hartmannsweilerkopf la Francoj faris kelkajn atakojn, kiuj pro nia pafado jam komence malsukcesis kun grandaj perdoj.

Orienta militkampoj: Ĉe la orienta fronto la tago pasis preskaŭ trankvile. La Rusoj okupis la urbon Memel.

La armeestraro.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 21. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Sudoriente de Ypern angla aeroplano estis pafe faligata; ni kaptis la ensidantojn. La Francoj dufoje, sed vane provis, repreni la pozicion ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo, kiun ni okupis je la 16-a de marto. — Ni ekkonis sur la katedralo de Soissons, kiur surhavis flagon kun la Ĝeneva Kruco, francan observejon, kiun ni pafadis kaj forigis. — En la Champagne, norde de Beausejour, niaj soldatoj sukcese antaŭeniris per tranĉeoj. Kelkaj francaj tranĉeoj estis senhomigataj. Ni kaptis tie 1 oficiron kaj 299 nevunditajn soldatojn. — Hieraŭ posttagmeze ni prenis atake la pozicion sur la supro de la Reichsackerkopf, kiu estis tre brave defendita de 2 batalionoj da alpo-ĉasistoj. La kontraŭulo perdis tre grave kaj lasis en niaj manoj 3 oficirojn, 250 soldatojn, 3 maŝinpafilojn kaj 1 minjetilon. Francaj kontraŭatakoj estis repuŝataj. — Por pli energie respondi la fiagojn de francaj aviadistoj kontraŭ la nefortikigita urbo Schlettstadt en la Elsaŝ, ni ĵetis lastnokte el aersipoj kelkajn pezajn bombojn sur la fortifikaĵon Paris kaj sur Compiègne-on, kruciĝejon de fervojoj.

Orienta militkampoj: Inter Omulew kaj Orzyc rusa atako estis repuŝata; ni kaptis 2 oficirojn kaj 600 soldatojn. Du rusaj noktaj atakoj kontraŭ Jednorozek malsukcesis sub nia pafado. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 22. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Malsukcesis franca provo, ekokupi nian pozicion ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo. Ankaŭ en la Champagne, norde de Le Mesnil, franca nokta atako malsukcesis. Ĉiuj penoj de la Francoj, repreni la pozicion sur la Reichsackerkopf, restis sensukcesaj.

Orienta militkampoj: Post mallonga bataleto sude de la urbo kaj obstina enstrata batalo la Rusoj hieraŭ estis elpuŝataj el Memel. Protektate de rusaj soldatoj rusa plebo tie ŝtelis posedaĵojn de germanaj enloĝantoj, ŝarĝis sur veturilojn privatulan proprajn kaj forigis ĝin trans la limon. Raporto pri ĉi tiuj okazaĵoj ankoraŭ estos publikigata. En repuŝitaj atakoj norde de Mariampol la Rusoj suferis gravajn perdojn. Okcidente de la Orzyc, apud Jednorozek kaj nordoriente de Praszysz, kaj nordokcidente de Ciechanow rusaj tagaj kaj noktaj atakoj malsukcesis sub nia pafado. En ĉi tiuj bataloj 420 kaptitoj restis inter niaj manoj.

La armeestraro.

Wien, 22. Marto.

Oficiale. — Post 4½ monata sieĝo la fortifikaĵo Przemyśl kun honoro kapitulacis je la 22-a de marto. Kiam meze de la monato la nutraĵprovizoj preskaŭ elĉerpiĝis, generalo von Kusmanek decidis, fari lastan atakon. Ĝi nesukcesis pro la multnombro de l'kontraŭulo. Ĉar la malmultaj nutraĵprovizoj permesis nur ankoraŭ tritagan resiston, la komandanto de la fortifikaĵo ricevis la ordonon, kapitulaci post tiu tempo kaj post pereigo de la milita materialo. Advia-
disto el la fortifikaĵo raportis, ke la fortifikajetoj kun kanonoj kaj municio ĝustatempe estis detruataj. La oferema persisto, la lastaj bataloj kaj la antaŭaj atakoj kaj bataletoj de la sieĝitoj meritas saman laŭdon, kion ankaŭ la kontraŭulo ne neos. La kapitulaco de la fortifikaĵo, kiun la armeestraro jam delonge antaŭvidis, neniel influas la ceteran situacion. (Mallongigita.)

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 23. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Apud Carenay, nordokcidente de Arras, du noktaj atakoj de la Francoj estis repuŝataj. En la Champagne niaj soldatoj sukcese eksplodigis kelkajn minojn kaj repuŝis noktan atakon norde de Beausejour. Ataketoj de la Francoj apud Combres, Apremont kaj Flirey ne sukcesis. Atako kontraŭ niaj pozicioj nordoriente de Badonviller malsukcesis sub nia pafado kun gravaj kontraŭulaj perdoj. — Kontraŭulaj aviadistoj ree ĵetis kelkajn bombojn super Ostende, kiuj kaŭzis neniun militistan malutilon, sed vundis kaj mortigis kelkajn Belgojn. Nordokcidente de Verdun franca aviadisto estis faligata. Aeroplano kun 2 francaj suboficiroj estis devigata, surteriĝi apud Freiburg; la ensidantoj estis kaptataj.

Orienta militkampoj: Persekutante la Rusojn el Memel elpuŝitajn niaj soldatoj okupis la rusan vilaĝon Krottingen kaj liberigis pli ol 3000 germanajn civilulojn, kiujn la Rusoj estis forkundukintaj. — Rusaj atakoj sur ambaŭ bordoj de la Orzyk estis repuŝataj.

La armeestraro.

Berlin, 24. Marto.

Oficiale. — En la bataloj norde de Memel niaj militŝipoj helpis la militagojn de sur la maro. Je la 23a de marto antaŭtagmeze la vilaĝo kaj kastelo Polangen estis pafataj, same dum la tago la ŝoseo Polangen-Libau. La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Berlin, 24. Marto.

Oficiale. — La komandanto de la germana militŝipo „Dresden“, kiu kun la ensidintoj alvenis sur ĉila krosŝipo en Valparaíso, raportas oficiale jenon: Je la 14a de marto antaŭtagmeze la „Dresden“ ankrumis en la Cumberland — sinuso de la insulo Juan Fernandez. Ĉi tie la ŝipo estis atakata de la anglaj krosŝipoj „Kent“ kaj „Glasgow“ kaj de la helpa krosŝipo „Orama“. La atako estis farata de loko, kien la „Dresden“ povis pafi nur per la kanonoj sur la malantaŭa ŝipparto. „Dresden“ respondis la pafadon, ĝis ĉiuj uzeblaj kanonoj kaj 3 municiejoj ne plu funkciis. Por malhelpi, ke la ŝipo venas al la manoj de l'kontraŭulo, oni preparis la mergon; samtempe intersendito veturis al la „Glasgow“, kiu atentigis pri tio, ke la ŝipoj estas en neŭtralaj akvoj. Ĉar la „Glasgow“ malgraŭ tiu ĉi atentigo volis daŭrigi la atakon, „Dresden“ estis krevigata kaj subakviĝis je la 11¹/₄ a kun fliranta flago, dum la ensidantoj trifoje elkriis „Hurra“ al lia imperiestra moŝto. Laŭ tio ne estas laŭfakta la angla raporto, ke la „Dresden“ suprentirinte blankan flagon kapitulacis.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 24. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: En la Champagne nur artileribataloj okazis. En la Priesterwald, nordokcidente de Pont-à-Mousson, ni repuŝis la kontraŭulon, kiu provis repreni teritorion de ni okupitan. — Denovaj kontraŭulaj atakoj nordoriente de Badonviller kaj ĉe la Reichsackerkopf malsukcesis sub nia pafado. Ĉe la Hartmannsweilerkopf oni batalas ankoraŭ.

Orienta militkampoj: Niaj soldatoj persekutantaj la kontraŭulon norde de Memel kaptis apud Polangen 500 Rusojn, akiris 3 kanonojn kaj 3 maŝinpafilojn kaj forprenis de la kontraŭulo multe da rabitaj brutoj, ĉevaloj kaj alia havaĵo. — Apud Laugszargen sudokcidente de Tauroggen kaj nordoriente de Mariampol rusaj atakoj estis repuŝataj kun multaj kontraŭulaj perdoj. Nordokcidente de Ostrolenka kelkaj rusaj atakoj malsukcesis. Ni kaptis 20 oficirojn kaj pli ol 2500 soldatojn kaj akiris 5 maŝinpafilojn. Ankaŭ oriente de Plock kelkaj kontraŭulaj atakoj malsukcesis. —

La germana militistaro kore dankas la bravan ensidintaron de Przemyśl, kiun post multmonata defendo, post multaj oferoj povis subigi nur la malsato. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 25. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Escepte de negravaj, ankoraŭ daŭrantaj bataletoj sur la Maas-altaĵoj sudoriente de Verdun kaj ĉe la Hartmannsweilerkopf nur artileribataloj okazis.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj estis repuŝataj oriente kaj sudoriente de Augustowo kaj apud Jednorozek, nordoriente de Praszysz. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 26. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Sur la Maas-altaĵoj sudoriente de Verdun la Francoj denove provis, preni per pli forta atako nian pozicion apud Combres, sed estis repuŝataj post obstina batalo. La bataletoj ĉe la Hartmannsweilerkopf daŭras ankoraŭ.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj kontraŭ la terkoloj inter la lagoj oriente de Augustowo estis repuŝataj. La armeestraro.

Konstantinopel, 26. Marto 1915.

La turka armeestraro sciigas: Proksime de la Suez-kanalo unu nia taĉmento apud la urbo Madam renkontis malgrandan anglan taĉmenton kaj pereigis ĝin. Poste ĝi pafis sukcese 2 anglajn vaporŝipojn plenajn de soldatoj. Same alia nia taĉmento pafis anglan transport-vaporŝipon inter Schaluf kaj Adŝigöl. — Je la 16a de marto niaj soldatoj kune kun la militencaj gentoj norde de Schuābia surprizis la kontraŭulon sudoriente de Bassorah, prenis liajn poziciojn kaj repelis lin ĝis Schuābia. Li perdis ol 300 mortigitojn kaj vunditojn kaj amason da armiloj kaj municio. Ni perdis 9 mortigitojn kaj 32 vunditojn. — Antaŭ la Dardanellen nenio nova.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 27. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: En la Vogesen la Francoj ekposedis hieraŭ la supron de la Hartmannsweilerkopf. Sur la rando de la supro sidas ankoraŭ niaj soldatoj. — Francaj aviadistoj ĵetis bombojn super Bapaume kaj Straßburg en la Elsaß, sed ne kaŭzis militistan malutilon. En Bapaume 1 Franco estis mortigata, 2 grave vundataj. Ni devigis kontraŭulan aviadiston surteriĝi nordokcidente de Arras kaj ĵetis kelkajn bombojn sur Calais-on.

Orienta militkampoj: La Rusoj, kiuj por rabi estis ekmarŝintaj de Tauroggen kontraŭ Tilsit same kiel kontraŭ Memel, estis venkataj kun multoj siaj perdoj apud Laugszargen kaj repuŝataj trans la Jeziorupa'n malantaŭ la Jura'n. — Inter la Augustowa arbaro kaj la Weichsel kelkaj atakoj de la Rusoj estis repuŝataj; sur kelkaj lokoj oni batalas ankoraŭ.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 31. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: La Francoj atakis okcidente de Pont-à-Mousson apud kaj oriente de Rogneville kaj en la Vogesen la bataloj estis decidataj favore al ni.

Großes Hauptquartier 28. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Francaj atakoj sur la Maas-altaĵoj sude de Verdun, apud Combres, kaj en la Woevre-ebenaĵo apud Marchéville post obstinaj bataloj estis decidataj favore al ni. En la Vogesen ĉe la Hartmannsweilerkopf la artilerio batalis.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj en la Augustowa arbaro estis repuŝataj. Inter Pissek kaj Omulew la Rusoj faris kelkajn atakojn, kiuj malsukcesis sub nia pafado. Apud Wach ni kaptis 900 Rusojn.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 29. Marto, antaŭtagmeze.

Okcidenta militkampoj: Ĉe la tuta okcidenta fronto la tago pasis preskaŭ trankvile; nur en la Argonnes kaj en Lothringen okazis negrandaj, por ni sukcesaj bataletoj. — Generaloberst von Kluck estis negrave vundata per ŝrapnelpafo, kiam li inspektis la plej antaŭajn poziciojn de sia armeo. Lia farto estas kontentiga.

Orienta militkampoj: Tauroggen estis atake prenata de niaj soldatoj; 300 Rusoj estis kaptataj. — Apud la fervojo Wirballen-Kowno rusa atako malsukcesis apud Pilwitschki kun plej gravaj perdoj. En la regiono de Krasnopol ni kaptis pli ol 1000 Rusojn, inter ili eskadron da gvardio-ulanoj kun ĉevaloj, kaj akiris 5 maŝinpafilojn. Rusa atako nordokcidente de Ciechanow estis repuŝata.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 30. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: Okazis nur bataloj per artilerio kaj tranĉeoj.

Orienta militkampoj: Laŭ raporto de la reĝido Joachim de Prusujo, kiu ĉeestis ĉe la ekspozicio de Tauroggen, tie la Landsturm*) de Orienta Prusujo bravege batalis kaj akiris 1000 kaptitojn. Apud Krasnopol la Rusoj suferis tre gravajn perdojn (proksimume 2000 mortigitoj). Ĝis hieraŭ vespere ni prenis en la tieaj bataloj 3000 kaptitojn, 7 maŝinpafilojn, 1 kanonon kaj kelkajn municio-veturilojn. — Ĉe la Szkwa apud Klimki en malsukcesanta rusa atako ni kaptis 2 oficirojn kaj 600 soldatojn. En la regiono de Olszyn (maldekstra bordo de la Omulew) du rusaj noktaj atakoj estis repuŝataj. La Rusoj sensukcese provis, transiri la malsupran Bzura'n.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 31. Marto 1915.

Okcidenta militkampoj: La Francoj atakis okcidente de Pont-à-Mousson apud kaj oriente de Regniéville kaj en la Priesterwald, sed estis repuŝataj kun multaj siaj perdoj; nur sur unu loko okcidente de la Priesterwald ankoraŭ estas batalate. — Kontraŭulaj aviadistoj hieraŭ ĵetis bombojn sur la belgajn urbojn Brügge, Ghistel kaj Courtrai, sed ne kaŭzis militistan malutilon. Per bombo proksime de vunditejo en Courtrai unu Belgo estis mortigata, alia vundata.

Orienta militkampoj: El la rusa ĉelima teritorio norde de la Memel ni forigis ĉiujn Rusojn; la kontraŭulo apud Tauroggen venkita sin retiris turnita al Skawdwilic. — La rusaj taĉmentoj, kiuj dum la lastaj tagoj denove avancis kontraŭ niaj pozicioj norde de la Augustowa arbaro, per nia atako estis repuŝataj al la arbaroj kaj lagoj apud Sejny. En ĉi tiuj bataloj apud Krasnopol kaj nordoriente de tie ni kaptis plue 500 Rusojn. — Apud Klimki ĉe la Szkwa ni kaptis denove 220 Rusojn.

La armeestraro.

Wien, 31. Marto.

Oficiale. — Ĉe la fronto en la orienta Beskiden la tago pasis pli trankvile. Ĉe la pli orienta fronto la bataloj daŭras ankoraŭ. — Sur la altaĵoj norde de Cisna kaj nordoriente de Kalnica ree ni repuŝis kelkajn rusajn atakojn, kiujn la kontraŭulo ankaŭ nokte ripetis. Ankaŭ norde de la Uzsoka montoselo noktaj atakoj de l'kontraŭulo malsukcesis kun multaj liaj perdoj. 1900 kaptitoj plue estis akirataj. Ĉe la aliaj partoj de la fronto nenio grava okazis; nur la artilerio batalis. — Depost la 1a de marto ni kaptis entute 183 oficirojn kaj 39942 soldatojn kaj akiris 68 maŝinpafilojn.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

*) Soldatoj de la 3a linio.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 1. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Prenante la biendomon Klosterhoek, kiun la Belgoj defendis, kaj malgrandan pozicion apud Dixmuiden ni kaptis 1 oficiron kaj 44 Belgojn. — Okcidente de Pont-à-Mousson, en kaj ĉe la Priesterwald la kontraŭula atako hieraŭ vespere estis haltigata. Sur mallarĝa loko la Francoj enpenetris nian plej antaŭan tranĉeon. La batalo daŭras hodiaŭ. — En antaŭgvardiaj bataletoj nordoriente kaj norde de Luneville la Francoj suferis nemalgrandajn perdojn. En la Vogesen nur la artilerio batalis.

Orienta militkampoj: En la regiono de Augustow-Suwalki la stato ne ŝanĝiĝis. Malsukcesis rusaj provoj, nokte transiri la Rawka'n sudoriente de Skierniewice. Rusaj atakoj apud Opcno estis repusataj. — En la monato marto la germana orienta armeo kaptis entute 55800 Rusojn kaj akiris 9 kanonojn kaj 61 maŝinpafilojn. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 2. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Inter Maas kaj Mosel fortaj artileribataloj okazis. La infanteri-bataloj ĉe kaj en la Priesterwald daŭris tra la tuta nokto. Okcidente de la Priesterwald la franca atako malsukcesis sub nia pafado. Kontraŭatakante ni kaŭzis gravajn perdojn al la Francoj kaj repuŝis ilin en siajn antaŭajn poziciojn; nur en la arbaro la Francoj sidas ankoraŭ en du fortikigitaj domoj de nia plej antaŭa pozicio.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 3. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: La Belgoj malsukcesis provante repreni la Klosterhoek-biendomon, kiun ni forprenis de ili je la 31a de marto. En la Priesterwald franca atako malsukcesis. Franca atako estis repuŝata sur la altaĵoj apud kaj sude de Nieder-Aspach, okcidente de Mülhausen.

Orienta militkampoj: Nenio grava okazis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 4. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Sur la okcidenta bordo de la Yser-kanalo, sude de Dixmuiden, niaj soldatoj okupis la vilaĝon Drie Grachten de Belgoj defendatan. En la Priesterwald kelkaj francaj atakoj estis repuŝataj.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj en la regiono de Augustowo estis repuŝataj.

La armeestraro.

Rondtrigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 5. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: La Belgoj provis, venigi plifortigajn taĉmentojn al Drie Grachten, kiu ni posedas (escepte kelkaj domoj ĉe la norda rando) de la 3a de aprilo; sed ili estis repuŝataj per nia artilerio. Nia artileripafado ankaŭ malebligis francajn atakprovojn en la Argonnes. Forta franca atako kontraŭ niaj pozicioj sur la altaĵoj okcidente de Boureuilles (sude de Varennes) malsukcesis antaŭ niaj dratbariloj. Francaj infanteriatakoj okcidente de Pont-à-Mousson ne sukcesis; sed eksplodiginte kelkajn minojn ni avancis en la Priesterwald.

Orienta militkampoj: Rusa atako apud Mariampol estis repuŝata kun gravaj kontraŭulaj perdoj. Escepte tio ĉe la tuta orienta fronto nenio okazis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 6. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: De hieraŭ la Francoj vigle agas precipe inter Maas kaj Mosel. Fortaj iliaj taĉmentoj kaj multe da artilerio atakis nordoriente, oriente kaj sudoriente de Verdun, apud Ailly, Apremont, Flirey kaj nordokcidente de Pont-à-Mousson: Nordoriente kaj oriente de Verdun pro nia pafado la atakoj ne sukcesis evolui, sudoriente de Verdun ili estis repuŝataj. Ĉe la orienta rando de la Maas-altaĵoj la kontraŭulo sukcesis, dum mallonga tempo okupi malgrandan parton de nia plej antaŭa tranĉeo; ankaŭ tie li estis reelpuŝata dum la nokto. La batalo apud Ailly kaj Apremont daŭris dum la tuta nokto sen iu sukceso de l'kontraŭulo. Obŝtine oni batalis apud Flirey; kelkaj francaj atakoj estis repuŝataj. Okcidente de la Priesterwald forta atako malsukcesis norde de la ŝoseo Flirey-Pont-à-Mousson. — Malgraŭ la tre gravaj perdoj, kiujn la kontraŭulo suferis en ĉi tiuj bataletoj, pro la lastaj trupo*)-aranĝoj estas verŝajne, ke li daŭros ĉi tie ataki, postkiam evidentiĝis, ke ĉiuj liaj klopodoj en la Champagne estas nepre senŝancaj.

Orienta militkampoj: Malsukcesis rusaj atakoj oriente kaj sude de Kalvarja kaj oriente de Augustowo. Escepte tio la stato restis la sama. La armeestraro.

Wien, 6. Aprilo.

Oficiale. — La bataloj en la Karpaten plivastiĝas. Sur la altaĵoj oriente de la Laborczabalo hieraŭ germanaj kaj niaj trupoj prenis fortajn poziciojn de la Rusoj kaj kaptis 5040 soldatojn. En la apudaj regionoj kelkaj fortaj atakoj de l'kontraŭulo estis sange repuŝataj kun multaj liaj perdoj; ni kaptis plu 2530 Rusojn. En sudorienta Galicio dumnokta atako de l'kontraŭulo malsukcesis nordoriente de Oтыння. — Je la 4a de aprilo okaze de la rusa provo, sudokcidente de Uscie-Biskupic antaŭeniri kontraŭ la suda bordo de la Dnjestr, 2 batalionoj de la Alexander-infanteriregimento estis pereigataj.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefen.

*) Trupo: Soldataro nedestinita granda. (La difino de Kabe: Tutaĵo de la artistoj de teatro, ne ŝajnas al mi praktika). La trad.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 7. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: La biendomoj de Drie Grachten, kiujn ni okupis antaŭhierau, estis detruataj de la kontraŭulo per peza artilerio kaj minoj. Tial ni malokupis ilin hierau vespere. — En la Argonnes atako malsukcesis sub la pafado de niaj ĉasistoj. — Nordoriente de Verdun la Francoj atakante venis nur ĝis niaj antaŭ-pozicioj. Oriente kaj sudoriente de Verdun kelkaj atakoj malsukcesis kun eksterordinare gravaj kontraŭulaj perdoj. — Ĉe la Combres-altaĵo 2 francaj batalionoj estis pereigataj per nia pafado. Apud Ailly niaj trupoj kontraŭatakis kaj repuŝis la kontraŭulon al liaj antaŭaj pozicioj. Ankaŭ apud Apremont la kontraŭulo ne sukcesis. Same aliaj francaj atakoj tute malsukcesis apud Flirey; multnombre mortigitoj kuŝas sur la kampo antaŭ nia fronto; tiu nombro pliiĝas ankoraŭ per tio, ke la Francoj la soldatojn mortintajn en iliaj propraj tranĉeoj ĵetas antaŭ la fronton de siaj pozicioj. — Ĉe la okcidenta rando de la Priesterwald unu nia bataliono repuŝis per la bajonetoj fortajn atakojn de la 13^a franca regimento. Ĉe la Hartmannsweilerkopf oni batalas de hierau posttagmeze malgraŭ forta neĝado.

Orienta militkampoj: Antaŭenirinte sur rusan teritorion al Andrajewo, 30 km sudoriente de Memel, nia kavalerio pereigis rusan batalionon, kies komandanto, 5 oficiroj kaj 360 soldatoj estis kaptataj, 120 mortigataj, 150 grave vundataj. Alia rusa bataliono pro helpo alvenanta estis repuŝata. Ni perdis 6 mortigitojn. — Rusaj atakoj oriente kaj sude de Kalvarja kaj kontraŭ niaj pozicioj oriente de Augustowo estis repuŝataj. Escepte tio ĉe la orienta fronto nenio okazis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 8. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: La bataloj inter Maas kaj Mosel daŭras. En la Woevre-ebenaĵo oriente kaj sudoriente de Verdun ĉiuj francaj atakoj malsukcesis. De la Combres-altaĵo ni kontraŭatakante elpuŝis kontraŭulajn taĉmentojn, kiuj sur kelkaj lokoj estis enpenetrantaj niajn plej antaŭajn tranĉeojn. — Batalionoj el la Selouse-arbaro norde de St. Mihiel antaŭenirintaj kontraŭ niaj pozicioj estis repuŝataj en ĉi tiun arbaron kun plej gravaj perdoj. En la arbaro de Ailly okazas obstinaj sendistancaj bataloj. En la arbaro okcidente de Apremont niaj trupoj batalante sekvis la kontraŭulon, kiu sensukcese estis atakinta. Kvar atakoj kontraŭ la pozicioj norde de Flirey kaj du vesperaj atakoj okcidente de la Priesterwald malsukcesis sub nia pafado kun tre multaj perdoj. — 3 noktaj francaj atakoj en la Priesterwald malsukcesis. La francaj perdoj ĉe la tuta fronto ree estis eksterordinare grandaj; la kontraŭulo tamen eĉ ne minimume sukcesis. — En la regiono de Rethel kontraŭula aeroplano veninta el Paris estis alterigata. La aviadisto eldiris, ke en Paris oni ne jam publike scias ion pri la francaj perdoj en la Champagne batalo. — La bataloj ĉe la Hartmannsweilerkopf daŭras ankoraŭ.

Orienta militkampoj: Nenio okazis. La vetero estas malbona. La vojoj en la rusa ĉelima teritorio estas marĉaj.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Berlin, 7. Aprilo 1915.

Oficiale. — La submara boato U 29 ĝis nun ne revenis de sia lasta entrepreno. Laŭ sciigo eldonita de la brita admiralaro la 26-an de marto la boato subakviĝis kun la tuta ensidantaro. Oni do devas ĝin kredi perdita. La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 9. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Ni ree elpuŝis la Belgojn el la tute pafdetruita Drie Grachten ĉe la Yser; 2 belgaj oficiroj, 100 soldatoj kaj 2 maŝinpafiloj venis al niaj manoj. — Responde al la bombardado de lokoj malantaŭ nia fronto ni bombardadis per brulgrenadoj Reims-on, en kiu ni ekkonis kunvenantajn multajn trupojn kaj bateriojn. — Norde de la arbareto Beausejour, nordoriente de Le Mesnil, ni prenis de la Francoj kelkajn tranĉeojn kaj akiris 2 maŝinpafilojn. Du reprenprovoj dum la nokto estis sensukcesaj. — En la Argonnes malsukcesis franca infanteriatako, en kiu la Francoj ree uzis bombojn, kiuj eligas sufokajn gasojn. — La bataloj inter Maas kaj Mosel daŭris plifortiĝante. Ree la Francoj atakis tute sensukcese kaj suferis plej gravajn perdojn. En la Woëvre-ebenaĵo ili atakis antaŭtagmeze kaj vespere sen sukceso. Por ekposedi la Maas-altaĵojn apud Combres ili daŭre antaŭensendis novajn taĉmentojn. Atako el la Selouse-arbaro norde de St. Mihiel malsukcesis ĉe niaj bariloj. En la Ailly-arbaro ni estas malrapide avancantaj. Okcidente de Apremont franca atako malsukcesis. Okcidente de Flirey francaj atakoj mortis sub nia artileripafado; sed norde kaj nordoriente de la vilaĝo ili kaŭzis obstinan sendistancon batalon, en kiu niaj trupoj fine superis kaj repuŝis la kontraŭulon. Noktaj atakoj de la Francoj ĉi tie estis senkuscesaj. Ankaŭ en la Priesterwald la Francoj ne povis avanti. Malsukcesis kontraŭula provo, preni sudokcidente de Chateau-Salins la vilaĝon Bézange la Grande de ni okupitan. — Ĉe la Sudelkopf ni kaptis soldaton de la 334-a franca regimento, kiu havis kun si Dumdum-pafaĵojn. Ĉe la Hartmannsweilerkopf nur la artilerio batalis.

Orienta militkampoj: Oriente de Kalvarja evoluis bataletoj, kiuj ne jam estas finitaj. Escepte de tio ĉe la orienta fronto nenio okazis. La armeestraro.

Berlin, 9. Aprilo 1915.

Oficiale. — Je la 1-a de aprilo 1915 en germanaj militkaptejoj troviĝis:

Francoj:	Oficiroj kaj personoj kun oficira rango	3868
	Soldatoj	238496
Rusoj:	Oficiroj ktp.	5140
	Soldatoj	504210
Belgoj:	Oficiroj ktp.	647
	Soldatoj	39620
Angloj:	Oficiroj ktp.	520
	Soldatoj	20307
Sume:		812808

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 10. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: La kaptajo el Drie Grachten kreskis al 5 belgaj oficiroj, 122 soldatoj, 5 maŝinpafiloj. En la Champagne norde de Beausejour niaj trupoj malokupis la tranĉeojn je la 8a de aprilo prenitajn, kiuj hieraŭ per franca peza artilerio estis detruataj; francaj atakoj en tiu regiono estis repuŝataj. La bataloj inter Maas kaj Mosel daŭris same forte. Apud la vilaĝoj Fromezey kaj Gussainville oriente de Verdun, kiujn la Francoj raportis de ili prenitajn, ĝis nun ne jam estas batalite; ĉar tiuj lokoj kuŝas multe antaŭ niaj pozicioj. Inter Orne kaj la Maas-altaĵoj la Francoj hieraŭ suferis gravan malvenkon. Ĉiuj atakoj malsukcesis en nia pafado. Apud la Combres-altaĵo ili nedaŭre sukcesis, enpenetri niajn plej antaŭajn poziciojn sur kelkaj lokoj; sed per noktaj kontraŭatakoj ili parte estis repuŝataj. La bataloj daŭras. Ankaŭ la atakoj kontraŭ niaj pozicioj norde de St. Mihiel estis tute malsukcesaj. Malgrandetaj atakoj ĉe la fronto Ailly–Apremont estis repuŝataj. Apud Flirey la bataloj estis malpli fortaj, verŝajne sekve de la gravaj perdoj de l'kontraŭulo je la 7a kaj 8a de aprilo. Ĉi tie ni akiris 2 maŝinpafilojn. Ĉe la fronto Remenauville–Priesterwald ni repuŝis ĉiujn francajn atakojn.

Ĉe la okcidenta rando de la Priesterwald la kontraŭulo nun definitive perdis ankaŭ tiun parton de nia pozicio, kiun li estis enpenetrinta fine de marto. En refojaj provoj, forpreni de ni Bézange la Grande sudokcidente de Chateaux Salins, la Francoj perdis 1 kompanion, kiu estis tute pereigata; 2 oficiroj kaj 101 soldatoj estis kaptataj. En la Vogesen la stato ne ŝanĝiĝis.

Orienta militkampoj: Oriente kaj sude de Kalvarja la Rusoj senfeliĉe provis ataki; ĉie ili estis repuŝataj kun gravaj siaj perdoj. Escepte de tio la situacio ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Wien, 10. Aprilo, tagmeze.

Oficiale. — En la arbaro-montaro hieraŭ fortaj bataloj evoluis ankaŭ en la regiono oriente de la Uzsok-montoselo. Norde de Tucholka germanaj trupoj atakprenis suraltajn pozicion, pro kiu de la 5a de februaro multe estis batalate kaj kiun la Rusoj obstine defendis. 1 kolonelo kaj 1000 soldatoj estis kaptataj, 15 maŝinpafiloj akirataj. — En la Opor-valo kaj en la regiono de la fronto de l'Stryj kontraŭulaj atakoj malsukcesis samtempe antaŭ niaj kaj la germanaj pozicioj; la Rusoj suferis gravajn perdojn. — Ni kaptis hieraŭ sume 2150 Rusojn. — Escepte de tio la stato ne ŝanĝiĝis.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefler.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 11. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Ĉe la Yser-kanalo apud Poesele, sude de Drie Grachten, prenante 3 biendomojn de Belgoj defendatajn ni kaptis 1 oficiron kaj 40 soldatojn. En negrandaj atakoj kontraŭ la Ancrerivereto apud Albert ni kaptis 50 Francojn. En la okcidentaj Argonnes franca atako malsukcesis. — La bataloj inter Maas kaj Mosel plifortiĝis nur antaŭvespere. En la arbara regiono norde de la Combres-altaĵo la Francoj denove kunigis fortajn taĉmentojn, por provi reprenon de nia suraltaĵa pozicio. La atako estis farata nur hodiaŭ matene kaj tute malsukcesis. La pozicio estas tute en niaj manoj. Sudoriente de Ailly nokte okazis fortaj sendistancaj bataloj, kiuj estis decidataj favore al ni. En forta, sed sensukcesa franca atako norde de Flirey la Francoj suferis tre gravajn perdojn. En la hieraŭaj bataloj en la Priesterwald ni forprenis de l'kontraŭulo 4 maŝinpafilojn. La postaj tre obstinaj bataloj dum la nokto finiĝis favore al ni. — La tre gravaj perdoj de la Francoj en la bataloj inter Maas kaj Mosel ne jam proksimume estas takseblaj. Sole inter la Selouse-kaj la Lamorville-arbaroj niaj soldatoj trovis 700, sur malgranda loko norde de Regniéville pli ol 500 francajn kadavrojn. Ni kaptis 11 francajn oficirojn kaj 804 soldatojn kaj akiris 7 maŝinpafilojn. — Ankrumita aerostato, kiu pro pafdetruo de la ankrokablo estis forfluginta, ne flugis — kiel la Francoj raportis — al la linioj de l'kontraŭulo, sed nedifektita surteriĝis apud Mörchingen kaj estis de ni kaptata. — En la Vogesen neĝventego malebligis iom grandajn batalagojn.

Orienta militkampoj: Apud Mariampol, Kalvarja kaj apud Klimki ĉe la Szkwa rusaj atakoj estis repuŝataj. El vilaĝo apud Bromierz, okcidente de Plonsk, la Rusoj estis elpuŝataj; ni kaptis 80 Rusojn kaj akiris 3 maŝinpafilojn. En Polujo sude de la Weichsel la rusaj nfanterio kaj artilerio vigle pafadis dum la tuta nokto. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 12. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: En la Argonnes negrandaj francaj atakoj malsukcesis. Inter Maas kaj Mosel la dimanĉo pasis preskaŭ trankvile. Nur en la vesperaj horoj la Francoj ekatakis la Combres-altaĵojn; post duhora batalo la atako estis repuŝita. En la arbaro de Ailly kaj en la Priesterwald okazis dum la tago sendistancaj bataloj, en kiuj ni superis; atako denove komencita dum la nokto estis repuŝata. — Kontraŭulaj aviadistoj je la 5a de aprilo ĵetis bombojn sur la nefortikigitan urbon Müllheim, kiu kuŝas ekster la milita regiono; 3 virinoj estis mortigataj. Responde al tio ni bombardadis per sufiĉe multaj brul- kaj krevigaj grenadoj Nancy-on, la ĉeflokon de la samnoma fortifikajetaro. — Laŭ eldiro de francaj oficiroj la katedralo Notre Dame en Paris kaj Troyes, same ankaŭ eminentaj ŝtataj konstruaĵoj, ekz. la nacia biblioteko, muzeoj, invalidejoj, Louvre ktp. estis militiste instalitaj, ekz. per reflektoroj, stacioj por senfadena telegrafio, maŝinpafiloj.

Orienta militkampoj: Antaŭenirinte de Mariampol orienten ni kaptis 9 rusajn oficirojn, 1350 soldatojn kaj akiris 4 maŝinpafilojn. Nordoriente de Lomza la Rusoj per ĵetmaŝinoj ĵetis bombojn, kiuj ne krevis, sed malrapide brulante eligis sufokajn gasojn. — Ne necesas, plue priparoli la evidentan kaj sensencan, en la gazetaro oficiale raportitan mensogon, ke rusa suboficiro en ĉeesto de germanaj oficiroj estis kripligata. La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 13. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: La Francoj asertas, ke ili ĵetis 150 bombojn sur la ĉemaran stacidomon kaj la fandejon Brügge; vere 9 bomboj falis teren apud Ostende kaj 2 apud Brügge, sed neniel malutilis. Responde dum la lasta nokto ni multnombro bombardadis la lokojn Poperinghe, Hazebrouck kaj Cassel. Apud Berry au Bac la Francoj nokte enpenetris unu nian tranĉeon, sed tuj estis repuŝataj. Oriente de Reims atako de kontraŭulaj aviadistoj malsukcesis. Nordoriente de Suippes ree pafaĵoj elĵetantaj sufokajn gasojn estis ĵetataj kontraŭ ni. Inter Maas kaj Mosel la Francoj sur kelkaj lokoj daŭrigis siajn fortajn, sed sensukcesajn atakojn. Antaŭtagmeze apud Maizerey oriente de Verdun 3 atakoj kun plej gravaj perdoj sekve de nia pafado malsukcesis. La atakoj apud Marchéville sudokcidente de Maizerey, kiujn la kontraŭulo tagmeze kaj vespere entreprenis kun fortaj taĉmentoj, finiĝis same. Atako hodiaŭ dum tagiĝo entreprenita kontraŭ la fronto Maizerey–Marchéville ree estis repuŝata kun sufiĉe grandaj kontraŭulaj perdoj. En la Priesterwald tage kaj nokte okazis obstinaj sendistancaj bataloj, en kiuj ni avancis malrapide. Sude de la Hartmannsweilerkopf franca atako hieraŭ estis repuŝata.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 14. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Nokta kontraŭula atako malsukcesis apud Berry-au-Bac. — Nordokcidente de Verdun la Francoj hieraŭ uzis kontraŭ ni minojn, kiuj elĵetis densan flavetan fumon kaj sufokan gason. — Inter Maas kaj Mosel la batalo daŭris. Per forta atako kontraŭ la linio Maizerey–Marchéville la Francoj sur mallarĝa loko enpenetris apud Marchéville nian pozicion, sed baldaŭ estis reelpuŝataj per kontraŭatako. Ĉe la aliaj partoj de la fronto la atako malsukcesis jam antaŭ nia pozicio. Inter Combres kaj St. Mihiel hieraŭ nur la artillerio batalis.

Post sensukcesaj kontraŭulaj krevigprovoj en la Ailly-arbaro ni repuŝis tri atakojn. Atako sur ambaŭ flankoj de la ŝoseo Essey–Flirey malsukcesis okcidente de tiu ĉi ŝoseo kaj kaŭzis oriente de ĝi sendistancajn batalojn, en kiuj niaj trupoj superis. En la Priesterwald ne estis batalate. — En la Vogesen malsukcesis franca atako kontraŭ la Schnepfenriethkopf sudokcidente de Metzeral.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksio estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! ..

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 15. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Inter Maas kaj Mosel hieraŭ nur sporadaj bataloj okazis. En trifojoj sensukcesaj atakoj apud Marchéville la Francoj suferis gravajn perdojn. Okcidente de la ŝoseo Essey-Flirey la batalo pro malgranda tranĉepeto daŭris ĝis la nokto. Ĉe kaj en la Priesterwald francaj atakoj malsukcesis. Kontraŭulaj taĉmentoj antaŭenirintaj kontraŭ niaj pozicioj nordoriente de Manonviller estis repuŝataj de niaj antaŭgvardiaj trupoj kun multaj siaj perdoj. Sude de la Hartmannsweilerkopf la Francoj kvinfoje, sed vane provis, rompi nian fronton. Escepte de tio en la Vogesen nur la artilerio batalis.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis. La armeestraro.

Berlin, 15. Aprilo 1915.

Oficiale. — Je la 14-a de aprilo vespere marino-aerŝipo entreprenis atakon kontraŭ la marenfluo de la Tyne. Nombro da bomboj estis ĵetata. La aerŝipo revenis nedifektita.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 16. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: En la artileribatalo antaŭ Ostende-Nieuport hieraŭ ankaŭ kelkaj kontraŭulaj torpedoboatoj partoprenis, kies pafado rapide estis silentigata. Post eksplodigo ni okupis 2 domojn ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo. Inter Maas kaj Mosel nur la artilerio batalis. — Plinombrigante de la Francoj estas uzataj bomboj, kiuj elĵetas sufokajn gasojn, kaj eksplodaj infanteripafaĵoj. Sekve de la klara, travidebla aero hieraŭ la aviadistoj ree agis tre vigle. Kontraŭulaj aviadistoj ĵetis bombojn sur la vilaĝojn malantaŭ niaj pozicioj. Ankaŭ Freiburg ree estis atakata; kelkaj civiluloj, precipe infanoj, estis mortigataj kaj vundataj.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis. — En malgrandaj bataletoj apud Kalvarja ni kaptis dum la lastaj tagoj 1040 Rusojn kaj akiris 7 maŝinpafilojn.

La armeestraro.

Berlin, 16. Aprilo 1915.

Oficiale. — En la nokto inter la 15-a kaj 16-a de aprilo kelkaj marino-aerŝipoj sukcese ĵetis bombojn sur kelkajn defendatajn lokojn sur la suda parto de la angla orienta marbordo. Antaŭ kaj dum la atako la aerŝipoj forte estis pafataj. Ili revenis nedifektitaj.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 17. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Hieraŭ ankaŭ la Angloj uzis oriente de Ypern grenadojn kaj bombojn, kiuj eljetas sufokajn gasojn. — Ĉe la suda deklivo de la Lorette-altaĵo, nordokcidente de Arras, ni perdis malgrandan pozicion 60 m larĝan kaj 50 m longan. — Post ampleksa eksplodigo ni prenis atake grupon da francaj fortikaĵoj en la Champagne nordokcidente de Perthes; kontraŭula kontraŭatako hodiaŭ matene komencita malsukcesis. — Inter Maas kaj Mosel fortaj artileribataloj okazis. Apud Flirey la Francoj atakis kelkfoje; ili estis repuŝataj al siaj pozicioj kun multaj siaj perdoj. — En esplora antaŭeniro niaj trupoj prenis hieraŭ la kontraŭulan pozicion nordokcidente de Urbeis (Vogesen). Ĉar ĝi kuŝas sur loko por ni maloportuna, ni matene ĝin malokupis kunforprenante nombron da kaptitaj alpoĉasistoj. — Franca aerŝipo aperis lastnokte super Straßburg kaj eljetis kelkajn bombojn. La difekto de objektoj — precipe fenestraj vitroj — ne estas grava; bedaŭrinde kelkaj civiluloj estis vundataj. Unu el niaj aviadistoj, kiu antaŭhieraŭ bombardadis Calais'on, hieraŭ eljetis bombojn super Greenwich apud London.

Orienta militkampoj: Ankaŭ hieraŭ la stato ne ŝanĝiĝis. La armeestraro.

Wien, 17. Aprilo, tagmeze.

Oficiale. — En rusa Polujo kaj en okcidenta Galicio nenio okazis. — Apud la fronto en la Karpaten la stato ne ŝanĝiĝis. En la arbaro-montaro, kie la Rusoj refoje sur kelkaj lokoj forte atakis, ni akiris 1290 kaptitojn. En ĉi tiuj kaj en kelkaj nokte provitaj atakoj la kontraŭulo ree suferis gravajn perdojn. — En sudorienta Galicio kaj en la Bukowina la artilerio batalis.

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefler.

Konstantinopel, 17. Aprilo.

La turka armeestraro sciigas: Hieraŭ posttagmeze kontraŭula hidroplano fluganta super la sinuson de Saros estis difektata per nia pafado kaj falis en la maron antaŭ Sazli Liman. Alia hidroplano sidiĝanta sur la maron, por savi la unuan, estis mergata per nia pafado. Elireja ŝipo por hidroplanoj kaj la angla kirasa ŝipo „Lord Nelson“, kiuj alproksimiĝis, estis trafataj de grenadoj. „Nelson“ sin retiris. La alia ŝipo trenante la difektitan hidroplanon sin ankaŭ retiris. — La angla submara boato E 15 estis mergata en la Dardanellen-markolo oriente de Karanlik Liman. El la 31 ensidantoj ni savis kaj kaptis 3 oficirojn kaj 21 soldatojn; inter ili estas la iama angla vickonsulo ĉe la Dardanellen. — Sur la aliaj militkampoj io grava ne okazis.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 17. Aprilo.

Okcidenta militkampoj: En la Argonnej Francoj El Germana Orienta Afriko alvenis jenaj oficialaj sciigoj: En tritaga bataleto la forta kontraŭulo estis venkata apud Jassini la 18-an kaj 19-an de januaro. Li perdis proksimume 200 mortigitojn; 4 kompanioj estis kaptataj. Entutaj kontraŭulaj perdoj proksimume 700 soldatoj. Ni akiris 350 pafilojn, 1 maŝinpafilon, 2 rajdbestojn, 60000 kartoĉojn.

Großes Hauptquartier, 18. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Ekplodiginte sur kelkaj lokoj hieraŭ vespere la Angloj sud-oriente de Ypern enpenetris nian suraltajan pozicion norde apud la kanalo, sed per kontraŭ-atako tuj estis repuŝataj; nur pro tri ekplodkrateroj de la Angloj okupitaj oni batalas ankoraŭ. En la Champagne la Francoj hieraŭ ekplodigis tranĉeon apud la pozicio hieraŭ de ni prenita, sed ne ĉerpis profiton el tio. Inter Maas kaj Mosel nur la artilerio batalis. En la Vogesen ni prenis francan antaŭpozicion sudokcidente de Stoßweier ĉe la montselo. Sudokcidente de Metzeral niaj antaŭpostenoj estis retiritaj al la subtenantaj trupoj, ĉar la kontraŭulo nombre superis.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

Großes Hauptquartier, 19. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Sudoriente de Ypern la Angloj estis elpelataj el tiuj malgrandaj partoj de nia pozicio, kiujn ili ankoraŭ defendis. Hieraŭ vespere per fortaj atakoj laŭlonge de la fervojo Ypern-Comines ili provis, denove ekposedi la suraltajan pozicion. La atako malsukcesis kun plej gravaj iliaj perdoj. Apud Ingelmunster la franca aviadisto-leŭtnanto Garros estis devigata, surteriĝi kaj estis kaptata. Inter Maas kaj Mosel la artilerio batalis dum la tuta tago. Sekve de nia pafado malforta franca atakprovo kontraŭ la Combres-pozicio malsukcesis, antaŭ ol ĝi evoluis. En la Vogesen okcidente de la Reichsackerkopf du francaj atakoj kontraŭ la surmontsela pozicio de ni prenita malsukcesis, same atako kontraŭ la altaĵoj norde de Steinabrueck. Post multaj perdoj la Francoj returneniris.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

El Francujo kaj Anglujo – versajne eĉ el oficialaj ejoj – la eksterlando estas superŝutata per sciigoj pri sukcesoj de niaj kontraŭuloj sur la mondmilitejo. Ĉiuj tiaj sciigoj estas absolute mensogitaj. Ne estas peninde refuti ilin detale; ni nur atentigas la legantojn, ke ili esploru ilin laŭ la oficialaj germanaj raportoj.

La armeestraro.

[Mallongigita.]

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 20. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: En la Champagne ni avancis per tranĉeoj. En la Argonnes franca atako norde de Le Four de Paris malsukcesis. — Inter Maas kaj Mosel la artileribataloj nur kelkloke estis viglaj. Franca atako apud Flirey malsukcesis pro nia pafado. Eksplozigitaj kelkajn fortikigitajn domojn ĉe la Croix des Carmes niaj trupoj enpenetris la ĉefpozicion de l'kontraŭulo kaj kaŭzis al li grandajn perdojn.

En bataleto de antaŭpostenoj okcidente de Avricourt ni atake reprenis la vilaĝon Embermenil, kiu mallongan tempon ni estis malokupintaj. Sur la Sillacker-altaĵoj en la Vogesen, nordokcidente de Metzeral, kontraŭula atako malsukcesis; la francaj alpoĉasistoj suferis gravajn perdojn. — Atakante kontraŭ la supro de la Hartmannsweilerkopf ni avancis kelkcentojn da metroj sur ties nordorienta deklivo.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 21. Aprilo 1915.

Okcidente militkampoj: Proksime de la Reims'a katedralo ni ekkonis kontraŭulan baterion kaj pafadis ĝin. En la Argonnes la Francoj ĵetis bombojn, kiuj eksplodinte kaŭzis vomon. Kontraŭula atako malsukcesis norde de Le Four de Paris. — Inter Maas kaj Mosel ni repuŝis hieraŭ kun multaj kontraŭulaj perdoj atakon entreprenitan de la Francoj sur larĝa fronto. En la Priesterwald ni avancis plu. — En la Vogesen la kontraŭulo vane atakis niajn poziciojn nord-kaj sudokcidente de Metzeral kaj apud Sondernach. Ankaŭ tie la Francoj multe perdis. — Hieraŭ matene kontraŭula aviadisto elĵetis bombojn super Lörrach; ili difektis silkfabrikejon arpartenantan al Svisoj kaj du domojn kaj vundis kelkajn civilulojn.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

Responde al la rusaj bombĵetoj super Insterburg kaj Gumbinnen, kiuj urboj estas nefortikigitaj kaj kuŝas ekster la milita regiono, ni hieraŭ ĵetis 150 bombojn sur la fervojkruciĝejon Bialystock.

La armeestraro.

Wien, 21. Aprilo 1915.

En la Karpaten la kontraŭulo ĉesigis la multperdigajn atakojn kontraŭ la plej gravaj partoj de nia fronto, precipe kontraŭ niaj pozicioj defendantaj la ĉefvojojn al Hungarujo: la valoj de la Ondava, Laborcza kaj Ung. Li provis ankoraŭ trairi kun fortaj taĉmentoj la arbaro-montaron ĉirkaŭirante niajn envalajn kaj suraltajn poziciojn. Sed ankaŭ ĉi tiuj fortaj rusaj atakoj finiĝis kiel la antaŭaj. Perdinte multajn milojn da mortigitaj kaj vunditaj kaj pli ol 3000 nevunditajn kaptitojn la Rusoj ĉesigis la atakon. La valoron de la multaj, eĉ oficialaj raportoj de la rusa armeestraro publikigitaj en la eksterlando pri rusaj sukcesoj en la longdaŭraj Karpaten-bataloj oni ekkonu el tio, ke malgraŭ ĉiuj streĉoj kaj multnombraj viktimoj de la Rusoj la Uzsoka montselo, kiu ili rigardis precipe grava kaj kiu estis la ĉefa celo de iliaj atakoj, estas ankoraŭ tute en niaj manoj.

(Mallongigita.)

La vicesro de l'generalstabo: von Hoefler.

Rendirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! ..

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 21. Aprilo 1915.

Dum la lasta tempo en la germana sinuso de la Nordmaro ni kelkfoje ekvidis kaj atakis britajn submarajn boatojn. 1 kontraŭula submaro boato estis mergata la 17 an de aprilo. La mergo de pluaj submaraj boatoj estas verŝajna, sed ne povis esti konstatata tutcerte.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 22. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Sude de l' La Bassée-kanalo kaj nordokcidente de Arras ni sukcese krevigis minojn. En la Argonnes kaj inter Maas kaj Mosel fortaj artileribataloj okazis. Post surpriza pafado la Francoj atakis lastnokte en la okcidenta parto de l'Priesterwald, sed estis repuŝataj kun multaj siaj perdoj. Ĉe la norda deklivo de l'Hartmannsweilerkopf ni detruis hieraŭ francan pozicion kaj repuŝis vespere kontraŭulan atakon.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 23. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Hieraŭ vespere ni avancis de Steenstraate-oriente de Langemarck-kontraŭ la kontraŭulaj pozicioj norde kaj sude de Ypern. Per unu atako niaj trupoj sur fronto 9 km larĝa avancis ĝis la altaĵoj sude de Pilkem kaj oriente de tie. En obstinaj bataloj ili samtempe transiris perforte la Yser-kanalon apud Steenstraate kaj Het Sas kaj okupis tie la okcidentan bordon. La vilaĝoj Langemarck, Steenstraate, Het Sas kaj Pilkem estis prenataj. Minimume 1600 Francoj kaj Angloj kaj 30 kanonoj, inter ili 4 pezaj anglaj, venis al niaj manoj. — Inter Maas kaj Mosel la bataletoj ree plivigliĝis. La artilerio batalis precipe forte apud Combres, St. Mihiel, Apremont kaj nordoriente de Elirey. La kontraŭula infanterio atakis nur en la arbara regiono inter Ailly kaj Apremont. Ĉi tie la Francoj sur kelkaj lokoj enpenetris niajn plej antaŭajn tranĉeojn, sed parte estis reelpuŝataj. Sendistancaj bataloj daŭras ankoraŭ. — Niaj avangardoj malokupis la vilaĝon de ni prenitan Embermenil okcidente de Avricourt, kiun la Francoj hieraŭ pafbruligis; la altaĵoj norde kaj sude de ĝi estas defendataj.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Berlin, 23. Aprilo 1915.

Dum la lasta tempo la germana militŝiparo kelkfoje krosis sur la Nordmaro ĝis en la anglan marteritorion. Anglaj militŝipoj neniam estis renkontataj.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 24. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Malsukcesis ĉiuj provoj de l' kontraŭulo, repreni la teritorion norde kaj nordoriente de Ypern prenitan de ni. Forta franca atako norde de Ypern, angla atako apud St. Julien nordoriente de Ypern malsukcesis kun gravaj kontraŭulaj perdoj, same plua atako hodiaŭ matene apud kaj oriente de la ŝoseo Ypern-Bixschoote. Okcidente de la kanalo niaj trupoj nokte atakprenis Lizerne'n. La nombro de la kaptitaj Francoj, Angloj kaj Belgoj kreskis al 2470; krom entute 35 kanonoj kun municio al niaj manoj venis nemalgranda nombro da maŝinpafiloj, multaj pafiloj kaj alia materialo. — En la Champagne norde de la Beausejour-biendomaro ni eksplodigis lastnokte per 4 minoj kontraŭulan tranĉeon; la Francoj suferis multajn perdojn, ankaŭ pro tio, ĉar ilia artilerio ekpafadis la proprajn tranĉeojn. — Inter Maas kaj Mosel la Francoj denove atakis sur kelkaj lokoj. En la Ailly-arbaro ni superis en bajonetbatalo. Pli oriente la Francoj, kiuj sur kelkaj lokoj estis enpenetrintaj niajn liniojn, estis reelpuŝataj. En la Priesterwald ni avancis plu. — En la Vogesen nebulo kaj neĝo malhelpis la batalagojn.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 25. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Apud Ypern ni sukcesis plu. La teritorion norde de Ypern prenitan de ni je la 23-a de aprilo ni defendis ankaŭ hieraŭ kontraŭ kontraŭulaj atakoj. Pli oriente ni daŭrigis niajn atakojn, atakprenis la biendomararon Solaert, sudokcidente de St. Julien, kaj St. Julien'n kaj Kresselaere'n kaj venke avancis kontraŭ Grafenstafel'n. En tiuj bataloj ni kaptis proksimume 1000 Anglojn kaj akiris kelkajn maŝinpafilojn. Angla kontraŭatako kontraŭ nia pozicio St. Julien hodiaŭ matene estis repuŝata kun plej gravaj kontraŭulaj perdoj. Okcidente de Lille atakprovoj de la Angloj estis subigataj per nia pafado, antaŭ ol ili povis evolui. En la Argonnes norde de Le Four de Paris ni repuŝis 2 atakantajn francajn batalionojn. — Sur la Maas-altaĵoj sudokcidente de Combres la Francoj suferis gravan malvenkon. Ĉi tie ni atakis kaj rompe trairis per unu atako kelkajn francajn liniojn kuŝantajn unu post la alia. Noktaj provoj de la Francoj, repreni la perditan teritorion, malsukcesis kun gravaj kontraŭulaj perdoj. Post tiuj bataloj 24 francaj oficiroj, 1600 soldatoj kaj 17 kanonoj restis en niaj manoj. Escepte de tio inter Maas kaj Mosel nur sur kelkaj lokoj de nia suda fronto okazis bataloj sendistancaj, kiuj apud Ailly ne jam finiĝis. En la Priesterwald franca nokta atako malsukcesis. En la Vogesen ankaŭ hieraŭ densa nebulo malhelpis la batalagojn.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis. Du nefortaj atakoj de la Rusoj okcidente de Ciechanow estis repuŝataj. — Responde al rusaj bombjetoj super la pacema urbo Neidenburg ni denove ĵetis 20 bombojn sur la fervojo-kruciĝejon Bialystok.

La armeestraro.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 26. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Apud Ypern la batalo daŭras. Sur la okcidenta kanalbordo Lizerne estas en niaj manoj malgraŭ la aserto de la Francoj, ke ili reprenis ĝin. Ankaŭ oriente de la kanalo ni defendis la prenitajn teritorion. La nombro de la prenitaj kanaloj kreskis al 45, inter kiuj estas ankoraŭ la 4 pezaj anglaj. Nordokcidente de Zonnebeke ni daŭrigis niajn atakojn kaj kaptis pli ol 1000 Kanadanojn. Per tio la suma nombro de la kaptitoj kreskis al 5000. Stranga popolmiksaĵo ĉi tie kunestis sur preskaŭ malvasta loko: nigruloj de la Senegal, Angloj, alĝeriaj pafistoj (Turkos), Hindoj, Francoj, Kanadanoj, Zuavoj, Alĝerianoj. — En la Champagne ni repuŝis 2 francajn noktajn atakojn norde de Beausejour. Sur la Maas-altaĵoj nia atako bone progresis. Ni prenis atake kelkajn montetojn ĝis la altaĵo okcidente de Les Eparges; kelkcentoj da Francoj kaj kelkaj maŝinpafiloj venis al niaj manoj. En la Ailly-arbaro kontraŭulaj atakoj malsukcesis. La Hartmannsweilerkopf en la Vogesen estas de ni atake reprenita. Niaj trupoj ĉi tie kaptis 11 oficirojn kaj 749 Francojn kaj akiris 6 minjetilojn kaj 4 maŝinpafilojn.

Orienta militkampoj: Kelkaj malfortaj rusaj noktaj atakoj nordokcidente de Ciechanow estis repuŝataj. La stato ne ŝanĝiĝis. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 27. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: En Flandern la Angloj norde kaj nordoriente de Ypern atakis kun tre fortaj taĉmentoj la novan linion de niaj pozicioj, kiu troviĝas 3 ĝis 4 km sude de la ĝisnuna kaj kiu kuras de loko norde apud la D' Houldt-biendomaro ĉe la Yser-kanalo tra St. Julien turnita kontraŭ Grafenstafel'n. La atakoj, kiuj de la germana artilerio sudoriente de Ypern parte estis kontraŭbatalataj de malantaŭen, malsukcesis jam sub la pafado kun eksterordinare grandaj perdoj. La domojn de Lizerne, kiujn la kontraŭula artilerio tute pafdetruis, ni malokupis lastnokte; la antaŭponta pozicio, kiu kuŝus oriente apud ĝi sur la maldekstra kanalbordo, estas defendata. En la ĝisnunaj bataloj apud Ypern niaj trupoj akiris 50 maŝinpafilojn. Ni komencis pafadi kun videbla sukceso la gravan fervojo-kruciĝejon kaj etapo-ĉeflokon Poperinghe, kuŝantan ĉirkaŭ 12 km okcidente de Ypern. — En la Argonnes nokta franca atako nordoriente de Vienne-le-Château estis repuŝata. Sur la Maas-altaĵoj ankaŭ hieraŭ ni sukcesis plu malgraŭ nove alvenintaj francaj taĉmentoj. Atakoj kontraŭ nia Combres-pozicio malsukcesis. Fortan atakon en la Ailly-arbaro ni repuŝis kun multaj kontraŭulaj perdoj. Ankaŭ pli oriente la kontraŭulo ne avancis. Per nokta batalo sendistanca ni sukcese avancis en la Priesterwald. Nian pozicion sur la Hartmannsweilerkopf la kontraŭulo hieraŭ vespere atakis kelkfoje; ĉiuj atakoj malsukcesis.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis. La armeestraro.

Etapo: Loko malantaŭ la batalfronto, militiste instalita, uzata kiel ripozejo kaj provizejo por la batalantaj trupoj.

(La tradukinto.)

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 26. Aprilo, tagmeze.

En la Karpaten la bataloj daŭras oriente de la Uzsoka montselo. Unu nia trupo prenis hieraŭ denove kontraŭulan pozicion sudoriente de Koziowa kaj kaptis 7 oficirojn kaj pli ol 1000 soldatojn. Kontraŭatakoj de la Rusoj estis repuŝataj kun plej gravaj iliaj perdoj. 2 batalionoj de la Rusoj estis preskaŭ tute pereigataj, kelkcentoj da soldatoj kaptataj. Per tuja persekutado ni prenis 26 tranĉeojn kaj multe da materialo. Antaŭ la Uzsoka montselo la kontraŭulo kvazaŭ fugante returneniris. Malgraŭ plej obstinaj rusaj kontraŭatakoj ni defendis hieraŭ la ĝis nun prenitajn teritorion kaj akiris novan sudoriente de Koziowa.

(Mallongigita.)

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

Großes Hauptquartier, 28. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: En Flandern la Angloj ankaŭ hieraŭ provis repreni la perditan teritorion. Ambaŭflanke de la ŝoseo Ypern-Pillkern ili komencis posttagmeze atakon, kiu 200 m antaŭ nia pozicio tute malsukcesis. Same finiĝis alia angla atako vespere entreprenita pli oriente. Ankaŭ tie la kontraŭulo multe perdis. Sur la okcidenta kanalbordo la kontraŭulo ne atakis. — Lastnokte ni atakprenis en la Champagne, norde de Le Mesnil, ampleksan grupon de francaj pozicioj, venke defendis ĝin kontraŭ kelkaj atakoj kaj ĝin plifortigis. La kontraŭulo multe perdis. 60 vunditaj Francoj, 4 maŝinpafiloj kaj 13 minjetiloj venis al niaj manoj. Dumtage inter Maas kaj Mosel nur fortaj artileribataloj okazis. Forta franca nokta atako en la Priesterwald estis sange repuŝata kun multaj francaj perdoj. Post la sensukcesaj atakoj kontraŭ la Hartmannsweilerkopf je la 26-a de aprilo la Francoj tiun ĉi nian pozicion ne plu provis ataki. Apud Altkirch unu nia aviadisto pafe terenigis francan aeroplanon.

Orienta militkampoj: Nordoriente kaj oriente de Suwalki ni ekposedis atake rusajn poziciojn sur fronto 20 km larĝa. Norde de Prasnysz hieraŭ 2 oficiroj, 470 Rusoj estis kaptataj, 3 maŝinpafiloj akirataj.

La armeestraro.

Konstantinopel, 27. Aprilo, posttagmeze.

La turka armeestraro raportas: Ni forpelis la kontraŭulon de sur la bordoj apud Sighin Dere, okcidente de Sedul Bahir. La kontraŭulo albordiĝinta proksime de Kaba Tepe klopodis, helpate de la pafado de siaj ŝipoj defendi siajn poziciojn. Tiujn poziciojn niaj trupoj atakprenis hodiaŭ matene, devigis la kontraŭulon, retiri sin sur la tuta fronto kaj kaŭzis al li eksterordinare grandajn perdojn. Kelkaj kontraŭulaj taĉmentoj fugintaj al la maro eniris siajn ŝalupojn kaj plejrapide forveturis. Aliaj, kiuj ne povis fugi, ŝvingis blankajn standardojn kaj grandare kapitulacis. Ni konstatis, ke kontraŭula transportvaporŝipo trafita de niaj artileripafaĵoj subakviĝis antaŭ Ari Burna. Raporto alveninta posttagmeze je la 4^{1/2} a sciigas, ke la kontraŭulaj taĉmentoj — laŭtakse 4 brigadoj — estis pelataj en la maron ĉe la bordo apud Kaba Tepe. Kontraŭula kroŝipo, kies malantaŭa parto estis difektata, kun disrompita masto estis trenata al Tenedos. Samtempe ŝipraro alproksimiĝis al la Dardanellen, pro batali ilin de sur la maro; sed pro nia pafado ĝi devis retiri sin. En ĉi tiu batalo kontraŭula torpedo-boato estis mergata, alia grave difektata; oni ĝin trenis al Tenedos. De sur la maro la kontraŭulo hodiaŭ nenion entreprenis kontraŭ la Dardanellen.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 29. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: De hieraŭ posttagmeze niaj pozicioj sur la okcidenta kanalbordo norde de Ypern kaj apud la L'Yperlee-rivereto ĉe Steenstraate kaj Het Sas estas atakataj senĉese, sed sensukcese. Oriente de la kanalo hieraŭ vespere malsukcesis atako kontraŭ nia dekstra alo entreprenita de Francoj, Alĝerianoj kaj Angloj kune; la kontraŭulo tre multe perdis. La nombro de la kanonoj de ni prenitaj en la bataloj norde de Ypern kreskis al 63. — La kontraŭulo sensukcese eksplodigis minojn apud la fervojo La Bassée-Béthune kaj en la Champagne norde de Le Mesnil. Apud Le Mesnil la Francoj nokte atakis la poziciojn hieraŭ nokte de ni prenitajn; ili estis repuŝataj kun multaj siaj perdoj. La ĉi tie kaptitaj Francoj estis en kompatinda stato; ili tremis de timo, ĉar iliaj oficiroj estis trompeme dirintaj al ili, ke kaptitoj de la Germanoj tuj estas mortpafataj. — Sur la Maas-altaĵoj sudoriente de Verdun ni antaŭenŝovis niajn poziciojn kelkcentojn da metroj kaj fortikigis ilin. En la Vogesen la stato ne ŝanĝiĝis.

Orienta militkampoj: Sude de Kalvarja ni prenis la vilaĝon Kowale kaj la altaĵon sude de ĝi. Apud Dachowo sude de Sochaczew ni prenis rusan pozicion. La armeestraro.

Konstantinopel, 29. Aprilo, vespere.

La turka armeestraro sciigas: Malgraŭ siaj klopodoj, subtenate de la pafado el siaj ŝipoj defendi sin sur la bordo, la kontraŭulo albordiĝinta en la ĉirkaŭaĵo de Kum Kaleh estis tute forpelata. Neniu kontraŭulo plu staras sur la azia bordo de la Dardanellen. La kontraŭulaj taĉmentoj sur la promontoro Kaba Tepe obstine sin defendis subtenataj de la pafado el siaj ŝipoj. De sur la aliaj partoj de la duoninsulo Gallipoli la kontraŭulo estas forpelita. Je la 28-a de aprilo la pafado de nia baterioj difektis la francan kirasman krosŝipon „Jeanne d'Arc“; brulante ĝi retiris sin al Tenedos. La 28-an de aprilo angla kontraŭ-torpedoboato subakviĝis ĉe la enirejo de l' markolo sekve de brulado kaŭzita de niaj grenadoj. Atako kontraŭ niaj antaŭpostenaj baterioj ĉe la markolo, entreprenita la 27-an de aprilo de 16 kirassipoj kaj multaj kontraŭ-torpedoboatoj, havis jenan resultaton: Milo de grenadoj pafitaj kontraŭ niaj baterioj kaj la pozicioj de nia infanterio negrave vundis ĝis vespere kelkajn soldatojn. Kontraŭe 2 transportŝipoj antaŭ Sedd il Bahr kelkfoje estis trafataj de niaj grenadoj, tiel ke unu tuj veturis sur la bordon. Ni mergis nombron da boatoj kaj velŝipoj okupitaj de soldatoj, kiuj kun trenŝipoj sin trovis apud la transportŝipoj. La anglaj ŝipoj de linio „Majestic“ kaj „Triumph“ estis difektataj kaj retiris sin el la batallinio. Dum la lastaj ambaŭ tagoj la kontraŭula ŝiparo nenion entreprenis kontraŭ la markolo. Sur la aliaj militkampoj io grava ne okazis.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 28. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: La hieraŭ sciigitaj bataloj sur la okcidenta kanalbordo — La submara boato nro. 5, kies komandanto estas linioŝipo-leŭtnanto Georg Ritter von Trapp, per torpedo trafis kaj mergis en la lona Maro la francan kirasitan krozŝipon Léon Gambetta.

Großes Hauptquartier, 30. Aprilo 1915.

Okcidenta militkampoj: Ĉe la marbordo la aviadistoj vigle agis. Bomboj el aeroplanoj elĵetitaj super Ostende nur domojn grave difektis. La fortifikajo Dünkirchen hieraŭ estis bombardata de nia artilerio. — En Flandern la tago pasis sen gravaj okazaĵoj. Nokte la kontraŭulo atakis inter Steenstraete kaj Het Sas; la bataleto daŭras ankoraŭ. La antaŭpontoj pozicioj sur la okcidenta kanalbordo apud Steenstraete kaj Het Sas estas de ni fortikigitaj kaj estas absolute en niaj manoj. Oriente de la kanalo, norde de Ypern, Zuavoj kaj alĝeriaj pafistoj provis ataki nian dekstran alon; la atako malsukcesis sub nia pafado. — En la Champagne norde de Le Mesnil la Francoj ne povis repreni la pozicion antaŭhieraŭ de ni prenitajn. La grupo de fortikigitaj pozicioj 1000 m larĝa kaj 300 m longa de ni estas tutamplekse fortikigita kaj estas defendata. — En la Argonnes niaj trupoj atakprenis kontraŭulan tranĉeon norde de Le Four de Paris, kaptis 1 oficiron kaj 30 soldatojn kaj defendis la prenitajn teritorion kontraŭ kelkaj kontraŭatakoj. Apud Cornay, ĉe la orienta rando de la Argonnes, kontraŭula aeroplano falegis teren; la ensidantoj estas senvivaj. — Inter Maas kaj Mosel la Francoj hieraŭ sensukcese atakis la poziciojn de ni prenitajn sur la Maas-altaĵoj; ankaŭ norde de Flirey kontraŭula atako malsukcesis kun gravaj perdoj. En la bataloj sur la Maas-altaĵoj de la 24a ĝis la 28a de aprilo la Francoj perdis sole kaptitojn; 43 oficirojn, inter ili 3 regimentestroj, kaj ĉirkaŭ 4000 soldatojn. — La ĉeborda fortifikajeto Harwich ĉe la orienta angla marbordo lastnokte estis bombardata per bomboj.

Orienta militkampoj: La avangardoj de niaj trupoj agantaj en nordokcidenta Rusujo hieraŭ atingis sur larĝa fronto la fervojon Dünaburg-Libau. La tie starantaj rusaj trupoj, inter kiuj estas ankaŭ la restintaj partoprenintoj en la rabiro kontraŭ Memel, nenie provis menciinde resisti. Nun oni batalas apud Scawle. — Apud Kalvarja nemalgrandaj rusaj atakoj malsukcesis kun multaj perdoj; 5 oficiroj, 500 Rusoj vunditaj venis al niaj manoj. Ankaŭ pli sude rusaj atakoj malsukcesis inter Kalvarja kaj Augustowo. La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 1. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: La hieraŭ sciigitaj bataloj sur la okcidenta kanalbordo nord-okcidente de Ypern malsukcesis kun tre multaj kontraŭulaj perdoj. Oriente de la kanalo, norde de Ypern, la kontraŭulo kelkfoje vane atakis. La fortifikajo Dünkirchen plue estis bombardata artilerie. — Inter Maas kaj Mosel infanteribataloj okazis nur inter Ailly kaj Apremont. La francaj atakoj ĉiuj malsukcesis multperde. Responde al la pafado kontraŭ niaj ripozejoj malantaŭ la fronto ni ĵetis je la 29-a de aprilo kelkajn grenadojn sur Reims-on. Ĉar la kontraŭulo tre bone konas la signifon de tia nia agado, li tre facile povus neokazigi bombardadon de Reims. — Hieraŭ la kontraŭulo ree perdis 3 aeroplanojn. Angla aeroplano estis pafe terenigata sudokcidente de Thielt. Alia aeroplano estis terenigata kaj pafdetruita apud Wieltje, nordoriente de Ypern. Tria aeroplano estis devigata, el kontraŭula eskadro tereniĝi apud Niedersulzbach i. E.

Orienta militkampoj: La bataleto apud Scawle finiĝis favore al ni. Ekbruliginte Scawle'n kaj suferinte grandajn perdojn la Rusoj fugis turnitaj al Mitau. La persekutado daŭras. Ĝis nun ni akiris proksimume 1000 kaptitojn. Krom tio venis al niaj manoj 10 maŝinpafiloj, granda aro da pakajoj, municio-veturiloj kaj precipe multe da municio. Kontraŭulaj atakoj apud Kalvarja kaj sudokcidente estis repuŝataj kun multaj perdoj; 350 Rusoj estis kaptataj. Kontraŭe la Rusoj sukcesis, surprize ataki sudokcidente de Augustow germanan antaŭpostenan kompanion kaj grave ĝin difekti. Oriente de Plock kaj sur la suda bordo de la Pilica mal-fortaj rusaj atakoj estis repuŝataj. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 2. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: En Flandern la kontraŭulo ree provis, post tre forta artileripafado ataki nian novan pozicion nordoriente de Ypern. La Francoj atakis energie inter la kanalo kaj la ŝoseo Ypern-St. Julien, la Angloj neenergie oriente de tie. Precipe pro nia tre efika elflanka kaj eldorsa pafado el la regiono de Broodseinde kaj Veldhoek ĉiuj penoj estis absolute sensukcesaj. 3 maŝinpafiloj restis inter niaj manoj. — En la Argonnes niaj atakoj bone progresis norde de Le Four de Paris. Malgraŭ plej forta resisto la Francoj perdis kelkajn tranĉeojn kaj 156 kaptitojn. — Inter Maas kaj Mosel fortaj bataloj okazis nur en la Priesterwald, kie la Francoj grandare atakis kelkajn fojojn. La kontraŭulo, kiu kelkloke venis ĝis en niajn tranĉeojn, estis repuŝata kun multaj siaj perdoj; ni akiris 90 kaptitojn. — Hieraŭ ni ree faris 2 kontraŭulajn aeroplanojn ne plu batalpovaj. Unu estis pafdetruita apud Reims; alia nord-okcidente de Verdun estis devigata, el eskadro plej rapide surteriĝi.

Orienta militkampoj: Niaj agoj en nordokcidenta Rusujo bone progresis. Apud Scawle ni kaptis plue 400 Rusojn. Persekutante la fugantajn Rusojn germanaj avangardoj atingis la regionon sudokcidente de Mitau. — Rusaj atakoj apud Kalvarja estis repuŝataj kun multaj kontraŭulaj perdoj. 300 kaptitoj restis inter niaj manoj. La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 3. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: En Flandern ni atakis hieraŭ kun sukceso nordoriente de Ypern sur ambaŭ flankoj de la ŝoseo Poelcappelle-Ypern kaj prenis la biendomojn Fortuin sudoriente de St. Julien. En la Champagne per sukcesa eksplodigo de minoj ni kaŭzis sufiĉe grandan difekton al la kontraŭula pozicio inter Souain kaj Perthes. Inter Maas kaj Mosel hieraŭ nur artileribataloj okazis. Ĉe la Hartmannsweilerkopf la Francoj lastnokte vane atakis nian surpintan pozicion. Franca aeroplano hieraŭ surteriĝis apud Hundlingen okcidente de Saargemünd; ambaŭ ensidantoj estis kaptataj. Germana aeroplaneskadro hieraŭ atakis la aersifalon kaj la stacidomon Epinal kun videble bona sukceso.

Orienta militkampoj: Plue persekutante la Rusojn fugantajn kontraŭ Riga'n ni akiris hieraŭ 4 kanonojn kaj 4 maŝinpafilojn kaj sude de Mitau ree 1700 kaptitojn; tie do ni kaptis entute 3200 Rusojn. Rusaj atakoj sudokcidente de Kalvarja malsukcesis kun multaj kontraŭulaj perdoj; la Rusoj estis repelataj ĝis trans la Szesupa'n kaj lasis en niaj manoj 330 kaptitojn. Ankaŭ nordoriente de Skierniewice la Rusoj suferis gravan malvenkon kaj perdis krom tre multaj mortigitoj 100 kaptitojn.

Sudorienta militkampoj: Dum ĉeesto de la plej supera komandanto arkiduko Friedrich kaj komandataj de Generaloberst v. Mackensen la unuiĝintaj trupoj post fortaj bataloj ĉie reprenis kaj sur multaj lokoj perkutis la tutan rusan fronton en okcidenta Galicio de proksime de la hungara limo ĝis la enfluo de la Dunajec en la Weichsel'on. Tiuj partoj de l'kontraŭulo, kiuj povis fugi, plej rapide returnenmarŝas orienten kaj estas fortege persekutataj de la unuiĝintaj trupoj. La trofeoj de l'venko ne proksimume jam estas takseblaj.

La armeestraro.

Berlin, 3. Majo 1915.

La 1an de majo posttagmeze germana submaro boato apud la Gallopa lumŝipo mergis per torpedo la anglan kontraŭ-torpedoboaton „Recruit“. Dum la sama tago proksime de la Noordhinda lumŝipo okazis bataleto inter 2 germanaj antaŭpostenaj boatoj kaj kelkaj armitaj anglaj fiŝvaporŝipoj; unu el la anglaj ŝipoj estis detruata. Divizio da anglaj kontraŭ-torpedoboatoj ekpartoprenis la bataleton, en kiu fine ni perdis niajn antaŭpostenajn boatojn. Laŭ publikigo de la brita admiralaro la plej granda parto de la ensidantaroj estis savata.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Berlin, 4. Majo 1915.

La 3an de majo germana marino-aerŝipo bataletis kontraŭ kelkaj anglaj submaraj boatoj en la Nordmaro. Ĝi jetis bombojn sur la boatojn kaj mergis unu el ili. La submaraj boatoj pafis la aerŝipon per kanonoj, sed ne trafis ĝin. La aerŝipo revenis nedifektita.

La vicestro de l'admiralstabo: Behncke.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 4. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: En Flandern ni daŭrigis kun granda sukceso niajn atakojn elnorde kaj eloriente. Hodiaŭ matene Zevenkote, Zonnebeke, Westhoek, la Polygonerveld-arbaro kaj Nonne Bosschen — pro kiuj de multaj monatoj plej forte estis batalate — de ni estas prenitaj. La returnenmarŝanta kontraŭulo estas elflanke pafata de niaj baterioj norde kaj sude de Ypern. En la Argonnes la Francoj norde de Le Four de Paris vane provis, repreni tranĉeon de ni prenitan je la 1^a de majo. La artileribataloj inter Maas kaj Mosel ankaŭ daŭras plu.

Orienta militkampoj: La nombro de la Rusoj kaptitaj dum la persekutado al Mitau kreskis al pli ol 4000. Denovaj rusaj atakoj sudokcidente de Kalvarja estis repuŝataj; 170 kaptitoj restis ĉe ni. Same rusaj atakoj sudoriente de Augustowo malsukcesis kun multaj perdoj de l' kontraŭulo, kiu krome perdis 4 oficirojn kaj 420 soldatojn kaptitajn kaj 2 maŝinpafilojn. Ankaŭ apud Jedwabno nordoriente de Lomcza rusa nokta atako estis repuŝata. — La ofensivo inter la Waldkarpaten kaj la supera Weichsel bone daŭras. La akiraĵo en la unua tago estis 21500 kaptitoj, 16 kanonoj, 47 maŝinpafiloj kaj ĉiuspeca milita materialo, kies amaso ne jam estas laksebla. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 5. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Kun plej gravaj perdoj la Angloj plue returneniras turnitaj al la antaŭponta pozicio plej proksime de Ypern oriente. Fe. Vanheule, Eksternest, la kastela parko de Herenthage kaj Het Pappotje-Fe. hodiaŭ estas prenitaj de ni. — Inter Maas kaj Mosel oni agis pli vigle. En la Priesterwald, nordokcidente de Pont-à-Mousson, la Francoj hieraŭ atakis kun fortaj taĉmentoj. Malgraŭ antaŭe longdaŭra artileribombardado la atako malsukcesis sub nia pafado kun grandaj kontraŭulaj perdoj. Kontraŭe ni atakis en la arbaro de Ailly kaj pli oriente kaj bone progresis. Tie ni kaptis ĝis nun 10 oficirojn kaj 750 soldatojn.

Orienta militkampoj: Rusaj atakoj elsudoriente kontraŭ Rossieni estis repuŝataj. La kontraŭulo estas persekutata. Ankaŭ apud Kalvarja kaj nordoriente de Suwalki kaj oriente de Augustow multaj rusaj atakoj malsukcesis. Tie ni kaptis ĉirkaŭ 500 Rusojn. Ĉe la aliaj partoj de la fronto okazis kelkaj sendistancaj bataloj; ĉiuj finiĝis favore al ni.

Sudorienta militkampoj: La atakantaj unuigintaj trupoj hieraŭ perkutis jam la trian fortikigitan linion de la Rusoj, kiuj tie repuŝitaj ĉe la tuta fronto returneniris al la Wisloka. La grandon de l' venko oni povas ekkoni el tio, ke sekve de la perkuto de la unuigintaj trupoj la Rusoj komencas, malokupi la poziciojn elnorde minacatajn en la Waldkarpaten sudokcidente de Dukla. — Pro la rapideco de niaj sukcesoj ne estas eble, sciigi nombrojn pri la akiraĵoj el nia venko. Laŭ provizoraj raportoj la nombro de la kaptitoj ĝis nun ŝajnas esti pli granda ol 30000.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 4. Majo 1915.

La tre fortikigita rusa fronto inter la Weichsel kaj la ĉefdorso de la Karpaten estis tutamplekse venkata. La signifo de nia sukceso ne proksimume jam estas taksebla. La nombro de la kaptitoj ĝis nun kreskis al pli ol 30000 soldatoj kaj pligrandiĝas ĉiuhore. En la multnombraj konkeritaj rusaj pozicioj multego da pormilita materialo estis prenata. Inter la unuaj kaptaĵoj estas 22 kanonoj kaj 64 maŝinpafiloj.

(Mallongigita.)

La vicestro de l'generalstabo: von Hoefler.

Großes Hauptquartier, 6. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Preskaŭ ĉe la tuta fronto fortaj artileribataloj okazis. Apud Ypern ni avancis plu apud la fervojo Messines-Ypern kaj prenante la Fe. Vanheule ni akiris kelkcentojn da kaptitoj kaj 15 maŝinpafilojn. En la arbara regiono apud Combres ni prenis atakante 4 francajn oficirojn, 135 soldatojn, 4 maŝinpafilojn kaj 1 minjetilon. — Nia hieraŭa atako en la Ailly-arbaro sukcesis laŭdezire. La kontraŭulo estis puŝata el sia pozicio; pli ol 2000 Francoj, inter ili 21 oficiroj, 2 kanonoj kaj kelkaj maŝinpafiloj kaj minjetiloj estis nia kaptaĵo. Ankaŭ hodiaŭ la Francoj suferis tre gravajn perdojn. — Norde de Flirey kaj apud Croix-des-Carmes la kontraŭulo atakis. Norde de Flirey li enpenetris sur unu loko nian tranĉejon. Pro malgranda peco oni batalas ankoraŭ. — En la Vogesen atako kontraŭ nia pozicio norde de Steinabrück estis repuŝata.

Orienta militkampoj: Sudokcidente de Mitau, sude de Szadow kaj oriente de Rossienie la bataloj daŭras ankoraŭ. Nordoriente kaj sudokcidente de Kalvarja fortaj rusaj taĉmentoj hieraŭ kelkfoje atakis niajn poziciojn. Ĉiuj atakoj malsukcesis kun tre grandaj kontraŭulaj perdoj. Same nesukcesis atakoj kontraŭ niaj antaŭpontaj pozicioj ĉe la Pilica. — Sur la fortifikaĵoj Grodno ni lastnokte ĵetis bombojn.

Sudorienta militkampoj: En okcidenta Galicio la postgvardioj de l'fuganta kontraŭulo hieraŭ provis, plejforte resisti la unuiĝintajn trupojn komandatajn de Generaloberst v. Mackensen; sed sur la altaĵoj de l'maldekstra Wisloka-bordo supre kaj malsupre de la Ropa-enfluo ni venkis per nekontraŭstareblaj atakoj. Jam vespere ni ne nur transiris kelkloke la Wisloka'n, sed okupis ankaŭ la montselan vojon de Dukla kaj la urbon Dukla mem. Oriente de Tarnow kaj norde ĝis la Weichsel oni batalis sur la dekstra bordo de l'Dunajec ĝis la nokto. La nombro de la kaptitoj kreskis al 40000, kiuj estis prenataj nur en frontbataloj. — En la Beskiden-montaro, ĉe la vojo trans la Lupkow-montselon, atako de la trupoj de kavaleriĝeneralo v. d. Marwitz bone progresas paralele al atako de la aŭstra-hungara armeo, kun kiu ili estas ligitaj.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 6. Majo, tagmeze.

La tuta fronto de la unuiĝintoj sukcese avancis en okcidenta Galicio. Fortaj rusaj taĉmentoj en la Beskiden estas minacataj elflanke. Ni jam okupis la regionon de Jaslo kaj Dukla. La nombro de la kaptitoj kreskis al pli ol 50 000. En la Orawa-valo forta rusa atako kontraŭ la Ostry-altaĵo estis sange repuŝata; ni kaptis 700 Rusojn.

Je la 4a posttagmeze: Niaj trupoj atake prenis ankaŭ la lastajn rusajn poziciojn sur la altaĵoj oriente de la Dunajec kaj de la Biala. De post la 10a antaŭtagmeze Tarnow ree estas nia. (Mallongigita.) La vicestro de l'generalstabo: von Hoefler.

Großes Hauptquartier, 7. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Apud Ypern ni vanigis ĉiujn provojn de la Angloj, forpreni de ni la altaĵon 60 sudoriente de Zillebeke, kiu depost la 17a de aprilo estas gravega batalpunkto. Ni plu avancis tie kontraŭ Ypern. La kontraŭulo hieraŭ perdis en ĉi tiuj bataloj 7 maŝinpafilojn, 1 minjetilon kaj grandan nombron da pafiloj kaj municio. Daŭrigante la atakojn la Angloj hodiaŭ matene suferis pluajn grandajn perdojn. — Inter Maas kaj Mosel ni defendis kaj fortikigis la prenitajn teritoriojn sur la Maas-altaĵoj kaj sudokcidente kaj sude de la Ailly-arbaro. Apud Flirey la Francoj posedas ankoraŭ mallongan pecon de unu nia tranĉeo; escepte de tio ĉiuj atakoj estis repuŝataj. — Atakprovoj de l'kontraŭulo norde de Steinabrück en la Fechtvalo estis malebligataj per nia pafado, antaŭ ol ili povis evolui.

Orienta militkampoj: La bataloj sude de Szadow kaj oriente de Rossienie finiĝis per absoluta malvenko de la Rusoj, kiuj multe perdis, postlasis 1500 kaptitojn kaj estas nun returnenmarŝantaj. Sudokcidente de Kalvarja, sude de Augustowo kaj okcidente de Praszysz rusaj izolaj atakoj estis sange repuŝataj. La Rusoj tie perdis sume 520 kaptitojn.

Sudorienta militkampoj: Ankaŭ la bataloj sur la dekstra bordo de la malsupra Dunajec finiĝis hieraŭ per absoluta sukceso de la unuiĝintaj trupoj. La kontraŭulo tie plej rapide marŝas orienten; nur ĉe la Weichsel malgranda lia taĉmento sin defendis ankoraŭ. Pli sude ni antaŭenmarŝis sur la dekstra bordo de la Wisloka turnitaj al la Wislok kaj trans la Jasiolka'n. Multfoje partoj el la dekstra alo de l'armegrupo de Generaloberst v. Mackensen jam renkontis plej rapide returnenmarŝantajn rusajn taĉmentojn, kiuj forlasis la Karpatenfronton okcidente de la Lupkow-montselo kaj senpere estas sekvataj de niaj aŭstraj-hungaraj konfederitoj. — Kun ĉiu paŝo antaŭen la akiraĵo el la venko pligrandiĝas.

La armeestraro.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 8. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Antaŭ Zeebrügge niaj surbordaj baterioj mergis hieraŭ vespere kontraŭulan kontraŭ-torpedobaton. Ĉe la plej granda parto de la fronto kiel kutime artileribataloj okazis, kiuj kelktempe sur kelkaj lokoj plifortiĝis, ekz. apud Ypern, norde de Arras, en la Argonnes kaj sur la Maas-altaĵoj. Infanteribatalo nur en la Vogesen okazis. Tie post kelkhora artileripafado la Francoj vespere atakis niajn poziciojn apud Steinabrück ambaŭflanke de la Fecht-valo. Ĉiuj atakoj malsukcesis kun grandaj kontraŭulaj perdoj.

Orienta militkampoj: Niaj trupoj antaŭenirantaj kontraŭ Libau ekposedis tiun urbon. Ili akiris 1600 kaptitojn, 12 kanonojn kaj 4 maŝinpaŝilojn.

Sudorienta militkampoj: La armegrupo Mackensen kaj la kunaj konfederitoj ankaŭ hieraŭ senĉese daŭrigis la persekutadon de l' venkita kontraŭulo, nekalkulite kelkaj sukcesaj bataloj de la postgvardio. Vespere niaj antaŭgvardioj jam transiris la Wislok'on en la regiono de Krosno. Per la komuna kunagado de ĉiuj antaŭenirantaj armeopartoj nemalgrandaj rusaj taĉmentoj estis izolataj, tiel ke la suma nombro de la kaptitoj akiritaj sur la Galicia militkampoj de post la 2a de majo kreskis ĝis nun al proksimume 70 000. Ni forprenis de la Rusoj 38 kanonojn, inter ili 9 pezajn.

La armeestraro.

Berlin, 8. Majo 1915.

La 7an de majo la angla kontraŭ-torpedobato „Maori“ estis mergata per la pafado de niaj surbordaj baterioj antaŭ Zeebrügge. La kontraŭ-torpedobato „Crusador“, kiu provis helpe aliri, estis devigata sin retiri kaj forlasi la elmetitajn helpajn boatojn. La tuta ensidantaro de la „Maori“ kaj la ensidantoj en la boatoj de l' „Crusador“ estis savataj de niaj ŝipoj kaj transportataj al Zeebrügge, sume 7 oficiroj kaj 88 soldatoj. — Kiam je la 7a de majo niaj trupoj antaŭenmarŝis kontraŭ Libau, nia ŝiparo en la Orienta Maro helpis la atakon pafadante de sur la maro.

La vicestro de l' marino-admiralstabo: Behncke.

Großes Hauptquartier, 9. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Daŭrigante niajn atakojn kontraŭ Ypern ni elpuŝis la kontraŭulon el sia tre fortika pozicio inter la ŝoseoj Fortuin-Wieltie kaj Gheluvelt-Ypern; ni prenis la vilaĝojn Frezenberg kaj Verloerenhoek kaj ekposedis per tio gravajn altaĵojn, kiuj regas oriente la ĉirkaŭaĵon de Ypern. 800 Angloj, inter ili 16 oficiroj, estis kaptataj ĝis nun. — Francaj atakoj okcidente de Lievin, nordoriente de la Lorette-altaĵo, malsukcesis kun kontraŭulaj perdoj. Apud La Bassée kaj Vitry (oriente de Arras) po 1 aeroplano estis devigata surteriĝi. Okcidente de Perthes franca izola atako, entreprenita helpe de bomboj eljetantaj nebulon, estis repuŝata per mangrenadoj. En la Argonnes, inter Maas kaj Mosel kaj en la Vogesen la tago pasis sen gravaj okazaĵoj.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 9. Majo 1915.

Orienta militkampoj: En Libau ni konfiskis grandajn provizojn da pormilita materialo. Pro fortaj taĉmentoj ĉiuspecaj, kiujn la kontraŭulo kunvenigis apud Mitau, niaj antaŭgvardioj starantaj antaŭ tiu urbo malrapide sin retiris. — Pereiginte rusan batalionon ni radikale detruis nordoriente de Kowno la fervojon Wilna-Scawle. Ĉe la Njemen, apud Sreducki, ni kaptis la restojn de 4 disĉasitaj rusaj batalionoj, kiuj verŝajne apartenas al la trupoj venkitaj la 6 an kaj 7 an de majo apud Rossieny. Denovaj rusaj atakoj kontraŭ niaj pozicioj ĉe la Pilica estis repuŝataj kun multaj kontraŭulaj perdoj.

Sudorienta militkampoj: Persekutante la venkitan kontraŭulon la trupoj de Generaloberst von Mackensen post batalo transiris la Wislok'on inter Besko (oriente de Rymanow) kaj Fryeztok. Pro la premo de la unuiĝintaj batalantaj oriente kaj norde de Tarnow la kontraŭulo returneniras al Mielec kaj trans la Weichsel'on. Ĉe la ŝanceliĝanta rusa fronto en la Karpaten aliaj germanaj trupoj repuŝis la kontraŭulon el iliaj pozicioj apud la fervojo Mezölaborcz-Sanok. La nombro de la akiritaj kanonoj kaj kaptitoj ankoraŭ ĉiam kreskas.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 10. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Turnitaj al Nieuport ni progresis en la dunoj ĉe la bordo kaj prenis kelkajn tranĉeojn kaj maŝinpafilojn. La kontraŭulo per kontraŭatako venis ĝis antaŭ Lombartzyde, sed poste estis tute repuŝata. Ankaŭ en Flandern ni avancis denove. Apud Verloerenhoek ni kaptis 162 Anglojn. — Sudokcidente de Lille komenciĝis la granda franca-angla atako de ni atendita kiel respondo al niaj sukcesoj en Galicio. Ĝi estis entreprenata kontraŭ niaj pozicioj oriente de Fleurbaix, oriente de Richebourg, oriente de Vermelles, en Ablain, Carency, Neuville kaj St. Laurent apud Arras. La kontraŭulo — Francoj, blankaj kaj koloraj Angloj — antaŭenmarŝigis minimume 4 novajn korpuseojn krom la taĉmentoj jam delonge batalantaj sur ĉi tiu frontparto. Tamen preskaŭ ĉie la kelkfojaj atakoj, precipe la anglaj, estis repuŝataj kun tre gravaj kontraŭulaj perdoj. Ni prenis ĉirkaŭ 500 kaptitojn. Nur en la regiono inter Carency kaj Neuville la kontraŭulo sukcesis, okupi nian plej antaŭan linion. La kontraŭatako estas komencita. — Norde de Steinabrück en la Fechtvalo ni atake repuŝis la kontraŭulon, kiu dum densa nebulo estis sidiĝinta proksimege antaŭ nia pozicio, kaj detruis liajn tranĉeojn. — Unu nia aerŝipo hodiaŭ matene jetis kelkajn bombojn sur la fortikigitan lokon Southend apud la marenfluo de la Themse.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

Sudorienta militkampoj: Malgraŭ ĉiuj provoj de l'kontraŭulo, ĉesigi nian persekutadon per taĉmentoj rapide alkondukitaj fervoje aŭ piede, la unuiĝintaj trupoj de la armegrupo de Generaloberst von Mackensen ankaŭ hieraŭ elpuŝis la Rusojn el unu ilia pozicio post la alia kaj akiris pli ol 12 000 kaptitojn kaj multe da materialo. Per tio la nombro de la kaptitoj prenitaj sole de tiu armegrupo depost la 2a de marto kreskas al pli ol 80 000 (okdek mil). Niaj antaŭgvardioj alproksimiĝas al la Stobnica kaj atingis Brzezanka'n kaj la malsupran Wislok'on. La persekutado daŭras.

La armeestraro.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 10. Majo 1915.

La 3a rusa armeo repuŝita kun multaj siaj perdoj el okcidenta Galicio kaj el la Karpaten nun staras sur la malvasta loko apud Sanok kaj Lisko. La unuiĝintaj armeoj transiris la Wislok'on kaj atingis la linion Dwernik-Balıgrod-Bukowsko. Kelkaj vilaĝoj oriente kaj nordoriente de Debica estis prenataj atake. La nombro de la kaptitoj en okcidenta Galicio kreskis al 80000. Krom tio ni akiris per la persekutado en la Karpaten pli ol 20000 kaptitojn. Do la 3a rusa armeo perdis 100000 (cent mil) kaptitojn. En la aro de la pormilita materialo ne jam konstatebla ni nombris ĝis nun 60 kanonojn kaj 200 maŝinpafilojn. — La bataloj en sudorienta Galicio daŭras. La vicestro de l'generalstabo: von Hoefer.

(Mallongigita.)

Großes Hauptquartier, 11. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Hieraŭ antaŭtagmeze ni pafade forpelis anglan ŝipon de linio antaŭ Westende. Oriente de Ypern ni progresis plu kaj akiris 5 maŝinpafilojn. Sudokcidente de Lille la Francoj daŭrigis la atakojn kontraŭ Ablain, Carency kaj la Lorette-altaĵo. Ĉiuj atakoj estis repuŝataj. La nombro de la kaptitoj tie akiritaj kreskis al 800. Inter Carency kaj Neuville la Francoj defendas ankoraŭ la prenitajn tranĉeojn; la bataloj tie daŭras. — Sudokcidente de Lille angla aeroplano estis pafe terenigata. — Nordokcidente de Berry-au-Bac, en la arbaroj sude de La Ville-aŭ-Bois, niaj trupoj hieraŭ prenis per atako pozicion 400 m larĝan, formitan el du linioj kuŝantaj unu post la alia; ili akiris nombron da nevunditaj kaptitoj kaj 2 minjetilojn kun multe da municio. Kontraŭulaj infanteriatakoj norde de Flirey kaj en la Priesterwald malsukcesis kun nemalgrandaj perdoj de l'kontraŭulo.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

Sudorienta militkampoj: La Rusoj hieraŭ provis haltigi la persekutantajn armeojn komandatajn de Generaloberst v. Mackensen sur la linio Besko-Brzozow apud la Stobnica-Ropczyce (oriente de Debica)-Szczucin apud la Weichsel. Tio tute vaniĝis. Vespere la rusaj linioj estis rompataj sur multaj lokoj, precipe apud Besko kaj inter Brzozow kaj Lutcza; jam antaŭtagmeze malsukcesis kun plej grandaj kontraŭulaj perdoj ege forta atako de kelkaj rusaj divizioj el Sanok kontraŭ Besko. — La persekutado daŭras. La armeestraro.

Konstantinopel, 12. kaj 13. Majo 1915.

Kiam antaŭhieraŭ la angla krosŝipo „Implacable“ sensukcese bombardadis niajn anatolajn bateriojn apud la Dardanellen-eniro, ĝi estis trafata de 4 turkaj grenadoj kaj sin retiris. — Parto de nia ŝiparo hodiaŭ antaŭtagmeze atakis anglan kirasan ŝipon troviĝantan proksime de l'haveno de Morto apud la eniro de la Dardanellen. Tiu ŝipo trifoje estis trafata; apud la ponto de l'komandanto, meze kaj malantaŭe. Ĝi tuj subakviĝis. (Mallongigita.)

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 12. Maj 1915.
Berlin, 11. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Kontraŭ la aviadistoj hieraŭ elitis bombadoj sur la havenoj.
Oficiale. — La registaroj de Usono kaj de la neŭtralaj eŭropaj landoj ricevis pere de la tieaj oficialaj reprezentantoj de l' Germana Imperio jenan sciigon: La imperia registaro sincere bedaŭras la perdon de homaj vivoj sekve de la subakviĝo de la „Lusitania“, sed rifuzas ĉian respondecon. Per sia plano, venki nin per malsato, Anglujo devigis Germanujon same kontraŭagi; la germanan proponon, ke ĝi forlasu sian planon kaj Germanujo ĉesigu la batalon per submaraj boatoj, ĝi respondis per pliseverigo de la blokado. Anglaj komercŝipoj jam pro tio ne povas esti rigardataj ordinara komercŝipoj, ĉar ili laŭkutime estas armitaj, jam kelkfoje atakis niajn ŝipojn, por rami ilin, kaj jam pro tio estas neeble, ilin ekzameni. Antaŭ nelonge ja la sekretario de l' angla parlamento deklaris responde al demando de Lord Beresford, ke nun preskaŭ ĉiuj anglaj komercŝipoj estas armitaj kaj per mangrenadoj provizitaj. Krom tio la angla gazetaro malkaŝe konfesas, ke la „Lusitania“ estis armita per danĝeraj kanonoj.

Plue la imperia registaro scias, ke la „Lusitania“ dum siaj lastaj veturoj kelkfoje transportis grandajn arojn da pormilita materialo; ke la Cunard-vaporŝipoj „Mauretania“ kaj „Lusitania“ pro ilia rapideco estis rigardataj plej bone garditaj kontraŭ atakoj de submaraj boatoj kaj, pro tio prefere estis uzataj por tiaj transportoj. Estas konstatite, ke dum la nuna veturo la „Lusitania“ transportis 5400 kestojn da municio. Ankaŭ la kroma ŝarĝo plejgrandparte estis kontrabando. Nekalkulite la ĝenerala germana averto, la ambasadoro grafo Bernstorff ankoraŭ speciale estis avertinta pri veturo sur la „Lusitania“. Sed tiu averto ne estis atentata de la neŭtraluloj kaj eĉ frivole mokegata de la Cunard-societo kaj la angla gazetaro. Ĉar do Anglujo spite de tiu averto asertis, ke la ŝipo ne estos en danĝero; ĉar ĝi fikciis sufiĉajn rimedojn kontraŭ la danĝero kaj tiel incitis la vojaĝontojn al malatento de la germana averto kaj al veturo sur tiu ŝipo, kiu pro armado kaj ŝarĝo estis merginda: tial la respondeco pri la perdo de homaj vivoj, kiun la imperia registaro ege bedaŭras, estas ekskluzive sur la flanko de la imperia registaro de Granda Britujo.

Berlin, 14. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Kontraŭ la aviadistoj hieraŭ elitis bombadoj sur la havenoj.
El la raportoj de la submara boato, kiu mergis la „Lusitania“n, rezultas jenaj faktoj: La boato ekvidis la vaporŝipon, kiu ne surhavis flagon, la 7an de majo je la 2²⁰ posttagmeze apud la suda bordo de Irlando. La vetero estis bela kaj klara. Je la 3¹⁰ ĝi pafis torpedon kontraŭ la „Lusitania“ kaj trafis ĝian dekstran flankon apud la ponto de l' komandanto. La eksplodon de l' torpedo tuj sekvis plua eksplodo eksterordinare efika. La ŝipo rapide kliniĝis dekstren kaj eksubakviĝis. La dua eksplodo nepre klariĝas per la ekbruliĝo de l' amaso da municio troviĝanta en la ŝipo. La vicestro de l' admiralstabo: Behncke.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo! .:

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 12. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Kontraŭulaj aviadistoj hieraŭ eljetis bombojn super la belga urbo Brügge, sed ne kaŭzis militistan difekton. Oriente de Ypern ni prenis gravan altajn defenditan de skotaj „highlands“. Dünkirchen plue estis bombardata. Oriente de Dixmuiden ni pafe terenigis anglan aeroplanon. — La tranĉeoj de la Francoj dum la lastaj tagoj prenitaj inter Carency kaj Neuville (norde de Arras) estas ankoraŭ sub iliaj manoj. Escepte de tie ankoraŭ hieraŭ malsukcesis ĉiuj provoj de l' kontraŭulo, rompi nian fronton. Ĉefe estis atakataj niaj pozicioj oriente kaj sudoriente de Vermelles, kontraŭ la Lorette-altaĵo, kontraŭ Ablain, Carency kaj niaj pozicioj norde kaj nordoriente de Arras. Ĉiuj atakoj malsukcesis kun plej grandaj kontraŭulaj perdoj. — Malsukcesis provo de l' kontraŭulo, forpreni de ni la Hartmannsweilerkopf-on. Post forta artileripafado francaj alpoĉasistoj ja enpenetris nian fortikan domon kuŝantan sur la supro, sed tuj estis reelpuŝataj.

Orienta militkampoj: Apud Scawle okazas bataleto ne jam decidita. Apud la Bzura ni pereigis rusan batalionon, kiu provis transiri la riveron.

Sudorienta militkampoj: Inter Karpaten kaj Weichsel ni persekutadas la Rusojn senhalte. La kontraŭulo plue suferis gravajn perdojn ĉe la tuta fronto. Ekzemple la 4a gvardio-infanteriregimento sole kaptis 4 oficirojn, inter ili kolonelon, kaj 4500 soldatojn kaj akiris 4 kanonojn, maŝinapilo-kompanion kun la ĉevaloj kaj veturilojn kun provizoj. — Inter Sanok kaj Dynow la unuiĝintaj trupoj transiris la San'on. Pli nordokcidente ili atingis la regionon de Rzeszów-Mielec. La trupoj batalantaj en la Karpaten ambaŭflanke de la Stryj elpuŝis la kontraŭulon el ĉiuj liaj pozicioj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 13. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Oriente de Ypern ni prenis pluan kontraŭulan pozicion. Posttagmeze ni repuŝis kun plej grandaj kontraŭulaj perdoj fortajn francajn atakojn kontraŭ nia fronto Ablain-Neuville. La vilaĝo Carency, kiun la Francoj preninte niajn antaŭajn tranĉeojn inter Neuville kaj Carency estis ĉirkaŭprenintaj plejgrandparte, kaj la okcidenta parto de Ablain lastnokte estis malokupataj de ni. Bedaŭrinde ni perdis tie nombron da niaj bravaj soldatoj kaj da materialo. Francaj provoj, repreni la tranĉepecon de ni prenitan nordokcidente de Berry-au-Bac en la arbaroj sude de Ville-au-Bois, ne sukcesis. — Post forta bombardado la kontraŭulo hieraŭ vespere atakis niajn poziciojn inter Maas kaj Mosel apud Croix-des-Carmes. Li sukcesis, enpenetri sur fronto 150–200 m larĝa; sed per plej forta sendistancaj bataloj ni tute reelpuŝis la Francojn el niaj pozicioj kaj akiris nombron da kaptitoj. Du francaj fortikigitaj domoj sur la okcidenta deklivo de la Hartmannsweilerkopf estis pafdetruataj de nia artilerio.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis. Apud Scawle ia batalo ne jam estas decidita.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 13. Majo 1915.

Sudorienta militkampoj: La armegrupo de Generaloberst von Mackensen persekutante atingis hieraŭ la regionon de Dubiecko (ĉe la San) – Lancut (ĉe la malsupra Wislok) – Kolbuszowa (nordoriente de Debica). Sekve de tiu nia antaŭenmarŝo la Rusoj forlasas ankaŭ siajn poziciojn norde de la Weichsel; proksimege sekvan la kontraŭulon, la trupoj de Generaloberst v. Woyrsch tie alvenis ĝis la regiono sude kaj nordokcidente de Kielce. — En la Karpaten, aŭstraj – hungaraj kaj germanaj trupoj komandataj de generalo v. Linsingen prenis batale la altaĵojn oriente de la supra Stryj; ili akiris 3650 kaptitojn kaj 6 maŝinpafilojn.

Nun, kiam la armeoj de Generaloberst v. Mackensen alproksimiĝas al la fortifikaĵo Przemyśl kaj al la malsupra San, oni povas proksimume taksu la trofeojn el la batalo apud Gorlice kaj Tarnow kaj el la postaj bataloj dum la persekutado. Tiuj armeoj ĝis nun kaptis 103 500 Rusojn kaj atake prenis 69 kanonojn kaj 255 maŝinpafilojn. En ĉi tiuj nombroj ne estas enkalkulitaj la trofeoj de la unuiĝintaj trupoj en la Karpaten kaj norde de la Weichsel, kie multe pli ol 40 000 Rusoj estis kaptataj. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 14. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Fortaj anglaj atakoj kontraŭ nia nove akirita fronto antaŭ Ypern malsukcesis kun gravaj kontraŭulaj perdoj. Apud la ŝoseo Menin–Ypern ni avancis plu turnitaj al Hooge. Sudokcidente de Lille la kontraŭulo post forta bombardado atakis nur sur kelkaj lokoj; ĉiuj atakoj estis repuŝataj. Ĉe la Lorette-altaĵo kaj norde de Arras la tago pasis preskaŭ trankvile; fortaj kontraŭulaj atakoj ne okazis. Dum la forpreno de Carency ni perdis 600 ĝis 700 soldatojn. Plua provo de l' kontraŭulo, repreni la tranĉepecojn de ni prenitajn nordokcidente de Berry-au-Bac, ree malsukcesis. Inter Maas kaj Mosel kontraŭula atako en la Priesterwald malsukcesis antaŭ niaj pozicioj sub nia pafado. — La ensidantoj de franca biplano terenigita apud Hagenau estis kaptataj.

Orienta militkampoj: Apud Scawle la bataloj ankaŭ hieraŭ ne jam estas finitaj. Norde de la Njemen, apud la malsupra Dubissa, ni akiris dum nokta atako 80 kaptitojn. — Post kvarfoja vana atako partoj de la 1a turkeŝtana korpuso venis ĝis en niajn plej antaŭajn tranĉeojn okcidente de Praszysz. Vespere la kontraŭulo ĉie estis reelpuŝita; li suferis grandajn perdojn; 120 kaptitoj restis inter niaj manoj.

Sudorienta militkampoj: La avangardoj de la armeoj de Generaloberst von Mackensen staras antaŭ Przemyśl kaj sur la maldekstra bordo de la malsupra San. Dekstre kaj maldekstre de ili la unuiĝintaj trupoj daŭrigas la persekutadon en la direkto de Dulina–Dobromil kaj tra Polaniec (ĉe la Weichsel)–Kielce. Ankaŭ de Kielce ĝis la Pilica apud Inowłodz la Rusoj ne povis defendi siajn poziciojn kaj estas plej rapide returnenmarŝantaj orienten.

La armeestraro.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 15. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Apud Steenstraate ĉe la Yser-kanalo ni repuŝis noktan atakon. Apud la ŝoseo St. Julien-Ypern ni atakis plu kaj avancis. 3 anglaj oficiroj kun 60 soldatoj kaj 1 maŝinpafilo venis al niaj manoj. La nombro de la nevunditaj kaptitoj prenitaj de ni apud Ypern depost la 22^a de aprilo kreskis al 110 oficiroj kaj 5450 soldatoj; krom tio ni kaptis pli ol 500 vunditojn. — Sudokcidente de Lille ankaŭ hieraŭ fortaj artileribataloj okazis; la kontraŭula infanterio tie ne atakis. Apud la Lorette-altaĵo la plejmultaj kontraŭulaj atakprovoj estis malebligataj. Atako norde de la altaĵo, per kiu la kontraŭulo venis ĝis en niajn tranĉeojn, estis repuŝata kun multaj kontraŭulaj perdoj. Ni konstatis, ke malokupante Carency-on kaj la okcidentan parton de Ablain ni perdis malpezan kanonon muntitan en la antaŭa linio kaj malgrandan nombron da provizoraj minĵetiloj; krom tio revenis al la manoj de l' kontraŭulo 5 francaj kanonoj antaŭe de ni prenitaj, nome 3 malgrandaj revolverkanonoj kaj 2 bombardiloj, kiujn ni uzis kiel minĵetilojn. — Norde de Arras preskaŭ nenio okazis. Prenante kelkajn kontraŭulajn tranĉeojn sude de Ailly, oriente de la Maas, ni kaptis 52 vunditajn kaj 166 nevunditajn Francojn, inter ili batalionestron. Tri kontraŭulaj atakoj kontraŭ niaj pozicioj apud la ŝoseo Essey-Flirey estis repuŝataj. — Dum matena krepusko ni atake ekposedis kontraŭulan tranĉeon en la Priesterwald kaj akiris kelkajn kaptitojn.

Orienta militkampoj: Post negrava sukceseto de l' kontraŭulo, per kiu ni perdis 3 kanonojn, la antaŭenmarŝo de fortaj rusaj taĉmentoj apud Scawle estas haltigita. Kontraŭulaj atakoj kontraŭ la malsupra Dubissa malsukcesis. Rapide la Rusoj nun helpe alkondukis trupojn ankaŭ al la regiono sude de la Njemen; bataletoj kontraŭ ili ne jam okazis. Apud Augustowo kaj Kalwarja kontraŭulaj atakoj estis repuŝataj.

Sudorienta militkampoj: Sude de la malsupra Pilica ĝis la Weichsel la unuiĝintaj trupoj daŭrigas la persekutadon de la Rusoj, kiuj plue returnenmarŝas. La antaŭponta pozicio apud Jaroslau ĉe la San hieraŭ estis atake prenata. Ŝultro ĉe ŝultro kun la aŭstra-hungara armeo, kun kiu ili estas ligitaj, la trupoj de generalo v. d. Marwitz alvenis al la regiono de Dobromil. Ankaŭ pli sude la persekutado daŭras senĉese. Multloke la unuiĝintaj trupoj atingis la elirejojn de l' montaro.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 16. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Norde de Ypern nigrulaj trupoj depost hieraŭ posttagmeze nenielantentante siajn perdojn atakas niajn poziciojn okcidente de la kanalo apud Steenstraate kaj Het Sas. Apud Het Sas la atako estis repuŝata, apud Steenstraate la batalo daŭras ankoraŭ. — Post forta artileripafado angla infanterio ekatakis sudokcidente de Lille niajn poziciojn sude de Neuve Chapelle; sur kelkaj lokoj ili jam estas repuŝitaj, sur aliaj oni batalas ankoraŭ. Pli sude ambaŭflanke de la Lorette-altaĵo, apud Souchez kaj norde de Arras apud Neuville denovaj francaj atakoj malsukcesis sub nia pafado. Precipe sur la Lorette-altaĵo,

(Daŭrigo sur folio 138.)

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

apud Souchez kaj Neuville la Francoj suferis gravajn perdojn. — Okcidente de la Argonnes ni fakte ekposedis vespere fortan francan pozicion 600 m larĝan kaj 200 m longan norde de Ville-sur-Tourbe kaj defendis ĝin en tri noktaj atakoj, per kiuj la kontraŭulo suferis tre multajn perdojn. Multe da materialo kaj 60 kaptitoj venis al niaj manoj. Ĉe la tuta fronto inter Maas kaj Mosel viglaj artileribataloj okazis. Infanteribataloj okazis nur ĉe la okcidenta rando de la Priesterwald, kie la batalo ne jam finiĝis.

Orienta militkampoj: Apud Scawle rusa atako estis senpene repuŝata. La nombro de la kaptitoj prenitaj tie dum la lastaj tagoj superas 1500. Ĉe la Dubissa nordokcidente de Ugiany negranda nia taĉmento devis sin retiri pro pli fortaj rusaj trupoj; ĝi perdis 2 kanonojn. Pli sude, apud Eiragola, la Rusoj estis repuŝataj perdante 120 kaptitojn. Norde kaj sude de Augustowo kaj ambaŭflanke de la Omulew fortaj rusaj noktaj atakoj malsukcesis kun gravaj kontraŭulaj perdoj; ni prenis 245 kaptitojn.

Sudorienta militkampoj: Inter la Pilica kaj la Weichsel kaj sur la fronto Sambor (40 km sudoriente de Przemyśl) — Stryj — Stanisław la unuiĝintaj trupoj avancis plu. Apud la malsupra San, de Przemyśl malsupren, la kontraŭulo rezistas. —

Laŭ nia kutimo dum francaj atakoj altcelaj ni publikigas ĉi sube la francan bultenon por la nuna ofensivo norde de Arras:

„10^a armeo, 33. Corps d'armée, état-major.

Post militiro dum 9 monatoj, el kiuj 7 estis pasigataj en kampaj fortikaĵoj, venis la tempo, definitive streĉi la fortojn, por rompi la kontraŭulajn liniojn kaj — esperante pli bonajn sukcesojn — unue forpuŝi la Germanojn el nia teritorio. La momento estas favora. Neniam la armeo estis pli forta kaj inspirita de pli granda entuziasmo. Post la fortaj atakoj dum la unuaj monatoj la kontraŭulo nun nur defendas siajn okcidentan kaj orientan frontojn; sed la neŭtralaj nacioj atentis, ke per sukceso ni faru al ili signon por partopreni la batalon. — Ŝajnas, ke kontraŭ ni staras nur kelkaj divizioj; ni estas kvaroble pli fortaj ol la kontraŭulo kaj havas artilerion tiel teruran, kiel ĝi neniam staris sur batalejo. Nia tasko ne estas, surprize preni tranĉeon, sed venki la kontraŭulon. Tial estas necese, ataki lin eksterordinare forte kaj persekuti lin nekompareble persiste kaj ne atenti lacecon, malsaton, soifon aŭ suferojn. Ni atingis nenion, se la kontraŭulo ne estos venkita definitive. — Do estu konvinkita ĉiu — oficiroj, suboficiroj kaj soldatoj — ke de la momento de l'atakordono ĝis la plena venko la patrujo postulas de ni ĉian streĉon kaj ĉian oferon.

La komandanto-generalo de l' 33^a korpuso: Petain.

La estro de l' generalstabo (nomo nelegebla).

Precipe interesa estas la noto pri la germana defensivo ĉe la orienta fronto.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 17. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Norde de Ypern, okcidente de la kanalo apud Steenstraate kaj Het Sas, ni malokupis niajn plej antaŭajn poziciojn. La tie starantaj malfortajn taĉmentojn ni retiris al la ĉefpozicioj sur la orienta kanalbordo, por eviti perdojn per kontraŭula artileripafado. — Sude de Neuve Chapelle la Angloj defendas ankoraŭ partojn de niaj plej antaŭaj tranĉeoj, kiuj depost la antaŭhieraŭa batalo estas en ilia mano; la bataleto daŭras ankoraŭ. Norde de Arras, apud Ablain kaj Neuville, ni repuŝis francajn atakojn kun multaj perdoj de l'kontraŭulo. — Apud Ailly kaj en la Priesterwald negrandaj infanteribataloj okazis. — Niaj aersipoj sukcese atakis la milithavenojn Dover kaj Calais.

Orienta militkampoj: Ĉe le Dubissa, apud Eiragola kaj Szekiszki kaj sude de la Njemen apud Mariampol kaj Ludwinow kontraŭulaj atakoj estis repuŝataj. — Inter la rusaj kaptitoj prenitaj apud Scawle ni konstatis rekrutojn el la jaro 1916, kiujn oni ekzercadis nur kvar semajnojn.

Sudorienta militkampoj: Nia antaŭenmarŝo inter Pilica kaj supra Weichsel, same sur la fronto Sambor-Stryj-Stanislau estas daŭrigata. Apud Jaroslau kaj pli norde ni sukcesis, kelkloke transiri la San'on. Pro Przemyśl oni batalas. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 18. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Norde de Ypern, ĉe la kanalo apud Steenstraate kaj Het Sas, hieraŭ regis trankvilo. Sur la orienta kanalbordo, sudoriente de Boezinghe, kelkloke evoluis bataloj daŭrantaj ankoraŭ. Sude de Neuve Chapelle la Angloj hieraŭ kaj lastnokte vane provis, avanci plu. Ĉiuj atakoj estis repuŝataj kun multaj kontraŭulaj perdoj. Denovaj francaj atakoj apud la Lorette-altaĵo, apud Ablain kaj okcidente de Souchez malsukcesis. 170 kaptitoj restis en niaj manoj. Apud Ailly la infanteribatalo ekhaltis. Franca atako en la Priesterwald malsukcesis sub nia elflanko pafado.

Orienta militkampoj: Ĉe la Dubissa ni ree repuŝis fortajn kontraŭulajn atakojn en la regiono de Eiragola. Kontraŭ la rusaj taĉmentoj, alkondukitaj el sude de la Njemen, niaj trupoj atakis ĝenerale turnitaj al Gryszkabuda, Syntowty, Szaki. La bataloj daŭras ankoraŭ. Hieriaŭ ni kaptis 1700 Rusojn. Norde de la Wysoka nia kavalerio repuŝis la kontraŭulan. Rusaj atakoj kontraŭ Mariampol malsukcesis.

Sudorienta militkampoj: Norde de Przemyśl, sude de Jaroslau ĝis la enfluo de l'Wislok en la San'on, germanaj kaj aŭstraj-hungaraj trupoj batale transiris la San'on. La kontraŭulo plue returneniras orienten kaj nordorienten. Inter Pilica kaj supra Weichsel (apud Ilza kaj Lagow), sudoriente de Przemyśl, same en la regiono de la Stryj de hieraŭ okazas nemalgrandaj bataloj.

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 18. Majo 1915.

La unuiĝintaj trupoj atingis la orientan bordon de la San. Ĉe la supra Dnjestr fortaj bataloj okazas. Rusaj atakoj norde de Kolomea estis repuŝataj. — La sumo de la kaptitoj prenitaj dum la unua duono de l'majo kreskis al 174 000. Krom tio ni akiris 128 kanonojn kaj 368 maŝinpafilojn. La vicestro de l'generalstabo: von Hoefler.

Großes Hauptquartier, 19. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Sur la orienta kanalbordo norde de Ypern la bataloj daŭras favore al ni. Sude de Neuve Chapelle la Angloj post forta artileripafado kelkloke provis denove ataki; ili estis ĉie repuŝataj. Prenante kelkajn tranĉeojn sur la Lorette-altaĵo ni akiris 2 maŝinpafilojn. Forta franca atako kontraŭ la suda parto de Neuville malsukcesis sub nia pafado kun multaj kontraŭulaj perdoj. — En la Priesterwald la Francoj noktmeze provis ataki, sed estis retenataj per nia artilerio.

Orienta militkampoj: El la linio Shagori-Frauenburg hieraŭ antaŭeniris nemalgrandaj kontraŭulaj trupoj. Norde kaj sude de la Njemen la bataloj daŭras plu.

Sudorienta militkampoj: La Rusoj hieraŭ provis, haltigi per kontraŭatako la pluan avancadon de niaj trupoj transirintaj la San'on (norde de Przemyśl). Ĉiuj tiuj atakoj malsukcesis kun gravaj kontraŭulaj perdoj. Dum la lastaj du tagoj divizio konsistanta el Hano-veranoj kaj Oldenburganoj kaptis en la bataloj pro la San-transiro 7000 Rusojn kaj akiris 4 kanonojn kaj 28 maŝinpafilojn. Inter Pilica kaj supra Weichsel kaj sudoriente de Przemyśl la bataloj daŭras.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 20. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Malklara, nebula vetero hieraŭ malhelpis la batalagojn en Flandern kaj nordokcidenta Francujo. Sur la Lorette-altaĵo ni progresis iom. Apud Ablain nokta kontraŭula atako estis repuŝata per sendistanca batalo. — Inter Maas kaj Mosel la artileribatalo estis tre forta. Preskaŭ matene la Francoj oriente de Ailly sur larĝa fronto komencis atakon, kiu ĉie, parte per plej obstina manbatalo, estis repuŝata de ni.

Orienta militkampoj: Kun la rusaj trupoj, kiuj laŭ nia sciigo antaŭenmarŝis el sur la linio Shagori-Frauenburg, bataloj ne okazis. Ĉe la Dubissa rusaj atakoj estis repuŝataj; 900 kaptitoj kaj 2 maŝinpafiloj restis inter niaj manoj. Hieraŭ ni atakis norde de Podubis, prenis la altaĵon 105 kaj kaptis 500 Rusojn. La rusaj taĉmentoj antaŭenirantaj sude de la Njemen estis tute venkataj apud Gryczkabuda-Syntowty-Szaki. La restoj de la kontraŭulaj trupoj fugis orienten en la arbarojn. Sutki ankoraŭ estas defendata de negrandaj taĉmentoj. La sangaj perdoj de la Rusoj estis tre grandaj; tial la nombro de la kaptitoj kreskis nur al 2200. 4 maŝinpafiloj estis prenataj.

Sudorienta militkampoj: Niaj trupoj transirintaj la San'on norde de Przemyśl hieraŭ posttagmeze estis denove atakataj de Rusoj obstine batalantaj. La kontraŭulo estis ĉie repuŝata kun multaj siaj perdoj. Hodiaŭ matene ĉe unu nia alo ni kontraŭatakis kaj prenis la poziciojn de l'kontraŭulo, kiu plej rapide fugas.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 21. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Norde de Ypern koloraj Francoj nokte atakis niajn poziciojn oriente de la kanalo. La batalo tie daŭras ankoraŭ. Angla atako komencita en malfrua vespero sude de Neuve Chapelle en la regiono de La Quinque-Rue malsukcesis sub nia pafado. Nordoriente de Arras ni pafe terenigis kontraŭulan aeroplanon apud Fresnoy. Plua atako de la Francoj hieraŭ posttagmeze komencita en la arbaro de Ailly malsukcesis kun nemalgrandaj perdoj de l' kontraŭulo, kiu lasis inter niaj manoj kelkajn kaptitojn.

Orienta militkampoj: En la regiono de Scawle nur malgrandaj bataletoj okazis. Ĉe la Dubissa ni atake avancis oriente de Podubis ĝis Betygola kaj kaptis plu 1500 Rusojn. Ankaŭ oriente de Miloszajcie kaj Zemigola la Rusoj estis repuŝataj ĝis trans la rivero; pli sude la batalo staras nedecidita. La restoj el la rusaj taĉmentoj venkitaj sude de la Njemen daŭrigas sian fugon turnitaj al Kowno.

Sudorienta militkampoj: La situacio de la germanaj trupoj ne ŝanĝiĝis. Oriente de Jaroslau hieraŭ ni prenis kaptitojn armitajn ne per pafiloj, sed nur per kverklignaj bastonegoj. — La armeo de Generaloberst v. Mackensen kaj la aliaj germanaj trupoj batalantaj en la aŭstra-hungara militistaro kaptis depost la 1a de majo 104 000 Rusojn kaj prenis 72 kanonojn kaj 255 maŝinpafilojn. Ĉi tiujn nombrojn la publikigitaj sumaj nombroj jam enhavas.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 22. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Inter la ŝoseo Estaires — La Bassée kaj Arras denove okazis bataletoj. Izolaj anglaj atakoj komencitaj dum diversaj horoj estis repuŝataj sudokcidente de Neuve Chapelle; nombro da koloraj Angloj estis kaptata. Pli sude apud Givenchy oni batalas ankoraŭ. Francaj atakoj entreprenitaj hieraŭ vespere kontraŭ niaj pozicioj ĉe la Lorette-altaĵo, apud Ablain kaj Neuville malsukcesis jam sub nia pafado. Plua nokta franca atako norde de Ablain atingis niajn tranĉeojn; la batalo tie ne jam finiĝis. Escepte de tio ĉe la okcidenta fronto nur artileri-bataloj okazis sur diversaj lokoj, precipe inter Maas kaj Mosel.

— Sudokcidente de Lille kaj en la Argonnes la kontraŭulo uzis minojn kun sufokaj gasoj.

Orienta militkampoj: Okcidente de la Windau, en la regiono de Schawdiny, la kavalerio batalis; unu regimento el la rusa Ussuri-kavaleri-brigado estis pereigata. Apud Scawle kaj ĉe la Dubissa kelkaj rusaj noktaj atakoj estis repuŝataj. El la bataloj oriente de Podubis denove 300 kaptitoj venis al niaj manoj.

Sudorienta militkampoj: Nenio grava okazis.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la gazetoj de via urbo!

La eŭropa milito.
La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 24. Majo 1915.

Großes Hauptquartier, 23. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Apud Givenchy daŭras ankoraŭ sendistancaj bataloj favore al ni. Pli sude francaj atakoj apud la ŝoseo Béthune-Lens kaj sur la Loretto-altaĵo estis repuŝataj. Proksimege norde apud Ablain per la jam sciigita nokta atako la kontraŭulo sukcesis, okupi malgrandan parton de nia plej antaŭa tranĉeo. Sude de Neuville ni atake iom avancis, kaptis 90 Francojn kaj akiris 2 maŝinpafilojn. Inter Maas kaj Mosel ree fortaj artileribataloj okazis. En la Priesterwald atako de l'kontraŭulo estis repuŝata.

Orienta militkampoj: En la regiono de Scawle ni atakis la nordan rusan alon kaj venkis ĝin. 1600 kaptitoj kaj 7 maŝinpafiloj venis al niaj manoj. Dum la nokto rusaj kontraŭatakoj malsukcesis. Ĉe la Dubissa nemalfortaj noktaj rusaj atakoj kontraŭ la linio Misiuny-Zemigola estis repuŝataj; 1000 kaptitoj restis ĉe ni. Ankaŭ sude de la Njemen kontraŭula nokta atako norde de Pilzviszki malsukcesis.

Sudorienta militkampoj: Nenio nova. La armeestraro.

Orienta militkampoj: Ĉe la Dubissa, sude de Rossien, niaj trupoj atakis fortajn rusajn taĉmentojn, venkis ilin kaj repuŝis ilin ĝis trans la rivero. 2240 kaptitoj kaj 5 maŝinpafiloj estis prenataj. Pli sude la rusoj perdis 33 kaptitojn kaj 5 maŝinpafilojn. Berlin, 23. Majo 1915.

La itala registaro hodiaŭ sian ambasadoron, la dukon de Avarna, igis deklari al la aŭstra-hungara registaro, ke depost noktmezo Italujo sin trovas en stato de milito kontraŭ Aŭstrio-Hungarujo. Per tiu frivola atako kontraŭ la Danubo-monarkio la itala registaro disŝiris senrajte kaj senkaŭze ankaŭ la federacion kun Germanujo. Malgraŭ la ekŝigo de la tria konfederito kaj ties aliĝo al la partio de la malamikoj la laŭkontraktaj fidelaj rilatoj inter Aŭstrio-Hungarujo kaj la Germana Imperio, kiujn la milita kuneco faris ankoraŭ pli firmaj, restis nedifektitaj. Tial la germana ambasadoro, princo Bülow, estas komisiita, forlasi Rom'on samtempe kun la aŭstra-hungara ambasadoro barono Macchio.

La turka armeestraro sciigas: Hodiaŭ posttagmeze en la sinuso de Saros antaŭ An Burnu la angla ŝipo de linio „Triumph“ estis pafata per torpedoj kaj subakviĝis.

(Mallongigita.) Großes Hauptquartier, 24. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Kelkaj noktaj anglaj atakoj inter Neuve Chapelle kaj Givenchy, same francaj atakoj ĉe la norda deklivo de la Loretto-altaĵo, apud Ablain kaj norde kaj sude de Neuville, estis repuŝataj kun gravaj perdoj de l'kontraŭulo, kiu perdis ankaŭ 150 kaptitojn. Inter Maas kaj Mosel la artileribataloj daŭras. En la Priesterwald en nova sensukcesa atako la Francoj suferis perdojn.

Orienta kaj sudorienta militkampoj: Nenio aliĝis. La armeestraro.

[Konstruita en la jaro 1913; pezo: 12000 tunoj; ensidantoj: 700.]

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 24. Majo 1915.

Dum la nokto post la militdeklaro, inter la 23a kaj 24a de majo, nia ŝiparo atakis la italan orientan bordon inter Venedig kaj Barletta kaj sukcese bombardadis multloke objektojn gravajn por la milito. Samtempe niaj hidroplanoj ĵetis bombojn sur la aerŝiphalon en Chiaravalle, same sur la pormilitajn instalaĵojn en Ancona kaj sur la armilejojn en Venedig, per kio ili videble kaŭzis difektojn kaj brulojn. La komandantaro de la militŝiparo.

Großes Hauptquartier, 25. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: En Flandern ni daŭrigis hieraŭ niajn atakojn en la direkto al Ypern, atakprenis la biendomojn Vlaminghe kaj Bellewaarde, la kastelon norde de Wieltje kaj alproksimiĝis al Hooge. En tiuj bataloj 150 kaptitoj kaj 2 maŝinpafiloj venis al niaj manoj. — Ni sange repuŝis izolajn kontraŭulajn atakojn sude de Armentières, inter Neuve Chapelle kaj Givenchy kaj norde de la Loretto-altaĵo. Apud Neuville pro nia artileripafado kontraŭulaj trupoj, starantaj en la tranĉeo pretaj al atako, ne povis antaŭeniri. — En Cambrai per bombo ĵetita de franca aviadisto 5 Francoj estis mortigataj kaj 12 grave vundataj, kiam ili forlasis la diservon. Apud St. Quentin ni pafe terenigis kontraŭulan aeroplanon.

Orienta militkampoj: Ĉe la Dubissa, oriente de Rossienie, niaj trupoj atakis fortajn rusajn taĉmentojn, venkis ilin kaj repuŝis ilin ĝis trans la rivero. 2240 kaptitoj kaj 5 maŝinpafiloj estis prenataj. Pli sude kelkaj, parte tre fortaj rusaj atakoj el la direkto de Eiragola malsukcesis kun grandaj sangaj perdoj de la kontraŭulo.

Sudorienta militkampoj: La armeo de Generaloberst von Mackensen hieraŭ denove komencis la ofensivon norde de Przemyśl. Ree la atako plene sukcesis. La tre fortikigitaj lokoj Drohojow, Ostrow, Radymno, Wysocko, Wietlin, Makowicko kaj la altaĵoj nordokcidente de Bobrowka kaj oriente de Cetula estis atake prenataj. Ĝis nun 153 oficiroj kaj pli ol 21000 soldatoj estis kaptataj; 39 kanonoj, inter ili 9 pezaj, kaj minimume 40 maŝinpafiloj venis al la manoj de la unuiĝintaj trupoj. La Rusoj suferis eksterordinare grandajn perdojn. La armeestraro.

Konstantinopel, 25. Majo 1915.

La turka armeestraro sciigas: Hodiaŭ posttagmeze en la sinuso de Saros antaŭ Ari Burnu la angla ŝipo de linio „Triumph“*) estis pafata per torpedo kaj subakviĝis. (Mallongigita.)

Wien, 26. Majo 1915, tagmeze.

La batalo apud Przemyśl daŭras. Dum la lastaj 2 tagoj ni kaptis 25000 Rusojn kaj akiris 54 malpezajn, 10 pezajn kanonojn, 64 maŝinpafilojn kaj 14 municio-veturilojn. — En bataleto norde de la Weichsel 998 Rusoj estis kaptataj.

(Mallongigita.) La vicestro de l'generalstabo: von Hoefler.

*) Konstruita en la jaro 1913; pezo: 12000 tunoj; ensidantoj: 700.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 26. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Nokta kontraŭula atako kontraŭ nia nove akirita pozicio okcidente de la lago de Belvaarde facile estis repuŝata. La nombro de la maŝinpafiloj, kiujn ni forprenis de la Angloj, kreskis al 10. Nordoriente de Givenchy koloraj Angloj hieraŭ vespere sukcesis, preni konveksan parton de nia plej antaŭa tranĉeo. Pli sude, inter Lievin kaj la Loretto-altaĵo, la Francoj posttagmeze komencis grandan multvican atakon; ili tute malsukcesis. Norde kaj sude de la ŝoseo Souchez-Bethune la kontraŭulo komence sukcesis enpenetri niajn tranĉeojn; sed per noktaj kontraŭatakoj ni reprenis tutan nian pozicion. 100 Francoj restis kaptitaj inter niaj manoj. Ankaŭ sude de Souchez refojaj fortaj atakoj, entreprenitaj de blankaj kaj koloraj Francoj kontraŭ niaj linioj sude de Souchez, malsukcesis proksimege antaŭ niaj bariloj. La kontraŭulo ĉie suferis tre gravajn perdojn. En la bataloj apud la Loretto-altaĵo precipe sin distingis silesia infanterieregimento. Kontraŭula atako en la orienta parto de la Priesterwald facile estis repuŝata. — Sude de Lens unu nia aviadisto pafe terenigis kontraŭulan aeroplanon.

Orienta militkampoj: Kelkaj malfortaj noktaj atakoj estis repuŝataj.

Sudorienta militkampoj: La atako de la armeo de Generaloberst von Mackensen bone progresas. Sudoriente de Radymno la loko Swiete estis prenata post forta batalo. Postkiam aŭstraj trupoj estis atake prenitaj la antaŭponton pozicion okcidente de la San, ankaŭ la transiro trans la riveron oriente de Radymno estis perforte prenata. Pli norde niaj trupoj atingis post batalo la regionon oriente de Lazy, oriente de Laszky kaj la linion Korzenica-Zapalow (apud la Lubaszowka). La nombro de la prenitaj kaptitoj kaj materialo kreskas.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 27. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Neatentante la absolutan malsukceson je la 25-a de majo la Francoj denove provis rompi nian fronton inter Vermelles kaj la Loretto-altaĵo. Sur fronto nur 10 km larĝa tre fortaj taĉmentoj atakis, sed ĉie estis repuŝataj. Ni defendis ĉiujn niajn poziciojn. Tre granda nombro da francaj mortigitoj kuŝas antaŭ la germanaj tranĉeoj. Plua franca atako en malfrua vespero estis entreprenata kontraŭ la linio Souchez-Neuville. Tie proksimege sude apud Souchez la batalo ne jam estas finita. Apud la tombejo de Neuville la Francoj starante fosis, uzante kiel sirmilon Germanojn kaptitajn en la antaŭaj bataloj. Dum patrolo norde de Dixmude ni kaptis 1 oficiron kaj 25 Belgojn. Negrandaj kontraŭulaj atakoj apud Soissons kaj en la Priesterwald estis repuŝataj. Elare ni atakis kun sukceso la fortikajojn de Southend ĉe la malsupra Themse.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

Sudorienta militkampoj: Nordoriente de Przemysl kaj en la regiono de Strij la atako de niaj trupoj bone progresas. La akiraĵo kaj la kromaj rezultatoj ne jam estas takseblaj.

La armeestraro.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 27. Majo 1915, tagmeze.

Nordorienta militkampoj: Oriente de Radymno trupoj el nia 6a korpuso atake prenis la lokon Nienowice kaj la altaĵon Horodysko, kaptis 2000 Rusojn kaj prenis 6 kanonojn. Sudoriente de Przemysl la unuiĝintaj trupoj en la regiono de Hussakow sukcesis, enpenetri la kontraŭulan ĉefpozicion kaj repuŝi la Rusojn. 2800 Rusoj estis kaptataj, 11 maŝinpafiloj prenataj. La bataloj daŭras.

Sudokcidenta militkampoj: Apud Caprile en la Cordevole-valo 2 italaj kompanioj estis pereigataj per la pafado de niaj maŝinpafiloj. En la Küstenland*) la Italoj sur kelkaj lokoj transiris la limon. Kontraŭulaj taĉmentoj proksimegen antaŭenirintaj al niaj pozicioj estis repuŝataj. (Mallongigita) La vicestro de l'generalstabo: von Hoefler.

Großes Hauptquartier, 28. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: La korpuso staranta nordoriente de la Loretto-altaĵo centre de la kontraŭulaj provoj, rompi nian fronton, kaptis depost la 9a de majo 14 oficirojn kaj 1450 Francojn kaj prenis 6 maŝinpafilojn. Sudoriente de la Loretto-montdorso la Francoj hieraŭ vespere komencis denove izolajn atakojn, kiuj estis repuŝataj. Apud Ablain la bataletoj daŭras ankoraŭ. Ankaŭ en la Priesterwald la kontraŭulo atakis hieraŭ vespere je la 7a post longa artileripafado. Okazis fortegaj noktaj bataloj, kiuj finiĝis per grava malvenko de la Francoj. En la Vogesen la kontraŭulo sukcesis, okupi malgrandan tranĉepecon sudokcidente de Metzeral. Franca atako ĉe la Reichsackerkopf norde de Mühlbach facile estis repuŝata. — 18 francaj aviadistoj atakis hieraŭ la nefortikigitan urbon Ludwigshafen. Per ĵetitaj bomboj kelkaj civiluloj estis mortigataj kaj vundataj; objektoj nur malmulte estis difektataj. La kirasa kondukanta aeroplano devis surteriĝi oriente de Neustadt a. d. H. Tiel ni kaptis majoron, la komandanton de l'aeroplana eskadro de Nancy. Niaj aviadistoj en aerbatalo apud Epinal ĉerenfaligis francan aeroplanon kaj ekbruligis la kazernon en Gérardmer.

Orienta militkampoj: Ĉe la Dubissa niaj trupoj denove ekavancis. Atako entreprenita ambaŭflanke de la ŝoseo Rossienie-Eiragola bone sukcesis; ni kaptis 3120 Rusojn. Krom tio ni repuŝis sur diversaj lokoj rusajn noktajn atakojn.

Sudorienta militkampoj: Por haltigi la antaŭenmarŝon de la unuiĝintaj trupoj la kontraŭulo provis, helpe de novaj trupoj alkondukitaj de aliaj militejoj ekataki sur diversaj lokoj dekstre de la San. La provoj malsukcesis. Nur en la regiono de Sieniawa nefortaj niaj taĉmentoj estis repremataj al la maldekstra San-bordo; 6 kanonoj ne ĝustatempe povis esti returntransportataj. En la regiono nordoriente de Przemysl, ambaŭflanke de la Wisznia ni daŭre avancis bone. Al la akiraĵo publikigita la 25 an de majo aliĝis proksimume 9000 kaptitoj, 25 kanonoj kaj 20 maŝinpafiloj. La armeestraro.

T. e. Ĉeborda lando (nomo de aŭstra provinco).

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 29. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Postkiam ni estis atake repuŝintaj la Francojn kaj forprenintaj de ili kaptitojn, ili hieraŭ komencis kun tre multnombraj trupoj kontraŭatakon laŭlonge de la soseo Bethune-Souchez, sed kun nemalgravaj perdoj estis repuŝataj de la tuta fronto. Neatentite de l'kontraŭulo ni nokte retiris el la orienta parto de Ablain al la plej proksima malantaŭa linio la okupantaron, kies plua restado en la tiea eksponita pozicio senutile estus postulinta sangperdojn. Sude de Souchez hieraŭ vespere franca atakprovo estis malebligata per nia pafado. La kastelo Le Carieul sude de Souchez estas de ni defendataj, malgraŭ la aserto de la Francoj, ke ili ĝin okupis. Sudoriente de Neuville ni facile repuŝis kontraŭulajn atakojn preparitajn per ĵetitaj minoj kaj mangrenadoj. — En la Priesterwald, nordokcidente de Pont-à-Mousson, la Francoj ŝajne preparis — kiel je la 27a de majo vespere — nemalgrandan atakon. Nia pafado malebligis la efektivigon. Izolaj noktaj atakoj de l'kontraŭulo estis sange repuŝataj. — Niaj aviadistoj ĵetis bombojn sur la fortikigitajn urbojn Gravelines kaj Dünkirchen, same sur la etapon St. Omer; ili kelkfoje trafis kontraŭulan aviadejon nord-oriente de Fismes.

Orienta militkampoj: Apud la supra Dubissa la Rusoj sensukcese atakis sudoriente de Kuetowiany kaj Kielmy. Dum la pluaj bataloj apud la malsupra Dubissa la kontraŭulo multloke estis pelata al la kontraŭa bordo. Dum la persekutado ni plue prenis 380 kaptitojn.

Sudorienta militkampoj: Niaj trupoj alŝoviĝis plu al la norda fronto de Przemyśl. Ĉe la fronto inter Wysznia kaj Lubaczowka (oriente de Radymno kaj Jaroslau) la Rusoj kelkfoje faris fortegajn izolajn atakojn; ili estis ĉie repuŝataj kun gravaj siaj perdoj. — La 179a rusa infanteri-regimento estas pereigita. Okcidente kaj sude de Sieniawa la kontraŭulo ĉesis ataki.

Apud Scawle la kontraŭulo estis repuŝata kun gravaj siaj perdoj.

La armeestraro.

Sudorienta militkampoj: Atakante germanajn trupojn ĉe la malsupra Lubaczowka — nord-oriente de Jaroslau — la Rusoj estis repuŝataj.

La armeestraro.

Konstantinopel, 28. kaj 29. Majo 1915.

Hieraŭ antaŭtagmeze apud Sigindars de multaj lokoj estis observate, ke angla ŝipo de linio estis torpedata. Apud la ŝipo leviĝis grandega akvoamaso, kaj la ŝipo kliniĝis flanken. Alia militsipo ĝin trenis al la insulo Embros. La kontraŭulo timante pluajn atakojn retiris ĉiujn militsipojn (escepte de kelkaj kontraŭ-torpedoboatoj) de la Dardanellen-enirejo kaj kaŝis ilin en sinusojn de l'Egea Arkipelago.

La angla ŝipo de linio laŭŝajne apartenanta al la „Agamemnon“-kategorio*) estis torpedata de germana submara boato. La ŝipo transportita al Embros malaperis, oni ne scias kien.

(Mallongigita.)

*) Pezo: Proksimume 16000 tunoj; ensidantaj: 750.

*) cerni: Eksternaj, ĉirkaŭ fortikaĵoj, por premi ilin.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Wien, 30. Majo 1915, tagmeze.

Rusa militkampoj: La Rusoj vane provis, transiri la San-riveron apud kaj malsupre de Sieniawa. Medyka apud la fervojo Przemysl-Grodek (-Lemberg) estas sub la pafoj de nia peza artilerio. Je la 27-a de majo trupoj el la 6-a korpuso denove prenis 8 rusajn kanonojn. La unuiĝintaj trupoj elnorde kaj elsude alŝovis la cernantan*) linion pli proksimen al la fortikaĵo Przemysl.

Itala militkampoj: Kontraŭulaj trupoj enmarŝis en Cortina. Sed iliaj esplorantaj taĉmentoj fugis post la unua kanonpafado. Niaj patroloj senpene repuŝis provojn, transiri la Isonzo-riveron apud Monfalcone. (Mallongigita.) La vicesro de l'generalstabo: von Hoefler.

Großes Hauptquartier, 30. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: Post 10 hora artileripafado la Francoj noktmeze atakis oriente de la Yser-kanalo nian pozicion norde de la D'Houdt-biendomo. Ĉe la tuta fronto la atako estis repuŝata kun gravaj kontraŭulaj perdoj; nombro da Zuavoj el 4 diversaj regimentoj estis kaptata. — Inter La Bassée-kanalo kaj Arras nur artileribataloj okazis. Apud la ŝoseo Béthune-Souchez ni kaptis kelkajn dekduojn da nigraj Francoj, kiuj estis kaŝintaj sin en arbareto. La unuiĝintoj kiel kutime bombardadis la vilaĝojn malantaŭ nia fronto kaj pereigis per tio multajn senkulpajn viktimojn inter la tie restadintaj francaj virinoj kaj infanoj, kiuj pro amo al siaj hejmoj ne forlasis ilin.

Orienta militkampoj: Apud Illoky 60 km sudoriente de Libau nia kavalerio repuŝis kontraŭulan taĉmenton norden kaj nordorienten. Pro surpriza rusa atako negranda germana taĉmento malokupis la lokon Sawdyniky ĉe la Dubissa; 4 kanonoj venis al la manoj de l'kontraŭulo. Alvenintaj niaj helpaj trupoj reprenis la vilaĝon kaj repuŝis la kontraŭulon. Apud Scawle la kontraŭulo estis repuŝata kun gravaj siaj perdoj.

Sudorienta militkampoj: Atakante germanajn trupojn ĉe la malsupra Lubaczowka — nord-oriente de Jaroslau — kaj apud Stryj la Rusoj suferis gravajn perdojn. La armeestraro.

Wien, 31. Majo 1915, tagmeze.

Rusa militkampoj: En la regiono de Stryj unuiĝintaj trupoj post forta batalo atake prenis kelkajn vilaĝojn kaj akiris rusan baterion.

Itala militkampoj: Hieraŭ antaŭtagmeze la atako de Alpini-regimento kontraŭ niaj fortikaĵoj sur la ebena apud Lavarone estis sange repuŝata. Nordoriente de Paneveggio kontraŭula taĉmento komencis fosi, sed tuj returneniris, kiam niaj patroloj pafis. Oriente de Karfreit la kontraŭulo vane provis, surpriniri la deklivojn de l'Krn.

(Mallongigita.)

La vicesro de l'generalstabo: von Hoefler.

*) cerni: Eksiegi, ĉirkaŭi fortifikacion, por preni ĝin.

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 31. Majo 1915.

Okcidenta militkampoj: La Francoj hieraŭ kun fortaj taĉmentoj provis rompi nian fronton norde de Arras kaj en la Priesterwald. Apud Arras la kontraŭulo dum la lastaj tagoj estis avancinta per fosoj ĉe la fronto Nouville-Roclincourt; ĉar ĉiuj provoj, peli nin pli norde el niaj pozicioj, estis malsukcesintaj, ni atendis atakon ĉe tiu ĉi linio. Ĝi estis entreprenata post kelkhora artileripafado hieraŭ posttagmeze kaj finiĝis sekve de la braveco de rejnaj kaj bavaraj regimentoj per absoluta malvenko de l' kontraŭulo, kiu suferis perdojn eksterordinare grandajn. En la Priesterwald la Francoj sukcesis nur enpenetri kelkajn antaŭajn tranĉeojn malforte defendatajn; escepte de tio la kontraŭula atako ankaŭ tie malsukcesis. — Apud Ostende ĉeborda baterio pafe terenigis kontraŭulan aviadiston. Nia artilerio hieraŭ ree detruis per malmultaj pafoj la fervojan viadukton apud Dammerkirch, post kiam antaŭ kelkaj tagoj la Francoj post kelkmonata laboro estis sukcesintaj, ree igi ĝin uzebla.

Orienta militkampoj: Nenio grava okazis.

Sudorienta militkampoj: Batalante ĉirkaŭ Przemyśl la germanaj trupoj hieraŭ alproksimiĝis plu al la norda kaj nordorienta frontoj. La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 1. Junio 1915.

Okcidenta militkampoj: Post la malvenko sude de Neuville je la 30^a de majo la Francoj denove provis rompi nian fronton pli norde. Iliaj atakoj, entreprenitaj sur fronto 2½ km larĝa kontraŭ niaj pozicioj inter la ŝoseo Souchez-Béthune kaj la Carency-rivereto, preskaŭ ĉiuj malsukcesis jam sub nia pafado kun grandaj iliaj perdoj; nur okcidente de Souchez okazis sendistanca batalo, en kiu ni venkis. — En la Priesterwald niaj trupoj sukcesis, rekonkeri preskaŭ ĉiujn tranĉepecojn antaŭhieraŭ perditajn. La kontraŭulo ree suferis grandajn perdojn. — Ĉe la aliaj frontpartoj nia artilerio kontentige sukcesis. Sekve de centropafado en la franca tendaro sude de Mourmelon le Grand 300–400 ĉevaloj malligis sin kaj ekforkuregis ĉiufanken. Multaj veturiloj kaj aŭtomobiloj plejrapide forveturis. Norde de St. Menhould kaj nord-oriente de Verdun municio-provizado de l' kontraŭulo eksplodis. — Responde al la bombardado de la nefortikigita urbo Ludwigshafen ni ĵetis lastnokte multajn bombojn sur la ŝipfarejojn kaj apudkajajn magazenojn de London. Kontraŭulaj aviadistoj lastnokte elĵetis bombojn super Ostende, sed escepte la difekto de kelkaj domoj ili kaŭzis nenium malutilon.

Orienta militkampoj: Apud Amboten, 50 km oriente de Libaŭ, germana kavalerio repuŝis la 4^{an} rusan dragono-regimenton. En la regiono de Scawle kontraŭulaj atakoj estis senrezultataj. — Dum la majo estis prenataj: Norde de la Njemen 24 700 kaptitoj, 16 kanonoj, 47 maŝinpafiloj; inter Njemen kaj Pilica 6943 kaptitoj, 11 maŝinpafiloj, 1 aeroplano.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 1. Junio 1915.

Sudorienta militkampoj: Ĉe la norda fronto de Przemyśl bavaraj trupoj hieraŭ atake prenis la fortifikajetojn 10a, 11a kaj 12 (apud kaj okcidente de Dunkowiczky) kun 1400 restintaj ensidantoj kaj 2 kirasaj, 18 pezaj kaj 5 malpezaj kanonoj. Grandare atakante niajn poziciojn oriente de Jaroslau la Rusoj provis, eviti tiun fatalan sorton; sed ĉiuj penoj restis sensukcesaj. Grandegaj aroj da mortigitoj kuŝas sur la batalejo antaŭ nia fronto. — El la armeo de generalo von Linsingen la konkerintoj de l' Zwinin — gvardianoj, Orientprusanoj kaj Pommeranoj komandataj de la bavara generalo grafo Bothmer — atake prenis la tre fortikigitan urbon Stryj kaj la rusan pozicion ĉe kaj nordokcidente de ĝi. Ĝis nun 53 oficiroj, 9182 soldatoj, 8 kanonoj kaj 15 maŝinpafiloj estis prenataj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 2. Junio 1915.

Okcidenta militkampoj: Apud Bixschoote, nordoriente de Steenstraate, ni pafe terenigis anglan aeroplanon; la ensidantoj, 1 belga kaj 1 angla oficiroj, estis kaptataj. — La sukerfabrikejo okcidente de Souchez, en kiun la Francoj enpenetris hieraŭ posttagmeze, estis reprenata de ni. Vespera franca atako kontraŭ niaj pozicioj ĉe kaj sude de Neuville estis repuŝata; nur malpranda tranĉepeco transe de la ŝoseo Neuville-Ecurie estis okupata de l' kontraŭulo. En la Priesterwald la sendistanca batalo pro kelkaj tranĉepoj daŭras ankoraŭ.

Orienta militkampoj: Apud Neuhausen, 50 km nordoriente, kaj apud Shidiki, 65 km sudoriente de Libau, okazis sukcesaj bataletoj kontraŭ negrandaj rusaj taĉmentoj, same pli sude en la regiono de Scawle kaj ĉe la Dubissa, sudoriente de Kielmy, inter Ugiany kaj Eiragola. Apud Scawle ni kaptis 500 Rusojn.

Sudorienta militkampoj: Hieraŭ apud Dunkowiczky 2 pluaj fortifikajetoj de Przemyśl estis prenataj. Post la venko apud Stryj la unuiĝintaj trupoj avancis hieraŭ kontraŭ Medenice. — En la monato majo sur la sudorienta militkampoj 863 oficiroj kaj 268 869 soldatoj estas kaptitaj, 251 kanonoj kaj 576 maŝinpafiloj prenitaj. El tio sole la unuiĝintaj trupoj komandataj de Generaloberst von Mackensen prenis 400 oficirojn, inter ili 2 generaloj, 152 254 soldatojn, 160 kanonojn, inter ili 28 pezaj, kaj 403 maŝinpafilojn. **Sekve la nombro de la Rusoj (inklusive la hieraŭ publikigitaj nombroj de kaptitoj prenitaj sur la orienta militkampoj) kaptitaj de la unuiĝintaj trupoj en la monato majo estas proksimume 1000 (mil) oficiroj kaj pli ol 300 000 (tricent mil) soldatoj.**

La armeestraro.

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Großes Hauptquartier, 3. Junio 1915.

Okcidenta militkampoj: Pro Hooge (ĉirkaŭ 3 km oriente de Ypern), kiu estas tre fortigita de la defendantaj Angloj, batalo komenciĝis, kiu daŭras favore al ni. Devigite ni detruis hieraŭ la turon de la Martin-preĝejo en Ypern, sur kiu ni vidis observantojn de la kontraŭula artilerio. En la regiono norde de Arras la bataloj ree estis tre viglaj ĉe la fronto Souchez-Neuville kaj sude de tie. Posttagmeze kaj nokte la Francoj tie provis nemalgrandajn atakojn, kiuj kelkloke kaŭzis fortegajn sendistancajn batalojn. La Francoj ĉie suferis plej gravajn perdojn, sed neniel sukcesis. Pro la sukerfabrikejo apud Souchez oni batalas ankoraŭ. — La pafado de la franca artilerio kontraŭ la vilaĝoj kuŝantaj malantaŭ nia pozicio pereigis ankaŭ hieraŭ multajn viktimojn el la francaj enloĝantoj. Ekz. en Angres 5 viroj, 15 virinoj, 10 infanoj kaj en Méricourt 2 virinoj estis mortigataj aŭ vundataj. — En la Priesterwald la bataloj ne jam estas finitaj. En la Vogesen niaj aviadistoj ĵetis bombojn sur la etapon kaj fervojokrucejojn Rémiremont kaj sur kontraŭulajn bivakojn apud Hohneck. Negrandaj izolaj bataletoj okazis lastnokte en la regiono de la Fecht-valo apud Metzeral.

Orienta militkampoj: La stato ne ŝanĝiĝis.

Sudorienta militkampoj: Postkiam nokte sur la norda fronto ni estis atake prenitaj sur la norda fronto la fortifikajetojn ankoraŭ defendatajn, **ni prenis hodiaŭ matene la fortifikajeton Przemysl.** La akiraĵo ne jam estas taksebla. Kontraŭatakoj de la Rusoj kontraŭ la atakantaj taĉmentoj kaj niaj pozicioj oriente de Jaroslau tute malsukcesis. — La armeo de generalo von Linsingen avancis en la direkto al Zydaczow, nord-oriente de Stryj, kaj batalas pro la teritorio ĉe la Dnjestro okcidente de Mikolajow. La akiraĵo el la batalo apud Stryj kreskis al 60 oficiroj, 12175 soldatoj, 14 kanonoj, 35 maŝinpafiloj.

La armeestraro.

Großes Hauptquartier, 4. Junio 1915.

Okcidenta militkampoj: Escepte de kelkaj domoj ĉe la okcidenta rando la kastelo kaj vilaĝo Hooge (oriente de Ypern) estas atake prenitaj de ni. Anglaj kontraŭatakoj estis sange repuŝataj. Oriente de Givenchy hieraŭ vespere anglaj trupoj sukcesis, enpenetri nian pozicion; per kontraŭatako ni reelpuŝis la kontraŭulon kun multaj liaj perdoj. Ni akiris 3 anglajn maŝinpafilojn. La pozicio estas tute sub nia mano. — Post batalo alterne sukcesa por ambaŭ partioj la sukerfabrikejo apud Souchez estas de ni okupita; apud la fervojo okcidente de Souchez la batalo daŭras ankoraŭ. Forta atako kontraŭ niaj tranĉeoj apud kaj norde de Neuville malsukcesis sub artileripafado. De la lasta nokto sendistancaj bataloj daŭras sude de Neuville. En la Priesterwald la batalo estas finita. Ni sukcesis, repreni la plej multajn el la perditaj tranĉeoj.

Orienta militkampoj: Nia kavalerio elpuŝis rusajn taĉmentojn el la vilaĝoj Lenen kaj Schründen 60 kaj 70 km oriente de Libau. El la regiono de Rawdsjany, okcidente de Kurŝchany, kaj apud Sawdyniki, ĉe la Dubissa, kontraŭulaj atakoj malsukcesis.

(Daŭrigo sur folio 151.)

Rondirigu tiun ĉi folion inter viaj amikoj!
Zorgu, ke la teksto estu presata en la ga-
zetoj de via urbo!

La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

(Daŭrigo.)

Sudorienta militkampoj: Post batalo nijaj trupoj atingis la lokojn oriente de Przemyśl kaj nordoriente la linion Bolastraszyce – Torki – Podciace – Starcawa. La akiraĵo prenita en Przemyśl ne jam estas konstatita. — Kaptitoj el plej diversaj trupoj eldiris, ke en la nokto de l' 2a al 3a de junio — en kiu Przemyśl estis prenata — la Rusoj estis komencontaj universalan atakon kontraŭ la tuta fronto de la armeo de Generaloberst von Mackensen. Ĉi tiu ofensivo komenciĝante jam tute malsukcesis 22 km oriente de Przemyśl germanaj trupoj komandataj de generalo von der Marwitz prenis atake la altaĵojn ambaŭflanke de Myslatyce. La armeo de generalo von Linsingen estas transironta la malsupran parton de l' Stryj nord-oriente de la samnoma urbo. La armeestraro.

Berlin, 5. Junio 1915.

Je la 4a de junio germana submara boato mergis rusan mino-krozŝipon el la „Amur“-kategorio apud Baltisch Port. — Nokte inter la 4a kaj 5a de junio nijaj marino-aerŝipoj atakis la fortikigitan marenfluejon de la Humber kaj la militŝipan helpejon Harwich. Sur la havenajn instalaĵojn multaj bomboj bonsukcese estis ĵetataj. Oni observis multajn fortajn bruladojn kaj eksplodojn, inter ili precipe fortan eksplodon de gasujo aŭ oleujo. Plue bomboj estis ĵetatoj sur fervojan stacion. — Nijaj aerŝipoj estis forte pafataj de ter- kaj ŝipkanonoj, sed ne estis trafataj; ili revenis nedifektitaj. La vicestro de l' admiralstabo: Behncke.

Konstantinopel, 5. Junio 1915.

Je la 30a de majo germana submara boato nokte atakis kontraŭulan ŝipon proksime apud la Strato-insuloj, sude de Lemnos, torpedis kaj mergis ĝin. Oni ne povis konstati, al kiu kategorio ĝi apartenis. — Nokte inter la 3a kaj 4a de junio franca ŝipo serĉanta minojn subakviĝis antaŭ Smyrna sekve de eksplodo.

Großes Hauptquartier, 5. Junio 1915.

Okcidenta militkampoj: Pro la ruinoj de la sukerfabrikejo apud Souchez oni batalas plu; nun ĝi estas sub la manoj de la Francoj. La kontraŭulaj atakoj apud Neuville estis repuŝataj. La aerŝipo-haveno Dommartemont apud Nancy estis bombardata.

Orienta militkampoj: Post la rusaj atakoj hieraŭ repuŝitaj apud Rawdijany kaj Sawdyniki nijaj trupoj avancis, repuŝis la kontraŭulon, kiu malokupis la antaŭponton pozicion Sawdyniki, kaj prenis 1970 kaptitojn. Pli norde apud Popeljany okazis rajdistaj bataloj favoraj al ni.

Sudorienta militkampoj: Oriente de Jaroslau la stato ne ŝanĝiĝis. Oriente de Przemyśl la trupoj de generalo von der Marwitz kune kun aŭstraj-hungaraj taĉmentoj estas avancantaj kontraŭ Mosziska. La armeo de generalo von Linsingen repuŝis la kontraŭulon ĝis Kalusz kaj Zurawno (ĉe la Dnjestro). La armeestraro.



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes



Residencia
de los estudiantes

N Archivo

12045

JMCO OK


Título

Partes oficiales de la Guerra de los imperios Centrales, en Esperanto desde 1 de Octubre 1914 a 5 de Junio 1915.

Tipo de objeto Cuadernillo

Nº de Objetos

1



Desc Docum. (cómo es)

Cuadernillo de 140 páginas de papel amarillo imprenta, cosido a mano, portada escrita a mano, en tinta negra. Rúbrica del autor en tinta negra y sello en tinta violeta.

Descrip. Cont. (qué dice)